


OFICIALA ORGANO de LA A.E.A.

La Ronda.



Jan 1942

No 16

Eldonita de F.R. Banham,  
2 Banchory St. Essendon W.5. Vic. AUSTRALIA.

REDAKTORA BABILADO.V I Z I O .

Ju pli mallume en la mondo,  
Des pli laboru ni por "Rondo";  
Ankaŭ ĝi la sanktan flamon  
Gardas tra la uraganon.

Fidon havu, amikaro,  
Al promes' pri jubilaro --  
Vortoj de profet' inspira  
Pri socio juste-ira.

Venos baldaŭ suno hela;  
Lumos ĝi al tero bela.  
H omoj jam el tim' liberaj,  
Homoj vorte, age veraj,  
Unu al alia premos  
Manon, kiu amon semos.  
Manon frate prenos mano:  
Ne plu viktim' sub kalkano.  
Venu, sun' kuraca, venu,  
Kaj nin afliktatojn benu!

vidi la ceterajn kostojn. El 25 pagemaj anoj tio portus 37ŝ 6p. Dum jaro ni uzas por la Traduka Kurso almenaŭ 24 stencililojn, se ne paroli pri papero, maŝinrubandoj k.a. Kalkulu mem: kiel malfacile estas la tasko eviti deficiton ankaŭ sur tiu kampeto de utila laboro.

Ni salutas ĉiun je la sojlo de nova jaro! Malgraŭ la animprema aspekto de la disŝirata socio, ni tenu viva la flamon de l' espero.

Tiu Decembra numero ja ĝin blv- incitis, ĉu ne? Imagu nur, kiom da pacienca, fidriĉa laboro devis direktiĝi al la produktado de tiel bela eldonajo! Ni rekompencu la fabrikintojn per fidela subteno tra la nuna jaro, akurate abonante, laŭpove donacante, tiel ebligante al ili fronti novajn postulojn. La pli alta poŝtkosto devigas nin eĉ pli funde en la kaso serĉi. Sed kun via lojalo ni ne rezignos.

Ĝuste pro tiu plialtigo ni devas levi la kotizon de la Traduka Rondo ĝis tri ŝilingoj jare. La poŝto el tiu manĝas duonon, lasante nur po dekok pencojn el ĉiu membro por lik-

----- F.R.B.

UNU PLENPLENA HORO.

(El la Australia Literaturo.)

La 30an de Marto 1778 okazis grandega ekscito en Parizo, la plej ekscitiĝema urbo en la mondo. Jam de longaj jaroj tian kirliĝon oni ne vidis, tian zumon, tiajn vivu-antaĵajn svarmojn en la stratoj, aŭ havis tiel fortan senton, ke gravaj eventoj disvolviĝas. "Ĝi estas la lasta granda publika bruco en Parizo sub la malnova reĝimo", skribis Lord Morley. "La sekvanta granda bruco, kiun devas kroniki la historiisto, estas la neniam forgesbla dek-kvara tago de Julio dekunu jarojn poste, kiam falis la Bastilo, kaj komenciĝis por Francujo nova ordo kaj por tuta Eŭropo novaj problemoj." Pro kio la homamasojn tiel tumultis tiu ekscito, kiun eĉ tiel sobra verkisto kiel Lord Morley komparas kun la ekscito kaŭzita de tiu mondskua faro -- la renverso de la Bastilo?

Se hazarde vi estus troviĝinta en Parizo tiun tagon kaj starus ie inter la Academie kaj la Comédie Française, vi aŭdus la tumulton kaj la kriegadon proksimiĝantaj pli kaj pli ĝis vi estus meze de densega amaso kaj senĉesa muĝo. La amaso elgorgadis la nomon de iu

homo; kaj se vi estus bonŝanca, aŭ sufiĉe vigla por grimpi stratlant-  
 ernon, vi eble povus ekvidi la homon mem dum lia kaleŝo malrapide  
 moviĝis tra la maro da bruanta popolo. Eta maljuna viro, nekredible  
 malgrasa kaj velkinta, en ruĝa jako substofita per ermeno, kun viz-  
 aĝo duonkaŝita per granda nigra peruko laŭstila de Ludoviko XIV.  
 Nia propra ŝtatviro, Sir Henry Parkes, kutimis sin amuzi, elpensante  
 trafajn mokpriskribojn pri siaj oponentoj dum li paroladis. Unu el  
 tiuj inspiriĝoj -- de kiu la trafito neniam povis sin apartigi --  
 estis: velkinta tarantulo. Per tiu ĉi oni povus doni iom tre bonan  
 bildon ankaŭ de la vireto, se ni prave kredas al tiamaj pentristoj.  
 Lia vizaĝo pensigis pri animita kadavro. Sed liaj okuloj brilis per  
 eksterordinara lumo, kaj en lia rideto dancis ĉia petolanta malico.  
 Li havis 84 jarojn, sed aspektis kvazaŭ la paso de 1' tempo neniel  
 forprenus de lia povo ironie ĝui la spektaklon de homa malsaĝeco.

Li naskiĝis en Parizo kaj estis Parizano ĝisoste; sed Parizo  
 estis por li malagrabra patrinurbo. Jam du periodojn li trasidadis  
 en la Bastilo -- unu por dekunu monatoj -- kaj pli ol unu fojon li  
 estis ekzilita for de Francujo (Li loĝis preskaŭ tri jarojn en Angl-  
 ujo). Ofte li devis kaŝi sin en la urbo kaj kelkfoje evitis mallib-  
 erigon nur per fuĝo el ĝi. Li glitis en sennombrajn malfacilojn kaj  
 faris nekalkuleblajn malamikojn inter la riĉaj kaj potencaj. La  
 lastajn 27 jarojn li ne enpaŝis en sian naskurbon. Dum lia foresto,  
 tiu loko jam vekigis ĝis sento de lia graveco. Oni jam ĝenerale  
 konfesis lin la plej fama vivanta Franco, homo, pri kiu aliaj nacioj  
 honoras Francujon. Li jam fariĝis kvazaŭ Eŭropa institucio. Al lia  
 ekzilejo pie iradis pilgrimantoj, ĉiun tagon de la jaro, el ĉiu lando  
 en Eŭropo.

Tiujn 27 jarojn li loĝis ĉe Ferney, vilaĝeto sur la Franca flanko  
 de la Svisa landlimo. Li posedis bienon ankaŭ sur la alia flanko de  
 la limo. Lia plano estis: kiam li sukcesis piki la Francan registar-  
 on en danĝeran koleron, salteti en Svisujon, kaj kiam Svisa registaro  
 fariĝis minaca, reen salti en Francujon. Evidente, estis nepre ne-  
 cese, ke li ne kverelu kun la du registaroj samtempe. Sed la Franca  
 registaro ne grave agis kontraŭ li, kaj li komforte loĝis 27 jarojn  
 ĉe Ferney, kie li sukcesis en rimarkinda afero, nome, teni tutan Eŭ-  
 ropon interesita en li, ĝis fine li akiris, laŭ frazo de unu sia bio-  
 grafo, "prestigon kaj influon, kiujn eble neniam posedis iu alia  
 homo, kies potenco estis la nepalpebla potenco de la vortoj." Ĉar  
 tiu maljuna vireto kun la kadavra vizaĝo, brilaj okuloj kaj maltrank-  
 viliga rideto, dum tuta vivo estis batalanto, kaj nura atakilo estis  
 la plumo.

Liaj kuracistoj informis lin, ke se li daŭrigus siajn nunajn viv-  
 kutimojn kaj regule prenis sian tason da kaĉo, ili promesus ankoraŭ  
 dekon da vivjaroj; sed fariĝis nesubpremebla la deziro vidi Parizon  
 ankoraŭ unu fojon, ricevi la omaĝon de tiu urbo, de kiu li tiom akre  
 suferis. Li sciis la riskojn, sed li elektis la plenplenan horon de  
 glora vivo. El siaj multaj vojaĝoj, li ekiris sur la lasta, kiu est-  
 is pli vere triumfa progresiro ol fariĝis al ajna alia literaturisto  
 de post la mondkomenco. Oni sentas plezuron imagi, ke se Byron estus  
 vivanta ankoraŭ 40 jarojn kaj tiam revenus al London, ankaŭ li vidus  
 ĉirkaŭ si similan flamon de gloro. Sed pri tio ĉi ekzistas dubo.

La Angla temperamento estas pli flegma ol la Franca. La Brita homamaso posedas ĝis pli forta grado ol la Franca, la valoregan povon, teni sin ne tro ekscitita. Sed, aliflanke, ĝi ne estas tiom preta montri grandaniman entuziasmon. Krome, la Angloj ne tre ŝatas la literaturon.

La vojaĝo tra Francujo estis antaŭgusto de tio, kio devis esti lia en Parizo. La novaĵo pri lia veno antaŭkuris lin de urbo al urbo. Ĉe Bourg li devis kaŝi sin en ŝlosita ĉambro por eviti la tro febran amason. Ĉe Dijon, en la hotelo, kie li loĝis, junaj viroj subaĉetis la servistojn lasi ilin vesti sin kelnere, por ke ili havu eblon ekvidi la patriarkon de Ferney. Ĉe la pordoj de Parizo, kie lia kaleŝo devis halti por la dogana ekzameno, unu el la soldatoj rekonis lin, kaj la malkovro fluge-kuris tra la urbo kiel fajra kruco. (1) (vidu p. 48.)

Fine de Marto li jam kelke da semajnoj loĝis en Parizo, kaj la tumulto kreskis anstataŭ moderiĝi. La eklezia partio ne partoprenis, ĉar li estis ilia akra kontraŭanto; kaj Versailles grimacis malaprob-on, ĉar tiu vireto, malgraŭ lia amikeco kun du Eŭropaj monarĥoj, facile mokadis ĉian aŭtoritaton. Sed la reĝaj princoj, motivitaj de scivolemo, iris en la ĉefurbon por rigardi la strangan spektaklon de tiom da spontanea entuziasmo, kaj eble demandis al si: Pri kio agas?

Ŝajnis, ke la amaso kunvenis ekster lia hotelo por nedefinite longa tempo.

En la granda tago, je la 4a posttagmeze, li veturis tra hura-antaj amasoj, al la ĉefkonstruo de la Academie en la Cour du Louvre. Tiu respektinda korporacio -- aŭ, pli ĝuste, ĉiu ĝia membro kiu ne estis ekleziano -- elvenis por saluti lin, honoron, kiun neniam antaŭe faris ili al alia vizitanto, eĉ ne por fremdaj monarĥoj. Ili proponis al li la prezidulan seĝon, kaj, kun ora ĝentileco, deklaris, ke ili neniel povus lasi lin suferi la lacigon de paroladfaro. Li tie sidis, dum d'Alembert, en ĉies nomo, faris al li omaĝon tiaman-iere, ke la okuloj de la vireto perlis je larmoj.

Kiam la afero finiĝis, li veturis trastrate al la Comédie, kie teatraĵo, la lasta tragedio de li, devis prezentiĝi. Dum li eniris loĝion, ĉiu viro kaj virino en la teatro ekstaris kaj kriis lian nomon. Li pensis kaŝiĝi malantaŭ sia kunulo, sed la vivu-ado daŭris ĝis li konsentis elpaŝi. Je tiu momento aktoro, enirinte la loĝion, metis laŭrokronon sur lian kapon. "Ah, Dio! Vi volas do mortigi min per troa gloro!" li diris, kaj formetis la kronon. Je tio, Princo de Beauvau prenis la honorilon kaj ĝentile devigis lin denove ĝin surhavi. Sekvis kromordinara bruo, kiu daŭris pli ol dudek minutojn. Finfine la aktoroj povis komenci la ludon.

Legi tiun teatropecon nun ne donas multe da plezuro, sed la tiama aŭdantaro estis en la ĝusta humoro aplaŭdi ĉiun linion; kaj ĉe kurt-enfalo la huraoj surdigis. Kiam denove leviĝis la kurteno, la statuo de la maljunulo, portita el la promensalono, staris meze en la scen-ejo. Vidante tion, la aŭdantoj preskaŭ deliris entuziasme; silento reĝis nur kiam Mdlle Vestris elpaŝis kaj deklamis kelke da linioj honore al la heroo; tiam ŝi metis laŭrokronon sur la kapo de la sta-tuo. Je tio la multaga vireto, kiu jam retiriĝis en la postan parton

de la logio, stumble venis antaŭen, liaj larmantaj okuloj flujs, li estis superfortita de prema emocio. Kia emocio, kiu diros? Ĉu li ĝuis ĝin tutan, aŭ ĉu li pensis amare, ke li donus ĉiom da tiu gloro kontraŭ unu jaro de sia aventuroriĉa juneco? Kiam la ordo restariĝis, ili ludis komedion -- unu lian -- kun la kronita statuo ankoraŭ meze la scenejo. Tiam, estis pli da ovacioj kaj alia triumfa procesio dum lia kalĉo nerapide portis lin ree al lia hotelo; viroj grimpis sur radoj kaj piedbreto por ekhavi videton al li, eĉ por kisi liajn manojn. Fine atinginte sian loĝejon, li falsidiĝis kaj "ploris kiel infano." Precize du monatojn poste li estis morta.

Kion li estis farinta, tiu maljunulo, kiu ĵetis Parizon en tiom da frenezo de l'adorno? Skribis teatraĵojn? Kian efektive li ne skribis? Li skribis tragediojn kaj komediojn, kaj poezion de ĉia speco, de la epigramo ĝis la epopeo; kaj kvankam nenio el tio multe allogas nian guston hodiaŭ, ĝi nerezisteble plaĉis al la gusto de tiu tempo. Sed lia prozo ankoraŭ influas. Li verkis historiojn kaj biografiojn, traktatojn pri filozofio, eseojn kaj dialogojn, romanojn kaj pamfletojn, pri ĉia konceptebla temo. Li estis la plej granda pamfletisto de sia tempo. Kaj malgraŭ ke multe da liaj verkoj devis aperi, pro prudento, havante nenian nomon sur la titolpaĝo, ili tute ne povis esti prenitaj por la verkoj de alia, ĉar neniu alia povus sorĉi tian ĉampanan eferveskon en la stilon. Li estis majstro de ĉiaj formoj de l'sprito, de senhonta moko ĝis la plej delikata ironio. Lia menso estis la plej vigla, la plej vastefluga, kaj piklerta de lia tempo. Sesdek jarojn li senlace laboris per plumo; spite de sia facilŝanĝa temperamento li devigis sin al iu solida industrio, kiu estas unu el la mirindaĵoj de la literatura historio; foje li havis submane ses verketaĵojn en sama tempo.

Kio estis unika pri li, tio estis lia intelekta energio, kaj la fakto, ke ĝis la lastaj semajnoj de lia vivo ĝi ŝajne neniam malfortiĝis. Li faris multajn bedaŭrindegajn erarojn; li skribis kelkajn liniojn, pro kiuj ni preskaŭ povas malami lin. Tamen, superrigardante la vastan kolekton de liaj verkoj kaj meditante pri tio, kiel ĉi viro formis kaj gvidis, bone-malbone, la destinon de Eŭropo, tiam ni sentas veni al ni io simila al respekto.

Kaj malgraŭ, ke al ni, Britoj, kun la flegmo de nia raso, la Franca frenezo de entuziasmo aspektas iel ridinda, ni devas vidi en ĝi ankaŭ ion grandan. Ne estas mirinde, ke Carlyle estis frapita de tiu io, kaj admiris la heroo-adoradon, eĉ se li ne tre admiris la heroon. Tiuj Francoj sentis, ke ili ŝuldas honoron al granda inteligento kaj granda plenumo: al tiu viro, kiu defiis la enfortikigitajn potencojn de la mondo kaj batalis kun neelĉerpebla kuraĝo en la afero de l'vero kaj justeco. Probable tre malmulte da ili vidis la tutan signifon de la evento, aŭ komprenis, ke ili estas foradiaŭantaj la malnovan ordon sciordon kaj bonvenigantaj la Francan Revolucion, kiam en tiu teatro ili staris dum dudek minutoj, kriegante:

"VIVU, VOLTAIRE!"

(Profesoro Walter Murdoch, en sia "Moreover": Eseo, "One Crowded Hour")

Tradukis F.R.BANHAM.

(1) En Skotlando, en la pasinteco, flamanta kruco estis uzata por signali tempon de militdangero. Iu rapidkrurulo alarme portis ĝin tra la montoj kaj valoj, vokante al armilhavuloj pretigi sin por batalo. Vidu mención pri ĝi ankaŭ en "The Lady of the Lake", de Sir Walter Scott.

(Rimarko de la Trad.)

-----

## ESPERANTISTOJ FLUGAS de EUROPO al AUSTRALIO. (20.-28.10.38)

I. Unua Tago: Amsterdam - Marseilles - Napoli.  
(1120 mejloj; neta flugdaŭro - 7 horoj 20 min.)

Frumatene, precize je la 7-a, la aeroplano "Buteo" de la nederlanda Reĝa-Flug-Kompanio leviĝas de la Amsterdama Flughaveno Schiphol, por porti nin en septaga flugvojaĝo al Batavia. La rapida kaj komforta flugmaŝino, du pilotoj; po unu radiisto, mekanisto kaj kelnero volas servi al ni, por ke ni sekure kaj agrable atingu tiun malproksiman celon.


Estas belega vetero, klara aŭtuntago, kiam ni lastfoje malsupren rigardas al la belega nederlanda ĉefurbo, kiu gastigis nin dum tri semajnojn. Lastfoje ni admiras ĝiajn gracil-turajn preĝejojn, ĝian multbranĉan kanal-sistemon kaj la ŝipoplenan havenon. Sed baldaŭ ni estas super la nuboj, en alteco de 9300 futoj, kaj povas nur jen kaj jen ekkapti rigardan impreson de tipe nederlanda pejzaĝo: herbejoj, brutaroj, kanaloj, ventmuelejoj..., lagoj..., riveroj.

De Belgujo ni ne vidas multon; la nubtavoloj estas tro densaj. La tempo pasas..., sed ne laŭkutime; niaj horloĝoj senvaloriĝas: nur la flugkabina horloĝo - ĉiam denove ĝustigita de la kelnerservisto - indikas la ĝustan tempon, nome la tempon de la alflugota aviadejo.

Post nelonge ni superflugas la francan arbarmontaron Les Argonnés, kie en la lasta mondmilito tiom da bravaj soldatoj devis fordoni sia vivo. La vido pliboniĝas, la suno ree vidiĝas, kaj nun ni transflugas jam la antaŭ-alpajn montojn, interesajn formaciojn el kalk-sablo-ŝtono. Dum ni flugas super tiu Ŝanĝoriĉa pejzaĝo, ni ekvidas maldekstre - malproksime, sed tute klare - la gigantajn alp-montegojn, la bone konatan karakterizan silueton de l' Mt. Blanc, kiu fiere kaj impone superas siajn najbarojn Mt. Cenis kaj Mt. Pulvoux. Dum pli ol 200 mejloj de nia flugo ĉi tiuj neĝokovritaj altaĵoj restas videblaj.

Ni alvenas en Sud-Francujo, sub ni kuŝas la rivero Rhone. Interesa fakto prezentas al ni: en ĉi tiu regiono ĉiuj kampoj estas ĉirkaŭitaj de arbet-bariloj, kiuj etendiĝas precize de oriento al okcidento, por ŝirmi la plantojn kontraŭ la atakoj de la timata Mistral, malvarmega nordvento. Post kvarhora flugo ni atingas Marignane, la flughavenon de Marseilles. Antaŭ la surteriĝo ni ĝuas la rigardon al la intense blua Mediteraneo kaj al la fabele roka marbordlinio de la Provence.

Marignane estas mirinda loko. Norde ŝirmata de monstroformaj rokomontoj, kiuj aspektas kiel vera roka fortikaĵo, ĝi havigas al ni



norduloj la unuan fortan impreson de la suplena sudo. Varmega estas la aero, bluega la ĉielo kaj sudlanda la vegetaĵaro. Dum nia flugmaŝino englutas freŝan provizon de petrolo el la flava cistern-veturilo de la Shell-Kompanio, kies modelaj servo-stacioj troviĝas ĉie sur la tuta terglobo, ni mem eniras la restadejon. Tie bona kafo refreŝigas nin, dum ni balbute konversacias kun franca amiko, al kiu ni anoncis nian alvenon. Tiu renkonto havas strangan antaŭaĵon. Ni neniam antaŭe vidis ĉi tiun homon, kiu en la jaroj 1909-14 estis korespondamiko de nia frato. Jam en Aŭgusto 1914 la frato batal-mortis, kaj ni ne aŭdis ion de la franca amiko lia dum 24 jaroj. Kiam ni detruis malnovan korespondaĵon antaŭ nia foriro, ni hazarde trovis leteron kun lia adreso kaj ekkorespondis denove. Kaj nun li venis kelkcent mejlojn aŭtomobile, por vidi nin unuafoje (kaj tre verŝajne ank-aŭ lastfoje) en la vivo, premi niajn manojn kaj konversacii kun ni dum mallongaj dudek minutoj. Ĉiam ni intermiksas anglajn kaj esperantajn vortojn en la francajn frazojn, kaj pli ol iam ni sentas la neceson de internacia lingvo. Malpli ol duonhoron ni restas, tiam nia urĝema kapitano donas la signon por la forflugo.

Facile nia granda birdo levas sin en la aeron, por transflugi la Mediteraneon. Tre baldaŭ ni estas en alteco de 8400 futoj super la klarblua maro, bone ekkonate la ŝaŭmkronojn de la ondoj. Dum ni ĝuas bonegan lunĉon, dekstre antaŭ ni alta montogrupa eligas el la maro, la insulo Korsika, la naskiĝloko de Buonaparte, la insulo de la floroj kaj de la banditoj, kies duonkaŝitaj montovilaĝoj vere aspektas romantikaj. Ĉe la malproksima orienta rando de la insulo ni vidas la havenurbon Bastia.

Poste vidiĝas la insulo Elba, kie Napoleon konsumiĝis en ekzilo;

DEMANDO. (Heine)

Lass die heiligen Parabeln,  
Lass die frommen Hypothesen --  
Suche die verdammten Fragen  
Ohne Umschweif uns zu lösen.

Por la sanktajn parabolojn,  
Por la piajn hipotezojn.  
Frontu al la bazproblemoj;  
Jam ĉesigu molaj vortoj.

Warum schleppt sich, blutend, elend,  
Unter Kreuzlast der Gerechte,  
Während glücklich als ein Sieger  
Trabt auf hohem Ross der Schlechte?

Kial, sange kaj mizere,  
Sub la kruco stumblas Bono,  
Dum, gajkora venkantaĉo,  
Trotas krimo sur ĉevalo?

Woran liegt die Schuld? Ist etwa  
Unser Herr nicht ganz allmächtig?  
Oder treibt er selbst den Unfug?  
Ach, das wäre niedertrachtig.

Kie do la kulpo kuŝas?  
Ĉu ververe Dio regas?  
Ĉu el Li malordo fontas?  
Fia stato tie estus.

Also fragen wir beständig,  
Bis man uns mit einer Handvoll  
Erde endlich stopft die Mäuler --  
Aber ist das eine Antwort?

Ni demandas, demandadas,  
Ĝis, ŝtopite per terbulo,  
Nia buŝ' finfine mutas --  
Ĉu vi nomas ĝin respondo?

Out upon your sacred fables,  
Out upon your pious fancies.  
Answer us the cursed questions,  
Clearly and without word-weaving.

Why must, bleeding and in sorrow,  
Good men limp beneath the cross-load;  
While, as happy as a victor,  
Trots the evil on his high horse?

Where then lies the guilt? 'Tis either  
That our Lord's not quite all-mighty,  
Or that He impels the evil --  
Ah, that were indeed a baseness.

So we ask and ask unceasing,  
Till at last with earth a handful  
These our mouths are brought to silence --  
But can this be called an answer?

Rhythmically translated by F.R.BANHAM.

Heine naskiĝis en Dusseldorf en 1797, mortis Parizon 1856. La plej granda lirika poeto de Germanujo; vaste verkis en franca kaj germana prozo. "La spirito de la mondo, observante la absurdecon de la homaro, lasis ironian rideton pasi trans la lipojn. Tiu rideto estis Heine."



LA DEMANDOJ DE HEINE.

So here's the answer for unriddling,  
 that good folk may be so much better  
 and ~~books~~ move on ... for new o'ercoming!  
 Why? Naught amiss knows but PERFECTION.

For tielajn hipotezojn;  
 for la parabolojn piajn...  
 sen evito, la demandojn  
 ah! respondu fundajn miajn...

Kial virtemulo devas  
 lame treti vojon ŝtonan?  
 ĉe l' ŝvitanta frunto porti  
 dorn-girlandon ride kronan?

dume, la fripono venks  
 sučas delĉon de la sorto!  
 Kial tia rajtas rabi  
 la heredon de l'komforto?

Jen la solvo de l'enigmo...  
 Taksu do sen fanfarono  
 kiomege bona homo  
 tamen foras de la Bono.

Pint-ĉe-pinte, tiel kuŝas  
 la ĉiela monto-vekto.  
 Levu tion ..... senmakula  
 sin malkaŝos la PERFEKTO!

----- JOEDIRO.

LIBERECO estas privilegio, kiun la individuo devas ĉiutage defendi por si mem: ĉar eĉ la plej demokrata registaro emas subpremi, se ĝia tiraneco estas provokita de la indiferenteco aŭ la malkuraĝo de la regatoj. Tial Ligo por defendi la civitanajn rajtojn estas necesa en kia ajn sistemo de regado; kaj tial ankaŭ estas necese, ke tiaj ligoj komprenu, ke ili ne povas asekiuri liberecon por la individuo, se ili ne samtempe edukas lin, por ke li defendu ĝin por si mem per sia daŭra preteco pagi por ĝi per oferado. Ne estas tiam problemo de ekstera organizado, estas multe pli problemo de evoluo de la taŭgaj moralaj kvalitoj en la individuo -- de kreado en li de ekkompreno pri lia natura valoro kiel individuo. Alie, se la individuo amas liberon kiel rimedon por atingi pluan materialan kontenton, tiam la ŝtato povas facile inciti lin fordoni ĝin per la promeso pri pli bonaj kontentigoj. Tio fakte okazas sub partiaj diktaturoj, ruĝaj, brunaj aŭ nigraj.

----- RABINDRANATH TAGORE.



Copyright.

1. La Serpento kaj ĝiaj ovoj.



Copyright.

2. La ovoj de la serpento.



Copyright.

3. La eloviĝo de la junaj serpentoj.

### La Ceremonio De La Mita Serpento

LA AUSTRALIAJ INDIGENOJ kredas, ke ili genealoge devenis de bestoj aŭ naturaj objektoj. Ekzemple, troviĝas la dromaja gento, tio estas, tiuj, kiuj devenas de dromajoj. Simile, la makropa aŭ kangurua grupo, ankaŭ la lacerta, didelfa, valabia, agla, k.t.p. kaj eĉ la rivera, monta, nebula kaj similaj gentoj. Ili reprezentas sian genton per portado de ornamoj aŭ simboloj, kaj paradas kaj elmontras ilin en specialaj festokazoj, simile kiel ni iafaje paradas kun devizaj standardoj.

Ĉi tiuj desegnoj ilustras tri fazojn en la origino de la serpenta gento, t.e., la ARABUNNA. La kadraĵo de ĉi tiuj ornamoj estas el branĉoj ĉirkaŭvolvitaj per homaj haroj kaj ŝmiritaj per homa sango tirita el la brako. Ilin tiam la indigenoj kovras per agla lanugo, iom da ĝi blanka, iom da ĝi ruĝigita per ruĝa okro. La linioj sur la korpo estas el kalko aŭ sango kaj agla lanugo.

En la bildoj, la Arabunna montras siajn praavajn ornamojn, dum ili vizitas la genton ADYNAMAUTIN-A; tial ĉar Adyna signifas "ŝtonon" aŭ "ŝtonan," kaj Maŭtina signifas "genton" aŭ "popoleon," ni rajtas diri, ke ĉi tiuj ceremoniaj ornamoj estas montrataj de la Serpenta Gento dum ili vizitas la Ŝtonan Genton.

La desegnoj estas laŭ fotoj kompletaj pruntitaj de S-ro C. P. Mountford, kiu estis la etnologo kun la Leichhardt ekspedicio de 1938.

Desegnis kaj verkis L. E. BAILEY.

Ĝi restas malproksime, dum ni superflugas la rokan vulkanon Monte Kristo, kiu situas meze en la blua maro, bone konata al ĉiu leginto de Aleksandro Dumas Patro. Nun ni flugas laŭlonge de la itala marbordo, pasante la riveron Tiber kun la urbo Ostia, la haveno de Romo, ĉe la enfluejo de tiu rivero. Post duona horo, dum malfortaj ventopuŝoj ekestiĝas, ni vidas la golfon de Napoli (Naples), la urbon mem kaj la Vesuvion.

De nia balkono ni havas belegan elrigardon al la haveno, al la fumanta Vesuvio, al la insuloj Ischias kaj Kapri en la fundo, kaj proksime al la malnova kastelo konstruita en la maro mem. Dum pli ol unu horo ni ĝuas tiun harmoniplenan vidon kaj admiras la subirantan sunon, kiu koloras la tutan ĉielon en la plej diversaj nuancoj, blujaj, verdaj, flavaj, puncaj kaj skarlataj... Fine la taglumo paliĝas en ultramara kaj purpura krepusko. La blunigra mallumo de l'nokto vualas la maron.

Sed nun la ĉielo iluminiĝas per miloj da briletaj steloj, kaj ĉie sur la monto-deklivoj, en la haveno, en la stratoj, sur ŝipoj kaj boatoj, eĉ sur la kruta deklivo de l'Vesuvio centoj da lumoj havigas novan pentrindan impreson de la eterna beleco de Napoli, tiom ofte prikantita. -- Nur malvole ni forlasas la balkonon, por iom promeni laŭ la muganta maro, kaj en proksima parko ni povas unuafoje en nia vivo "iri sub palmoj." Ĉiam denove allogas nin la elrigardo al la maro, sed finfine ni devas adiaŭi, adiaŭi de la varmharmonia beleco de nia unua tranoktiĝ-loko.....

----- P.SCHWERIN.

### RESPONDOJ al DEMANDOJ.

Pom. en Te. La formo estas "S-ino" kun streketo sed ne punkto. Laŭ internacia kutimo estas bone uzi "Sinjoro" (aŭ S-ro) je viro, negrave ĉu edzo aŭ needzo, ni uzu "Sinjorino" (aŭ S-ino) je virino edzina kaj "Fraŭlino" (aŭ F-ino) je needzino. Tamen, simile al "lady" en la Angla, la vorto "sinjorino" ne ĉiam kaj necese indikas, ke la virino estas edzinigita. Ekzemple, vi povus diri, ke vi ricevis leteron de iu nekonata sinjorino. La demando ĉu aŭ ĉu ne ŝi estas edzino tute ne estas grava. Vi malfermus paroladon per: "(Estimataj) sinjorinoj kaj sinjoroj!" kiel Zamenhof ĉe la dua kaj kvara kongresoj. Vidu "Step by Step" p. 23, 4a eld.

No. All. en Y. La "ampersand" (&) estas uzata je titoloj en la Germana, Franca kaj Angla lingvoj, kaj eble je aliaj. Povas esti, ke ekzistas verkoj en kiuj oni uzis "&" trae anstataŭ "and", "et", "und"; Petro Stojan en sia "Bibliografio de Esp-o" tiel faris anstataŭ "kaj". En S.A.T. eldonadoj oni ĝenerale uzas "k", ne "kaj". S-ro Gordon, malaprobante la emon al troa mallongigo de vortoj, konsilus nepre metu punkton post k (k.), se farindiĝis uzi ĝin pro bona kialo. "&" supozinde estas internacie konata kaj komprenata, eĉ de orientanoj, sed mondvasta akcepto de ĝi anstataŭ "kaj" finfine forpelus el nia lingvo tiun belan vorteton, rekte derivitan trezoron al la glora Greka lingvo. Vidu pj.195 kaj 207 "La Suda Kruco" (1930)

Hokumo en K. "Aeroplano" estas oficiala, ne "aviono", kiu lasta cetere estas tre internacia pro la flugmaŝina leterkovrilo. Kiam oni elektis la unuan vorton por la "flugmaŝino" (la arkaika formo) la internacia poŝt servo ankoraŭ ne prezentis sin oĉ al la penso, almenaŭ ne en tuje praktika senco, alie oni tre eble estus elektinta la pli mallongan formon. Por "dirigible airship", Zamenhof uzis "aerostato"--- Aparato, generale sfer- aŭ cigarforma, entenanta gason pli malpezan ol la aero, kaj servanta por sin levi kaj veturi en la aero. La homoj en ĝi estas "aeronaŭtoj" "Zamenhofa sed ne oficiala).

----- F.R.B.

### PRI LA ANGLA "DUPLICATOR".

Kiel nomi la Anglan "duplicator"? Ĉu per "duplikatoro", "ciklostililo", "hektograf(ik)ilo", "kromograf(ik)ilo"? La lasta eble povus erare pensigi pri "koloro", ĉar "kroma" en la Greka signifas "koloro", kiu povas tute malesti ĉe la multobligebla procezo, kiun ni konsideras. En "Herald" (Melb.) 20.11.41, ni trovis la frazon: "cyclo-styled circulars". J.Eljot skribis "skribmaŝinografikaj", sed tiu vortmonstro ne allogas.

En par. 87 "Plena Gramatiko" ni legas: "Eble kiel pseudosufiksojn ni povus rigardi -OR, -ATOR.... . Migliorni proponis fari el -OR sufiksoidon kun la senco: maŝino, kaj uzi antaŭ ĝi -AD por havi internaciajn formojn: akumuladoro, generatoro, transformadoro ktp. Tio havus la avantaĝon, ke tiamanere tiuj vortoj apartenus al la pure Esp-a lingvistiko". Sed ni devas rimarki, ke jam de longe en E-o oni uzas la sufikson -OR sence de personoj: inspektoro, redaktoro, uzurpatoro, kreditoro, direktoro k.a.

Nin plaĉus ŝi kiel oni nomas la maŝinon en la kvin ĉefaj Eŭropaj lingvoj, kaj aparte bonvenigus helpon de niaj kolegoj ĉe "British Esperantist."

----- F.R.B.

EN TRADUKOTA PECO 22 la frazo "I had a few hundred thousand acres of Crown lands behind my place" donis nesamajn konceptojn. Kelkaj opinioj ke la senco estas: "Troviĝis malantaŭ mia bieno kelkcent....." Aliaj opinioj ke la senco estas: "Mi luis", aŭ "mi tenis per lurajto". Ne estas neeble ke nia estimata S-ro Gordon tie eraris, tradukante per "mi estis luinto..."

"I have had my fill of bushfires" ankaŭ streĉiĝis la cerbojn. Tro da anoj kontentiĝis per simpla redono de la vortoj anglaj, sed iuj pli-malpli trafe celis la sencon pli ol la formon de lia esprimo. La unuaj uzis: "mi havis sufiĉe da ili", "mi plensatiĝis de ili", "mi travivis pli ol sufiĉe"; la duaj: "ili minacis min", "ili naŭzis min". "Gego" tradukis per "mi multe suferis de ili."

KRIKO. PECO 20. S-ro Gordon tradukas "estuaries and creeks" per "krikoj kaj enmarigoj". Li ŝajne apogis sin sur la aŭtoritato de Boirac, kiu en sia Vortaro donas "kriko -- marenflekseto, riverenflekseto: golfeto, Franca "crique", kaj sur tiu de Rhodes, kiu donas

sub "creek" kriko, marenflekseto, riverenflekseto.

S-ro Gordon iel ne atentis la tute alian difinon de "kriko" (F. cric) en Verax, kiam li faris la tradukon en 1924, kaj kompreneble la Plena Vortaro (1930, 1934) ankoraŭ ne aperis. Jen la difino en Verax:- "Speco de levaparato, konsistanta el dentita stango suprenlevita de dentradeto movata per kranko." Angle, "lifting jack." Tiu en P.V. estas samsenca.

Ni devas kompreni, ke "creek" signifas en Australio kaj Usono "a branch of a main river; a small stream," sed en Anglujo "a narrow inlet in the coastline of the sea, or the tidal estuary of a river; a small port or harbour; an inlet within the limits of a haven."

Plena Vortaro donas "estuaro -- golfo formita per enfluo de rivero." Mi do konsilus uzi "estuaroj kaj enmarigoj" en Trad. Peco 20.

----- F.R.B.

### A.E.A. AFEROJ.

NOVA STATUTO. Rilate al la voĉdonado pri statuto, jesigaj voĉdonoj ĝis 90 % de la voĉdonrajtaj membroj jam atingis min. Tial mi nun deklaras ke la Proponita Statuto publikigita en LA RONDO Nro 14 (Nov.), kune kun la korektitaj eraroj publikigitaj en LA RONDO Nro. 15 (Dec.), estas la leĝe starigita Statuto de la AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

Mi atentigas la Prezidanton, Sekretarion, kaj Komitatanojn de ĉiu Aliĝinta Grupo al sekcio 5 (Komitato) de la Statuto. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi al mi la nomojn de la komitatanoj elektitaj de vi. Estas grave, ke ĉiuj Aliĝintaj Grupoj en sia vico elektos la Estraron. (Vidu Sekcion 6 Estraro). Sendu la avizon jene:

"Per ĉi tio ni certigas ke, S-ro X, kaj S-ino Z estas la laŭregule elektitaj komitatanoj de nia grupo, kaj ke la hodiaŭa dato estas 26 kotizpagintaj membroj de ĉi tiu Aliĝinta Grupo.

20/1/42. Signed.....Prezidanto ) Darwin Esp.  
Signed.....Sek. aŭ vicprez.) Klubo."

Estas tre dezirinde, ke ĉiu aliĝinta Grupo elektu komitatanojn laŭ sekcio 5, por ke la Estraro, sur kiu falos la plej granda parto de la laboro, enoficiĝu kiel eble plej frue.

20/12/41. ALLAN TURNER (Prezidanto A.E.A.)

PO BOX 81

SHEPPARTON, VIC.

ALILANDA NOVAĴO. (El "Esperanto Internacia", oficiala organo de I.E.L.) En Britujo nuntempe oni organizas grandan Alvokon al la registaro pri nia lingvo. B.E.A. esperas, ke multaj miloj da homoj pretaj montri aprobon de Esperanto, kiel internacia komunikilo post la milito, subskribos la petskribon.

George Douglas Buchanan, la amata pioniro skota, kaj prez. de B.E.A., mortis la 26an de Aŭgusto en sia hejmo apud Glasgow. Pro sia ĉiama afableco, sindonemo, kaj bonkoreco li estis de ĉiuj amata. Lia memoro longe restos, kiel inspiro por Esp-istoj ĉie.

En Aprilo 1941 fondiĝis Argentina Esp.-Ligo.

Laŭ la I.E.L. filia oficejo en Stockholm, Svedujo, la movado en venkitaj landoj daŭras firme, kiel ankaŭ en malproksima Oriento, kaj Egiptujo.

La dua parto de I.E.L. jarlibro eldoniĝis en Oktobro, kaj jam atingis Aŭstralion.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la duoblan kotizon S-ino M.Back, F-ino F. Smith, S-roj V.Rutland, C.Crowe, S-inoj M.Ling, H.Johansen, S-ino C. Caldero, S-ro C.Dornbusch. Denove membriĝis F-ino M.Oldham. Denove aliĝis kiel grupo Westralian Esperanto Society.

STATISTIKO. La Asocio nun konsistas el 6 Aliĝintaj Grupoj kun pli ol 110 Grupaj Membroj, kaj 50 individuaj membroj. La ĝenerala kaso enhavas iomete pli ol 13 funtoj aparte de la gazeta mono.

Sendube en la apudaj monatoj la individuo-membra cifero pligrandiĝos, kiam multaj el niaj legantoj revalidigos subtenon per la duobla kotizo. Ni memorigas abonantojn, ke ili rajtas tuj membriĝi per la pagado de la diferenco inter la abonprezo kaj la duobla kotizo. Se ĉiu farus tion ni povus tuj sendi nian aliĝpeton al la I.E.L.

KOTIZOJ. Pagi la duoblan kotizon estas grave helpi Esperanton. Ni bezonas la subtenon de ĉiu nova kaj malnova Esp-isto. LA RONDO 3/-. Individua Membro A.E.A. 3/-. Duobla kotizo al ambaŭ 5/-. Sur poŝtmonbiletoj ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G. HILLERMAN (Sek. A.E.A.)

C/- Bank of N.S.W.

DEVONPORT, TAS.

LA ESPERANTO RENDEVUO, MELBURNO. Fina kunveno de la Rendevuo por 1941 okazis 28 Nov. ĉe McEwan-Bldgs, Elizabeth-str. Ĉeestis 21 ĝesamoj. Oficistoj por 1942: Prez-o C.W.Ballard; sek-io S-ro E.Hearne; kasisto S-ro H.M.Cohen. Pasintjare la Rendevuo faris utilan servon al progresintoj. Oficistoj antaŭarangiĝis la programon, ĉu parolado, deklamo, kantado aŭ ia alia distraĵo. Nacia lingvo estas tute malpermesata ĉe la Rendevuo. Por instigi al individua peno la prez-o proponis premion por originala verketo, ĉu romano, ĉu eseo. Ĉirkaŭ ok partoprenis en la konkurso. S-ro F.R.Banham juĝis pri la verkoj. La rezulton oni sciigos 30 Jan. je la proksima kunveno.

Jus reveninte el Tasmanio post libertempo, S-ro P.Holmes faris paroladon kaj montris lumbildojn pri sia vizito. Ĉe St. Mary's li restis kelke da tempo kun Ĝe-sroj C.C.Cowling, kies ĉiutaga lingvo estas Esperanto. Ĉe Hobart S-ro Couche bonvenigis kaj prezentis lin al la tieaj ĝe-samoj. Lasinte Tasmanion, S-ro Holmes portis kun si belajn bildojn kaj fotografajojn kaj neforgeseblan impreson pri la Tasmaniaj samcelantoj. Post manĝeto kaj gaja interbabilado S-ino P.Hanks paroladis pri sia vizito al Darwin antaŭ du-tri jaroj. Per

lumbildoj ŝi vidigis interesajn lokojn en kaj ĉirkaŭ Darwin kaj Nord-Aŭstralio.  
Adiaŭ ĝis 30 Jan. 1942.

ANNA C. HINTZE.

M.E.K.RAPORTO. Pro kromlaboro kaj militservado la Melb. Esp. Klubo malvigligas -- sed ankoraŭ vivas! ce ni, same kiel ĉe preskaŭ ĉiu movado, la fidinda malplimulto ĉiam troviĝas ĉe sia posteno. 17 Dec. ni festis la nasktagon de D-ro Zamenhof -- kaj jarfinon de la klubo. (Okazis, bela sukceso; nur unu ĉagreno -- neniu gajnis premion Pyke Memorial.

A.C.H.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY.

Dum la pasintaj monatoj funkciis vigle la W.E.S. Kelkaj novaj lernantoj aliĝis, inter kiuj troviĝas dekduo da soldatoj ĉe Melville-Kazerno, gvidataj de nia estimata ano S-ro R.F.Stephens. En la ĉambrego de "Woman's Service Guild" ĉe Pert-o, S-ro la prezidanto -- I.Masel -- faris paroladon pri Esperanto: ĉirkaŭ 200 ĉe-estantoj streĉe aŭskultis interesan kaj informan prelegon; S-ino Lawrence prezidis. D-ro Caldera ankaŭ klarigis la Esp-Gramatikon. Antaŭ la anoj de "Overseas League" S-ro H.Byatt parolis pri "Internacia Lingvo kaj Esperanto." Poste, multaj geĉe-estantoj petis demandojn pri nia lingvo, kaj kiel oni povas ĝin lerni. La okan de decembro okazis la fina kunveno en 1941. La proksima kunveno okazos la unuan lundon en la venonta februaro.

HO-BO.

ERAROJ. Juste al amiko E.Lanti, ni atentigas pri eraroj en lia artikolo "Kelkaj Impresoj el Meksikio" (Okt. pj.3, unua linio, kaj 5, linio 20). "EĈ" devas esti "ĉe"; "Asketoj" d.e. "Aztekoj". Ni petas al la multaj, kiuj zorge konservas sian "Rondojn", ke ili bv. faru la korektojn. "Ebrion" sur p.4, lasta linio, d.e. "embrion."

LETEROJ.

Rev. C.C.COWLING. Pri LA RONDO: Mi ne povas tro gratuli la agemajn Esp-istojn, kiuj ĝin preparas. Objektiva, informoplena, instrua kaj distra, altnivela kaj Esperantisma, ĝi rajtas senflute nomiĝi inter la plej bonaj gazetoj de Esperantujo. Tra la ombro de propagando kaj milito ĝi jetas luman kaj inspiran radion, pli fortan per tio, ke la lecionoj estas latentaj, neesprimitaj. Eble estus pli bone skribi "danki" anstataŭ "gratuli".

EL LETERO de CECIL GOLDSMITH, SEKRETARIO de la B.E.A. I have just read the last number of "Rondo" with interest, and congratulate you all on being able to keep it going.....

Things are going remarkably well for Esperanto in this country at present, as you will see from coming issues of B.E.

Poor Mangada was still in Oran some months ago, but permission

has now been obtained for him to enter Cuba; if permission has been given for him to leave Africa he ought to be on his way to a happier life now. (Oct.25,1941)

-----

KASO de LA RONDO. Dec. 1941.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£.s.d.	<u>ELSPEZOJ.</u>	£ .s.d
Konta transpreno.....	8.5	papero.....	9.2
S-roj Crowe, Rutland, M.Ling,		ŝablonaĵoj.....	10.8
T.Porter, 3/-,.....	12.-	bindpingloj.....	1.6
S-roj Hearne, J.King, 5/-.....	10.-	luo.....	5.-
S-inoj E.M.Hill, 2/6, F.Kemp, 3/-..		poŝto.....	9.6
A.Sterling 3/-, H.Jobansen 3/-,..	11.6		<u>1.15.10</u>
F-inoj Smith, K.Crawford, 3/-....	6.-	En la kaso £1.11	
F-ino R.McLeary.....	1.9		<u>£3. 6.10</u>
F-ino K.Dalton.....	3.-	<u>W.ADDIS, (kasistino)</u>	
F-ino S.Rosengrave.....	1.6	15 Greville Ave.	
S-roj C.Ballard, P.Hudson,		Flinders Park,	
S.C.Belcher, 1/6,.....	4.6	S.AUS.	
vendoj.....	8.2		
	<u>£3.6.10</u>		

-----

EL "ESPERANTO", Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, Geneve.

Per nia bona amiko S-ro Ballard ni povis ricevi la Maj-Junian numeron de tiu gazeto, kompatinde etampleksa tamen plena de bona materialo.

Unue ni informu, ke Lidja Zamenhof ankoraŭ vivas. La Esp-a Interhelpe ŝin regule kontaktas kaj la familion Z. Jen p.k.el ŝi (tradukite el la Germana):

Varsovio, 25 vi 1941. Mi estas tre feliĉa informi vin, ke ni jam daŭre paŝojetojn el Porto ricevis. Ankaŭ hieraŭ el Gotenburg mi ricevis pakajon. Mi dankas al vi koro pri via penado.

Kun koraj salutoj, Lidia Zamenhof.

De Portugalujo regule iras malgrandaj sendaĵoj al la Familio Z., pri kio sindone okupigas Manuel de Freitas, ĉefdel.de UEA. Estas bedaŭrinde, ke la nevarma sento kaŭzita pro la skismo IEL-UEA rezultigis tiom da misinformo aŭ malutiliga silentado.


"La Praktiko" (Cseh) devis ĉesi pro registara ordono:

D-ro W.Lippmann, advokato en Leipzig, sperta analizanto de la gramatiko de E-o, nun estas ĉe Mrs.George Cahn, 2013 Bryant Av., Bronx, N. York, kie li penas rekonstrui fuŝitan vivon. Ankaŭ D-ro Wilhelm Solzbacher, pacisto, redaktoro de la iama "Juna Batalanto" (kotalika) estas en tiu urbo. Li fuĝis el Luksemburgo.



OfICIALA ORGANO de la A.E.A.

La Ronda.



Feb 1942

Nº 17

Eldonita de F.R. Banham,  
2 Banchory St. Essendon W.S. Vic. AUSTRALIA.

Mi ĵus revenis de semajnlonga ferieto sur la dunoj kaj arbust-vojetoj de Sorrento. Dum tiu tagsepo mi penadis min iluziigi en alian kaj pli serenan vivmedion, laŭeble ŝtopante la internajn orelojn kontraŭ la dolora muĝado de tiu agonianta socio en kiun mi devis tro tre baldaŭ re-enpaŝi. Memama, egoisma, simple stulta? Laŭelekte.

Sed nun, lasinte la marventojn trablovi la animon, kaj kun korpo revigligita per dolĉa senzorgo, denove al la taskoj kaj riskoj de nia ŝvarmanta mondo:

Vi sendube rimarkas, ke pro la reviziita poŝttarifo la abono al LA RONDO altiĝis ĝis 3ŝ 6p por poŝte-ricevantoj: tiu kromkosto estas nedeviga por tiuj ricevantaĵaj permane de agento. Malgraŭ la prezpliigo ni ankoraŭ aŭdacas aserti, ke el nia amika negoco vi, karaj legantoj, tenas la pli valoran el la interŝanĝiloj. La enhavkvanto de LA RONDO superas tiun de La Suda Kruco, por kiu pli ol 200 sengo, sengo, pagadis 4 $\frac{1}{2}$ ŝ.

Sed la akurata kaj regula aperado de LA RONDO ne tute dependas de tio, ĉu aŭ ĉu ne la legantoj fidele reabonados je la pli alta kosto. Ĝi tiras la vivon el pli gravaj fontoj -- la sano kaj labori-povo de la du fabrikantoj, la daŭra havebleco de materialo, la restado de sufiĉaj legantoj en Aŭstralio aŭ poŝta atingeblo. La postuloj de militdevo aŭ aliaj formoj de naciservo forrabis de la kluboj multajn aktivajn membrojn. Tiuj devtrudoj povas ankaŭ de LA RONDO forpreni ardajn subtenantojn, pelante ilin al lokoj transmaraj, al cirkonstancoj malfacilaj.

Korespondado kun alilandaj sam-oj estas nune preskaŭ nebla. Tial tiuj E-istoj kiuj strebas akiri "internacian stilon" akre sentas la foreston de tiu bone verkita lingvaĵo, kiun antaŭe ili ricevadis en la kovertoj de neanglaj plumamikoj. Ofta interŝanĝo de E-aĵo, buŝe aŭ skribe, ĉe sampatralingvanoj povas generi danĝeron en tio, ke, per ĝi, fortiĝas, enradikiĝas en la lingvo tro facile akceptataj idiotismoj, anglismoj ne kompreneblaj por fremduloj. Povas ĝirmi kontraŭ tio nur inteligenta, metodeca legado de tiuj verkoj, kiujn en pacaj tempoj donacis al ni majstroj kiaj Sidlovskaja, Mejer, Eggleton, Bodo, Jung, "Zanoni", Lippmann, Behrendt. La bonreputaciaj gazetoj de antaŭa tempo, se ni disponas tiajn, ankoraŭ povas vekti en ni malkontenton pri la banala, sensala -- kaj deziron atingi al gusthava, kolora esprimmaniero, stilo riĉa je trafaj frazturniĝoj, strukture harmonia, flulegebla, kristala. Sed legu kun notlibro!

----- F.R.B.

ERAROJ en Jan. RONDO:

- p.44, linio 7 de la malsupro, tumultis devas esti tumultigis.  
 p.47, " 6, devas esti: meze la scenezon. Linio 11: monatojn poste.  
 p.48, "17, " " : semajnoj. Linio 28: sian vivon.  
 p.54, " 28: kaj ni aparte bonvenigus.

MIA ONKLO SOSTHENES.

Simile al multaj aliaj liberpensuloj, mia onklo Sosthenes estis tia simple pro stulteco. Pro sama kaŭzo ofte homoj estas religiaj. Ekvido al pastro kutime kolerigis lin en grado eksterordinara; li minacis per pugno, ĵetis mokojn, kaŝe tuŝis feraĵon (1), kio lasta indikis, ke ankaŭ li jam havas ian kredon -- kredon al malbona okulo. Nu, kiam temas pri la senpensaj kredemoj, necese estas havi ĉiujn aŭ tute neniujn. Mi ankaŭ estas liberpensulo -- tio estas, ribelanto kontraŭ ĉiaj dogmoj, kiujn inventigis la timo al morto -- sed mi ne koleras kontraŭ la temploj, negrave ĉu ili estas katolikaj, apostoldaj, romaj, protestantaj, rusaj, grekaj, budhaj, muslemaj. Mi havas manieron ilin konsideri kaj klarigi. Templo, jen respektomontro al la nekonata. Ju pli la penso larĝiĝas, des pli la temploj disfaliĝas. Anstataŭ enmeti incensilojn en templojn, mi starigus teleskopojn, mikroskopojn kaj maŝinojn elektrajn.

Mia onklo kaj mi malsame opiniis pri preskaŭ ĉiaj aferoj. Li estis patrioto, mi ne, ĉar la patriotismo estas ankoraŭ alia religio. Ĝi estas la ovo de militoj. Li estas framasono; mi opiniis la framasonojn pli stultaj ol la maljunaj piemulinoj. Jen mia opinio, kaj mi subtenas ĝin. Se koncernus elekti religion, mi favorus la malnovajn.

Tiuj naivuloj nur imitas la paroĉestrojn. Ili havas kiel simbolon triangulon anstataŭ krucon. Ili havas eklezidomojn de ili nomataj loĝioj, kun amaso da diversaj ceremonioj -- la rito skota, franca, grandorienta -- serio da sensencaĵoj ridindaj.

Kion ili celas? Reciprokan helpon per tiklado de la manplatoj unu la alian. Mi vidas nenian malbonon en tio, ĉar per ĝi ili plenumas la kristanan ordonon, "Ĉion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili." La nura diferenco konsistas en tio, ke ili tikladas; sed ŝajnas stulte, fari tiom da groteskaĵoj simple por prunti kelkŝilingon al iu kompatinda diablo.

Mia onklo diris: "Ni ja frontigas religion kontraŭ religio. Ni faras el la libera pensado armilon, kiu mortigos la klerikalismen. La framasonismo estas la citadelo en kiu rekrutiĝas ĉiu, kiu celas detrui la diaĵojn."

Mi rebatis: "Sed, bona onklo (enkore mi diris: maljuna ŝafkapulo), ĝuste pri tio mi al vi riproĉas. Anstataŭ detrui, vi konkuras -- jen kio mallevas la prezojn. Plue, se vi permesus membriĝon nur al liberpensuloj, mi komprenus. Sed vi akceptas ĉiaspecan enirvolulon. Vi havas la katolikojn amase, eĉ la parti-ĉefojn. Pio IX estis en vi antaŭ ol li papiĝis. Se vi nomas societeton tiel konsistigitan citadelo kontraŭ la klerikalismo, mi opinias tiun vian citadelon tre malforta."

Tiam mia onklo, okulumante, aldonis: Nia efektiva agado, nia agado la plej efika, havas lokon en la politiko (2). Ni sapeas, en maniero konstanta kaj senduba, la monarĥisman spiriton."

Je tio mi eksplodis: "Aĥ jes, vi opinias vin tre ruzaj! Se vi diras al mi, ke la framasonismo estas iu maŝino de balotelektoj, mi samopiniis kun vi; ke ĝi servas kiel ilo por kontrole voĉdonigi al kandidatoj de ĉiaj nuancoj, tion ankaŭ mi ne neigos; ke ĝi havas

\* to sap

nenian funkcion alian ol mistifiki al honestaj homoj, igi parbatal-antojn, kiu iros al la voĉdoniluĵoj, kiel oni sendas soldatojn al batalo, ankaŭ pri tio mi samopinias kun vi. Pri tio, ke ĝi estas utila, eĉ necesa al la politikaj ambicioj, ĉar ĝi ŝanĝas en balot-elektajn agentojn ĉiujn siajn membrojn, mi krias: Ĝi estas sunlume klara! Sed se vi pretendas, ke ĝi servas por sapei la monarĥisman spiriton, mi ridas al vi en la nazon! Konsideru iomete tiun vastan kaj misteran asocion demokratian, kiu havas kiel grand-estron en Germanujo la kronprincon; en Rusujo la fraton de la caro; kiun partoprenas la reĝo Humberto kaj la princo de Kimrujo kaj ĉiu kronita kapĉjo sur la tero!"

Je tio mia onklo flustris: "Tio estas vera; sed ĉiuj tiuj princoj servas al niaj celoj, ne konsciante pri tio."

"Kaj reciproke, ĉu ne?" kaj mi aldonis en mi, "aro da stultuloj!" Ni vidu mian onklon doni manĝegalon al framasono. Unue ili faras la interrenkontigon kaj intertuŝas la manojn en maniero mistera kaj gajige stranga; oni vidas, ke ili donas serion da sekretaj premioj..... Poste la onklo kondukis la amikon en angulon, kvazaŭ por konfidi al li aferojn gravajn; tiam, ĉe tablo, vizagon ĉe vizago, ili havis aspekton de homoj, kiuj konsideras, interŝanĝante rigardojn kaj trinkante kun okulesprimoj, kvazaŭ ili ripetus senĉese: "He! ni bele scias pri la afero, ĉu ne?"

Imagu nur, ke estas miliono sur la tero, kiuj sin amuzas per tiaj afektaĵaĉoj! Mi preferus esti jezuito.

Nu, estis en nia urbo maljuna jezuito, kiu estis la ĉefa malplaĉulo al onklo Sosthenes. Ĉiun fojon la onklo renkontis lin aŭ nur ekvidis lin de neproksime, li murmuris: "Sentaŭgulo, for!" Tiam, prenante min per brako, li konfidis: "Vi vidas, ke tiu kanajlo faros malbone al mi unu tagon. Mi tion antaŭsentas."

Mia onklo diris veron. Jen kiel la akcidento okazigis per mia kulpo.

Ni proksimiĝis al la sankta semajno. Tiam mia onklo ekhavis ideon aranĝi manĝeston viandan por la merkredo -- efektivan manĝon kun tripaĵoj kaj kolbasoj. Mi rezistis kiom mi povis. Mi diris: "Mi manĝos viande, kiel en ĉiu tago, sed sola, en mia hejmo. Estas stulte, fari vian manifestacion. Kial manifestaci? Kial vi deziras ĝeni homojn, kiuj ne manĝas viandon?"

Sed la onklo persistis. Li invitis tri amikojn en la ĉefan restoracion de la urbo, kaj, ĉar li pagis, mi ne plu rezistis la inviton manifestaci.

Je la kvara horo ni publike okupis lokon en la restoracio Penelope, la plej frekventata. Onklo Sosthenes, en forta voĉo, mendis sian menuon por la sesa. Akurate je tiu horo ni ĉetabliĝis. Je la deka ni ankoraŭ manĝadis, kaj ni jam trinkis, ni kvino, dekok botelojn da neeferveska vino, krom kvar boteloj da ĉampano. Tiam mia onklo proponis, kion li nomis "la rondtrinko de la arĥepiskopo." Tio estis: meti en linio antaŭ ni ses glasetojn, kiujn ni plenigis per diversaj likvoroj; tiam estis necese trinki ilin dum kelnero kalkulas ĝis dudek. Estis stulto; sed mia onklo rigardis ĝin kiel "laŭcirkonstajca."

Je la deknua horo li estis tute ebria. Estis necese venigi

kaleŝon kaj lin enlitigi; jam ni povis facile vidi, ke lia antiklerikala manifestacio ŝanĝos en teruran maldigeston.

Dum mi promenis al mia loĝejo en humoro ebrio gaja, envenis la kapon ideo makiavela, kiu bone kontentigis al miaj instinktoj skeptikaj. Mi ordigis la kravaton, prenis aspekton de afliktato, kaj sonigis furioze sur la pordo de la maljuna jezuito. Li estis surdeta; mi devis atendi. Fine dum mi skuis la tutan domon per piedbatoj li aperis, en katuna noktoĉapo, je fenestro kaj demandis: kion mi volas.

Mi kriis: "Rapide, rapide, respektinda patro, malfermu al mi. Senespera malsanulo vokas por via sankta ofico!"

La bonkora honestulo tuj surmetis pantalonon kaj malsuprenvenis sen sutano. Mi rakontis al li per voĉo spireganta, ke mia onklo, la liberpensulo, prenita subite de terura malsano, kiu minacis fariĝi treege grava, nun havas fortan timon pri la morto, kaj ke li deziras vidi lin, paroli kun li, aŭskulti liajn konsilojn, plibone scii pri la kredoj, alproksimiĝi al la Eklezio, kaj, sen dubo, konfesi, tiam komunii, por povi preni en paco la timindan transpaŝon. Kaj mi aldonis en tono iom kritikeme mallauda: "Li deziras tion; eĉ se ĝi ne faros al li bonon, ĝi neniel faros malbonon. La maljuna jezuito, konfuzite, ravite, tute tremante, diris: "Atendu momenton, mia knabo; mi venas." Sed mi aldonis: "Pardonu, respektinda patro, mi ne akompanos vin; miaj konvinkoj tute ne tion permesas. Mi eĉ rifuzis veni serĉi vin; tial mi forte petas al vi ne sciigi, ke mi vidis vin. Prefere diru, ke per ia revelacio vi antaŭavertiĝis pri la malsano de mia onklo."

La bona homo konsentis kaj foriris per rapidaj paŝoj por sonigi je la pordo de la onklo. La servisto, kiu flegis la malsanulon, malfermis kaj mi vidis la pastron eniri tiun fortikaĵon de la libra pensado.

Mi kaŝis min je apuda perdo por observi la aferon. Se mia onklo estus bonsana, li batbuĉus la jezuiton, sed mi sciis, ke li ne povas eĉ levi brakon, kaj mi demandis al mi kun ĝojo delira, kia malverŝajna sceno ludigis inter la du kontraŭuloj. Kia lukto? Kiaj interklarigoj? Kia konsterno? Kia konfuzo? kaj kia finsolvo al tiu senelireja situacio, kiun la indigno de mia onklo farus eĉ pli tragedia?

Mi ridis en mi mem, tenante la ripojn, kaj ripetadis subvoĉe: "Bona farso, kia bona farso!"

Tamen, fariĝis malvarme kaj la pastro restis tre longe. Mi diris al mi: "Ili reciproke klarigadas."

Horo pasis, du, tri. La respektinda pastro ne elvenis la domon. Kio okazis? Ĉu mia onklo mortis apopleksie, ekvidante lin? Ĉu la onklo mortigis la sutanulon? Ĉu ili manĝis uĥu la alian? Tiu ĉi supozo ne estis verŝajna, ĉar mi sciis, ke la onklo en tiu momento estas tute nekapabla absorbi eĉ unu gramon da nutraĵo plu. La taglumo jam ekaperis.

Maltrankvila, ne kuragante mem eniri la domon, mi rememoris, ke unu amiko mia loĝas kontraŭe. Mi iris ĉe li, rakontis la aferon, kiu lin mirigis kaj ridigis, kaj mi prenis embuskan pozicion je lia fenestro.

Je la naua li prenis mian observlokon, por ke mi iom dormu. Je Je la dua matene, mi reokupis miavice... Ni estis supermezure mal-trankvilaj. Je la sesa matene la jezuito eliris kun mieno paca kaj kontenta, kaj ni rigardis lin trankvilpaŝe elvidiĝi.

Tiam, hontema kaj timanta, mi sonigis je la pordo de mia onklo. La servisto aperis. Mi ne kuraĝis pridemandi kaj supren-iris sen vorto.

Onklo Sosthenes, pala, venkita, malvigla, kun malĝoj<sup>e</sup> senbrilaj okuloj kaj inertaj brakoj, kuŝis en lito. Malgranda figureto piaĵa pingle tenis sin al la litkurteno. La maldigesto estis forte sentebla en la ĉambro. Mi diris: "Ej bone, onklo; vi kuŝas do? Ankoraŭ ne tre bone?"

Li respondis per voĉo sen<sup>ca</sup>ergia: "Ho mia knabo, mi estis tre malsana, preskaŭ mortis!"

"Kiel do, onklo?"

"Mi ne scias; estis miregige! Sed kio estis eĉ pli stranga, tio estas la jezuita pastro, kiu ĵus eliris el tie ĉi, li, brava homo,, kiun antaŭe mi tute ne povis toleri, havis ian revelacion pri mia stato kaj venis por trovi min!"

Ekprenis min forta riddeziro: "Aj, vere?"

"Jes, li venis. Li aŭdis voĉon, kiu ordonis lin ellitiĝi kaj veni, ĉar mi mortos. Ĝi estis revelacio."

Mi ŝajnis terni, por ke mi ne eksplodu. Mi deziris ridkonvulsie ruliĝi sur la tero.

Post minuto mi reprenis tonon de indigno, malgraŭ kelkaj enŝprucoj da gajo: "Vi do akceptis lin, onklo, vi, liberpensulo?! Framasono?! Vi ne ĵetis lin eksteren?"

Li balbute embarasiĝis: "Aŭskultu tamen. La afero estis tiel miriga, tiel providenca! Li parolis al mi pri mia patro. Li iam antaŭe konis lin."

"Via patro, onklo?"

"Jes, ŝajnas, ke li konis mian patron."

"Tio ne estas sufiĉa tialo por akcepti jezuiton."

"Tion mi bone scias, sed mi malsanis, tre malsanis! Kaj li savis min! Tiuĵ homoj estas lasence speco de kuracistoj."

"Aj, li prizorgis vin la tutan nokton? Sed vi diris al mi, ke li nur ĵuse eliris el tie ĉi?"

"Jes, vere. Ĉar li montris sin tiel bonestima al miaj konsideroj, mi invitis lin resti por manĝo. Li manĝis tie apud mia lito, sur tableto, dum mi prenis tason da teo."

"Ĉu li manĝis viandon?"

Mia onklo faris geston de ofendiĝo, kvazaŭ mi ĵus kulpis pri kruda nedecaĵo; kaj li aldonis: "Ne moketu, Gaston; foje ŝercoj malkonvenas. Tiu homo, en ĉia okazo, montriĝis pli dediĉa al mi ol kiu ajn parenco; konsentite estas, ke oni respektu liajn konvinkojn."

Je tio mi estis konsternita, tamen mi respondis: "Tre bone, onklo; kaj post manĝo, kion vi faris?"

"Ni ludis iom la bésigue, tiam li eldiris sian breviarion, dum mi legis ian libreton, kiun li havis ĉe li, tute ne malbone verk-

"Ĉu libreto pia, onklo?"

itan."

"Jes, kaj ne, aŭ prefere ne. Ĝi estis historieto de iliaj mis-

ioj en Mez-Afriko. Aŭ pli ĝuste unu libreto da vojaĝoj kaj aventuroj. Bela estas tio, kion ili faras tie, tiuj homoj."

Mi komencis senti, ke la afero marŝas malbone. Mi leviĝis: "Do, adiaŭ, onklo; mi vidas, ke vi ŝanĝas la framasonismon favore al la religio. Vi estas renegato."

Li denove iom konfuziĝis kaj murmuris: "Sed la religio estas ia speco de framasonismo."

Mi demandis; "Kiam via jezuito revenos?" Onklo balbutis: "Mi.. mi ne scias; eble morgaŭ ... ĝi ne estas certa."

Mi foriris, absolute malspirigitita. Mia farso jam prenis malbonan direkton. Mia onklo konvertiĝis ĝis en la radikoj. La afero ĝis tiam ne estis al mi grava. Por mi la diferenco inter klerikulo kaj framasono estis nur tiu inter kufo blanka kaj blanka kufo. Jen la plejmalbono:- Li ĵus faris testamenton, ja testamenton, kiu malherediĝis min favore al la jezuita pastro.

(Guy de Maupassant, tradukis F.R.Banham)

- (1) Komparu: "to touch wood" (tuŝi lignon.)
- (2) En Anglujo la framasonoj ne havas aferon kun la politiko, sed en Eŭropo ili estis aktiva sur tiu kampo. La Romkatolika Eklezio malpermesas al siaj anoj aliĝi la Framasonismon. (Notoj de la trad.)

-----

### INTERPAROLO en BANKO.

(La sekvantan verkis speciale por LA RONDO S-ro Houchio, ĉina instruisto en Kuala Lumpur. Ĝi donas fluan ekzemplon de banklingva konversacio taŭgan por lernteksto. Ni sincere esperas, ke nia amiko estas ekster danĝero, kaj ke ĉi tiu numero povos porti al li plezuron.)

HU: Bonan matenon, S-ro Li. Ĉu vi estas nun okupata de diversaj aferoj?

BANKA ADMINISTRISTO: Ho ne. Envenu, S-ro Hu.

HU: Laboru laŭ via bezono, S-ro Li. Mi povas atendi kelkan tempon en la atendejo.

B.A. Bone. Mi estos preta servi vin post kelke da minutoj.

HU. Bone, dankon.

B.A. (post kelke da minutoj) Mi tre bedaŭras, ke mi atendigis vin.

HU. Ho, ne tion diru! Mi bedaŭras interrompi vian laboron.

B.A. Tute ne! Mi estis nur diktanta kelke da leteroj al mia maŝin-skribisto. Nu, ĉu ian aferon mi povas fari por vi?

HU. Jes. Mi venis vidi vin por meti sumon da mono en vian bankon. Tial ĉar mi ne estas tre familiara kun la procedo, mi esperas, ke vi bonvolos sciigi al mi ĉion pri ĝi.

B.A. Kompreneble, vi estas tre bonvena. Kiel granda estas la sumo, kiun vi volas deponi en nian bankon, S-ro Hu?

HU. Kvin mil dolaroj.

B.A. Tiu estas sufiĉe granda sumo. Kiamaniere vi volas ĝin deponigi?

- HU. Mi volas meti tri mil dolarojn en vian bankon dum fiksita periodo de kvin jaroj. La alia du mil mi deziras meti en vian bankon kiel kurantan deponaĵon. Mi volas rajti la lastan eltiri el via banko, kiam kaj kiel ajn laŭ mia bezono. Bonvolu sciigi al mi apartan procenton por ĉiu el tiuj du deponaĵoj.
- B.A. Ni pagas tri cent dolarojn kiel unujaran interezon por fiksita deponaĵo de tri mil dolarojn por kvin jaroj. Rilate la kurantan deponaĵon, se vi metus en nian bankon du mil dolarojn, kaj se via restaĵo restus pli ol dol.500,00, vi povos doni al ni 5 p.c. jare. Se vi legos ĉi tiun regularon pri mon-deponoj vi ĉion komprenos.
- HU. Mi dankas vin, S-ro Li. Mi volas forporti la libreton, por ke mi povu iam ĝin konsulti laŭbezone. Nu, al kiu fako mi devos enmanigi la monon?
- B.A. Al la depona fako tie. Restu, S-ro Hu. Halo, Van, ĉi tie estas S-ro Hu, kiu deziras deponi en nian bankon sumon da tri mil dolaroj kiel fiksitan deponaĵon kaj krome du mil kiel kurantan deponaĵon. Aranĝu ĉion ĉi tion por li kaj donu la du banklibrojn al la administrejo. Nun, S-ro Hu, ni reiru al mia oficejo por babili. Li faros la tuton por ni.
- HU. Dankon, S-ro Li.
- B.A. Vi estas ĉiam bonvena, S-ro Hu. Nu, ĉu vi fumos? Ĉu vi volas cigaron?
- HU. Ne, mi dankas vin. Mi ne fumas. Nu, S-ro Li, troviĝas multegaj bankoj fonditaj lasttempe en Juanfu. Ĉu ili estas bone starigitaj?
- B.A. La plimulto el ili estas bone starigitaj, sed el la aliaj kelkaj ne estas. Kiel mi scias, tio dependas de tio, ĉu ili povas investi sian kapitalon en produktajn kaj profitdonajn entreprenojn. Oni devas havi bone elpensitan planon kaj devas efektiviĝi ĝin per kompetentuloj.
- HU. Tio estas vera ankaŭ pri aliaj aferoj. Nu, mi havas nenian alian demandon por vi, kaj devas adiaŭi vin.
- B.A. Bone. Jen viaj du banklibroj. Zorge tenadu ilin, mi petas.
- HU. Mi volonte vidos vin denove.
- B.A. Venu plue laŭ via plaĉo, S-ro Hu.
- HU. Ĝis revido, S-ro Li.
- B.A. Ĝis revido.

-----

ESPERANTO kaj la BLINDULOJ.

Ĉu pro tio ke ili naskiĝis sen vidpovo, ĉu pro ia akcidento aŭ malsaneco, mankas la vidpovo al multe da homoj en ĉiuj landoj. Kvankam ili ofte devas akcepti helpon de iuj pri ĉiutagaj aferoj, plejparte la blinduloj ĉiam estas dankemaj kaj neniam plendas pri mankoj. Akceptante sian pozicion en la vivo, la blindulo ofte sopiras oportunon por akiri instruitecon, por ke li, aŭ ŝi, estu almenaŭ iomete nedependa en la batalo por vivrimedoj. Feliĉe ke ekzistas diversaj institutoj en kiuj blinduloj povas havigi al si la sopiratan klarecon. Unue, iu studento lernas la Braille-skrifton.



Tuj gevidantoj jam lernis kaj lernas uzi tiun arton, por ke ili transskribu lernolibrojn nacilingvajjn en la Braille-skribon. Farinte tion kiel amlaboron por helpi al la nevidantoj, oni daŭrigas la transskribadon de lernolibroj, ankaŭ de multe da klasikaj verkoj, romanoj, historioj. Inter tiuj estas Esp. lernolibroj tute en Braille. Lerninto E-on, blinda studento pli facile akiras kapablecon lerni nacilingvojn ĝis grade ke li, aŭ ŝi, povas ricevi oficon kiel interpretisto en leĝejo aŭ simila ofico. Pro tio, iu blindulo povas fariĝi iomete sendependa koncerne la vivrimedojn. Estas bone konate ke multaj nevidantoj ricevas pli da mensa vigleco, komponse mankon de vidpovo. Tiu vigleco estas mirinda helpilo al kuraĝa kaj persista homo. Pruvon oni vidas en multaj landoj, kie blinduloj jam atingis imponajn oficojn aŭ en politiko kaj komerco, aŭ en religio kaj leĝaj aferoj. De longe oni eldonis E-an gazeton en Svedujo per blinduloj tra la mondo. Ĝia redaktoro estas blinda! En kelkaj ĉefurboj en diversaj landoj troviĝas bonega biblioteko por neviduloj, enhavanta, inter alio da verkoj, iom da Braille-skribitaj libroj. Instruante junan blindulon, la skribanto de tiu ĉi artikolo sportis plezuron kiam li konstatis kiom da ĝojo ankaŭ la lernanto ricevas per la instruado. Al li, ŝajne, la vojo kiu kondukas lin al ĉiaspeca kono nun estas malfermata, kaj li povas laŭiri samegale kiel kunuloj vidpovaj. Tuj post kiam li lernis la E-an grammatikon, tiu lernanto ekkomencis skribi en E-o, por ke li povu sendi leterojn al blinduloj en aliaj landoj. Li krome lernas la Francan kaj Germanan lingvojn. Responde mian demandon, li diris ke la jam lernita lingvo -- E-o -- bonege helpis lin studadi la por li novajn lingvojn. En tiu maniero la menso disvolviĝas. Lia rigardo sur la vivon estiĝas maltima kaj memfida; li gajnas pli da memrega povo. Blindulo ne sopiras kompaton; li preferas senti ke la kunhomoj traktas lin kiel normalan, ne kiel malsanan. Ju pli li studas kaj lernas, des pli li sentas ke efektive li estas ordinara membro de la homaro. Lerninto E-on, la blindulo ja estas tia, ĉu ne vere?

----- HO-BO.

### OBSTINE ANTAUEN.

"Ĉu vi lernas nur de tiuj, kiuj vin amas? Ĉu vi ne povas lerni ion ankaŭ de la kontraŭstaranto?" Tiele demandis la poeto, Walt Whitman.

Vere la kontraŭstaranto havas por ni gravan instruadon, se ni volas lerni. La karaj, simpatiemaj geamikoj povas montri al ni bonegan ekzemplon, tamen la plej gravajn lecionojn de la pacienco, la sendependeco kaj la memregado, ni lernos nur de la kontraŭstarado.

Se la velo ne kontraŭstaras la venton, la velŝipeto ne estus direktebla. Se la akvo ne kontraŭstaras nin, ni ne povus lerni la naĝarton.

Do, ni ne serĉu vojojn facilajn, nek timu la nekonatecon. Ni paŝu firme, kuraĝe, memfide, kaj ellernu fidele ĉiun lecionon, kiun la estonteco prezentos al ni. Eble ni ne ĉiufoje kapablos supervenki la montpintojn de malfacileco, sed iel, iam, ni povos ĉir-

kaŭiri ilin, kaj tion farante ni gajnos novan forton, novajn spertojn tre akirindajn.

Ni faru nian eblon! Ni iru antaŭen!

----- PERTULINO.

ASOCIAJ AFEROJ.

	£	s	d		£	-	s	-	d
<u>GENERALAJ SPEZOJ 1941.</u>				<u>MONO ĈE LA SEK-KASISTO</u>					
Presajo kaj materialo.....	1-13-		3	Ĵo 31.12.40.....	7	-13-			11
Skribmaterialo.....		2-	7	KOTIZOJ--					
Telegramoj kaj afranko.....	1-13-		4	Grupaj : 1-16-0					
Varbnumeroj de Gazeto.....		12-	0	Individuaj 8-18-0					10-14-0
Gazeta Parto de duoblaj kotizoj.....	1-	4-	0						
Mono je 31-12-41 ĉe Commonwealth Savgs									
		12-4-	10						
Ĉe la Sek-kasisto	7-11-	13-	2-9						
		<u>18-</u>	<u>7-11</u>						
					<u>18.7.11.</u>				

NOTO. Por helpi en la starigo de la Asocio, la Ofichavantoj kaj aliaj membroj pagis elproprapoŝe ĉiun elspezon ĝis 2.7.41.

DANKON al Brisbane Esperanto Asocio, kiu cirkuleris siajn membrojn pri la laboro de la Asocio, kaj tiel havigis al ni 8 novajn duoblajn kotizojn. Ni tre esperas, ke aliaj Grupoj tiele sukcesos.

GRATULON al S-ro Sonners en Hobart, kiu Brajle gajnis la certigaĵon de la "Pyke Memorial" ekzameno.

ALILANDA NOVAĴO (el "Tagiĝo", la bulteno de Hongkong Esp-Asocio) La Nov. numero de Tagiĝo trafis nin antaŭ ne longe. Kredeble ĝi estos la lasta, kaj ni tre bedaŭras la forpason de eĉ unu plia kontakto kun alilandaj samideanoj. "Tagiĝo" montris tre viglan movadon en Hongkong, antaŭ ol la milito trafis tiun insulon. Raportoj temas pri novaj kursoj sur la insulo kaj en Suda Ĉinio. Laŭ informo de "Koresponda Esp-Lernejo" en Chungking, la dumilita ĉefurbo de Ĉinio, pli ol 600 gelernantoj studas la lingvon ĉe tiu lernejo.

B.E.A. EKZAMENOJ. Por forigi ekzamenajn malfacilaĵojn al personoj en lokoj malproksime de la specialaj ekzamenistoj, via Asocio interŝanĝis kablogramojn kun la Brita Esp-ista Asocio. La barilo al kandidatoj baldaŭ malaperos. Ni atendas la plenajn detalojn, kiuj atingos nin en Marto. Por la Asocio, S-ro Banham kaj Pastro Cowling estros iun aranĝon.

ARMEA EDUKADA SERVO. Via Asocio nun penas interesi la Armean edukadan servon pri Esp. Kia grava influo povus havi sukceson tie! La redaktoro de ties semajna gazeto esprimis deziron esplori la lingvon. Ni metis antaŭ lin "Esp. and why we need it", lernolibron,

kaj la Nov. numero de la "British Esperantist", en kiu aperis detala raporto pri la stato de la lingvo en Eŭropaj landoj kiam la milito eksplodis. Membroj, kiuj servas en la armeo, bonvolu skribi al "Salt" (Gazeto de A.E.S.) se ŝanco sin prezentos.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la duoblan kotizon, S-ino F.Rawson (Prez. M.E.K.), S-ro I Masel (Prez. W.E.S.), T.Sness (Prez.B.E.S.), W. Lamb, L.R.Roberts, A.S.Frost, C.Kidd, J.Knox Walker, O.Davies, G. Card, E.Costa, J.King, Dro C.Caldero, F-inoj F.Kemp, A.Curtis, J. O'Shaughnessy, E.B.Carrick (Sek B.E.S.)

KOTIZOJ kaj ABONOJ:- "LA RONDO" (liverata permane), 3 ŝ.; (afrankita), 3 ŝ.6p. Individua membro de A.E.A. kun gazeto, 5ŝ. (Rimarku: Tiu kotizo estas sama, ĉu la gazeto estas liverata, ĉu afrankita). Abonantoj povas tuj anĝi, pagante la diferencon inter abonprezo kaj la kotizo por individua membro kun gazeto. Ĉiam atentigu la alsenditon pri via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtmonbiletoj NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

La individua-membro-cifero jam pasis 60.

G. H. Hillerman (Sekretario)  
P.O.Box 75,  
Devonport (Tas).

-----  
KASO de LA RONDO. Jan. 1942.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s	d	<u>ELSPEZOJ.</u>	£.	s.	d
Konta transpreno.....	1.	11.	-	ŝtampilo.....	9.	-	
S-inoj Westbrook, Blackmore, Grant, 5/-.....	15.	-		bindpingloj...	1.	6	
S-roj King, O.Davies 5/-.....	10.	-		luo.....	5.	-	
S-ino Hopewell.....	7.	9		ŝablonaĵoj....	11.	4	
S-ro E. Costa.....	8.	-		papero.....	11.	6	
F-ino A. Godfrey.....	1.	9		poŝto.....	13.	1½	
S-ino Hanks.....	1.	9		inko.....	10.	6	
S-roj Hanks, Stevenson, Knox-Walker 1/9.....	5.	3			£3 - 1-11½		
S-roj C.Kidd, T.Ness, A.S.Frost L.R.Roberts, G.W.Card, R.F.Stephens 3/-.....	18.	-		En la kaso			
S-ro E.Williams.....	3.	6		£3.9.-½			
S-inoj M.Back, F.Rawson 3/-.....	6.	-			£6.11.-		
F-inoj E. Garrick, A Curtis J.O.'Shaughnessy, Blyth 3/-.....	12.	-					
F-ino Rosengrave.....	3.	-					
vendoj.....	10.	9					
	£6.11.	-					

W. ADDIS (kasistino)  
25 Greville Ave.  
Flinders Park,  
Adelaide,  
S.AUS.

PLEASE NOTE INCREASE in SUBS.

RONDO .....3/6 yearly  
 CORSO .....3/- "  
 Double Sub. RONDO and Aus.Esp.Asoc. 5/- yearly.

-----  
 LA TAS. ASOCIO ankoraŭ ne komencis la novjaran laboron, sed ni okazigos kunvenon je la 9a de Februaro kaj aranĝos novan kurson, se eble. Supozeble estos malfacile varbi lernantojn, ĉar nuntempe ĉiuj havas tiom da kromokupoj promilitaj, sed tamen, niaj fervoraj, agemaj anoj tenos alte la standardon.

Unu el niaj lernantoj, S-ro Sonners, sukcesis je la Pyke Memoriga Ekzameno. Ni gratulas lin. Li riĉe meritas sian sukceson, ĉar li estas blinda kaj devis respondi la skribajn demandojn brajle. Li estas kuragulo, kaj ni ĉiuj admiras lian persistemon.

Saluton al ĉiuj Esperantistoj de la A.E.A. kaj bondezirojn por sukcesplena jaro. Ni peni travidi la nubojn kaj serĉu la helan flankon. Dauran sukceson al LA RONDO, kaj al la fidelaj laborantoj.

----- ALICE DOUGLAS. Prez.Tas.Esp.Asocio.

ĈU TROVEBLA IU BONKORULO kiu donacus uzitajn lernlibrojn "HOME STUDENT" al kurso en Okc.Aŭst.? Skribu aŭ sendu al W.6065, Lieut. R.Stphens, 25 M.C., Rgt. Sig.T.P., NORTHAM, W.A.

-----  
LETERO de SINJORO GEORGE GORDON.

(Pro tio, ke la Nov-Zelanda poŝtaŭtoritato malpermesas uzon de Esperanto en komunikaĵoj sendotaj eksterlanden, ni bedaŭre devis traduki la sekvantan leteron, kiun ni plezure ricevis de S-ro Gordon. Malgraŭ sia 85-jaraĝeco, nia respektinda amiko ankoraŭ streĉinterese sekvas la zigzagojn de tiu kara por li lingvo al kiu li jam donis 35 jarojn da honesta laboro.)

Kara S-ro Banham:

Mi gratulas vin pri la daŭra bonegeco de LA RONDO. Mi esperas, ke post ne longe estos eble presigi ĝin.

Via noto pri "camp" povas forte helpi al lernantoj. Mi tute prikonsentas ĝin, kiel ankaŭ la noton pri "million", "billion", kaj "milliard."

En N-ro 15 de LA RONDO, pĝ 31, linio 32, mi rimarkas uzon de la futura verbtempo por traduki "shall I drink"? Miaopinie, ĉe demandoj petantaj pri permeso aŭ instrukcio la futura ne estas rekomendinda, ĉar la sola nocio en tiu verbtempo estas pri estanteco. Zamenhof uzis la ordonan ĉe Marta 188/30 (ĉu vi permesas, ke mi vin akompanu?); La Rabistoj, 51/15 de malsupro (Kiun lokon mi legu al vi?); Eliro ii, 7(ĉu mi iru?).

En la projektata statuto de A.E.A. mi rimarkis: "escepte se" (regulo 13,7). Tio ŝajnas al mi nebona, ĉar la adverbo signifas "exceptionally", ne "except". En la unua eldono de la Nova Testamento ĉe Luko ix,13 tiu formo estis uzita, sed en la reviziita eldono ĝi ne aperas. Kial ne uzi "krom se"?

Ankoraŭ nenia vortaro aŭ lernolibro instruis pri tio, kiel legi la krucon en formo, kia "9 x 4 koloroj". Angle ni legas "by"; France "sur". Antaŭ la milito de 1914-18 mi skribis al la Esp. Scienca Asocio, kaj ili respondis, ke ili konsideros la demandon. Sed venis la milito.....

En LA RONDO mi vidas titolojn "Plena Vortaro", "Plena Gramatiko", sen la nomo de la aŭtoro (aŭ eldonisto). Kutime en aliaj lingvoj oni mencias tiajn nomojn en libroj de tia speco. Doni nur la titolon estigas impreson, ke la citanto rigardas la verkon kiel oficialan. Estas danĝere, pensemigi al lernantoj, ke tiuj verkoj estas oficialaj. (21.12.41)

Sincere via,

GEO. GORDON.

#### RIMARKOJ de la REDAKTORO.

Lau Millidge "escepte" signifas "exceptionally", kaj "escepte se" sig. "unless". Ĝuste tiun lastan formon la verkanto uzis en la statuto. La P.V. de S.A.T. donas sub "escepte" -- "en escepta maniero; per, pro escepto"; "Escepte se" = "krom se; sed ne se.". La formo ne estas tre uzata; supozeble oni evitas ĝin pro ĝia neklareco, eĉ erarigipovo. En senco "exceptionally" ĝi tute ne estas bezona, ĉar jam ni disponas pri: tre, forte, altgrade, eksterordinare, supermezure (Marko 7,37) kaj aliaj.

Koncerne la "x". Konsilite de vi antaŭ jaroj, mi ekuzis "per" skribo kaj lege por traduki la "x" en tiaj formoj. Profesoro Waringhien, kunaŭtoro de la Plena Gramatiko, skribis al mi sub dato 15 Okt. 1935 jene: "Mi esperas, ke ankaŭ "nian" gramatikon vi funde kritikis; almenaŭ unu aferon mi ŝtelis de vi kaj enmetis en ĝin: la esprimon de la formato (12 per 20 cent.) Pardonu tiun krimon! Simpatia via, G. Waringhien."

#### DE S-RO P. SCHWERIN.

#### PRI LA ANGLA "DUPLICATOR".

En la germana lingvo oni nomas ĝin "Vervielfältigungs-Apparat" oder "Vervielfältigungsmaschine", tio signifas "Multobligil-aparato" aŭ "Multobligil-maŝino". Mi dirus en Esperanto simple "multobligilo"; tio ne indikas, kiamaniere la multobligado estas farita, sed ankaŭ la naciaj lingvoj ja ne klarigas tion. Robert Kreuz: "Esperanto en komerco kaj trafiko" diras "multoblig-maŝino"; en la Komerca Vortaro" de Kreuz-Mazzolini troviĝas:

869 multobligaparato, oficeja maŝino por multenombra reproduktado de cirkuleroj, avizoj, katalogoj, ktp.

870 multobligilo, instalato por multoble reprodukti skribaĵojn, desegnojn, ktp. per speciala procedo.

470 hektografo aparato por multfoja reprodukto de skribaĵoj aŭ desegnoj per speciala inko sur preparita gelatina maso. e/-

Mi esperas, ke tio iom helpos al vi.

-----

### LINGVAJ RESPONDOJ.

B. en Y. "licenco" ne estas akceptita vorto. Vidu "koncesiita drinkejo" (Batalo de l'Vivo 87/10); "permeshavaj nutraĵistoj" (Ok Noveloj, trad. Wackrill, 29/15). Millidge "koncesio".

M. en To. "Li lernis ĝin post dek minutoj"? Oni ofte uzas "en", kiu estas klara kvankam ne tute logika, kaj Cart forte protestis kontraŭ tia uzo. La jenaj estas ĝustaj: Oni malliberigis lin por ses monatoj. Li sidis en karcero dum tuta la vintro. En Junio oni aljuĝis al li tiun punon. Ankoraŭ E-istoj disputas pri tio, ĉu estas korekta. "Mi aŭdis pafon dum (aŭ en) la nokto." Mi certe preferus "en", retenante "dum" kun senco "en la tuta daŭro de".

S-ino A.D. en Moo. Kiam en 1926 S-ro Gordon tradukis la Pecon 18 (Julio 1941) la Plena Vortaro de SAT ankoraŭ ne aperis. Li formis la frazon "edukejo de aligatoroj (kaj kobajoj) laŭ la vorto en Gen-ezo 46/32, "brutedukistoj" (en senco "keepers of cattle). Strange estas, ke la P.V. de SAT, kiu donas "eduki" = dresi beston (train it), ne rimarkigis pri tiu uzaĵo de Zamenhof. "Bredi", kiu signifas "kulturi kaj eduki bestojn por la uzado de la homo" (to breed animals as a business), estas pli vaste uzata ol "eduki" en tiu sen-  
co.

G.D. en Tas. Ĉu "da" aŭ "de" post "provizo"? Se vi uzas "provizo" kiel puran substantivon de kvanteco, uzu "da"; se ĝi havas verban forton, uzu "de". Ekzemple: prizorgi provizadon de Taĉmento. Ĉu sufiĉas la proviz(ad)o de biskvitoj? En tiuj okazoj la substantivoj havas verban forton (the providing of). Male, "provizo da vortoj, da pensoj." Tie la kvanta senco postulas "da". Ajna substantivo povas sekviĝi de "da" se la senco estas kvanta. Ekz., "Mi ne uzis eĉ vorton da nia kara lingvo." Tie "vorto" = iometo, ~~ereto~~, do pure kvanta.

-----


TROA DEFENDO. Kial vi redonis al mi la tason rompita? Tio ne povas esti, ĉar unue mi ne pruntis de vi tason. Due, mi redonis ĝin al vi nedifektita. Kaj trie, kiam mi prenis la tason, ĝi jam estis rompita.

-----

NI NUN PRESAS monate 220 ekzemploj<sup>oj</sup> de LA RONDŌ.

Oficina Organo de la A.E.A.

Le Rondo.



Man 9/2

Nº 10/8

Edonita de F.R. Banham  
2 Banchory St. Essendon W5 Vic AUSTRALIA.

ALTIGO kaj HUMILIGO. (el "PUNCH")

La hazardo estas la ununura leĝo reganta la elvokadon al la familiaraj vizaĝoj de la pasinteco. En kiu ajn momento la prembuto ne povas ricevi tuŝon, kaj per tute neatendita ilo-rimedo. Ekzemple, foliumante raperton pri vendo de artobjektoj, mi ekrimarkis, ke iu akvarelo de BIRKET FOSTER ĵus kostis naŭcent gineojn. Tiu simpla fakto venigis al mia menso du rememoraĵojn. Unu estis pri faksimilo de bildeto, kiun-ĉi faris tiu pentristo. La faksimilo pendis en la infanludejo kaj estis konstanta fonto de ĝojo -- rozvangaj etuloj de l'tero, sunĉapelitaj, ĉirkaŭ kampa baril-pordo, havantaj ĉe la piedoj sovaĝajn florojn; en la tritiko trans la pordo belruĝis papavoj, kaj for en la malproksimo etendis sin mejloj da blua Anglujo sub ĉielo de pli hela bluo, kiu enhavis en si ian, kio avertetis pri venonta tondro. Kiel estis lerte-tuŝa la mano de BIRKET FOSTER! Preni pecon da papero ek per ses koloroj kaj per miriado da penikstreketoj ŝanĝi ĝin en kvintesencon de graflando Surrey -- miraklo tio estas! En tiu tempo mi tiel opiniis, kaj ankoraŭ same.

Kian interesan ŝanĝon de la artgusto oni vidas ĝuste en tiuj naŭcent gineoj! Mi ne povas diri kiom da monrekompenco lia laborado alportis al li dum lia plej agema periodo, sed foje en la fina parto de lia vivo, kaj post lia morto, la prezoj estis tre altaj. Poste venis faliĝo tiomgrada, ke oni povis antaŭ la milito (de 1914) aĉeti bonegan ekzemplon de lia arto kontraŭ elspezo de kelke da funtoj. Regis aliaj manieroj, kaj tiu simplanima idealulo estis depuŝita for. Sed la milito kreis oportunojn per kiuj povis riĉiĝi tiaspecaj homoj, kiaj, kiam venis tempo por ripozi kaj pensi pri la dekoraĵoj de sia nova hejmo, trovis ke ĝuste la ĉarmaj idilioj de BIRKET FOSTER povus portien ĝin feliĉon. Do, naŭcent gineoj!

Mia alia rememoro. Legante tiun raperton, mi denove vidis amikon de la infanjaroj kaj junula tempo, iom grandaĝan sinjoron, kun neĝblanka barbo. Li ĉiam estis bonvena vizitanto ĉe ni. Li foje rakontis al ni pri ferio en Tunbridge Wells, kie, sidante sur seĝo en la Common, li vidis veni al li nekonata sinjorino. Ŝi petis de li la favoron salutpremi la manon.

"Certe jes, sinjorino," li respondis, "se per tio vi sentus plezuron."

"Plezuron!" ŝi fervoris; "pli ol plezuro. Ĝi ĉiam rajtigos min fanfaroni, ke mi iam havis privilegion prempreni la manon de la homo, kiu la plej bele pentras el ĉiuj en tuta Anglujo -- Sinjoro BIRKET FOSTER."

"Imagu al vi," li diris, rakonte la aferon al ni, "kiel forte mi sentis min altigita; el ĉiuj homoj sur tero, BIRKET FOSTER estas tiu, kun kiu mi preferus esti erare prenita!"

"Tamen," li aldonis, "antaŭ la pereco iras fiereco. Ĝuste en la morgaŭa tago mi sidis ĝuste en la sama seĝo kaj ekvidis sinjorinon decidpaŝe veni al mi. Tiuĉifoje ŝi estis ne heĉon-admiranto sed vera Furio. "Kial vi ne venis je la dek-unua ĥoro laŭ via promeso?" ŝi akrate demandis.

"Promeso?" mi respondis. "Pardenu, sinjorino, sed mi neniam antaŭe vin vidis."



antaŭ vin vidis."

"Si ekpaŝis malantaŭen kaj streĉe min esplorigardis. Tiam ŝi ekridis.

'Senkulpigu min, mi tre petas,' ŝi diris. 'Mi pensis, ke vi estas mia ĉarpuŝisto. Ĉu efektive vi ne estas tiu?'"

----- F.R.BANHAM (trad)

### KIO ĜI ESTAS?

En ĉiu mateno mi eniras mian ĝardenon por serĉi la tagĵurnalon kiun mia afabla vendisto tien enĵetas ĉirkaŭ la kvina. Ĉu mi serĉas ĝin sur la veranda planko, aŭ meze de gruzo vojeto? Tute ne! La tagĵurnal-liveristo estas tro artisto por fari la atenditon. Jen lia metodo. Unue li volvas ĝin ĝis tielforta kiel ligno kaj tiom danĝera kiel estas bumerango -- nu, tion mi konjektas, ĉar mi neniam estis tie por akiri la praktikan sperton de viktimo -- tiam, volvita ĝis ne pluolvebla, li ĵetas ĝin.

Estas ja mirinde, kion kapablas fari volvita ĵurnalo. Ĝi povas frakasi krizantemojn, fortranĉi rozojn, enterigi semojn, malaltigi narcisojn kaj hiacintojn, senkapigi ziniojn, mortigi violetojn ktp. laŭ sezono. Ŝajne estas nur unu sola afero kiun ĝi ne kapablas aŭ ne volas fari en la tuta mondo de legomaĵoj -- neniam mi perdis per ĝi eĉ unu sarkindaĵon, grandan aŭ malgrandan.

Antaŭ nelonge, dum laŭ kutimo mi frue vagadis la ĝardenon por serĉi la ĵurnalon, eksterordinara kaj nekomprenbla objekto kaptis mian atenton. Tiu objekto, kiu ajn ĝi povus esti, sidis en la koro de rozujo -- ruĝa io, mola kaj fleksebla, ne klare videbla pro la dika foliaro de la rozujo. Venkinte momenton da naŭzo, mi alproksimiĝis kaj flanke puŝis la branĉetojn kiuj ĝin duonkaŝis, kaj tie, meze de rozujo malkongrue aperigis ŝirita.....!

Kiel, nome, ĝi alvenis tien? Ne per ĝia memovo!

Estas kvar enirejoj el la strato en mian ĝardenon, grandaj aŭto-pordoj, kaj tri dratpordetoj, kaj troviĝas rozujoj ĉe ĉiu enirejo. Oni atendus, ke sensaĝulo kiu naskis ideon idiotan por mal embarasi sin de objekto ne plu dezirata, pendante ĝin en rozujo, elektus unu proksiman al enirejo. Sed ne! Li elektis rozujon la plej malproksiman de ĉiu enirejo. Plue ne tre agrabla estis lia tasko, ĉar li elektis rozujon havantan tre dikan foliaron, kaj tre pikecan. Nur per granda peno li povis enŝovi ĝin, kaj mi kuraĝas hazardi, ke li ankaŭ perdis pli ol unu sangoguton kaj tre da tempo.

Kian kompatindan objekton li fordonis! Ĝia materialo naskiĝis en iu tropika lando. Brunaj homoj grimpis arbojn por kolekti ĝin. En por li fremda lando, tiu materialo estis zorge formita, kudrita, donita grandan metalan buŝon en iu laborema fabrikejo. Poste iu komercisto vendis ĝin al aĉetisto por granda butiko. Kontenta ĝi kuŝis sur montratablo kun multaj kunuloj, grizaj, bluaj, verdaj, aŭ ruĝaj sama kiel ĝi mem. Tiam en unu tago alvenis aĉetanto kaj elektis lin prefere el ĉiuj liaj kunuloj -- kia dolĉa fiero naskiĝis en lia modesta koro! Li, la preferato! Kaj tiam en sia nova hejmo, nokt-nokteli fide servadis, donante varmon kaj komforton al sia

posedanto.

Kaj nun -- ! Kia sorto! Kia kruela sorto! Forlasita, kun siaj vundoj videblaj al ĉiu sciamulo, korpo maldece ŝirita, buŝo malfermega, dornoj enpikantaj liajn glatajn flankojn, li deviga elmontri sian malaltiĝon en tia malamika loko, kie li neniam antaŭe aperigis, kaj kiun li antaŭe eĉ ne vidis.

Trankvilligu vin, mia kara! Malgraŭ tuta via nuna malgaja stato vi ankoraŭ estas fonto de bonfarado, ĉar per vi, finfine mi gajnas rajton por la fanfarono. Vi igas min unika inter ĉiuj la Esperantistoj de ĉiuj landoj -- mi ne dubas, ke sola el ili, mi povas diri, ke mi trovis en rozujo.....ŝiritan litvarmigilon el kaŭĉuko!

----- L.E.BAILEY.

ESPERANTISTOJ FLUGAS de EUROPO al AUSTRALIO. (20.-28.10.38)  
(Daŭrigo.)

II. Dua Tago: Napoli - Athens - Alexandria.  
(1140 mejloj; neta flugdaŭro - 7 horoj 30 min.)

Por tiuj malmultaj (!) homoj, kiuj ankoraŭ ne flugis de Eŭropo al Aŭstralio mi volas menci, ke ĉiun vesperon alveninte ni ricevis de la flugkompania agento sciigpaperon nete presitan, kiu ekzemple en Napoli tekstis jene:

K.L.M. ----- Regaj Nederlandaj Aerlinioj.  
 Stacio: Napoli ~~Monserte~~ de la lando: Liro *spaco!*  
 Aeroplano: PH-ARB Interŝanĝa valuto: 1 sterl.funto =  
 Dato: 21.10.1938 90 liroj  
 Loka tempo: G.M.T. plus 60 minutoj.  
 Pasageroj loĝas en: Hotelo Excelsior  
 Aviadistaro " " ; " "  
 Pasageroj estos vekataj: 5.45 a.m.  
 Pakajoj estos kolektataj: 6.35 a.m.  
 Matenmanĝo en ĉambro: 6.15 a.m.  
 Aŭto forlasos la hotelon: 6.45 a.m.  
 Forflugo de la aerodromo: 7.30 a.m.

Pasageroj estas serioze petataj, esti pretaj je la supre menciitaj tempoj, ĉar la aŭto ne povas atendi. Prokrastata forflugo endanĝerigos la regularecon de la servo.

Napoli.....Kiel precizaj homoj ni ellitiĝas jam je la kvina frumatene, por denove ĝui la belan elrigardon al la Vesuvio, kiu malklare siluetiĝas kontraŭ la krepusko-griza ĉielo. La maro estas maltrankvila, malforta pluveto falas kiel maldensa vualo, sed baldaŭ ĝi ĉesas....

Precize je la fiksitaj tempoj ĉio funkcias. La aŭtobuso veturas laŭlonge de la haveno kaj denove havigas al ni okazon, primiri la belecon de la suditala vegetaĵaro: grandaj agavoj, kakteoj kaj altaj palmarboj kreskas abunde en bone flegitaj ĝardenoj kaj publikaj parkoj. En la strato duradaj altaj ĉaroj renkontas nin; ili

estas tirataj de ĉevaloj, azenoj kaj muloj, kiuj surdorse portas belan ornamajon kun tintilaro, kies ĉarmaj sonoj plenigas la frumatenan aeron per harmonio. Sur la ĉaroj la kamparanoj alveturigas fruktojn kaj logomojn al la urbo, kiu nun kuŝas malalte sub ni. Pli kaj pli nia aŭtomobilo grimpas supren, ĝis ni atingas la flughavenon. Post temporaba, sed ne tro serioza dogankontrolo ni eniras nian belan 'birdon', kiu jam atendas nin kvazaŭ malnova amiko. Precize je la 7a kaj duono ni forflugas kaj adiaŭas de la verdaj oliv-arbaretoj, kiuj ĉirkaŭas la fame belan urbon.

Dum ni interne sentas la veron de la frazo "Napolon vidi...kaj morti - ", forta vento skuas nian bravan aviadilon supren-malsupren kaj tuj elrevigas nin. Tute malalte ni pasas la Vesuvion, en kies fumantan faŭkon ni povas ĵeti rapidan rigardon. Nun ni devas tre rapide alteniĝi, ĉar proksimo minacas la Apennin-montaro, kiu leviĝas krute kaj danĝere antaŭ ni. Post nur 30 minutoj ni troviĝas en alteco de dek mil futoj, kie ni trovas sufiĉe trankvilan aerfluan, sed la malvarmeco devigas nin, surmeti la lanajn kovrilojn, kiuj estas je la dispozo de la fluggastoj.

Sub ni alternas surrokaj urboj, brunkoloraj montetoj kaj sekigitaj river-fluejoj, ĝis ni atingas la Golfon de Taranto, kies akvoj brilas malhelblue en la unuaj radioj de la suno, kiu ĵus eliĝas el malantaŭ la nuboj. Klare ni povas ekvidi la havenurbon Taranto, kiu nun en la milito famiĝas pro la bombado per britaj aeroplanoj. La lasta itala urbo, kiun ni vidas, estas Otranto; ĝi situas sur la pinto de la "kalkanumo de l'itala boto".

Dum ni superflugas nun la Jonian Maron, nuba tavolo ŝovas sin inter nin kaj la akvon. Nur mallonga klara vido ebligas al ni, ekoni maldekstre la fabele belan insulon Korfu; post tio ni flugas en densaj nuboj atingante altecon de pli ol 13,000 futoj.

Post kvardek minutoj la suno denove venkas, la nuboj disiĝas, ni estas jam delonge en Grekujo kaj la Golfo de Korinth vidiĝas sub ni kun siaj multnombraj insuloj kaj insuletoj, kovritaj de arbaroj aŭ ruĝe-flavaj kampoj. Pasinte la faman lokon Delphi, kies dubesenca orakolo ludis gravan rolon en antikvaj tempoj, ni ekvidas post mallonge la ĉefurbon Ateno en la malproksimeco. En krutaj ŝraŭblinioj ni flugas malsupren, kelkfoje ni timas kontraŭ-flugi monteton, kiu ŝajne baras al ni la vojon, sed fine -- iom traskuite sed danĝore -- ni surteriĝas en Dekelia, la flughaveno de Ateno. Grandioza lunĉo atendas nin en aparta salono. Guante ĝin ni pensas kun bedaŭro je la famaj vidindaĵoj de la urbo, kiujn ni vere ŝatus vidi dum tiu kvardek-minuta paŭzo; sed tio ne estas ebla.

Je 12.30 ni ree forflugas vidante la faman urbon nur de malproksime. Baldaŭ ni estas super la Kreta Maro. Niaj pensoj iom vagas al parto de ĉi tiu maro, la Ikara Maro, en kies profundon iam antaŭ multaj jarcentoj falis la Malfeliĉa Ikaro, dum li (laŭ la greka mitologio) uzis simplan flugmaŝinon elpensitan de sia patro Daedalus. La flugilo konsistis el plumoj kungluitaj per vakso kaj estis fiksitaj al la brakoj. La patro admonis lin antaŭ la flugo, ke li ne flugu tro alten, tro proksimen al la suno; sed la filoj ja ofte ne obeas, kaj ankaŭ la ambicia Ikaro ne ŝatis la averton de l' singarda patro, li flugis pli kaj pli alten, ĝis la sunvarmo fluidigis

la vakson, la flugiloj disiĝis kaj la malfeliĉulo falis en la maron antaŭ la okuloj de la patro.

Flugante en alteco de 12,000 futoj ni rimarkis, ke la aero estas ege maldensa, kaj precipe rimarkis tion niaj fontoplumoj, el kiuj la inko libere elfluas pro la malgranda aerpremo. Do ni devas rezigni nian skribadon....Kaj ni volas uzi la duhoran flugadon super la Mediteranea Maro, por iomete konatiĝi kun la komforto de la modernaj flugmaŝinoj:

La Douglas-aeroplano, kiuj havas 21 sidlokojn flugante la Eŭropajn liniojn, veturigas maksimume 11 pasaĝerojn sur tiu longa fluglinio; efektive ni estis la solaj gastoj, kiuj flugis la tutan distancon de Amsterdam al Sidnejo. Ni neniam estis pli ol 8 pasaĝeroj, kaj dum kelka tempo ĉiuj aliaj sidlokoj estis neokupitaj. Do ni ĉiam disponis pri sufiĉe da loko por sidi en la komfortaj Pullman-seĝoj aŭ ĉirkaŭvagadi. La seĝoj estas turneblaj kaj ĉiurilate adapteblaj al la korpoformoj; molaj kusenoj kaj specialaj pied-subteniloj efikas, ke oni povas kuŝante ripozi same agrable kiel en la plej bona lito.

La manĝoj estas kutime prenataj en hotelo aŭ en la restoracioj de la flughavenoj, sed kelkaj bonegaj manĝoj estas ankaŭ prezentataj de la aviadil-kelnero. La du kofroj, kiujn la flugkompanio senkoste havigas al ĉiu fluggasto, staras en la flugkabino antaŭ kaj sub la sidloko tiel, ke ĉiu havas sian pakajon je sia dispono dum la tuta flugo.


Ĉiuj membroj de la aviadistaro parolas angle, france, germane kaj nederlande, kaj ĉiuj afable zorgas pri la bonfarto de la vojaĝantoj. Antaŭ forflugo kaj surterigo ĉiufoje eklumas averta ŝildo: "Fiksu la zonojn!" Tiam la pasaĝeroj devas kunligi la du rimenojn, kiuj estas fiksitaj ĉe ĉiu sidloko, kaj fiksi ilin per buko, tiamaniere ŝirmante sin kontraŭ elfalado el la sidloko en kazo de akcidento. Sed tio daŭras nur kelkajn minutojn, poste la ŝildo mallumiĝas kaj oni povas malfiksi la rimenojn.

Ĉe ĉiu sidloko troviĝas tableto, elektra lampo, sonorilo al la kelnero kaj speciala instalaĵo, kiun oni povas turni, por ekhavi suplementan freŝan aeron. La kelnero daŭre zorgas pri la gastoj ne nur per ĉiuspecaj refreŝigiloj, li ankaŭ disdonas la plej novajn gazetojn, revuojn, interesajn librojn ktp. Sed plej ofte oni uzas la specialajn landkartojn, por observi la flugvojon.

Sur la pordo inter la flugkabino kaj la pilotejo troviĝas horloĝo kaj altometro, sur kiu oni povas ĉiun momente ekkoni la altecon super marnivelo, en kiu la flugmaŝino troviĝas. Kaj tio kompreniĝas ĉiam interesas.

Dum du longaj horoj ni povis vidi nenion krom ĉielo kaj maro; sed nun la malalta bordo de l' nigra kontinento Afriko montriĝas en brilega sunlumo. Baldaŭ ni ekkonas la Egiptan Dezerton, la grandegan duoncirklan havenon de Aleksandria kaj la larĝan duoneŭropan urbon mem. Ni surteriĝas en la flughaveno Dekheila, kie multaj arme-flugmaŝinoj kaj grandega aviadilo de la "Imperiaj Aerlinioj" atendas nin.

Dezerta sablo, brulega varmo kaj palmarboj konvinkas nin denove, ke ni nun fakte kaj efektive lasis Eŭropon malantaŭ ni. Brunaj



kaj nigraj homoj ĉirkaŭis nin, ĉiuj surhavantaj ruĝajn fezojn, kiuj ŝirmas la kapon kontraŭ la sunradioj. Enirinte nian aŭtobuson ni unue veturis longan tempon tra parto de la Nil-delfto; gigantaj, alte amasigitaj tavoloj de argila tero, kiujn la Nilo alfluigis superakvante, donas al ni la impreson de ĉina leŭso-teritorio. Multloke oni ekspluatas tiujn argilamasojn, farante brikojn el la sunsekigita tero por domkonstruado. Gigantaj kakteoj kaj agavoj, fruktopezaj palmarboj, domruinoj, azenveturiloj, duradaj ĉaroj tipataj de muloj pli kaj pli vigligas la pejzaĝon.

Alproksimiĝante al la urbo ni vidas indiĝenajn portistinojn, kiuj ekvilibrigas pezajn ŝarĝojn surkape; aliaj virinoj surhavas blankajn kaptukojn, aliaj nigrajn vestojn kaj nigrajn vualojn antaŭ la vizaĝo, kiuj lasas nekovrita nur la okulojn ambaŭflanke de la nazopeco. Traveturinte la indiĝenan kvartalon, kie la tuta kolorriĉa familia vivo okazas surstrate kaj publike, ni atingas la modernajn partojn de la urbo, la centron de l'eŭropa societa vivo, kun ĝiaj trafikplenaj stratoj kaj bulvaroj kaj altegaj modernaj nubskrapuloj. Laŭlonge de la marhaveno etendiĝas larĝa promenejo kun ŝton-balustrado; tie leviĝas la elegantaj kaj parte ultramodernaj hotelpalacoj, inter ili nia komforta hotelo "Windsor Palace."

De sur la balkono antaŭ niaj ĉambroj ni havas elrigardon al parto de la haveno kaj precipe interese al la tegmentaj terasoj de la apudaj domoj. La ebenaj tegmentoj estas apartigitaj per muroj por la unuopaj familioj; tie troviĝas lavadejoj, staloj por kokinoj, instalaĵoj por la batado de tapiŝoj, sekigido de tolaĵo, ktp. Strateto nur ses futojn larĝa disigas nin de la apuda tegmento, de kiu oni facile povus transsalti al nia balkono.

Ni uzas la lastan horon antaŭ sunsubiro por mallonga irado laŭ la havenkuro, kie postenantoj kun pafiloj paŝas tien kaj reen kaj memorigas nin denove, ke la tempoj ne estas tro pacemaj kaj sekuraj. Trafikpolicisto en eleganta uniformo kun ruĝa fezo, bastoneton en la mano, regulas la veturadon de aŭtobusoj, elektraĵ tramoj kaj luksaj aŭtoj, kies pasageroj rapidas al la hele lumigitaj amuzejoj.

Ni ĵetas lastan rigardon trans la malhelan maron: ĉe la plej proksima fino de la haven-moleo ekbrilas lumo montranta la enirvojon al la ŝipoj, kiuj serĉas rifuĝejon post longa marveturo. En nia fantazio ni identigas ĝin kun tiu lumo, kiu iam eliris de la fama "Pharus-lumturo" staranta samloke kaj miriganta la antikvan mondon kiel unu el la sep mondmirakloj. Konstruita tute el blanka marmoro en la jaro 250 antaŭ Kristo, ĝi atingis altecon de preskaŭ 600 futoj kaj staris tie, ĝis mahometana Kalifo detruis ĝin en la naŭa jarcento.

Ni devas enlitigi. Sed longe ni ankoraŭ pensas pri la riĉa historio de ĉi tiu urbo, kiun Aleksandro fondis en la jaro 332 a.K. kaj kiu ludis grandan rolon dum ĉiuj jarcentoj de sia dumiljara historio. La figuroj de Julio Cezaro kaj Kleopatra, kiuj rendezuis ĉi tie.... de Napoleono, kiu komencis ĉi tie sian egiptan ekspedicion, ... de la imperiestroj Oktavian kaj Karakalla.... kaj multaj aliaj sekvas nin en niaj sonĝoj kaj formas strangan kalejdoskopon bildon.

----- P. SCHWERIN.

### VORTOJ KAJ TIEL PLU.

Ni ofte rimarkas kiel iu studento, kiu lernas pri la artoj, lingvoj, sciencoj, ktp., senintence fanfaronetas pri la studataj temoj. Al la junaj studentoj, tio estas, eble, rezulto de nova akiraĵo, kiu iomete disvolvigas la mensan elrigardon. Pro tio, li tre ŝatas montri al kunuloj kaj aliuloj sian tielnomatan lertecon. Tamen, ĉiuj konsentos ke vere kulturita persono forlasas tiun emon, tuj post kiam li mem trapasis la lernadan periodon. Ĉiu el ni iam renkontis parademan Esperantiston, kiu pro sia lerteco, ne povas ne paradi sian konon kaj kapablecon. Tiu eĉ ne povas atendi oficialiĝon de iu vorto, tute ne, li permesas al si la uzadon de tute nova vorto, kiu, al la Esperantistaro ĝenerale, estas simple enigmo, aŭ eble vortmonstro. Plejparte ĉiuj volas akiri la parolpovon kio ebligas al ni interparoli inter la mondanoj en ĉiuj landoj kaj regionoj. Farante tion, estas memkompreneble ke oni devas sekvi la gramatikan regularon.

Krome, ne estas necese uzi enigmojn al la ordinara homo. S-ro G. Cox en sia bonega verko -- "Commentary" konsilas -- "eviti enigmojn kiel longaj kunmetitaj vortoj, havante tri aŭ pli da diversaj radikoj. Sentenco en Esperanto ne estas enigmo...memoru, ke tio, kio ne facile povas esti komprenata, ne estas bonstila, kiom ajn korekta ĝi estas gramatike." D-ro Zamenhof ĉiam uzis la plej simplajn vortojn esperantajn, ĉu parolante, ĉu skribante. Neniam li faris Esperantan paroladon kvazaŭ por konfuzi la aŭskultantaron, tute ne, li ne estis tia; male li ĉiam celis esti helpema kaj neniam paradema. Ni sekvu tiun ekzemplon, spirite kaj en la ĉiutaga praktikado. Ni estu humilaj kaj helpemaj antaŭ ĉio. Ne imagu ke mi volas prediki, karaj legantoj;

tute ne, mi nur deziras atentigi vin al evitinda kulpeto.

----- HO-BO.

THE PROPHEPIC LAWSON.

By our place in the midst of the furthest seas we were fated to  
stand alone --  
When the nations fly at each other's throats let Australia look  
to her own;  
Let her spend her gold on the barren West, let her keep her men  
at home;  
For the South must look to the South for strength in the storm  
that is to come.  
.....And is it our fate that we'll wake too late for the truth  
that we were blind,  
With a foreign foe at our harbour gate and a blazing drought  
behind?

(See last "Heroldeko") .....

"Hold them, Ivan! Staggering bravely underneath your gloomy sky;  
"Hold them, Ivan! We shall need you pretty badly by-and-bye!  
Fighting for the Indian Empire, when the British pay their debt.  
"Never Britain watched for Blucher as he'll watch for Ivan yet!  
It means all to young Australia -- it means life or death to us,  
For the vanguard of the White Man is the vanguard of the Russ."

----- Written before 1905.

LETERO de D-ro Cyrus J. CALDERA, al la REDAKTORO.

Kun granda plezuro S-rino Caldera kaj mi sendas al vi, kiel kor-  
oferajon por nia Esperanto-gazeto LA RONDO, mandaton de unu funto,  
en la ĝoja okazo de la datreveno de nia geedziĝo. Ni atente legas  
la gazeton kaj ni vidas progresajn pliboniĝojn en ĉiu nova eldonajo.  
La tradukaĵoj de la verko de Prof-o Murdoch pri Voltaire, kaj de la  
poemo de Heine, "Demando", estas ambaŭ belegaj, kaj ni gratulas vin  
pro via altgrada kaj utila laborado por la Esperanto-movado.

-----  
LEGANTOJ...ATENTU!

Se vi vidas en LA RONDO ion pri kio vi volus sugesti, kritiki,  
kontraŭdiri, plendi, koleri, demandi --- aŭ simple laŭdi, nepre  
verku leteron pri ĝi al la Redaktoro, kiu tre volonte starigus ru-  
brikon "Leteroj de la Legantoj."

ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATO. Ankoraŭ mankas kelkaj informiloj pri la elekto de Komitatoj. La koncernaj Grupoj bonvolu sendi sian senprokraste! Anoneo pri la ĝusta formo de la informilo aperis en la Jan. Nro. de LA RONDO. Estas tre dezirinde, ke ni tuj elektu la oficienontojn, sed tio estas noble ĝis la Grupoj elektos la komitatanojn.

20.2.42. Allan Turner, Prezidanto.  
Box 81, Shepparton. VIC.

ALILANDA NOVAĴO. Laŭ la Jan/feb Nro. de la British Esperantist novaj membroj nuntempe aliĝas laŭ paco ne spertita dum multaj monatoj. Oni atribuas tion al la kreskanta sento inter la popolo, ke Esperanto ludos esencan rolon en la paco por kiu ni sopiras.

Reklamoj en gazetoj de la Publika Servo kaj similaj organizaĵoj pri nova korespondo kurso estis granda sukceso. Kredeble ni povos profiti el la spertoj de niaj amikoj en Britujo kaj organizi tian kurson. Militaj taskoj ofte malhelpas vizitojn al la klubĉambroj.

Rilate al la oficiala projekto por eduko en la armeo, la B.E.A. esperas aranĝi prelegojn pri Esp.

La dua parto de la I.E.L. Jarlibro (havebla nur al membroj) enhavas Aeronautikan Terminaron. Tiam terminaron oni delonge bezonis en nia lingvo.

La Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko denove eldonis Esp-e sian Statistikan Resumeton.

ADRESARO. La manuskripto nun pretiĝas. Bedaŭrinde, rezulto de la milito, multaj malfacilaĵoj pri presado sin prezentis, sed ni kuraĝe daŭrigas, esperante pri eventuala eldoniĝo. Eĉ se niaj penoj pri publikigado malsukcesos, la kompilo de la adresaro certigos, ke ĉio konata samideano sciigos pri la Asocia laboro.

MILITO. La terura monstro rampas ĉiam pli proksimen. Bonboj jam falis sur Aŭstralia tero. Unu rezulto estas, ke ĉiu homo devas nun sin meti je la dispono de la Registaro. Sendube multaj el niaj membroj kaj legantoj devos militservi aŭ labori plilonghore je la kutima okupo. En ĉiu okazo la tempo je ilia dispono malsufiĉos por daŭrigi la kromokupojn. Esperanto-kluboĵ certe tiel perdos subtenantojn, kiuj ne plu povos viziti la klubĉambron.

Sed jen unu el la pli gravaj celoj de nia Asocio -- havigi al tiaj personoj metodon daŭrigi kontakton kun la Esperanto-mondo. Nia oficiala organo havigos al ĉiu el ni regulan ekzercon en uzado de la lingvo, novaĵon pri la kluboj kaj kontakto kun niaj Asociaj kunuloj. Subtenu kiel eble plej multe vian klubon; en ĉi tiuj tagoj ĝi bezonas vin. Kio ajn okazos, daŭrigu vian membrecon en la tutlanda asocio; legu ĝian organon. Tiel vi certigos, ke la movado en nia lando NE PEREOS, sed male plifirmiĝos ĝis preta por la pacaj jarej.

KVITANCOJ ĝis 20.2.42. Bonvole pagis la duoblan kotizon:- Ges. J. Couche, S-roj S. Warner Snr, P.Schwerin, B.Cuvet, L.G.Hadley, F-ino L.O'Connor, S-inoj V.Baker, E.Dollahan, D-ro A.R.Maclurkin, Lieut. Stephens.



La individua membro-cifero jam atingis 70.

KOTIZOJ kaj ABONOJ. Individua membro kun LA RONDO, 5/-. LA RONDO al nemembroj, 3/6. Abonantoj povas tuj anizi, pagante la diferencon inter la abonprezo kaj la kotizo por individua membro kun LA RONDO. Ĉiam atentigu la senditon pri via ĝusta volo pri mono. Sur postmonbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)  
Box 75, DEVONPORT, TAS.

-----  
WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY.

Ni volas al ĉiuj ge-esperantistoj ĉion bonani! Nia ĉiujara kunveno okazis frue en februaro: la anoj preparolis administraciajn aferojn; oni elektis kiel prezidanton kaj vicprezidanton respektive ges-rojn Hy. Byatt; kiel sekretarion re-elektis s-ron A.Chamberlain. Novaj komitatanoj estas f-inoj K.Dalton, O.Stremple, A.L.Bailey kaj s-ro A.Saar. La Societo kunvenas la unuan kaj trian lundon en ĉiu monato. Dum la pasinta intertempo periodo kelkaj el niaj anoj bonvole invitis la ceteron, vespere, por ke ili sin ekzercadu konversacie ĉetabile, antaŭ bongustajoj, kafo, k.t.p. Ni dankas al la f-ino Stremple, s-inoj Saar, Motteram, Jones, kaj s-ro Masel, pro ilia gastigemeco, kaj la oportunaĵo por babilado en Esperanto. Nun, denove ni rekomencas forte studi nian Esperanton.

----- HO-BO.

RENDEVUO, MELBURNO. Lastan jaron okazis konkurso inter la Rendevojanoj: Kiu gajnos premion pro bona verketo? S-ro Banham juĝis.

Tre vigla estis la 20 ĉeestantoj, kiam la Prezidanto S-ro Ballard, malfermis la paperojn kaj anoncis, ke S-ino Hanks jam gajnis per sia originalaĵo, la Praarbaro. S-ino Hanks bonvolis legi sian verketon, post kio ĉiu konsentis, ke ĝi estas bele farita rakonto. Ni esperas, ke la legantoj de LA RONDO baldaŭ havos oportunon ĝin tralegi.

Post plaŭda aklamado S-ro Ballard donacis al la gajninto premion forme de libro, "Fabiola". En sekvantaj Rendevojanoj oni legos la ceterajn verketojn.

La Prezidanto gratulis al Ge-sroj Ling, en tio, ke antaŭ du-tri tagoj naskiĝis al ili alia infano. S-ro Ling ĉeestis, kaj ni suspektas, ke li estas iom tre fiera pro tio, ke li nun havas fileton. Post kelke da jaroj, esperatendoble, ili tutfamilje venos al la Rendevo. Feb. 7.42.

-----  
EL "BRITISH ESPERANTIST" (JAN-FEB)

Ĝis 20 Dec., sub B.E.A. organizo, 5267 homoj nomskribe petas la Registaron konduki E-on en la lernejojn. Kolektado ĉesos 31 Marto.

"Millidge" ne plu aĉetebla en Britujo.

Prof-o Aime Cotton, mondfama fizikisto kaj fervora E-isto de post 1907, estas garantiule tenata de la Nazioj. (La France Libre, Nov)

El radiparolo de Beaverbrook 12 Okt.:— "S-ro Harriman kaj mi veturis al Kremlo, kie konsultante kun Stalin kaj Molotov, kun Litvinov kiel interpretanto, ni revuis la rezultaĵojn de la tago. Sed ni ne tute apogis nin sur nian interpretanton. Ni jam antaŭe faris planon por rapidigi la aferon, kaj ĝi bonega funkciis. Jen ĝi:— Antaŭ nia veturo Kremlon ni klopodis anticipi la demandojn de Stalin. Al tiuj supozitaj demandoj ni preparis respondojn, kiujn ni tradukigis Rusen. Sekve de tia antaŭpreparo, ni povis ĉe la demando transdoni al la Rusa ĉefministro kompletajn respondojn maŝinskribitajn en lia lingvo, anstataŭ lasi ilin tradukiĝi per la buŝo de Litvinov."— Vere intima konversacio!"

### REDAKTORA BABILADO.

En la lastaj du-tri jaroj aperis en la Jarlibro de I.E.L. tri utilaj fakvortaroj (1) Fervoja; (2) Armea; (3) Aeronautika. Pro la milito, internacia kunlaboro, vere reprezenteca kaj kompetenta, estis neebla, kaj ili estas preskaŭ tute la frukto de la sindona studado de Anglaj E-istoj, el kiuj estas elstaraj fakuloj en la koncernaj kampoj. Pro la malvasta vendkampo de tiuj eldonaĵoj pro konataj kaŭzoj, ni devas supozi, ke iom post iom la rekomenditaj terminoj pli-malpli uze komuniĝos inter la Anglalingvaj E-istoj, malgraŭ tio, ke post la milito vere internacia lingva komisiono eventuale opinios iujn el la terminoj ne tute ĝuste elektitaj. Tiu penso tamen, ne malemigu legantojn de LA RONDO iel havigi al si tiujn vortaretojn, kiuj estas preze malkaraj ĉe "British Esperantist", Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Eng. Jam jarojn ekzistas similaj, ekzemple, La Marista Terminaro (Rollet de l'Isle), la Ornitologia de Stojan, la Hortikultura de Neergaard, la Radia de Epton, la Medicina de Briquet, la Filozofia de Kamaryt, la Maŝinfaka de Wŭster, kaj kelkaj Komercaj. Havebleco de tiaj malmulte konataj kaj etkvante presitaj vortlistoj prezentas dornan problemon. Ni povas nur esperi, ke favora atmosfero en la nova socio, por kiu ni nun batalas, permesos inkluzivigon de la inda parto de tiuj fakvortaretoj en novan reviziitan eldonon de nia granda Esp-Espa vortaro. Tio ebligus, ke la laboroj de la disaj fakuloj estu facile disponeblaj por multe pli vasta uzantaro, ol estas nun la fakto. Plena Vortaro de S.A.T., konsultata tra la mondo, estas potenca unuecigilo de lingvuzo inter ni, kaj ni nur bedaŭras ĝian relativan malkompletecon, studante la suprajn faklistojn. Kompreneble, ĉe Esp-Espa vortaro staras la baro kontraŭ rapida kaj facila trovo de serĉata vorto, se la serĉanto scias nur ties nacilingvan formon. Sed tio estas ĝeno ekster la nuna temo. Ĉiu klubo aŭ grupo morale devas esti kolektiva membro de B.E.A.-I.E.L. Estante tia, ĝi ricevas por sia biblioteko la presitaĵojn kaj lingvajn direktivojn de tiuj asocioj, kaj povas

evitigi al siaj verkantoj la gravan malhelpon de nesufiĉa inform ateco.

Esp-a aktivo en Japanujo kaj Italujo staras en stranga kontrasto kun la konata malarikeco de la Germana registaro kontraŭ nia lingvo. La Nazia opozicio estas konsekvencaĵo de la arja rasteorio, laŭ kio ĉia internaciismo, ĉia postulato pri homa sangegaleco, malkongruas kun pura Germanismo kaj tiun ĉi malfortigas. "Ĝia uzo kaŭzas malfortigadon de esencaj valoroj de popola karaktero..." (organo de la Regna kaj Prusa ministerio por scienco, 1935.) Malgraŭ tio, ke naciismaj ekscesoj montriĝis ankaŭ ĉe la Itala kaj la Japana, ĝis nun tiuj landoj tute ne kontraŭagis Esp-on simple laŭ principo. Resumo en "Esperanto Internacia" (Sep-Okt.1941) pri nia afero en Japanujo estas alte kuraĝiga.

Aprila numero LA RONDO tro povas enhavi duan verkaĵon de nia konata samidealulino S-ino P.Hanks, kies Rubeno de la Mandareno vekis grandiom da plaĉo ĉe legantoj. Ni kore dankas al ŝi kaj al ĉiu kontribuanto. Ankaŭ al tiuj sendintaj al ni esprimojn de ŝato, inter ili S-ino Trundle en norda ŝtato. Ŝi estas malnova fidelulino; montru al mi la homon, kiu, iam vere amiĝinte en nian aferon, poste forlasis ĝin pro indiferenteco.

----- F.R.B.

### ESPERANTO en JAPANUJO.

La malforteco de la movado en Eŭropo, sekve la militon, tute ne respugligas en Ekstrem-Oriento, kie ekzistas jam de longe fortaj elradiaj punktoj. Jen kelkaj ekzemploj montrantaj la penetron de E-o en la Japanan vivon:

"The Crown English-Japanese Dictionary" (1939), de la fama eldonejo de Vortaroj, Sansei-Do, Tokio, enhavas: "International --- International Language, Esperanto --- Universal --- Esperanto is becoming a universal language. En sia difino "Esperanto" ĝi diras: "Lingvo internacia inventita en la jarcento 19a; konstruita surbaze de la lingvoj Eŭropaj, kaj karakterizas ĝin la beleco kaj klareco de ĝia prononco kaj gramatiko."

Grava klasikaĵo en kvin volumoj eldonita en Esperanto: Antaŭ kelkaj monatoj la Japana Esp. Instituto finis eldonon de la kvina volumo de "Kroniko Japana." Pro la grava loko, kiun okupas tiu verko en la klasika literaturo de Japanujo, ĝia apero en E-o ricevas unuaniman laŭdon de ĉia prescentro en la Imperio.

Esperanto subla bomboj: En "La Taglibro de Fotisto ĉe la Milito", eldonita de "Asahi Camera", la plej legata foto fakgazeto: "5 Okt., en la salono oficira la babilado fluis seninterrompe, de unu teno al alia saltante. La navigacia oficiro komencis sian kurson de Esperanto."

Sur la teatra sceno: Aprilo 1939, dum 20 tagoj E-o favore audigis forme de leciono en la prezentaĵo "Sankta Familio" per unuaklasa rolularo. La peco aperis libroforme kaj vasta vendiĝis.

-----

**MORTO.** Je la 2a de Oktobro, 1941, mortis en malsanulejo en Gloucestershire, Anglujo, post mallonga malsano S-ro Cedric F. White. Li multe laboris por Esperanto en Nov-Zelando kaj Viktorio jam de ĉirkaŭ 1906. Poste en Skotlando kaj Anglujo. Pacon al nia kara pioniro!

-----  
KASO de la RONDO.

<u>ENSPEZOJ</u>		<u>ELSPEZOJ.</u>	
Konta transpreno.....	£3-9- $\frac{1}{2}$	poŝto.....	£- 18-6
Abonoj kaj kotizoj:-		bindpingloj.....	1-6
S-ino Couche.....	3- -	papero.....	15-4
S-roj S.Wanmer, P.Schwerin,		sablonaĵoj.....	11-4
P.Holmes 3/- .....	9- -	luo.....	5--
S-roj A.Chambers, H.Byatt	7- -	inko.....	11--
S-ro T.L.Enderby.....	4- 6		<u>£3- 2-8</u>
F-ino L. O'Connor.....	3- -	mono en la kaso	
D-ro A.Maclurkin.....	3- -		<u>£2-7-7</u>
F-inoj H.Bostock, A.Godfrey	3- -		<u>£5-10-3</u>
F-ino I James.....	1- 9		
S-ro C.Thompson.....	1- 9	F-ino W.Addis, (Kasistino)	
S-ino K.Hennessy.....	1- 2	25 Greville Ave.,	
S-ino O.Glenie.....	1- 6	Flinders Park,	
Donaco.....	-- $\frac{1}{2}$	Adelaide, S.AUS.	
Vendoj.....	<u>2- 6</u>		
	<u>£5-10-3</u>		

Eraro. En la kontoj por Feb. Legu "F-ino Rosengrave, 3pencoj."


-----  
 Bonvolu atentigi pri la jenaj du eraroj ne korektitaj plume sur la lasta paĝo de Feb. RONDO:-  
 (gelatina)      gelatena      (ekzemploj)      ekzempleroj

-----  
STRANGAJ ERAROJ de EMINENTULOJ. En "La Interrompita Kanĉo" Kabe erare uzas "eraris" anstataŭ "vagi" sur p.64 ("petola rideto eraris sur liaj lipoj"). La Franca "errer" signifas (1) (erar) vagi, kaj (2) erari. En "La Faraono" la sama verkisto eraris, uzante "tombi" (F. tomber -- fali) anstataŭ "fali". Sur p.219 de "La Reĝo de la Montoj" Gaston Moch, Lingva Akademiano, lasis sin "tombi" (fali) en la saman eraron, verkante la frazon "La tondro, tombante (falante!) en la ĉambro....."

----- F.R.B.

OfICIALA ORGANO de LA A.E.A.

Le Ronco.



Apr 1942

No 19

Eldonita de F.R. Banham,  
2 Banchory St. Essendon W.S. Vic. AUSTRALIA.

LA NAJTINGALO.

Mallongigita el "For Ever England", de Major-Generalo J.E.B. Seely  
C.B., C.M.G., D.S.O.

Kiam la Germana armeo retiris sin de la Somme en la printempo de 1917, la Kanada soldataro, kiun mi komandis, kiel unua trarompis la nedensajn Germanajn ariergardojn...poste la linioj reestabliĝis .....preskaŭ mejlo apartigis ilin.

Kun la bravaj Kanadanoj, de kiuj jam pli ol tri jarojn mi estis ĉefoficiro, mi prenis respondecon por tiu liniparto. En ĝi trovis sin longa herbokovrita valo, tre simila al bela valo en Angla parko, kaj larĝa pli ol duonmejlono; sur nia flanko de ĝi kuŝis arbareto ankoraŭ okupita de Germanoj.

Ni atake prenis la arbareton, tamen la malamiko pafe regis "nenies-teron". Dum komplikaj manovroj en mallumo mia devo estis: ĉiunokte iri en tiun nenies-teron por gvidi operaciojn de la patrolistoj.

Tagon post tago la vetero daŭris bona, kaj eĉ kiam luno mankis, stelbrilo klare lasis vidiĝi kiun ajn movantan objekton. Proksimume kvardek jardojn de la arbareto, malgranda arbo kreskis, arbido alta ĉirkaŭ kvardek futojn. Starante apud ĝi homo estis nevidebla kaj povis observi laŭ la tuta longo de la valo, dekstren, maldekstren, ankaŭ trans ĝin ĝis en la Germanan frontlinion for je eble kvarcent jardoj sur la kontraŭa kresto. En la unua el miaj iroj tien, du patrolistaroj, ĉiu po du oficiroj kaj dudek subuloj, foriris por fari taskon. Mi restis kune kun adjutanto kaj kontrolisto de kamptelefono. Venis funda silento, kiun rompetis nur la mirinda kanto de najtingalo belvoĉanta sur branĉeto proksimume ses futojn super mia kapo. Starante tie senmova, vibranta pro la dolĉa sono, mi povis vidi per lumo de eta lunarko la birdeton klare siluetitan kontraŭ la ĉielo. La gorĝeto tremis dum ĝi elverŝis sian sorĉan melodion. Mi povis krome vidi la neston ne pli ol tri futojn super mia kapo. Mi sciis, ke en ĝi sidas la kunulo al kiu la kanto estas direktata. En Anglujo, jam en la feliĉaj tagoj de la paco, mi havis okazojn kaŝpaŝi ĝis similaj arboj por aŭskulti tian dian muzikon.

Jen subite la silento frakasigis per forta eksplodo de maŝin-pafado; kugloj milope flugegis supre de niaj kapoj. Kompreneble la birdo ne kantis dum la fajra uragano. Tuj tondre ekrespondis niaj haŭbizo; ilia tiriĝa, zumo kreskis ĝis akra siblego, kaj la bruo de eksplodantaj obusoj for-neniigis, la najtingalo reprenis sian kanton, en maniero jam tiel tre fervora, ke la mirinda son-fluo atingis eĉ trans la valon kaj, laŭ diro de miaj homoj, klare aŭdiĝis apud la Germana drato...

Ricevinte avizon, mi devis iri al ia patrolistaro...poste mi revenis al la arbeto, ĉirkaŭ kiu ankoraŭ sporade fajfis kugloj kaj krakis obusoj. Kiel antaŭe, la ĉiela kanto ripetigis tuj kiam ekmutis la bruo. Tio okazis en kelke da sinsekvaj noktoj, ĝis la nenies-tero estis jam nia kaj la malamiko sin retiris el ĉiuj antaŭpozicioj. Tamen, unu el miaj homoj, iama trupano en la Nord-Okcidenta ĉevalpolico Kanada, tre amis la birdojn kaj observadis la neston ĝis la idetoj bone elkoviĝis.

Iom konsideru. Por ke tiu najtingalo tiel brave kantu al sia

kunulo, ĝin nepre devis suferi ekstreman teruron. Najtingaloj estas inteligentaj, eĉ mistifike tiaj birdetoj, sed tre timemaj. Silentigas ilin, ofte dum tuta nokto, eĉ malgranda soneto por ili ne kutima.

Sed en la supra incidento, spite al sia timemo, la brava kant-  
emuleto eltenis. Neniel povis for-timigi tiun etan amanton la bruo, la krioj de kolero kaj angoro, kiuj en tiuj noktoj portis teruron eĉ al ŝtalkingoj viroj. Male, ili pelis ĝin al eĉ pli granda streĉo konsoli per bela kanto la samnestulon.

Ĉe ni ankaŭ tiel estu! Ni ĵuru, ke dum ni iras tra la vivo, nenia danĝero troe timigos -- ke super la teruro venke staros la amo.

-----F.R.BANHAM (Trad.)

" LA SIGNO.  
(de Mavis Dearing)

Paŭl, iom laca, eniris la restoracion, eksidis ĉe unu el la rondaj tabletoj, kaj mendis kafon. Luĝinginte cigaredon, li malstreĉis sin komforte en la remburlita brakseĝo.

Turniĝis liaj pensoj al Gertruda, al ŝiaj teatre ruĝa hararo, delikata tuŝloga haŭto kaj diafane sukcesecaj okuloj. Li perdiĝis revo inter la dolĉa invitemo de ŝia kara rideto kaj la subtilaj, paŝtelecaj subtonoj de ŝia elgorĝa voĉo. Unika, nekomparebla Gertruda! Kaj li komencis senhonte rideti ĉe la penso de tiu stulta nekonato, ŝia facile trompita kaj jam forlasita edzeto. Do fine li estas sukcesinta tranĉi por ĉiam la lastan lignon inter Genjo kaj tiu mizera ĝenulo.

"Laŭ via permeso," afablis fremdulo, intencante la saman tableton. Paŭl kapjesis, kaj la alia sidigis sin vidalvide. Mendinte, li pretigis cigaredon. Li estis masive formita, tamen tute ne malgracia. Sed lia vizaĝo estis granda, flavpala kaj sponga, kun krude modelitaj trajtoj. Malgraŭ densa tegolo de preskaŭ pajlkoloraj bukloj lia mieno restis mola, humilhumora. Liaj orangutangaj brakoj kvazaŭ englutis la tableton. Paŭl pensis: mi ŝatus pentri vin.

Komenciĝis inter ili nepersona konversacio.

La fremdulo konfesis, ke nefumanton li malfidas. "Se ili plie montrus sin vin-abstinaj, mi ekscius mian malfidon bone bazita," li aldonis.

Paŭl amuziĝis. "Kurioza tipo, tiu," li flustris al si, kaj laŭte: "pri kio do vi malfidus?"

"Pri ilia ĝenerala karaktero. Neniadube, tiaj estas suspektindaj. Estas preskaŭ evidente, ke ili volas kaŝi ion."

"La fumado tamen estas nura rutino," diris Paŭl. "Tio nek kaŝas nek malkaŝas ian signifon."

"Ĉu vi volas vere aserti, ke tiaj rutinoj estas sensignifaj?" respondis la alia. Li hezitis iom. "Nu do, mi klarigu al vi, se vi permesos. Jen, reveninte de afer-vojaĝo, mi trovis mian hejmon frakasita per la forflugo de la edzino. Aĥ, Dio! La ŝoko preskaŭ detruis min. Mi estis tute neinformita pri la kruela afero. Fine, el la servistinoj mi suĉis la tutan historieton. Tiuj inoj

estas tre observemaj. Ili ne povis nomi la viraĉon, kiu ŝtelis mian edzinon, sed ili rakontis pri iuj rutinaj afektaĵoj liaj. Iam per tio ĉio mi nepre rekonos lin, kaj tiam ....." Li metis la fingrojn de sia simia mano preme al la traĥeo, kaj malagrable ridetaĉis. "Dio ne kompatu lin, nek Gertruda-n," li aldonis apenaŭ aŭdeble.

"Kiaj estas tiuj afektaĵoj?" demandis Paŭl post tempeto. Lia buŝo estis sensukiginta. Ĉu iaeble, ke jen la edzeto de Gertruda? Tio ja estus troa koincido, troa ŝancŝerco -- kaj tamen... Li provis rememori, kiel Genjo estas priskribinta la edzon. Ĉe la malantaŭo de siaj okuloj li sentis senluman brulon. Subhaŭte, fajra timo pikis lin. Li aŭdis la voĉon, kvazaŭ murmuro el suntiklite dormema tigro, respondi: "Nu, unu lia afektaĵo estas, transdoni la cigaredon de la maldekstra al la dekstra mano antaŭ forfrapi la cindrojn."

Paŭl direktis sian rigardon al la cigaredo tenata de lia maldekstra mano. Li provis rememori, ĉu ĉi rutineto povas aplikigi al li, sed lia menso similis sensaĝan katidon je sia vosto ĉasantan. Rememori li ne povis. Per subita, malgracia ago li forfrotis sur la provizita cindrujo, uzante la maldekstran.

"Jen io plia, kio povus helpi min," diris la alia, kiu ŝajne ne rimarkis la agon; "kiam tiu adultema rataĉo absorbiĝas en konversacio, li kutimas apogi la kapon sur la dekstra manplato, volvante la fruntharojn ĉirkaŭ fingro."

Paŭl sentis salti sian koron. Kreskantaj timoj kunbuliĝis ĉe lia stomakfundo. Ja nur hieraŭ nokte Genjo estis priridinta ĝuste tiun afektaĵon. Ah, tiu ŝia karesanta ridado! La penso je ĝi momente enparadizigis lian monson, sed apud la flegma inerto de tiu idiote grandforma vizaĝo kontraŭ li, la kareso flugis for el la rido, kiu fariĝis obtuza, sensignifa, senviva...

"Iom neordinara, tiu kutimo," respondis Paŭl, kaj, lia voĉo sonis al li stranga. "Do eĉ la nomo de tiu fripono restas kaŝita al vi," li aldonis.

"Bedaŭre, ke jes. Tamen, ne gravas, ĉar mi eksciis pri tioma alio egale informe. Ekzemple, mi scias pri lia aparte neordinara adiaŭgesto." La bukloriĉa masivulo kirle kurigis per la kulero la kafon en sia taso. "Ŝajnas, ke li levas du fingrojn, kaj, frapetinte per ili dufoje ĉe la nazomezo, li faras ian militan saluton. Verdire, ĝuste tio estas la plej definitiva indico, kiun mi posedas pri li." Li forglutis la palan, sukeritan kafon, kaj Paŭl aŭdis la suĉsonon de liaj larĝaj lipoj sur la dika, blanka porcelano.

La fremdulo retren puŝis la seĝon kaj ekstarigis sian masivan korpon. "Nu, mi devas pardonpeti pro la ĝeno de mia longa rakontado, sed efektive, la afero obsedas min. Vi komprenas, ĉu ne?" Parolante, li ĉirkaŭrigardis al la aliaj ĉeestantoj en la ĉambro. "Notu, kiel observema mi fariĝis." Lia rideto estis konfide plena, sed haltis antaŭ atingi la okulojn. "Adiaŭ! Eble, ke mi iam revidos vin." Li paŝis al la kontĝiĉeto kaj pagis la kalkulon.

Paŭl povis senti sian koron jam pli libere batanta pro tio, ke glitas for lia teruro kune kun tiu masivulo. Li povis senti tiujn fundajn, spasmajn korbategojn aliĝi al nuraj rapidaj skubatetoj. La tableto ŝajnis kreski kiel remparo antaŭ li; la tuta ĉambro lum-



iĝis pro gajo kaj senzorgo.

La babilema masivulo jam trafis la elirpordon. Tie li turnis sin, kaj kapgestis adiaŭon, ridetante amike. En la kruda brilo de la sunlumo enfluanta de ekstere lia vizaĝo akcentis sian palecon, nesamecon, tragedion.

La streĉo estis for, la atmosfero normaliginta, kaj Paŭl eĉ sentis momentan kompatemon. Senkonscie li resendis sian adiaŭ-signon. Tiam li rememoris.

Diveno ekpenetris la masivulon. Lia rideto, ŝtoniĝinte, aspektis eĉ pli plena kaj stulta ol iam. Pasis por Paŭl eterndaŭreca momenteto. Malrapide kaj sensanceliĝe la masivulo repaŝis rekte al la tableto, ĉe kiu restis Paŭl, kvazaŭ najlito al la seĝo.

----- JOEDIKO (trad.)

### LA PRAARBARO.

La grizharulo haltis ĉe la pinto de la monteto. Li estis iom laca post la grimrado. La voĵeto laŭ kiu li venis serpentumis tra la arboj malsupren ĝis la valo, malaperis inter la filikoj, kaj ree aperis sur la kontraŭa flanko, irante al la domaro kiu ĉirkaŭis la finstacion de la monta fervojo. Foje li aŭdis bruon de la lokomotivo, ellason de vaporo kaj la kunfrapadon de la ŝarĝvagonoj - sonojn kiuj interrompis la silenton, sed tamen, enhavis iom da paco. Baldaŭ la eta trajno, per kiu li vojaĝis al la montoj, estos kolekta lignaĵon - trunkegojn de arbaraj gigantoj, nudajn trunkojn kies branĉaroj estis forhakitaj, trunkojn kiuj memestos displititaj kaj glatigitaj, kaj fine, ensorbitaj en la domojn de la urbanoj.

La urbanoj! La grizharulo mem estis urbano, sed dum la lastaj jaroj li sentis sin subpremita de la ĉiutagaj ĝenoj, de la mondproblemoj, de la necerteco de sia propra menso; kaj la sola kuracilo kiun li trovis estis - iri al la arbaro, la praarbaro, dum semajnfinoj kaj ferioj.

Hodiaŭ li venis, sed ne estis semajnfino, estas labortago en kiu li devus esti ĉe la laborejo; sed hodiaŭ matene kiam li vekigis li sentis tre forte ke li devas iri al la arbaro. La ĉiutagaj aferoj perdis sian gravecon; subite li konis la fakton ke la urbo ne estas konsiderinda afero, la sola konsiderinda afero estas la arbaro. Kaj anstataŭ iri al la laborejo, li iris al la stacidomo de kie la vagonaro komencas sian vojaĝon al la piedo de la montaro. Lia menso estis iom konfuzita dum la vojaĝo, sed kiam li atingis la lokon kie li devas ŝanĝi la vagonaron kaj li sidis fine en la eta vagono kiu iras sur pli mallarga fervojo inter la montoj mem, li sentis ke li faris kion li devus fari, kaj lia koro pacigis.

Kun multa bruo la lokomotivo tiris sian ŝarĝon supren, ĉiam supren, ĝis la pasaĝeroj povis vidi unuflanke la krutan deklivon de la arbestitaj montoj, kaj aliaflanke, bienojn kaj kulturejojn, kiuj etendiĝis, etendiĝis, ĝis fine ili atingis la grizebluan maron, kaj tiu lasta mergiĝis en la horizonton kaj neniu povus diri kiom estas marokaj kiom estas ĉielo. Fine la lokomotivo haltis en la lasta stacio, kaj la vojaĝanto, turnante sian dorson al la vilaĝeto,

komencis piediri al la arbaro. Dum kelkaj mejloj li trapasis arbaron nedensan - ĝiaj gigantoj estis antaŭ longe fortranĉitaj kaj nur la malgrandaj, kurbaj arboj kaj la junaj arbidoj restas. Sed li bone sciis ke li ne povas trovi kion li serĉas en la nova arbaro -- ne, li devas atingi la praarbaron; kaj li sekvis la krutan vojeton eĉ pli supren.

Li ripozis ĝis la spirado ree venis kaj iris regule kaj la korbatoj fariĝis malpli urgaj, tiam li leviĝis kaj daŭrigis la marŝadon, jen malsupren, jen supren, sed ĉiam gajnante pli altan nivelon, ĝis la arboj ŝanĝis sian karakteron, kaj la sunbrilo ne povis penetri la densan foliaron. La malgrandaj filikoj susuris ĉirkaŭ liaj piedoj, la plialtkreskaj frotetis lian vizagon, kaj super lia kapo movetis la filikarboj, rektaj, sveltaj, graciaj kiel tropikaj palmoj. For estis la bruo de la homaro, Paco regis. Eĉ la birdoj kantis kviete. Brilaj verdaj-kaj-ruĝaj papagoj foje flugis super li, sed ili faris nur la sonorilsimilajn notojn kiujn ili kutimas fari dum la serĉado por fruktoj. La flavaj rubenoj klinis sin flanken de la arbtrunkoj kaj rigardis la homon en amika maniero. Li sidiĝis ĉe la rando de murmuranta akvofluo, tro malgranda por nomi "rivereto". Ĉio estis malseketa kaj mola. Akvo, klara kaj malvarma, perkolis tra la musko kaj nutris la fluon. La notofagoj(p.n.), kiuj povas vivi nur en altaj malsekaj lokoj, etendis sian foliaron en filigrana desegno super lia kapo; kupro kaj oro intermiksiĝis kun la verdo de la folioj, kaj la trunkoj estis nuancitaj de grizo, blanko, kaj bruno.

"Strange!" pensis la homo, "Ĉio tie ĉi havas la samajn makulojn -- akacioj, aveloj, moskarboj --" li metis la manon al la griza kapo kaj ridetis, "eĉ mi!" Li citis mallaŭte: "Nun gloron al Ci, Dio, por nuancitaj aĵoj..." (p.n.)

Li rigardis supren. Sur la deklivoj kreskis multaj grandaj arboj, el speco de eŭkalipto, kies trunkegoj rekte iris, montrante kiel katedralaj pinturoj al la ĉielo - du-cent futoj da majesta belo. Sub ili, inter la malaltaj kreskaĵoj, kuŝis falintaj kunuloj, polviĝante malrapide kaj formante grundaĵon el kiu elkreskos la novaj, la junaj, kiuj baldaŭ anstataŭigos la falintajn. La grundo estis tre fekunda pro la mortintoj de ĉiuj arbspecoj; sen ili ne ekzistus taŭga loko por la multaj, modestaj insektoj kaj indiĝenaj bestetoj kaj birdoj kiuj povus ekzisti nur en la omoraj spacoj.

Kia unueco! Subite li havis kvazaŭ vizion pri la arbaro. Tra multaj epokoj la sinsekvaj stadioj faris ciklojn - ekĝermi, kreski, maturiĝi, fali, polviĝi, nutri la semon kiu ekĝermas, - kaj ree tra la ciklo. La individuo estas efemera, sed la tuto estas eterna. Eĉ la homo, la sola ribelanta filo de la Naturo, ne povas eviti la sorton. Ne nur en lia reproduktado estas ciklo, sed ankaŭ en liaj rilatoj kun aliaj estaĵoj. Li laŭvice venas el la polvo kaj reiras al ĝi - laŭvice mangas kaj estas mangata. Sed la granda diferenco, la penskapablo!

Subite la kvieto de la arbaro estis disrompita. Bruo aŭdiĝis simila al la muĝo de ondoj. La foliaroj de la altaj eŭkaliptoj moviĝis, kaj sen plua averto la ventego frapis la arbaron. Ĝi ŝanĝis la humoron de la homo. La paco kaj certeco forflugis! Ree la prob-

lemoj de la vivo fariĝis urĝaj. Li devis marŝi plu.

Supren li grimpis inter la skuĝantaj gigantoj, sed li preskaŭ ne rimarkis ilin. Li fugis antaŭ siaj propraj pensoj. Kio estas la celo de la homa skuado? Kial ni estas sur la tero? De kie ni venis, kien ni iras? La cerbo turmentis lin, la koro bategis, la spirado fariĝis malfacila. Li stumblis kaj preskaŭ falis. Li apogis sin sur arbtrunko kaj ĉirkaŭrigardis. Li staris apud kaverneto en kruta deklivo, farita eble de iu arbara besto, sed sufiĉe granda por ŝirmi homon kontraŭ la pluvo. Li kuŝiĝis en ĝi. La cerbo daŭre luktis kun la problemo. La penskapablo! Ĉu ĝi ne apartigas la homon de ĉio alia sur la tero? Ĉu ne sole en li estas tiu specialaĵo? Ĉu li povas ensorbiĝi en malpli altaj kreitaĵoj?

La pensanto kuŝis senmove; la pluvo daŭris. Ĝi penetris la foliaran tegmenton de la arbaro; la gutoj kolektiĝis sur la filikoj kiuj konsistigas kurtenon kovrantan la enirejon de lia ĉambreto. Baldaŭ la vento tute formortis, la pluvo en takto falis, guto post guto, en narkota ritmo. Malgranda, bruna birdo saltete venis antaŭ lian kuŝejon kaj scivoleme rigardis lin. Li ridetis. La penskapablo! La homo leviĝis el la polvo; la homo povas pensi. Do, la penskapablo antaŭe estis en la polvo. Hazarde ĝi montriĝis en la homo; sed kien iris jam pensitaj pensoj? Ĉu ili ne ĉiuj reiris al le tero, restas en la tero? Sed - pli frape! - kie en la nuna momento restas tiuj sennombraj pensoj kiujn la estontaj homoj pensos? Kie, se ne en la tero, la patrino, mirinda tero?

La konscio ŝanceliĝis, konfuziĝis, nur unu ideo restis klara -- la unueco! La eterneco! La morto estas nur la komenco de alia vivstadio. Ĉu gravas ke la eroj de la tero fojon post fojo, troviĝas en nova aranĝo, novaj, diversaj individuoj? Ĉu la eroj estas pli gravaj ol la tuto? La tuta arbaro, la praarbaro, ŝajnas atendi, atendi.

La pluvo falis, falis, sed subite sono, klara kiel sonorilo, aŭdiĝis en la valo; unu mallonga, dolĉa strofo - kaj poste, silento. La grizharulo kuŝis senmove, kun fermitaj okuloj. La bruna birdeto revenis kaj eniris, eĉ saltetis sur la manon, sed la homo ne moviĝis.

El la valo ree venis la notoj de Menuro, laŭtaj kaj sonoraj, strofoj diversaj, neregulaj. La historio de la mondo; la krio de batalo, la kanto de amo, la gajo de la vivo, kvietaj sonoj de humilaj estaĵoj, spitaj, arogaj frazoj - ĉiuj akorditaj fine en unu bela, triumfa tuto, kiu eĉis kaj reeĉis tra la arbaro, la praarbaro kie morto estas ĉiam la fonto de vivo.

La pluvo daŭris, daŭris; en la kaverneto terpeco falis de la saturita plafono, falis sur la homon. Sed li ne movis sin. Paco regis.

p.n. Libera traduko el Gerard Manley Hopkins:

"Glory be to God for dappled things."

"notofago" (nothofagus) angle, "myrtle beech", arbo parenca al, sed ne same kiel, la eŭropa "beech," (fagus) fago.

TERURA TEMPO, ATENDE AL ŜIPROMPIĜO.

En la jaro mil okcent sepdek du, tre granda velŝipo forlasis havenon Plymouth, Anglujo, survoje al antipoda lando, Nov-Zelando.

Kiuj ne havis sufiĉan monon por la unua klaso, tiuj devis veturiĝi duaklase, sed la plimulto devis kontentiĝi okupante tiun parton de la ŝipo, kiun Angloj nomas "steerage", klaso tria. Tiuj, kiuj vojaĝis "steerage" estis migrantoj el Anglujo kaj tre superis nombre tiujn en la pli komfortaj klasoj sur la ŝipo, "Ironmaster", kiu faris sian unuan vojaĝon.

Ni renkontis la kutimajn ventojn en la Golfo de Biskajo, kaj poste, kiam ni esperis ricevi la helpon de la tradoj, ili ne alvenis, kio rezultigis, ke la ŝipo restis tute senventa dum tri semajnoj. La vojaĝantoj forgesis la marmalsanon kaj intermiksitis unu kun alia, interŝanĝante historietojn pri vivo en Anglujo kaj esprimante siajn esperojn pri la nova lando.

Finfine, pro bonaj ventoj "Ironmaster" post kelke da semajnoj proksimiĝis al la ekvatoro. La oficiroj diris, ke en la sekvanta tago ni trafos ĝin, kaj ke Reĝo Neptuno vizitos la ŝipon por prezidi la ritaron, kiu koncernas maristojn, kiuj ne antaŭe transpasis la ekvatoron. En la morgaŭa tago, frue en la posttagmezo, oni vidis boaton. En ĝi estis remantoj, kiuj ŝajne volis albordegi sur "Ironmaster". Do oni pretigis certajn velstangojn, tiel ke la ŝipo ne plu iradis. Tiam la "dio de la ondoj", forlasinte la malgrandan boaton, supreniris la svingan stuparon kaj paŝis sur la ferdekon de la granda velŝipo. Oni kondukis lin kaj lian sekvantaron ĝis la estrado de la ŝipestro. Sur la ferdeko estis kruda banujo el velto, kiun oni plenigis per marakvo. Nun staris antaŭ Neptuno maristo ne antaŭe transpasinta la ekvatoron. Pro tio Neptuno ordonis al li submetiĝi al razilo. Oni ŝmiris melason sur la vizaĝo kaj poste forskrapis ĝin per kombilo; kaj por fini la procedon oni forŝovis lin en la banujon. Sekvis lin aliaj maristoj, ankaŭ pasaĝeroj. Tiam Neptuno elpensis ankoraŭ da belaj distraĵoj ĝis malfrua horo.

En la sekvanta tago pasaĝero, kiu bezonis ion el la kuirejo por malsana infano, staris ferdeke. Subite li konsterniĝis, ekvidante en distanco dukilometra grandan rifon en kies direkto "Ironmaster" rapide alproksimiĝas. Sekve de la distraĵoj de la hieraŭo, la direktilisto estis dormema kaj nesciis pri la danĝero. Sed la ŝipestro tuj aperis kaj faris ĉion eblan por eviti la rokojn. Fulme-rapide la pasaĝeroj ekaŭdis pri la minaco kaj malsaĝe plenigis la ferdekon tiel dense, ke la estro ordonis, ke ili ĝin forlasu, por ke la maristoj povu manipuli la velojn.

Mi dolore klare memoras la scenojn en la granda mangŝalono sur la malalta ferdeko. Kelkaj kantis popularajn kantojn; aliaj himnojn; jen aliaj aŭskultis, kun nova sento de memintereso, la vortojn de homo, kiu surgenue preĝis por "tiuj en danĝero sur la maro." Mia patro povis vidi la rokojn tra ŝipfenestreto. Mia patrino staris apud li, kaj mi kaj la juna fratino tenis iliajn manojn kaj sentis, ke se iu povas fari ion por ni, nia paĉjo mem ja povas tion fari. Mia patro parolis pri feliĉa vivo en nova lando, se ni nun

ne iras al ŝipruino. Ni nun estas en grava pozicio, sed li esperas, ke ĉio estas bonmarŝa. Denove li ĵetis rigardon tra la fenestreto. La ŝipo en tiu momento transpasis la ekstreman flankon de la rokaro, lasante interdistancon ne pli longan ol ŝtonĵeto. Ni estas savitaj! Niaj kunveturantoj dankfervore havis Diservon, preĝis, himne kantis; poste laŭdis la ŝipestron kaj maristojn.

Kiam aferoj denove iris bone, ili demandis sin, kia estas la nomo de la rokoj, kie tiuj staras, kaj ĉu ni estas sur nia ĝusta vojo? La ŝipestro informis la pasaĝerojn, ke en la nunaj cirkonstancoj li volas diri aferojn pri kiuj ordinare ŝipestro ne parolas al pasaĝeroj, nome ke "Ironmaster" estas nova ŝipo faranta la unuan vojaĝon. Ĝi estas la unua konstruita el ferplatoj! Oni ne scias, ĉu tia metalo malbonigos aŭ ne la funkcion de la kompasoj. Li nun rajtas diri, ke la kompasoj ne precize montris al la efektiva nordo. La rokoj sur kiujn ni preskaŭ rompiĝis havas nomon Sta. Paŭlo. Ili staras norde de la ekvatoro kaj malproksime de nia vojo. Tial ni ankoraŭ ne transpasis la ekvatoron! Estontece ni rigardos en ĉiu horo la sunon kaj dum la noktoj la stelojn. Kalkulante laŭ tiuj ni povos iri nian vojon kaj li certigas al ni, ke la ŝipo atingos la landon de niaj esperoj.

Kaj efektive la ŝipo post kelke da semajnoj feliĉe konfirmis la diron de sia bona estro.

----- C.W.BALLARD.

### LA GVIDANTO. (El "PUNCH")

(Ekzistas en Anglujo ŝerco, ke la tuta mondo konas Londonon kun escepto de la Londonanoj.)

"Pro tio, ke mi naskiĝis en Londono," diris mia amiko Pokewhistle, "kompreneble mi estas mirinde nescianta pri la vidindaĵoj. Mi volas diri, kompreneble, pri la brik-kaj-ŝtonaj vidindaĵoj. Mi troviĝas sufiĉe inter altsocieto por koni la plejparton el la homa speco."

"Vi volas diri, la Turo de Londono, kaj la Wallace Collection kaj tiaj," mi sugestis.

"Ja ĝuste," diris Pokewhistle. "Se vi petus al mi vin konduki al la Muzeo de Londono, ekzemple, (pri kiu miaj provincaj amikoj parolas tre aprobe), mi devigus demandi al policano aŭ suferi la elspezon de taksfiakro. Mi havas nekларan ideon ke ĝi staras ie inter Aldgate kaj Hyde Park Corner kaj ke ĝi enhavas aron aŭ de la pupoj de Reĝino Victoria, aŭ de la tepotoj de Reĝino Anne, sed jen la plejmulto kion mi povas diri. Kaj se vi demandus al mi vin konduki vidi la Rotigon de la Gvardio -- "

"La Gvardio ne rotas," mi kontrolis, "estas la Standardo kiu rotas. La Gvardio nure ŝanĝiĝas."

Pokewhistle malaprobe flirtis la manon. "Se vi petus al mi vin konduki vidi tion," li diris, "mi tute ne scius kien iri, en kiu tago, aŭ jekiu horo. Kaj se vi petus al mi vin gvidi por aŭskulti al Bow Bells (Sonoriloj de Bow), mi estus same nekapabla komplezi

al vi. Mi konjektas, ke la sonoriloj de Bow estas en Bow, sed kie estas Bow?"

"Estas unu el la stacioj de la District Line," mi lerte diris, "Bow Road."

"Sed tre verŝajne estas, ke Strato Bow tute ne kuŝas proksime al Bow," diris Pokewhistle malgaje, "kaj mi ja similus al malsaĝulo se mi atingus tien kaj ne trovus sonorilojn. Povas simili al Tottenham Court Road, tiel nomita ĉar ĝi ja ne estas proksima al Tottenham. Tottenham estas alia loko kiun mi ne povus ĝuste trovi eĉ se mi dezirus. Ekzistas futbala ludantaro kiu rilatas al ĝi, sed jen la tuto de mia scio."

"Almenaŭ vi konas la Bestarejo (Zoo)," mi konsole diris.

"Jes kaj ne," li diris, "foje mi penis tien konduki maljunan onklinon, kaj ni vagadis horojn kaj horojn ĉirkaŭ Regent's Park, serĉante enirejon. Ni povis ĝin aŭdi sed ni ne povis trovi enirejon. Kompreneble mi povis demandi al iu, sed, pro tio, ke mi antaŭe diris al la onklo, ke mi scias preskaŭ ĉion pri ĝi, mi ne deziris aperigi mian nescion."

"Sed," mi demandis al li, "se vi tiom longe estis kontenta ne koni Londono, kial vi subite nun tiel ekinteresiĝas pri ĝi?"

Ĉar," diris Pokewhistle, "mi havas finfine unikan okazon por akiri tre detalan scion pri la Metropolo. Mi jam konis junulon kiu plenperfekte konas Londonon, kaj flue verŝas interesajn historiajn anekdotojn pri ĉiuj vidindaĵoj. Li scias la precizan lokon kie Reĝo Charles perdis la kapon kaj kie Walter Raleigh faris bonfareton al la vest-purigistoj per la faligo de sia mantelo en kotejeton. Li estas ĉarma junulo kun fervora amo ~~por~~ Londono."

"De kie li venis?" mi demandis.

"Aŭstralio," diris Pokewhistle.

----- L.E.BAILEY. (trad.)

### LA MALBENO DE BABELO KONCERNAS ANKAŬ AMERIKON.

Prezidanto Roosevelt jam kelkfoje rekonis tion kaj en artikolo en "La Prensa" ni legas: "Turnante sin al sia intereso en la kreskig-

ado de ~~A~~Amikeco kaj komprenemo inter ĉiuj popoloj de Ameriko, Roosevelt agnoskis la malfacilojn pro la diversaj lingvoj, kaj diris sian opinion, ke homoj Usonaj devas lerni Hispanan, kiu estas 'facile lernebla'. Liaparte, kvankam li ne povas flue paroli ĝin, li povas subteni konversacion en ĝi, ĉar li komprenas kaj ofte legas ĝin.

"La Argentina Esperantisto" ne konsentas kun Roosevelt, ke la Hispana estas facila. Ĝi rimarkas, ke, por paroli flue, li devis uzi al Anglan kun la raportanto "La Prensa", kaj la Argentina reprezentanto ĉe la konferenco parolis France kun S-ro R. Krome, kion opinias la 40 milion' loĝantoj de Brazilio, la Franclingvaj Kanadanoj, kaj la Hajtianoj? La eksperimentoj en unu lernejo Nov-Jorko, simile al lernejoj en Eŭropo, atestas klare, ke unu jaro da E-a studado sufiĉas por kapabli lernantojn korespondi kun alilandoj.

-----


# ĈU ILI ASPEKTAS KIEL JENE ?




LA REDAKTORO KIAM ALVENAS LA RONDO




LA SEKRETARIO DE LA A. E. A. KUN BONE MERITITA AŬREOLO.



LA KASISTINO KIAM DEFICITO MINACAS.



LA PRESISTINO KIU FERVORE ESPERAS KE NENIA INKO EN LA ĈIELO



ESPERANTO NE GRAVAS AL TIAJ SENSENCULOJ



TIUJ NENIAM EĈ AUDIS VORTON PRI ĜI.

L. E. BAILEY KUN PARDONPETOJ AL THOMAS DERRICK EN PUNCH

Prezentu al vi bildon fantazian. En Septembro 1939 profundaĝa vireto, kun doktoreca aspekto, kuntiriĝe staras en pordkadro de la Pola ĉefcentro. Agitate, febrotreme, li direktas rigardon al ĉielo, samkiel miloj da liaj kunurbanoj. Zumas tie la Morto fluganta. La okuloj de la vireto malsekas, la manoj nervagace interplektiĝas pro anima doloro. La malfortika korpeto skue vibras responde al la fajf-krakq de eksplodantaj obusoj, la tondra bruo de falantaj konstruoj. Ĉirkaŭ li, fiera respubliko, lia nasktero, konsumiĝas en flama ruine, parto de tiu granda kataklismo re-mulde fandanta per ardega fajro la tutan vivsistemon de l'homaro. Okdek tri jaroj da sindona servo devis do konduki fine al tiu ĉi tago infera, en kiu, tra ondoj da paffumo, li torturate vidas sian vivverkon de l'amo rompiĝanta sub la martelo de malracia kolero. La ĝojo de la benata patriarko Simeon ne estas ankaŭ lia; neniam "Nunc Dimittis" pace falas de liaj lipoj -- aŭdiĝas obtuze la anims'ira "Eloi, Eloi, lama sabaŝtani". La figureto ŝanceliĝas, sterne frapas la pavimon...

Tio kompreneble ne okazis. Por ĉesigi al Zamenhof la koron sufiĉis la Unua Mondmilito. Li mortis Aprilo 14, 1917, en Varsovio, tiam sub Germana okupado. Feliĉe li neniam sciis pri la hipokrito de la Naciara Ligo, la mizero de ekonomia krizo, la longa turmento de armita "paco", la kortaŭzaj jaroj dum kio la sorto de l'homaro dependis de frotita fadeno, la heroa kontraŭstaro de perfortataj popoloj, rajte sed vane petegantaj helpon -- kaj fine la teruraj etapoj la mondkovra katastrofo.

Jes ja. Al li la dioj bele indulgis, en tio ke li ne ĝisvivis la plej doloran jardekon en la Historio, jardeko en kiu la lando de Goethe ediktis kontraŭ Esperanto kaj bruligis verkojn de universalaj spiritoj.

La "lastajn vortojn" de Zamenhof ŝajne neniu konservis por generacioj, kiuj estonte benos lian nomon, sed ni scias, ke ĝis lia lasta konscia momento la problemo de homa sufero obsedis lin plene, absolute. Li havis "Dion en la koro".

----- F.R.B.

### ASOCIAJ AFEROJ.

ADRESARO. Kun bedaŭro ni devas avizi vin, ke ne plu estas ebla al ni eldonigi la adresaron. Ordonu lastatempe farita de la Registaro malpermesas la uzon de papero por novaj libroj. Tial ni devas prokrasti la aperon de nia adresaro ĝis paco revenos. La ordono registara ne estus farita se ĝi ne estus por la bono de nia lando, kaj sendube ĉiuj niaj subtenantoj akceptos la prokraston, sciante ke ĝi estas devo al nia lando. Tamen ni kompletigos la manuskripton. Se iu deziras informon el ĝi, li skribu al la sekretario. La artikolo en ĝi, "Memore al la Pioniroj", verkita de S-ro F.R.Banham aperos en LA RONDO.

ALILANDA NOVAĜO. Satana Bulteno (Bulteno de sennacieca Asocio Tutmonda) regule aperas. S.A.T. havas sian provizoran sidejon en California. Ĝia adreso estas "Box 6475, Metro Sta., Los Angeles, California, U.S.A." La registara regado de aferoj pri alilanda mono ne



permesas al ni aboni tiun bultenon, sed kelkaj el ni regule (senpage) ricevas ĝin. Interesitoj povas avizi Aŭ S-inon A.C.Hintze, 7 Dean St., Coburg, Vic., aŭ la subskribinton, kaj ni penas rondirigi la Bultenon. Laŭ raporto en ĝi Centra Librejo Esperanta en Francujo daŭre funkcias en Paris. Do Esperanto ankoraŭ spiras malgraŭ ĉio.

Malgraŭ, eĉ spite, la terura efiko de la milito al Esperanto ĉie, samideanoj en la ankoraŭ libera mondo pli forte laboras. Esperanto Internacia (Organo de I.E.L.) en sia Nov-Dec. numero raportas, "Nia movado akiras novan forton en Argentino, kaj en Buenos Aires, kaj aliaj centroj montriĝas multe da intereso. En Rosario nun loĝas Angla samideano, S-ro W.M.Goodes, kiu multe antaŭenpuŝas la aferon kaj lastatempe instruis rektmetode al 70 komencantoj. Multaj Argent-inaj ĵurnaloj kaj gazetoj eldonas raportojn kaj artikolojn pri la lingvo. Koresponda Kurso, nun administrata de la Nova Argentina Esperanto-Ligo, ĝis Sep. ricevis 200 lernantojn."

Tiu estas la dua raporto atinginta nin en la lastatempo pri sukcesoplena koresponda kurso.

KOMITATO. La Prezidanto ankoraŭ atendas la nomojn de unu-du el la komitatanoj elektitaj laŭ la nova statuto. Rapidu, ni petas.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la duoblan kotizon (t.e. Individua membro kun LA RONDO) S-ro Holmes, S-roj W.L.Illingworth, H.Byatt (Vic-Prez. W.E.A.), H.M.Cohen (Sek.M.E.K.), T.Enderby, Chambers; S-inoj E.Hill, W.Hewison, kaj F-ino E.Godfrey. Donacon de F-ino M.C.Trundle ni metos en la kaso de LA RONDO.

Al ĉiu nova membro, bonvenon. La individua membro-cifero nun estas 78. Se novaj personoj aniĝos je poŝo samkia en pasintaj monatoj, ni povos fariĝi Landa Asocio de I.E.L. en Junio. En Britujo la Esperantistaro alte tenas nian standardon malgraŭ la milito. Certe ni en Aŭstralio povos fari same.

KOTIZOJ kaj ABONOJ. Individua membro kun LA RONDO - 5/-. LA RONDO al nemembroj - 3/6 (afrankita) 3/- (liverata). Abonantoj povas tuj aniĝi, pagante la diferencon inter la kotizo por individua membro kun LA RONDO kaj la abonprezo. Ĉiam atentigu la adresiton pri via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtmonbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)

P.O.Box 75,

Devonport, TAS.

ANKORAŬ PRI "ĴUS". En Marto 1941 LA RONDO havis noton pri "ĵus". La ekzemplo "mi ĵus alvenas" sidas en Plena Vortaro SAT. Konsiderante la aferon, mi bedaŭras, ke mi ĝin citis. Millidge kaj Wuster (Encik. Vortaro) ambaŭ konsilas uzi ĝin nur ĉe la pasinta tempo. Verdire, uzi ĝin ĉe estanta tempo saĝas inviti konfuŝon. "Mi ĵus alvenas" ni referu per "Mi (ĝuste) nun venas", aŭ "mi (ĵa venas)". "Plena Gramatiko" (Kalocsay kaj Waringhien) asertas: "ĴUS signifas MOMENTON AŬ KELKAJN MOMENTOJN ANTAŬ LA AKTUALA MOMENTO: Ni kelkfoje trovas ĴUS uzata kun la senco: EN la nuna momento. Tio estas nekorekte. Ankoraŭ pli nekorekte estas uzi ĝin en la senco: precize."

KASO de la RONDO.

ENSPEZOJ.	£-s-d
Konta transpreno.....	2.7.7
S-ro A. Turner, donaco.....	1.-.-
S-roj W. Lamb, Langham, M. Noake, K. ĝis Mar. 4.....	9.-
S-ro O. Davies, afranko.....	7½
S-ino A. Douglas, don. K.....	5.-
F-ino Godfrey, ĝis Feb. 43.....	3.6
F-ino J. Mitchelson, Jun. 42.....	1.9
S-ro H. Cohen, ĝis Feb. 43.....	3.6
S-ino E. Hill, " " ".....	3.6
S-ro Illingworth " " ".....	3.6
S-ino V. Baker " " ".....	3.0
S-ino E. Dollahan " " ".....	3.0
S-ro L. Hadley, " " ".....	3.-
S-ro W. Brodie ĝis Mar. 43.....	3.6
S-ino W. Hewison " " ".....	3.6
S-ino Trundle, donaco.....	3.6
Vendoj.....	3.3
Donaco.....	½
	<u>£7-0-9</u>

ELSPEZOJ.	£.s.d.
Posto.....	14.6
Bindpingloj.....	1.6
Papero.....	12.-
Sablonaĵoj.....	11.4
Luo.....	5.-
Inko.....	11.-
Okazaj elspezoj, skribmaterialo k.t.p. 4.-	<u>12.19.4</u>
Mono en la kaso....	4. 1.5
	<u>£7. 0.9</u>

W. ADDIS

25 Greville Avenue  
Flinders Park  
Adelaide  
S. AUS.

-----

DOKTORO FRED WILLIAMS, el Papuo, nun administras la hospitalon KENNEDY, en Bowen, Kvinslando.

-----

BANDEROLO?


Laŭ Millidge ĝi estas "band, postal wrapper"; laŭ Plena Vortaro "rubando el papero por ĉirkaŭligi ion"; laŭ Dictionnaire Complet E.-Francaise de Grosjean-Maupin "bande de papier, banderole". Sed laŭ la Franca-Esp. parto "banderole" estas flagrubando, (dupinta flageto). Laŭ Chevelley: Pennant, streamer, flag; shoulder belt, musket-sling. Laŭ Pfeffer "Kreuzband" (crossband for gazettes, &c, ne "Streifband", kiu estas "a cover open at each end for printed matter). En la Angla Banderol(e), bandarole, bandrol, bannerol, ne havas sencon de "wrapper". "The lances bore gay bandaroles" (Washington Irving.). "Banderolo" estas oficiala. Kiel ĝi fariĝis en E-o vorto por "gazette wrapper" (postal) estas por mi mistero, se ne oni prenis ĝin el la Nederlanda "banderol", kiu havas tian sencon.

-----

F.R.B.

Oficina Organo de la AEA.

La Ronda.



May 1942

Nº 20

Eldonita de F.R. Banham  
2. Banchory St. Essendon W5 Vic. AUSTRALIA.

MEMORE AL LA PIONIROJ.

(Skizeto pri frutempa historio de Esperanto en Aŭstralio.)

MALLONGIGO: B.E. - "British Esperantist" (Londono)

La verkinto emfazas, ke tiu ĉi resumo de la E-a movado en Aŭstralio tute ne kontentigas lin. Multe da merithavaj nomoj, pro nesufiĉa kono liaparta, ne trovas lokon en liaj mencioj. Tamen mankas pli bona, kaj malgraŭ ĝia fragmenteco la kompilaĵo povas havi intereson kaj utilon nun kaj estonte. La artikolo sub "Aŭstralio" en la "Enciklopedio de Esperanto" mencias nur 25 nomojn entute, kaj la malkompleteco de la tuta enciklopedio vidigas en tio, ke, dum trovas sin nomoj de dekoj da diverslandaj diligentantoj kaj maleminentuloj, oni serĉas vane al tiuj de homoj kiaj John Booth, Cedric White, W.J. Drummond, E.Pryke, D-roj Barrington kaj MacBurney, kaj aliaj, kiuj en la frua tempo faris firman laboron por nia idealo en tiu ĉi lando.

El la jaroj antaŭ 1905 (en kiu aperis la unua numero de B.E.) estas malfacile trovi eĉ unu nomon. Ĉio naĝas en nebulo. Ke ekzistis E-istoj en Aŭstralio treege frutempe ni scias per letero de Zamenhof en 1889 al la ankoraŭ hodiaŭ vigla E-isto Vladimir Majnov; -- "El Aŭstralio, kiom mi memoras, mi ricevis leterojn internaciajn el Melbourne kaj el unu urbeto proksime de Sydney; sed de tiuj sinjoroj mi ne ricevis formalan promeson nek adresojn, kvankam iliaj leteroj estis skribitaj tre varme....." (Originala Verkaro, p.481). Tiuj estas la plej unue aluditaj Aŭstraliaj "samideanoj". Sed iliajn nomojn ni tre verŝajne neniam scios. La nomojn de aliaj fruaj pioniroj ni ankoraŭ honoras sed ne plu havas iliajn karajn personojn.

VIKTORIO.

S-ro JOHN BOOTH, laŭ opinio de kelkaj kompetentaj, estis la "patro" de Esperanto en Aŭstralio. Lia nekrologo, verkita de A.M.Hyde, sidas en "La Suda Kruco" Aŭgusto 1920. Jarkompletej de tiu gazeto estas en la Publika Biblioteko en Melbourne. La dato, kiun donis Hyde pri la fondo de la Esperanta Klubo Melburna (1903) estas, laŭ la protokoloj havataj de F-ino Virginia Cox, erara. John Booth kaj la sekvantaj dek unu estis fondaj membroj de tiu organizo, kies unua kunveno okazis 17 Feb-o 1905 en 27 Rathdown-str., Carlton, Vik.: F-inoj D., F., R., kaj H.E.Booth; S-roj F.E.Cobb, G.Ramsaj, E.Eberbach, F. Connolly, G.C.Hodgson, Gillespie, G.A.Evans.

Aliaj fruaj Viktorianoj inter 1905-10: Pastroj C.W.Thonger, W. Lawler. S-roj Frank Russell, P.Adcock, W.Muirden, W.J.Drummond, Cedric White (forta agemulo en Vik., N.Z., kaj poste en Glasgow, Skotlando), G.Gordon, G.Whiteford, A.M.Hyde, Syd.Stott, N.Mills, W.J.Smart (?); Ge-sroj Service. D-roj J.F.Cobbe, Barrington, Scantlebury, V.Bennie, D-ro kaj S-ino MacBurney; D-rino Alexander. F-inoj A.Sinnotte, E.kaj G.Ely, B.K.Blyth, M.Helm, Tilly Aston.

La sekvantaj, kiom mi scias, ekmenciigis nur post 1910:

S-roj J.G.Pyke, H.Tilbury, N.Grant, L.E.Thomson, M.L.Edmanson, C.Clarke, G.Hussey, A.R.Cohen, A.H.Johnson, C.W.Ballard, W.H.Halliwell,

E.J.Bowles, Douglas, A.L. kaj L.J.Sullivan, Perrott, R.Rawson, Jas. Shannon, H.Byatt (poste en Okc.Aŭs.), P.Hudson, F.H.Thorpe, R.A.Lanyon. D-ro W.T.Kendall. F-inoj E. kaj A.Godfrey, M.Hopton, A.L. Hutchens, M.Crabbe, Hollow, Walker. S-inoj Amy Cope, H.Harrison, Tillotson, Purnell, S.Trewin; Ge-sroj E.Hanks; *S-ino Sigelow*.  
En Ballarat F-ino C.A.Walker agadis en 1908.

### NOV-SUD-KIMRUJO.

Pastroj W.D.Kennedy, A.H.Tolhurst (09). S-roj John I.Marx (06), E.Pryke (06), Vic. Roinel (gvidis unuan diservon en E-o en N.S.K. en 1911), A.Lusby (09), H.Gadsden, Chapple, Caffrey, van der Welden, F.E.Wallace, P.J.Holdsworth, F.W.Bloore, Geo. Collingridge de Tourcey (pentristo, verkisto). F-inoj E. Schiedel (S-ino Gregg), J. Graeme Orr (S-ino Mair), Adamson; D-ro Corlette. S-ro Pryke E-igis en Maitland en 1906 kaj trovis samideanojn en Sidnejo en tiu tempo. Li estis la unua U.E.A. delegito en la Suda Duonsfero. La Sydney Esp-o Club fondiĝis en 1909 (Gadsden, Bluett, Caffrey, Chapple). S-ro B.G.Watson ĉefis E. teozofojn ĉ. 1910; Kolonelo Pollen alparoladis ilin en Sidnejo tiujare. D-ro Corlette kaj S-ro Wallace en B.E. pretendis esti la unuaj E-istoj en N.S.K.

### SUD-AUSTRALIO.

D-ro William Lamb (Hummocks Hill); Prof-o A.C.Uhrlaub; S-inoj Wm.Hogg, Porter, J.Lumsdon, D.Davies kaj Withers (07). S-roj J. Lyall, W.D.Smith, Waterman.

### OKCIDENTA AUSTRALIO.

Jam en 1911 grupo "La Nigra Cigno" filiĝis kun B.E.A., sed antaŭ tiam aktivis pioniroj. Inter la sekvantaj troviĝas kelkaj: S-roj Buckeridge, J.Skurrie, V.J.Matthews, J.A.Cowie, F.E.Donoghue, G.A.Brown, M.A.Browne, H.M.Leighton (06), F.L.Stow, C.Caine, Colin Unwin, Burt, A.Saar, A Dewar, Strickland. D-ro(D?)Davies (07); S-ino A.MacDonald; F-ino M.Watson.

### KVINSLANDO.

S-roj P.V.Pears (05), Cadell, Mason-Beatty, Fewings, Schoch, C.S.Price (10), C.Dornbusch(09); Kanoniko (poste Episkopo)Hay; D-ro Hankins; F-ino Fraser.

### TASMANIO.

Ĉirkaŭ 1907 klaso en Hobart (F-ino Ross, S-roj J.Steele, Meggy, H.L.Nichols). Hobarta E-Klubo fondiĝis 1911 (F-ino Hannaford, Ge-sroj Steele, S-roj A.Budge, D.Guilbert, K.Simmons, F.Archer).

### NOV-ZELANDO.

La historio de E-o atendas la plumon de tiulanda kompilanto; la

nuna verkanto tute ne havis disponeblan materialon; la tasko post-  
 ulus multe da pacienco kaj inko en aparta traktato, kaj la jena lin-  
 iaro estas nur tre supraĵa provo surpaperigi kelke da honorindaj no-  
 moj. La unua E.Klubo en Auckland en 1904; en 1906 la Southland (In-  
 vercargill) E.Club (R.McKinnon, J.D.Pearce, J.L.Field, J.Hendry, E.  
 Webber, F.W.Bicknell, D-roj Hogg, Torrance); samjare kluboj en Dun-  
 edin kaj Christchurch. A.Rowlands, Pastro Bernstein, E.D.Bernstein  
 (ankoraŭ fervora), S-roj J.Hampton, W.French, J.Clark, Cedric White,  
 Roland St.Clair, O'Brien Hoare, T.Newburgh, Whittaker, R.Eastwood.  
 En Gisborne: S-ro I.J.Quigley; Wanganui: S-ro C.H.Parker, S-ro Pen-  
 lington. Prof-o Bickerton kaj S-ino Chapman-Taylor kun ĉirkaŭ 150  
 anoj konsistigis la klubon en Christchurch en 1906; lecionoj aperis  
 en "N.Z.Truth" k.a., kaj 500 E-istoj piknikis ĉe la hejmo de Prof-o  
 Bickerton en tiu jaro. Pastro G.Aldridge, S-ro J.ŝ.Russell, H.A.  
 Epstein (elstara homo), Cornish; F-ino Ockenden. Cefministro Joseph  
 Ward kaj Edukministro G.Fowlds patronis E-on. La nomo de B.Potts  
 (poeto, prozisto, pedagogo) ekstaras en B.E. ĉ. 1916 kiel tiu de  
 talenta lingvuzanto.

Kelkaj el la supraj mortis, aliaj perdis kontakton kun la mov-  
 ado, sed la jenaj veteranoj inter aliaj ankoraŭ pli-malpli vigle  
 akompanas la lingvon laŭ ĝia zigzaga vojo: S-ro G.Gordon en 1906,  
 ekvidinte E.libron en butikoj en Invercargill, aĉetis ĝin, formetis  
 la tro malfacile memoreblan Volapuk, kaj fariĝis porĉiama "verdulo";  
 S-roj Pryke, N.Grant, Ballard, Hyde, Drummond, Dornbusch, Rawson,  
 L.E.Pfahl, V.Rutland, Lanyon, Fussey; F-inoj A.kaj E. Godfrey, E.A.  
 Sinnotte (S-ino Mumford), Blyth, Hopton; S-ino Tillotson; Ge-sroj  
 Hanks.

Laŭ la "Enciklopedio de E." Kolonelo Doktoro John Pollen, tiama  
 prezidanto de la Brita Asocio, vizitis Aŭstralion en 1904, sed tio  
 estas erara. Laŭ raporto en B.E.Julio 1910 lia vizito okazis en  
 1910. En Marto D-ro Pollen kune kun Melburnaj E-istoj deputaciis  
 al Viktoria Edukministro Billson, ankaŭ en Sidnejo li partoprenis  
 deputacion. En Adelaide li ricevis bonan akcepton de Univ. prof-o  
 Naylor, amiko de la fama Prof-o Gilbert Murray, kaj parolis antaŭ  
 granda aŭskultantaro. Li ankaŭ vizitis Nov-Zelandon. Gazetraporto  
 pri li kaj lia agado por E. senteble akcelis la movadon en Aŭstrali-  
 o; por la unua fojo eminenta homo el alia lando tiris atenton al la  
 demando pri internacilingvo. Jam en Julio 1910 li revenis en Ang-  
 lujon.

Verketoj de niaj pioniroj tie kaj tie staras en la tekstoj de  
 jam flaviĝintaj Eŭropaj E.gazetoj. La Revuo (Fremi(A.M.Hyde) Aŭg.  
 1913 pri Canberra; J.G.Pyke; H.Gadsden, Jan.1912 pri Tendotagoj en  
 Aŭstralio); Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Lingvo Internacia kaj  
 aliaj. E. librojn presigis alilande G.Gordon, E.A.Sinnotte, J.G.  
 Pyke, E.Pryke, A.M.Hyde; Benalla Independent (E.kurso ĉirkaŭ 1907);  
 La Verda Stelo (07) red. S-ro Service; The Australian Esperantist  
 (komencis Jan. 1910 laŭ arango kun Benalla Independent kiel aldona-  
 aĵo al tiu ĵurnalo. Red. la E. gaz. D-ro Barrington); The New Zea-  
 land Esperantist (07); La Informilo (12) kaj ĉeble aliaj mallonge-  
 daŭraj E. gaz. ekzistis antaŭ la Suda Kruco, kiu estis la plej viv-  
 tenema E. eldonaĵo en la Suda Duonsfero (1921-1934). Redaktis ĝin

siavice A.M.Hyde, C.W.Ballard, P.Hudson, kaj (de 1927) F.R.Banham.

En Nov, 1939 ekaperis INTER NI, monata gazeto de La Nova Espero, klubo en Adelaide. Redaktis ĝin F-ino Addis. En Okt 1940 eldoniĝis la unua numero de LA RONDO, komence ~~publikato~~ por la anoj de Traduka Kurso estrata de Sr. F.R.Banham. Poste, en Jan.1941 LA RONDO fandiĝis kun INTER NI, sed konserve donis al la kombinaĵo sian nomon. En Okt. 1941 LA RONDO iĝis la oficiala organo de la A.E.A. Redaktoro, F.R.Banham; enhava aranĝistino; F-ino L.E.Bailey; Kasiŝtino, F-ino W.Addis.

Okazis ses Aŭstraliaj Kongresoj de E.; Adelaide 1911; Melbourne 1912; Sydney 1920, 1923; Melbourne 1925; Perth 1929. Tiu unua en Adelaide estis vere brila afero. Malfermis ĝin Lia Ekscelenco Sir Day Hort Bosanquet, en ĉeesto de la Kanceliero de la Universitato en tiu impona konstruo.

Ĉe la mondkongresoj de E. Aŭstralio reprezentiĝis inter aliaj per S-roj J.Booth, Pyke, Rawson, Hussey, Hyde, Drummond, Rutland, Hudson; D-ro F. Williams; Ge-sroj Hanks; S-inoj Tillotson, Newport, F-inoj Sinnotte, E. kaj G. Ely, *S-roj G. Hart, J. Birch*

La Esperanta Klubo Melburna fondiĝis sub la unua Prezidanto, John Booth, en 1905; en 1915 ĝi ŝanĝis nomon en Esperanta Societo Melburna. En 1921 S-roj Drummond, Pyke, Rawson kaj aliaj derompigis de la origina fondaĵo kaj formis The Melbourne Esperanto Club. La Australian Esperanto Association fondiĝis en 1918 (asimilanta la Esperantan Societon Melburnan) kaj invitis ĉiujn E-istojn aliĝi al ĝi. En 1924 la origina Melburna E. grupo reprenis sian nomon, Melbourne Esperanto Society, sed likvidiĝis en Okt.1934. Sub W.L. Edmanson en Aprilo 1909 fondiĝis Melburna Komerca Klubo Esperanta. Ĝi daŭris kelke da jaroj.

S-ro J.Eliot en 1940 iniciatis la duan A.E.A., kiu ŝuldas sian faktan ekziston hodiaŭ ĉefe al S-roj G.Hillerman kaj A.Turner kaj Pastro C.C.Cowling, kies persista kaj senlaca konstruado kontraŭ ĉia malfacilo fine rezultigis, ke la Asocio nun entenas la organizojn en ĉiu ŝtato.

En ĉiu Decembro la J.G.Pyke Memorial Committee, krom atestkartoj al sukcesaj ekzamenitoj, per kvin ~~funtoj~~ *gvidoj* premias al la plej bona E. lerninto dum unu jaro.

(Dankon al F-ino Cox, S-ro Ballard, S-ro Pryke, S-ro D.Guilbert, S-ro H.Byatt, Pastro C.C.Cowling pro informoj.)  
En Novembro, 1941.

-----F.R.BANHAM.

### "KAJ ŜPARI UNUHORAN VELVETURON."

La velboatoj ĉirkaŭis la malproksimajn buojn kaj komencis la longan veturon al la celo. Ĉi tiu konkurso estis la ĉefa okazaĵo de la jaro por la malgranda fiŝkaptista komunumo, kaj preskaŭ la tuta popolo de Port Brownie estis sur la sabla marbordo malantaŭ la sport-areno. Sur malalta duno Maljuna Sam staris kaj sekvis la progreson de sia plej juna filo dum la naŭmejla vojaĝo. Forta vento, blovante el la okcidento, maltrankviligis la maron kaj faris la boatojn malfacilaj por manovri.

Pli kaj pli malheliĝis la ĉielo, sed ju pli ŝtorma iĝis la vet-

maro ĉe la orienta flanko. Do, estis du buŝoj el la rivero en formo de grandega litero "V", kaj per tiuj la insulo estis fortrancita de la ĉeftero. La okcidenta estis larĝa, sendanĝera vojo, sufiĉe profunda por granda vaporŝipo. La orienta estis konata kiel la "Narrows". Ĝinestis malrekta, mallarĝa vojo, kaj la enirejo estis tra danĝera, nefidinda golfo kun rifoj kaj akvofluegoj. Estis mallonga vojaĝo por fiŝkaptistoj kiuj venas de la oriento, oni evitas vojaĝi unu horon, se oni povas eniri sen akcidento; sed nur tiuj kiuj bone konas la golfeton povas tion fari -- kaj tiuj nur kiam la maro estas trankvila.

Dum la vivo de Maljuna Sam tiu golfeto dronigis nombron da viktimoj. Kiam li estis ne multe pli aĝa ol la filo nun estas, ĝi dronigis lian kunulon kaj samtempe preskaŭ lin mem. Estis tragedia afero en lia vivo pri kiu li ĉiam rifuzis paroli.

Venante al la haveno, malsekaj kaj malvarmaj post longa vojaĝo, fiŝkaptistoj ofte havis turmentan tenton provi trairi la golfeton al la "Narrows" kaj ŝpari unu-horan velveturon ĉirkaŭ la insulo al la sendanĝera enirejo.

Maljuna Sam sekvis la lastan de la ĉesstantoj for de la maro, sed li estis viktimo de stranga, neesprimita timo. Li lasis la aliajn kaj revenis al la marbordo, kaj fikse tenis la vidon sur la "Sally" dum ĝi iris for. Li sidis dum mallonga tempo kaj rigardis la malgrandan boaton. Ĉiu alia boato nun estis el la vido ĉirkaŭ la alia flanko de la insulo. Li ne estis studento de psikologio, sed en sufiĉe lerta maniero li imagis la pensojn de la filo. Juna Sam gajnis la trofeon, kaj kompreneble, li tre volas paroli pri la konkurso kun la aliaj partoprenintoj; ankaŭ diskuti ĝin kun Mario. Li estas ekcilita kaj tio igis lin esti tro memfida kaj malprudenta. Li klare montris tion kiam li velveturadis la boaton tiel proksime al la marbordo.

"Imagu iun faranta tion en tiel aĝa vetero kiel la hodiaŭa!" li murmuris, "Ho, kiel mi deziras ke li ne estu tiel malproksima malantaŭ la aliaj!" kaj ĝuste tiam li vidis tion, kion li timegis -- sed vere duonatenadis vidi.

Subite Juna Sam ŝanĝis la direkton de la "Sally" kaj iris rekte al la golfeto kaj la "Narrows". La tento ŝpari unu-horan velveturon kaj atingi la ankrojn pli frue ol la aliaj pruviĝis esti tro forta kaj alloga. La maljunulo rigardis la nigran ĉielon. "Ho, bona Dio!" li plorĝemis, "Bona Dio!" Tiam li kuris al la plej proksima domo kaj informis la fiŝkaptistojn pri la danĝero kiu minacas la filon.

Dum tiu ŝtorma terura nokto la fiŝkaptistoj serĉis la marbordon per la lumo de lanternoj. Ĉar Juna Sam estis forta naĝanto ili ne volis rezigni la esperon ke li le atingis la marbordon. Maljuna Sam serĉis kun la aliaj ĝis li preskaŭ kolapsis. Poste kun griza, dolorplena vizaĝo, li sidis en la malgranda domo rigardanta en la fajron. Mario estis kun li. Ĝi estis sur la marbordo kun la fiŝkaptistoj kaj ili nur persvadis sin foriri por prizorgi la maljunulon. Iom post la noktmezo Maljuna Sam venigis unu el la fiŝkaptistoj. "Ĉu iu el vi provis la malproksiman flankon de la insulo?"



li demandis.

"Ĉu utilas iri tien?" estis la respondo. "Ĉu vi ne kredas, Sam, ke se io ajn envenas, devas esti ĉe tiu ĉi flanko?"

"Ne ĉiam estis tiel," li respondis, "Kiam mi kaj kompatinda Jack Koonan estis renversitaj la ondoj metis ~~nia~~ sur ĉi tiun flankon, sed kompatinda Jack estis tirita en subrefluon kaj oni trovis lin post du tagoj sur la alia flanko de la insulo. Ĉu vi povas aranĝi ke iu serĉos tie?"

"Mi kunprenos Jock'n kaj du-tri aliajn kaj tuj iros en mia propra boato," respondis la fiŝkaptisto.

Ĉirkaŭ la tria matene aro de malsekaj fiŝkaptistoj venis al la malgranda domo. Nur unu el ili eniris. Sen ia parolo ĉiu persono sciis kian informon li havis. Estis tempo de terura silento. La viro (li estis la frato de Mario) tute ne kapablis komenci sian malĝojan novaĵon.

"Ĉu vi trovis lin?" diris Sam, finante la teruran streĉadon.

"Ĝes," respondis Jock.

"Kie li estis?" La maljunulo levis siajn lacajn okulojn al tiuj de la parolanto.

"Sur la alia flanko de la insulo, kien vi direktis nin iri," respondis Jock, "Tuj post ni atingis la insulon, la hundo de O'Brien komencis bojadi. Li estis iom antaŭ ni sur la marbordo inter nombro da grandaj ŝtonoj. Kaj ni trovis ke vere estas Juna Sam. Kiam la boato renversigis, supozeble li provis demeti sian palton -- liaj brakoj estis fikse envolvitaj en ĝi kaj tenitaj super la kapo. Li estis bona naĝanto sed li ne havis ŝancon."

Tiam Mario, kiu ĝis nun tiel kurage suferis la tuton, iom kolapsis. Ŝi komencis histerie plori kaj forkuris de la ĉambro. Iu el la virinoj atendis dum malgranda tempo, tiam ŝi eliris al Mario.

Maljuna Sam stariĝis. "Preskaŭ ŝajnas esti juĝo kontraŭ mi," li kriis emocie, "Kiam kompatinda Jack Koonan dronis mi estis kulpa pro la afero. Li deziris iri ĉirkaŭ la insulo, sed mi ridis je li, kaj ni velveturis la "Narrows". Kiam ni trafis la unuan forton de la fluo li deziris reveni sed mi estis tro memfida kaj ne aŭskultis lin. Dum ni estis en la plej danĝera fluo, ventego blovis kaj renversis nin. La ondoj metis min sur la marbordon, post ol mi naĝis dum horoj -- sed li estis kaptita de la subakvo fluo kaj oni trovis lian korpon ĝuste kie vi trovis Sam. Ŝajnas esti juĝo kontraŭ mi!".

.....

Sur la insulo ankoraŭ nestas la petreloj, kiel ili nestis dum multaj jarcentoj antaŭ ol la unuaj balenkaptistoj (inter ili Maljuna Sam) paŝis sur ĝin. Sed ĝi ne plu estas insulo, en la kondiĉo ke ĝi estas tranĉata de la ĉeftero per la rivero. La "Narrows", la mallonga, dua elirejo de la rivero, estis fermita per la laboro de la homo. La rivero nun havas nur unu elirejon al la maro.

La danĝera golfo, senigita de la rivera enirejo kaj la fortaj fluoj kiuj trairis la sablorifojn, iĝis pli kaj pli plena da sablo. Sur la loko kie Maljuna Sam, Koonan, Juna Sam, kaj la aliaj fiŝkaptistoj faris tiujn danĝerajn vojaĝojn en pasintaj tagoj, infanoj nun ludas sur malalta herbara plato apud la maro. Dum pli ol kvindek jaroj tiu sireno de la maro, la "Narrows", fojon post fojo legis

viktimon al detruo per la sorĉa kanto: "Kaj ŝpari unu-horan velveturon."

Juna Sam estis ŝia lasta viktimo.  
Tiu estis ŝia "Cigna Kanto."

-----ERNEST H.HANKS.

AUTUNO.

Flaviĝas la folioj  
De ĵus pasinta jar';  
Birdnestoj forlasitaj  
Troviĝas en arbar'.

Forvelkas la espero  
Kiun naskis mia kor';  
La ĝojo kiun mi sentis  
Ĵam estas tute for.

Sed, arboj senfoliaj  
Ne mortis ĉe l' radik,  
Kaj - se la floroj mankas -  
Ĵen kreskas la filik'.

Kiel birdo kiu kantas  
En frosta la aer',  
La koron mi ne lasos  
Al nigra malesper'.

Printempo sopirata  
Revenos, kune kun  
Birdaroj en la ombro  
Burgonoj sub la sun'.

Kaj koroj esperemaj,  
Helpataj de kontent',  
Ĵa povas antaŭsent  
La pacon post la vent'.

PHYLLIS BYATT.



Violetoj, memoraĵo  
de l' printempa mia viv',  
kiam amo, sorĉa, rava,  
por mi estis la motiv.

Velkis floroj, la printempo;  
kune, ŝi mem pasis for --  
Purigite, sed la amo  
restas, flam' de mia kor'.

JOEDIKO.

-----  
"Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero...; ke ekzistas  
iaj leĝoj en la naturo...; ke io min gardas al alta celo...;

-----ZAMENHOF

KION VI SCIAS ?

- (1) Kie estas la statuo de Libereco, kaj pro kio oni ĝin konstruis?
- (2) Kiuj Eŭropanoj kiel unuaj ekvidis la Aŭstralian marbordon?
- (3) Kiu estas la plej alta monto en Aŭstralio? En Viktorio?
- (4) Kiu estis la unua Gubernatoro de ŝtato Viktorio?
- (5) Kiu estas la plej pluva regiono de Aŭstralio?
- (6) Kial oni ne povas geedziĝi post la tria posttagmeze en Anglujo?

----- (respondoj - p.112)

R.K.? -----NENIA TABAKO.

Viro deziris aĉeti tabakon en la nuna tabakmankado. Petinte la vendiston, li ricevis ĉi tiun demandon: "Ĉu vi estas R.R.?"

"Ne," li hezite informis.

"Do mi ne povas vendi al vi," diris la vendisto.

La viro vizitadis laŭ la tuta strato, sed ĉiam la sama demando: "Ĉu vi estas R.K.?" Finfine lia pacienco elĉerpiĝis, kaj li rekte postulis al unu vendisto:

"Kial vi ne vendas al mi simple pro tio, ke mi ne estas Roma Katoliko?"

"Ho," klarigis la vendisto, "Ĉu vi ne scias, ke ĉe ni tabakistoj R.K. signifas Regula Kliento?"

-----H. MARSHALL COHEN.

REDAKTOR@ BABILADO.

Pro spacmanko mi verku kerne, lakone.

Espereble la Adresaro baldaŭ aperos, per manoj de F-ino Bailey.

De 9 ĝis 23 Majo mi estos kampare. Do komprenu pri iaj prokrastoj. Dankon.

Kolonelo Mangada jam en Meksikio; Jaime Grau Casas, Kataluna Esp-a poeto kaj kompilinto de la Kataluna Antologio, mizeras en Franca hospitalkampo. "Esperanto" (Geneve) raportas: "Ni sukcesis sendi al li kvanton da nutraĵoj, dank' al efektiva oferemo de Franc-aj samideanoj. En Lyons Hans Jakob kolektis nutraĵmarkojn ("tickets" oni diras en Francujo) por 8 kilogr.... Estas heroeca ago, senigi je ĉi tiuj paperetoj, sen kiuj oni povas mortmalsati." Ankaŭ al la Zamenhof-familio en Varsovio modesta helpo iras daŭre.

La A.E.A. bezonas 100 membrojn ĝis Junio por ebligi aliĝon al I.E.L. Ĝi havas 83. Abonantoj-nemembroj, nepre aniĝu al nia Asocio, tiel servante kiel brikoj en nia Esperanta fortikaĵo.

----- F.R.B.

ASOCIAJ AFEROJ.

EKZAMENOJ. Via Asocio nun havas provizajn da folioj pri la ekzamenoj de la Brita Esperantista Asocio. En la lasta tempo kelkaj samideanoj ekinteresiĝis pri tiuj ekzamenoj, kaj ni esperas, ke aliaj, kiuj ĝis nun ne entreprenis ekzamenon, uzos tiun ŝancon por plibonigi sian kompetentecon en la lingvo. La pretiĝo por ekzameno helpas la studenton atingi certan normon. Ricevinte certigaĵon, tiu ĝuas la plezuron de persono kiu penis kaj venkis.

La ekzamenoj estas el du normoj (a) "Preliminary" (b) "Advanced". Por ĉiu normo estas du tipoj de ekzameno (i) Parola kaj skriba antaŭ ekzamenisto (ii) skriba, farebla en la hejmo, kun la uzo de lernolibro kaj vortaro.

Tial ĉu vi loĝas aŭ en urbego aŭ en monta kabano, vi povas partopreni tiujn ekzamenojn, kiuj estas bone konataj en ĉiu parto de la Brita Imperio. Se vi ankoraŭ ne provis viajn kapablon pri Esperanto, kial ne fari tion nun? Dumilite ni plifirmigu nian konon de la universala helplingvo. Espereble, la partoprenantoj de la Traduka Kurso celos la Diplomon de la B.E.A., kiel kronon por siaj studoj, se ili ankoraŭ ne posedas ĝin.

Jen sufiĉo por informi vin pri la normo de la "Preliminary":-

(i) Farita antaŭ ekzamenisto (iu Diplomito de B.E.A.)

Skriba parto (a) Frazoj, en kiu la kandidato enskribas mankajn finaĵojn (b) Elesperantigo (c) Enesperantigo (d) demandoj pri la uzo de afiksoj (e) demandoj pri la uzo de vortoj en frazoj (f) demandoj pri uzo de la ciferoj (g) mallonga diktaĵo.

Parola Parto. (a) simpla konversacio (b) legado de simpla Esp. peco (c) demandoj pri la peco legita.

(ii) Perkoresponda ekzameno. (a) Simpla Angla peco tradukenda Esperanten (b) Simpla Esperanto peco tradukenda anglan (c) Gramatikaj demandoj (d) Simpla letero.

En la perkoresponda ekzameno oni rajtas uzi lernolibrojn.

La kosto estas malgranda kaj nur sufiĉa por pagi la elspezojn rilate al certigaĵoj, folioj, k.t.p.

Plenajn detalojn vi povas ricevi de la Specialaj Ekzamenistoj aŭ la subskribinto. La Specialaj Ekzamenistoj estas S-roj F.R. Banham, 2 Banchory St., Essendon, W5 Vic. kaj Rev.C.C.Cowling, St. Mary's, Tas.

GRATULON al S-ino A.Douglas, Prezidantino de Tas.Esp.Asocio, kiu lastatempe sukcesis kun honoro ĉe la Diplomo de B.E.A.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la duoblan kotizon (t.e. Individua Membro kun la RONDO) S-roj F.A.W.Thomas (dankon pro letero), C.C. Cowling (Donaco ni metos en la kason de LA RONDO), G.F.Hillerman, S-ino C.C.Cowling, Lieut.R.Stephens (ni ne petis pagon por la libroj, sed dankon).

ADRESARO. Feliĉe ni nun povas raporti pli optimisme pri la sorto de la Adresaro. Ĝi baldaŭ aperos en Mallonga formo. Ĉiu membro ricevos ekzempleron.

KOTIZOJ kaj ABONOJ. Individua membro kun LA RONDO 5/-. La RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita)-3/- (liverata). Abonantoj povas tuj aniĝi, pagante la diferencan inter la kotizo por individua membro kun LA RONDO kaj la abonprezo. Ĉiam atentigu la adresiton pri

via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtmonbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)  
P.O.Box 75, DEVONPORT, Tasmania.

MELBOURNE ESPERANTO CLUB. Oficitenantoj estas S-ro E. McKenzie, (prezidanto); S-ino E.M.Hill (vicprezidanto); S-ro H.M.Cohen (sekasisto); S-ino Hintze (helpsek.); S-ino O.Glenie (bibliotekistino). Komitato: Ges-roj Hanks, S-ro Drummond, S-ino F.Rawson, F-ino E. Godfrey, S-ino Mayall.

### RESFONDOJ. (v.P.110)

- (1) Ĝi staras sur Bedloe's Island, en Nov-Jorka haveno; la Franca nacio donacis la konstruon en 1885 por honori la jarcentan datrevenon de la Amerika sendependiĝo.
- (2) Holandanoj, kiuj en 1606 eniris la Golfon de Karpentaria sur ŝipo "Duyfken".
- (3) Mt. Kosciusko (7,336 futoj); Mt. Hotham (6,508).
- (4) Charles Joseph La Trobe.
- (5) Laŭ nuna scio, la nordorienta Kvinlanda marbordo, inter Port Douglas kaj Cardwell.
- (6) Antaŭ jarcentoj estis tiom da drinkdiboĉo ĉe geedziĝoj, ke en 1753 estis starigita parlamenta leĝo, kiu devigis geedziĝontojn fari la celebren antaŭ la tria horo. Tio estis pro la bedaŭrinda fakto, ke tre ofte post tiu horo la ĉefroluloj kaj iliaj amikoj estis tro ebriaj por konscii ion pri la soleno.

### LETEROJ al la REDAKTORO.

MONTETULO. Ĉar vi petis helpeman kritikon, vi sendube permesos al mi sugesti, ke kelkaj numeroj, precipe la Februara, estis iom tro beletristikaj, kaj tro emfazas la literaturan flankon? En tiu rilato mi opinias, ke artikoloj, kiuj informas pri la eksterlandoj vekus pli grandan intereson inter legantoj. Mi ne volas diri, ke oni devus forlasi altgradan stilon aŭ tradukan arton. Tamen Esp-o celas internacian fratigon, kaj tion oni atingos nur per informoj pri fremdaj popoloj. Mia sugesto pri elĉerpaĵoj el leteroj eble helpus en tiu rilato. Ĉiam mi trovis, ke artikoloj, kiaj tiuj de S-ro Hanks, S-ro Schwerin kaj Fraŭlino Bailey (pri naturaj kaj alilandaj aferoj) vekis pli da intereso ol nuraj tradukaĵoj belartaj.

S-r- C.W.B.demandas: Ĉu estas ia aldono al vortoj aprobitaj de la Lingva Akademio de post la apero de Plena Vortaro de S.A.T.?

Ĝes. PV de SAT (dua eldono) eldoniĝis en 1934. La Kvina Al-

dono al la Universala Vortaro (oficialigitaj radikoj) eldoniĝis en Aŭgusto 1934 (vidu Heroldo de Esperanto de tiu monato aŭ Brit.Esp. por Sept.); la Sesa en Junio 1935 (tiumonata Brit. Esp.)

La Kvina: Aviado; Bremso; Bulteno; Fono; Kabineto; Pilo; Flagiato; Slipo.

La Sesa: Angoro; Aperturo; Aplombo; Arbusto; Aŭguri; Baletto; Bankiero; Gramofono; Grego; Honorario; Ingredienco; Koncesio; Konduktoro; Monotona; Strebi; Susuri; Ŝrumpi; Vinkto; Vivisekcio; Vizio.

Posedantoj de PV aldonu la grandajn komencliterojn! F.R.B.

### JOEDIKO.

Ofte min demandas mi  
kiaj...la Gracioj Tri;  
kompreneble tiu Trio  
de la Verd-Hierarkio.  
Jen pri tio la respondo  
ĵus alvenis per LA RONDO.  
(Ĉu vi mem abonas ĝin?  
Kiu ne, senigas sin  
de valora informilo  
en studinda lingva stilo.)  
Nu, mi vere kontentiĝis,  
ĉar finfine informiĝis  
pri ĉi interesa temo  
ekscitanta je l' sciemo.

En Numero la Aprila  
(legindaĵo tute brila!)  
sur la naŭdek-sepa paĝo  
(juveleto de art-saĝo!)  
plene sin malkaŝis ĉio  
pri la Verda Graci-Trio.  
Sidu ni ĉe ekzemplero  
de nomita la numero;  
estu tiu malfermita  
ĉe la paĝo menciita:-

Jen unue: Melpomena  
Bejli (Bailey), seriozmiena;  
serioza, ĉar ĉi nomo  
taŭgas nur por tia homo:  
jes, nur sopra ink-najado  
rajtas pri la redaktado  
de la verd-evangelia,  
fama ROND-ORGANO nia...  
Melpomena en veluro,  
nimfo de l' literaturo!

Due: tragedianino,  
Nula Garba, kasistino.  
Ja! la tuta Addis-scio  
tremas ĉe la adicio...  
nul' plus nulo ... La kredito  
emas do al deficito.  
Nula Garba Addis! Kia  
tragediulino dia!  
"Venu iam! Min rigardu!  
Pencojn, por ke mi plu ardu!"

Trie: kun la aŭreolo,  
en sekretaria rolo,  
Sankta Bo Brummell Georgo  
Hillerman ... sen unu zorgo.  
Ho, fraŭlinoj, gardu vin!  
Vidi estas ami lin!  
Venke tra la koridoro  
de la negardata koro  
paŝus li, sen ia zorgo,  
Sankta Bo Brummell Georgo!

Halo, kara Graci-Trio!  
jen buked' el poezio,  
jen glor-kron' el retoriko  
por Ci Tri de Joediko.

R.F.STEPHENS. Mi ĵus ricevis LA RONDO por Marto kaj ĝuas ĝian en-  
havon. Bonvolu noti, ke oni ne plu permesas, ke la nomo de aŭ la

urbo aŭ de la ŝtato aperu sur la koverto de leteroadresata al ano de la Australian Military Forces. Mia adreso:

Lieut. R.F. Stephens W6065

25 M.G. Regt. Sig. Tp.

HOME FORCES.

Mi aĉetis libreton "Easy Conversational Arabic & French for the Australian Soldier" (6p.). Por ekzercado mi penis traduki la enhavon, frazon post frazo, sed la penso venas kaj revenas: "Ĉu la A.E.A. povus eldoni similan libreton, "Easy Conversation in the International Language, Esperanto, for the Australian soldier"? Eble la enkondukaj paĝoj povus enhavi:

(1) Ĝenerala Enkonduko. (2) Reguloj. (3) Alfebeto kaj Prononcado. (4) Esperanto ĉe Ekrigardo. (5) Kiel Lerni Esperanton.

Dua sugesto: ke artikoloj pri Esperanto aperu en la gazetoj kaj revuoj, kiaj la diversaj "digest-oj" kaj la armeana gazeto "Salt".

<u>KASO de la RONDO.</u>			(Apr. 1942)		
<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s d	<u>ELSPEZOJ</u>	£	s d
Konta transpreno.....	4.	1. 5	Poŝto.....	17.	3
Restaĵo de celebra donaco....	4.	14. 11	inko.....	11.-	
Dr. Caldero, don.....	10.	-	papero.....	12.-	
S-ro G. Hillerman, Rondo & Don.	10.	-	bindpingloj.....	1.6	
Ges-roj C. Cowling.....	7.	-	ŝablonaĵoj.....	11.4	
S-ro F.R. Thomas.....	3.	6	luo.....	5.-	
F-ino P. Johns.....	3.	6	okazaj elspezoj..	3.5	
S-ro G. Miller.....	3.	6		<u>£3. 1.6</u>	
F-ino Lambert.....	3.	6	en la kaso		
S-ino G. Crockett.....	3.	6	£8. 14. 1		
F-ino L. Morphy.....	1.	9		<u>£11. 15. 7</u>	
F-ino Thorne.....	1.	6			
S-ro Drummond.....	3.	-			
S-ino C.E. Stope.....	3.	6			
S-ro Ballard.....	1.	6			
Deaconess Magarey.....	3.	6			
	<u>£11. 15. 7</u>				

W. ADDIS,  
25 Greville Ave.,  
Flinders Park,  
Adelaide, S.AUS.

VIDITA en "The Mail", Adelaide, Sat. May 2. 1942.

"I saw in the paper to-day a reference to Esperanto. Where is that?" asked Tom Toller.


"It's not a place. It's the universal language," replied Pop Walker.

"Oh. And where is it spoken?"

"Nowhere."

Gran Organó de la A.E.A.

La RONDA.



Junio 9/2

Nº-ro 21

Edonita de F.R. Banham  
2. Banchory St. Essendon W5 Vic AUSTRALIA.



Ĉe la naive simplaj popoloj de Afriko la blankuloj havas reputacion de la Diablo. Kiam nigruloj ĉasas sovaĝajn bestojn aŭ batalas inter si, ili estas tute sen timo, sed ekvidante blankan homon, ili tuj tremas. Mi promenis ĉirkaŭ la vilaĝo Bobo Oule unu matenon. Io malaperis malantaŭ grenujon. Sekvinte ĝin, mi trovis virinon jam ne plu junan. Kun vizaĝo preme al muro, ŝi staris blekante pro timo. Mi forpaŝis sen prokrasto, por ke ŝi povu resereniĝu. Krome, estis por mi hontiga afero vidi la negridetojn en la Ĉad-regiono malfermegi la okulojn pro teruro antaŭ mi, kaj en la kabanajn forkuri tiel rapide kiel povis porti ilin la kruretoj. De el la loĝejaĉoj venis la akratona ploro de teruritoj.

Kiu kaj kio do tiel diable teruris tiujn homojn? Ĉu ni estas inferuloj tiaspecaj, ke eĉ infanoj nin timegas? Tute senhomiĝintaj estas regionoj de Afriko samgrande kiel Eŭropaj regnoj. La loĝintoj foriris por eviti ekvidon al blankuloj. Ili forlase perdis siajn vilaĝojn, riverojn, lagojn kaj ĉasterojn, preferante kaŝi sin en la ĝangalo kaj mangi radikojn kaj serpentojn, se per tio ili ne devas kontaktiĝi kun la reprezentantoj de la tielnomita Okcidenta civilizacio.

Ho jes, ni riĉe portis benojn, se ni juĝas tion per specimenoj en muzeoj kaj per statistiko en koloni-administrejoj. Sed preskaŭ ĉie en kolonia Afriko la tero de la indiĝenoj estas forprenataj de la blankuloj. Ĉe la Bobo Oule-anoj la Franca registaro koncesiis ilian kolektivan teron al koloniigaj trustoj laŭ kontraktperiodoj de 99 jaroj -- t.e., por ĉiam. Sen cendo da kompenso al la indiĝenoj, tiuj trustoj elsuĉas la naturajn riĉojn el vastegaj regionoj, bone sciante, ke ili havas siadispone la armeojn de Francujo, kiuj se necese frakasus kontraŭstaron; ili eĉ subjugigas indiĝenojn sklave ekspluati propran teron kaj riĉon.

Ĉiun printempon el la Ĉad-regiono aroj da junviroj estas ŝipe sendataj en Nigerion kaj Ekvatoran Afrikon por labori en kaŭĉukarb-aroj. Ili neniam revenas. Se ili rifuzas, trafas ilin batado de vipoj el hipotama haŭto. Se ili sin kaŝas, iliaj vilaĝaj ĉefoj estas karceritaj; ofte la virinoj kaj infanoj estas fitraktataj antaŭ iliaj okuloj por venki ilian reziston. Pasiva rezisto de tribo aŭ familio sekvigas kolektivan punon; detruo al iliaj vilaĝoj el pajlo-argilo, kaj senindulgaj homĉasoj en la arbaroj, kie la loĝantoj serĉas rifuĝon.

Kiaspecan vivon havas la nigraj laboristoj, oni juĝu per raporto de Albert Londres (1) pri konstruo de fervojo, kiu iros de Ĉad al la marbordo de Ekvatora Afriko. El la 30,000 kontraktlaboruloj en 1928, nur 7000 vivis jaron poste. El la 27,000 pelitaj en laboron en 1929, 18,000 mortis en naŭ monatoj. Krom tripanosomozo (dormiĝmalsano), ankaŭ nostalgio (hejmveo) mortigas dekmilojn da nigruloj...

Laboro? Tio ne estas laboro, sed bestaĉigo! Ĉio en Afriko estas farata per la vipo. Laŭnaske liberaj homoj bate pelataj al taskoj, kiujn devus fari maŝinoj aŭ elefantoj. Se ili ribelas kontraŭ la malhomeca traktado kaj volas reveni al sia paca kampula

vivo, bajonetoj ordonas ilin resti je la tasko.

Dum kelke da tagoj mi observis arbar-laboron. Tie 8,000 negroj. Simila al milita tempo, taga mortlisto. Lundo: 10 mortigitaj. Mardo: 9. Merkredo: 15. ktp. La vunditoj ne menciigis. Tute indiferente. Morgaŭ nova bando alvenos, ĉar dek vilaĝojn oni atakis homrabe kaj akiris la junulojn. Tiuj anstataŭos la perditajn hombrutojn.

Kvardek nigruloj nefirme tenis starlokon super giganta arbtrunko, kiun ili devos levi ĝis sur platĉaron sur la reloj de ĝangala fervojo. Ankoraŭ 100 negroj -- rezervo -- rigardis. Krakis la vipoj de la Eŭropaj sklavpelistoj. "Levu!" La 40 negroj tiregis je la trunko, la muskoloj ŝvelis, la okuloj elstariĝis, "Levu, levu!" Vipoj ŝiris nudan karnon, sango flue striis la krurojn. La trunko ne moviĝis. "Levu! Ankoraŭ dek homoj! Faru spacon por dek! Rapide!" La vipoj zumis denove. Unu negro, falinte, ricevis tian batadon, ke li ne povis restariĝi. Gardisto saltis sur lian vizagon kaj premis la pezan kalkanumon en lian buŝon. Tiu ne el-lasis eĉ soneton. La aliaj rigardis, mute, stulte; tima ŝvito kuris sur iliaj korpomembroj. La kvar gardistoj histeriigis, kuris laŭ la linio, viptranĉante, piedbatante, terurante. Fine la trunko ekmoviĝis. Sed la brako de negro estis pretenita sub ĝi. La homo blekis, ne pro doloro sed pro tio kio venos, laŭ certa scio. Du gardistoj saltis sur lin, piedfrapante lian ventron, bruston, vizagon, ĝis li ĝeme dronis en senkonscion.

Deviga laboro, la tielnomita kontrakt-sistemo, estas unu el la plej kruelaj institucioj de nia tempo. Tiuj negroj, tre for de siaj naskteroj, laboradas sub puna leĝo -- t.e., se ili rompas la kontraktojn ili povas ricevi malliberigon. Se ili penas forkuri, kaj vane, ili suferas superlative kruelan korpopunon.

La mondo ricevis vomemigan ŝokon, eksciante pri la terura fiuzo al la indiĝenoj de Belga Kongo. Sed ĝia indigno baldaŭ foriĝis. Hodiaŭ terorado al la indiĝenoj estas fakta jam de Sud-Afriko ĝis la Sudano, kaj de Rio del Oro ĝis Etiopio. En Eŭropo kaj en Usono publika opinio, Kristanaj tradicioj kaj demokrata libereco, kune kun laboristaj organizoj, forte protestas kontraŭ la kruelo de tiuj ekspluatantaj la nigrulojn, sed en Faŝistaj landoj tiu brido tute mankas; tial la indiĝenoj en iliaj kolonioj estas liverataj, simila al kruda varo, en la manojn de la ekspluat-kompanioj. La kroniko de Itala agado en Libjo estas eble la plej korsira en la historio de Afrika koloniado.

Trad. F.R.BANHAM.

(1) Albert Londres, "Schwarz und Weiss: Die Wahrheit über Afrika" (Berlin-Vieno 1929); vidu ankaŭ Andre Gide, "Le Voyage au Congo" kaj "Le Retour" (Parizo 1927). Tradukitaj titoloj: Nigra kaj Blanka: la Vero pri Afriko. Vojaĝo al Kongo. La Reveno.

PROVERBOJ.

En 1905 Mark Zamenhof, patro de Lazaro, komencis eldoni Frazelogiĝon-Proverbaron kun ĉ. 3000 rusaj proverboj kun kunrespondaj proverboj el la pola, franca, germanaj lingvoj. Li skribis: Oni devas rigardi proverbojn kiel la plej certan rimedon por akiri la nuancojn de la lingvo ... ili estas por la lingvo kiel la salo por la manĝo. La verko ne estis tute kompletigita, sed D-ro Zamenhof eldonigis en 1910 Esperantan tradukon de 2000 sub titolo "Proverbaro Esperanta" (Vidu British Esperantist Aprilo 1934). Butler tie asertas ke, malgraŭ tio ke kelkaj proverboj postulas iom da konsidero por ilin kompreni, tio ne estas plendinda. Li neniam konis klasanon, kiu ne povis kompreni ekzemple "Proksima kubuto, sed ne por la buŝo". Tamen, ĉu ne konsilinde, ne trofacile, senpripense, uzadi tian esprimmanieron? Ni ne rajtas supozi ke ĉiu homo sur la tero senbare ensorbas la signifojn kaj sencojn de "Queen Anne's dead", "She has broken her elbow at the Church door", "not fit to hold a candle to him."

Fine ni iom konsideru rimarkojn de Kabe (D-ro K.Bein) jam tiam ne plu E-isto. En 1931 intervjuis lin Jean Forge (Literatura Mondo Julio-Aŭg, 1931) kaj en 1937 T.Morariu (Heroldo de E. Julio 1937). Al la unua li asertis: "Por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn al si malparencajn. Kial ekzemple ni havis inter la slavoj tiom da bonaj stilistoj? Ĉar ili sciis minimume du lingvojn ..." Al la dua: "En mia tempo la plej bonaj literaturistoj estis la polaj esperantistoj; slavoj estas devigataj lerni plurajn lingvojn." Oni devas scii plurajn lingvojn por skribi internacie."

Mi mencias lian sintenon, ĉar, kiel li, iuj povus rebati min, dirante ke nur homo funde sciante kelkajn lingvojn povus fulmorapide decidi pri ĝusta aŭ neĝusta uzo de tiu aŭ tiu ĉi proverbo, diraĵo, aludaĵo por internacia publiko. Ne, mi ne konsentas kun Kabe. Lingvosciado ne estas la decida faktoro en la afero verkadi internaciale. Baghy, homo de unu lingvo, hungara, pruvatestas tion. Miloj da homoj vaste verkas propralingve, ne uzante alian ol sengustan sed korektan lingvaĵon, tute ne salitan per proverboj k.s. Se ili sciis ok lingvojn seke-gramatike, ili ne konus aŭ scipovus ties popoldiraĵojn aŭ spiriton. Gravus nur tio, ke verkanto streĉe kaj eterne atentis pri la neceso eviti nacilingvajn apartaĵojn. Tia homo, tentate pikantigi sian parolon aŭ skribon per proverba aludo, cedos nur kiam li havos certon ke ĝi vaste kompreniĝas prouze en lingvoj krom la lia. Tiun certigon li povas ricevi, serĉante en koncernaj libroj.

Pacienca kaj persista ekzercado en la propra lingvo, kristala pensado en ĝi, logika vortelekto kaj -aranĝo, pliakrigado de la sento percepti subtilajn signifnuancojn, fleksebla esprimo de tiuj nuancoj, kultivado de ŝatkapablo, kiu kvazaŭ instinkte evitigas al li ĉian nebulaĵon, kune kun studama komparado de la sintaksoj de Esperanto kaj la angla, jen kio pli valoras ol simpla amasigado de "lernitaj" lingvoj.

----- F.R.BANHAM.

(La jena rakonteto unue aperigis en INTER NI. Du-tri legantoj de INTER NI petis vidi ĝin en LA RONDO.)

### SEN KAJ TRO.

En Anglujo dum la granda milito multaj kaj strangaj estis niaj travivaĵoj. Mi tiam loĝis en mia propra domo kaj jen travivaĵo pri karbo.

La manko de nutraĵo estis grava, sed egala grava, eĉ eble pli grava, estis la manko de karbo. Same kiel nutraĵo, oni havigis la karbon per porciaj biletoj, kaj ĝi estis havigebla aŭ kiel gaso aŭ kiel karbo. Sed tiel grava estis la nacia manko de karbo, ke la privata civitano, kia mi mem, ofte ne povis havigi eĉ la justan porcion, speciale pro la fikomercistoj kiuj, inter si, favoris unu la alian. Ekzemple, la buĉisto dirus al la spicisto, "Donu al mi plu da sukero, kaj mi donos al vi plu da viando preter niaj justaj porcioj," kaj simile parolis la spicisto al la karbovendisto, k.t.p. Tiel ne trovis sufiĉa liveraĵo por la nekomercistoj.

Okazis ke la vintro de 1917 estis terure malvarmega. La pend-glacioj "ornamis" la defluilojn ĉe ĉiu tegmento, kaj ofte fariĝis longe multajn futojn pro la krevado de la akvotuboj, kaj ni ja preskaŭ frostiĝis en niaj malvarmegaj domoj, sen eĉ ero da karbo.

Sed kiam alvenis la somero, kaj kiam oni ne bezonis ĝin, tiam facile estis ĝin havigi. Sekve, mi diris al mia servistino:-

"Lizio! Nun havigu al ni la porcion da karbo kion ni rajtas por la pasinta vintro, por kiu ni ankoraŭ havas la biletojn neuzitajn, kaj pro la eteco de nia karbokelo, ni metu ĝin en la tegmentetaĝon. Se ni faras tion nun, ni ankoraŭ havos malplenan kelon por nia porcio de la venonta vintro."

Bonsance, Lizio estis perfekta servistino, ĉiam konsentanta al ĉio ajn kion mi diras -- vere, laŭ ŝia opinio, mi ĉiam rajtas kaj estas la perfekta mastrino. Do, ŝi volonte konsentis, kaj kiam la tri tunoj da karbo estis liveritaj, kaj ĵetitaj en la karbokelon, ni komencis porti ĝin tra la domo, kaj supren per la ŝtuparo ĝis la unua etaĝo kaj la banĉambro, kie movebla ŝtupetaro, tra truo en la plafono kondukis al la tegmentetaĝo. Kaj ĉiutage, ni levis kelke da plensiteloj, kun ŝi staranta ĉe la piedo de la ŝtupetaro, kaj mi, en la tegmentetaĝo, klinanta malsupren tra la truo kun kapo renversita por levpreni de ŝi, la sitelojn kiujn ŝi suprenŝovis al mi.

Sed kia terure nigra laboro!

Ĉiutage, mi alivestis min por la aĉa afero. Ĉiutage, miaj okuloj, nazo, buŝo, la sulketoj en mia vizaĝo, miaj oreloj, kaj kompreneble miaj brakoj -- efektive, tute ĉie ajn, mi nigriĝis, kaj aspektis vere kiel nigrulino. Same mia kompatinda servistino.

Sed malgraŭ niaj pulmoj plenigitaj de karbopulvo, niaj nigraj vizaĝoj, niaj doloremaj dorsoj, niaj rigidaj muskoloj, ni persistis ĝis ni finfine povis grande admiri tri tunojn da bela karbo, tre bonorde metitaj per niaj severaj penadoj, sur la planko de la teg-

mentetago.

Sed imagu al vi niajn sentojn kiam, post nelonge, la registaro anoncis la Armisticon, kaj kun tio, la fino de la milito, do, kompreneble, fino de porciaj biletoj, fino de karbomanko.

Nun, pro tio, devis ni malsupren porti ĉiun eron de niaj nigraj diamantoj, ne malpli malfacila kaj nigra tasko ol la supren-levigo. Por nenio estis nia severa kaj aĉa laboro!

----- L.E.BAILEY.

EMBARASE, ĈU NE ?

Antaŭ kelke da tempo mi veturigis per aŭtomobilo la gepatrojn al la enterigiro de parenco.

Reveninte, ĉe la angulo de stratoj King William kaj Currie, mi haltis por permesi transiri la veturilaron kaj la stratirulojn. Dum la haltado mi rimarkis, ke la preterpasantoj kaj pasaĝeroj en la tramoj rigardegas al mi kaj multaj el ili ridetas. Tiam, antaŭ ol mi povis informi min pri la kaŭzo, nekonata junulo proksimiĝis al mi kaj levante la ĉapelon, ridete diris, "Pardonu, fraŭlino, sed ĉu vi havas grandan kaserolon sur la supro de la aŭtomobilo!"

vi havis

----- R.G.TELFER.

LA PATRO de M<sup>me</sup> CHIANG.

Antaŭ kelka tempo en la lasta jarcento malriĉa kaj senamika ĉina knabo en unu el la marhavenaj urboj de Ĉinujo enŝteliĝis surŝipe en Usonan brigon kaj trovis por si kaŝlokon. Post ol la ŝipo forveliris li elŝteladis el sia kaŝejo kaj disputis kun la ratoj pri la peco da manĝaĵo kiu estis antaŭe forlasita. En unu nokto, tamen, ŝipano kaptis lin kaj trenis lin antaŭ la kapitano.

En tiuj tagoj estis risko ke li estus ĵetita elŝipen. Sed la kapitano estis kristana homo; li savis lian vivon, kaj dum la resto de la marvojaĝo donis al li tian laboron, kiam li povis fari. At-inginta ĉe Baltimore, la kapitano transdonis lin al sia pastro, kiu siavice enlokigis lin en neriĉan sed bonan Kristanan hejmon kiun li konis. En lernejo la knabo montris neordinaran inteligenton, kaj poste, helpata, li povis ricevi kolegian edukadon. Li revenis al Ĉinujo por helpi al sia popolo. Li edziĝis, kaj lia edzino iĝis kiel li mem, Kristano. Ili havis tri filinojn, el kiuj unu iĝis la edzino de D-ro Sun Yat-sen, kreinto de la Ĉina Respubliko, alia la edzino de Chiang Kai-Shek, nun Prezidanto de Ĉinujo, kaj la tria la edzino de la Financa-estro.

----- L.E.BAILEY. (trad.)

Li: Kiam mi edziĝis, vi promesis min obei!"

Ŝi: Sed mi ne volis komenci kverelon en la ĉesto de la pastro.

----- OWEN DAVIES. (trad.)

LETEROJ al la REDAKTORO.

POR LITERATURO. Responde al Montetulo, mi skribas kiel lernanto kiu opinias, ke kvankam LA RONDO estas tre feliĉa havi inter siaj skribantoj tiujn kiuj povas originale verki, eĉ du poetojn, Joediko kaj Phyllis Byatt, ĝi estas egale feliĉa havi tradukistojn el la plej alta grado kies laboro helpas la studenton kaj samtempe kontentigas la spertulon.

Tradukaĵoj kaj originalaj verkaĵoj estas malsimilaj artoj kun malsimilaj indoj. La lerta tradukisto prizorgas esti fidela kaj inda montranto de la lingvo; en sia temo koncentriĝas ĉefe la verkisto, do, por la studanto de la lingvo, tradukaĵo emas esti la pli utila. En LA RONDO ankaŭ, mi rimarkis, ke la tradukisto kutime nomas la fonton de sia tradukaĵo, per kio la fervora studanto ofte eblas havigi al si la anglan per kompar-celo, utilaĵo kiu kompreneble estas nebla ĉe originala verkaĵo. Plue, tradukisto povas intence elekti temon kies koncernaj frazoj aŭ vortoj tre verŝajne neniam estos prezentataj de verkisto.

Mi opinias, ke en tiuj ĉi tempoj la literatura flanko de LA RONDO estas de la unua graveco, preter gramatiko aŭ io alia. Dum mankas al ni fremdaj gazetoj, leteroj kaj novaj libroj, ĝi daŭrigas vivan senton pri la flueco de la lingvo, por kio, sen monat-monate la literatura flanko de LA RONDO, almenaŭ mi mem jam estus iĝinta indifera.

DANKEMULO. "Montetulo" (RONDO 20) plendas iome ke la artikoloj tro emfazas la literaturan flankon: mi ne same opinias kun li. Lia sugesto ke RONDO pliofte enhavu artikolojn pri alilandaj aferoj k.t.p. estas bona. Tamen, mi opinias ke la historioj kiuj jam aperis tempon post tempo en la gazeto estas tre legindaj, kaj, por mi mem, mi esprimu ĝuon ke oni povas havi materialon por legi krom raportoj pri kunvenoj, klubagadoj kaj similaj el aliaj landoj. Eble aliaj el viaj legantoj havos aliajn preferojn, se jes, ne gravas. Mi volas gratuli kaj danki tiujn kiuj tiel fide sendas al ni nian ŝatatan gazeton.

JOEDIKO.

En LA RONDO de l' pasinta mi jam estas priskribinta la Graciojn, (kies brila portretaro en la Aprila.) Jen la trio pritraktita -- Melpomena (ridigita de la seriozo sia), Greta Tutsen-Garba (ia tipo iom tragedia), Bo George Brumel (dando adorata tra la lando).

Do, post tiu Graci-fasko restas al mi nur la tasko rimi pri la Olimp-Reĝo en la ĉefredakta seĝo.

Kia ja unika speco de l' plej glora majesteco! Jen kranio fulm-ĉizita! Jen staturro rok-granita! Kia agla okul-globo! Li, en la purpura ... ROBO! En la mano, kvazaŭ glavo, plumo el plumar' de pavo, akriĝita ĉe la pinto,

senkompata kiel flinto;  
 ĉar, se li fuŝaĵon trovas,  
 ĉin indulgi li ne povus:  
 Trastrekado! Kondamngesto!  
 Paperkorben al la pesto!

Robo "Ban 'em" Jupitero,  
 vivu li tra longa ero  
 por la Verdaĵ bono, vero!

-----

ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATO. Per ĉi tio mi deklaras la jenajn personojn esti la laŭ-  
 ŝtatutaj Komitatanoj A por reprezenti la Aliĝintajn Grupojn :-  
Westralian Esp. Society -- F-inoj K.Dalton, A.L.Bailey; Brisbane  
Esp. Society -- S-ro Clement Kidd; Sydney Esp Society -- S-ro P.  
 Schöwin: Melbourne Esp. Club -- F-ino E.Godfrey; Tasmanian Esp.  
Assn -- S-ino A.Douglas and Kapitano Couche.  
 12/5/42. ALLAN TURNER, Prezidanto.

ESPERANTO kaj MILITISTOJ. Rilate al la Propono en la letero de  
 Leŭtenanto Stephens, kiun ni publikigia sur paĝo 113 (Majo), via  
 Asocio estas iom malhelpita pri novaj eldonaĵoj pro la Registraraj  
 reguloj pri papero. Tamen ni kredas, ke oni povas fari bonan pro-  
 pagandon inter soldatoj alimetode. Tiucele, la Asocio skribis al  
 la armea gazeto "Salt" frue en la jaro. Ties redaktoro ricevis  
 nian leteron kun intereso kaj ankoraŭ havas antaŭ si niajn ideojn.  
 Pli faciligus la aferon se ankaŭ legantoj, kiuj servas en la armeo,  
 skribus al li sugestante, ke "Salt" aperigu artikolojn sub la tito-  
 lo "Easy Conversation in Esperanto." Tial se vi estas soldato tuj  
 skribu al "Salt", Army H.Q., Victoria Barracks, Melbourne, Vic.  
 Plaĉus al la Sekretario ricevi de membroj proponojn kaj ideojn pri  
 la propaĝando inter militistoj.

VARBOPETO. En Julio 1941 la Asocio decidis varbi sufiĉe da Individ-  
 iduaj Membroj, por ke ĝi rajtu aliĝi al I.E.L., kiel Landa Asocio.  
 Tiam ĝi celis jam atingi 100 membrojn ĝis Junio 1942. La tempo  
 preskaŭ forpasis kaj ankoraŭ mankas 16 anoj por trafi la celon.  
 Tial ni nun faras fortan peton al ĉiu abonanto-nemembro, ke tiu  
 senprokraste aniĝu. Inter niaj legantoj estas proksimume 40 sam-  
 ideanoj, kiuj ne membriĝis. Ni estas dankemaj al tiuj personoj pro  
 ilia subteno al nia organo, sed estus eĉ pli feliĉaj se ili povus  
 tuj fariĝi membro-abonantoj. La kosto estus malgranda -- po pliaj  
 18 pencoj ĉiujare. Abonanto povas doni la maksimuman helpon al la  
 movado, aniĝante. D-ro F.J.Williams, en lastatempa letero sumigis  
 la aferon jene :- "Estas eĉ pli grave nun, ke ni en Aŭst. faru nian  
 movadon, kiel eble plej forta."

Laŭ-ŝtata analizo de la membraro malkaŝas, ke estas 20 Individ-  
 uaj membroj en Kvinlando, 18 en Nova Sudkimrujo, 17 en Viktorio,  
 11 en Okcidenta Aŭst., 11 en Tasmanio, kaj 7 en Suda Aŭst -- entute  
 84. Ni estas certaj, ke la cifero por Tas., Vik., kaj Okc. Aŭst.  
 estas pligrandigebla, kaj esperas ke ĉiu samideano vidos membriĝon

dum Junio kiel devon. Ne prokrastu, agu nun.

KVITANCOJ ĜIS 20/5/42. Bonvole pagis la kotizon de membro-abonanto F-inoj W. Addis, F. Johns, A.L. Bailey, F.H. Kemp, S-ro C. Schmidt.

KOTIZOJ kaj ABONOJ. Membro-abonanto 5/- . LA RONDO al nemembroj 3/6 (Afrankita) - 3/- (liverata). Abonantoj povas tuj aniĝi, pagante la diferencon inter la kotizo de Membro-abonanto kaj la Abonprezo. Ĉiam atentigu la adrsiton pri via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtmonbileto NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

G.H. HILLERMAN, (Sekretario)  
P.O. Box 75, DEVONPORT, Tas.

EL "ESPERANTO INTERNACIA" (Jan-Feb): Interesa noto pri E-a agado en Aŭstralio, en kiu menciigas LA RONDO kaj la organiza laborado de la A.E.A.

La B.B.C. (nacia radio-organizo), ĝis nun indiferenta pri nia lingvo, je la 15a de Decembro signis la nasktagon de la Majstro por la unua fojo, dissendante mallongan sed trafan resumon de lia vivo kaj la progreso de E-o, kun aludo al la granda nombro da Esp-istoj en Britujo kaj ilia kredo ke la lingvo multe helpos en tutmonda rekonstruo kaj interkompreno.

De la Delegito en Fayum (Egiptujo) venis kuraĝiga informo pri movado en Egiptujo. En Aleksandrio S-ro Bell gvidas kursojn kaj fondis Societon 60-membran. Foto de sam-oj el 12 nacioj. Oni instruas E-on en unu el la lernejoj de la British Institute en Aleksandrio. Viglas verduloj en Fayum, Cairo, kaj aliaj urboj.

-----  
S-ro RAWSON, Wayfarers' Bookshop, Exhibition Str., Melb., havas stoke la lernolibron de Robbie kaj Step by Step (Butler).  
-----

### KLUBRAPORTOJ.

TASMANIA ESPERANTO-ASOCIO. La 2 Majo ĉe foiro, kiun okazigis la Instituto por Blind- kaj Surdmutuloj, la T.E.A. starigis budon en kiu estis montritaj Esp-aĵoj -- gazetoj, broŝuroj, lernolibroj, poŝtkartoj, bildoj, Esp-aj libroj en Brajlo k.sim.

Kelkaj fervoraj sam-oj ĉeestis la budon por respondi al demandoj kaj disdoni informon kaj propagandilojn pri Esp-o.

Ni ja ne vane laboris se ni povis per tio semi la ĝermon de nia sankta afero eĉ en unu cerbon aŭ koron.

G.CHATTERTON (Hon.sek.T.E.A.)

MELBOURNE ESPERANTO CLUB:- Malgraŭ multaj malfacilaĵoj, la nombro da vizitantoj al M.E.C. estas kontentiga. Kelkaj novlernantoj aliĝis. Skota sam-o, S-ro H. Clarke, menciis pri vizito al la Esp-a



Klubo en Nov-Jorko. Esp-o floras en tiu urbo. Ano de la klubo ricevis leteron de D-ro A.H.Beck. iama internigito, kiu jam revenis al sia hejmo en Anglujo.

La Rendevuo:- Ĉeestis dek kvar sam-oj. La Prez-o bonvenigis S-ron H.Clarke el Edinburgh, kies ŝipo restis kelke da tagoj ĉe Melburno. Gesam-oj E.Fearne, K.Linton kaj A.C.Hintze legis siajn konkurs-pecojn. Ges-roj Hanks faris demonstracion pri Unua Helpe (provizora kuraco al vundito antaŭ alveno de profesiulo). S-ino Hanks montris kiel oni povas apliki triangulan Bandaĝon diversmaniere, laŭ ĝia faldigo. Ŝi ankaŭ montris kiel nefaldita triangula bandaĝo estas uzebla skarpe por subteni brakon (kiel granda brak-skarpo), aŭ por bandiĝi la korpon, bruston, ŝultron k.s. La faldita bandaĝo estas uzata por firmteni splintojn, por subteni brakon (malgranda brakskarpo), por fiksi pansaĵon en la ĝusta loko, aŭ por bandiĝi kolon, okulon, tempion aŭ oreilon. S-ino Hanks estis la pacienca paciento. Poste ĉe vespera manĝeto S-ro Clarke diris, ke nur en Aŭstralio li povis havigi al si vortaron; neniu estis aĉetabla en Skotlando kaj Nov-Jorko. (A.C.HINTZE)

Glore kantas najtingalo  
en la nest' de mia kor',  
kie floras la printempo,  
kie regas la amor':  
tuta mi pro vivodolĉo  
tremas; palac', la kaban'..  
mano cia tiel fide  
negas en ĉi brula man'!

JOE

IUJ ASERTAS, ke, kvankam per Esperanto oni eble kapablas korespondi, tamen buŝa interkompreniĝo ne povas esti kontentiga, ĉar la diversnacioj tro malsame prononcus ĝin. Al tiaj kontraŭparolantoj ni rekomendas viziton al universala Esperanto-kongreso, kie anoj de 30-40 nacioj senmanke interkompreniĝas per la internacia lingvo. La diferenco inter la prononcado de Esp-o ĉe la diversnacioj estas

tiel malgranda, ke ĝi neniel malhelpas la interkompreniĝon. Tiu diferenco estas, ekzemple, ĉe svedo kaj italo, aŭ ĉe polo kaj japano, malpli granda ol la diferenco inter, ekzemple, la prononcado de la altgermana lingvo ĉe vilaĝanoj el rejnlanda Eifel-montaro kaj la bavara distrikto Oberbayern.

En la iama presejo de "Heroldo", en Kolonjo, kelkfoje la germana ĉefredaktoro, rejnlandano, ne povante kompreni iujn altgermanlingvaj rimarkojn de la sama germana presejestro, bavaro, petis lin ripeti la diritaĵon en Esp-o, kaj tiam tre klare komprenis.

-----"Heroldo de Esperanto"10-4-38.

### PRI "ADMIRIX".

En "Universala Vortaro" ni trovas A.to admire; F.admirer; G. bewundern. Kabe, kiu verkis sian vortaron sur la bazo de "Petit Larousse", difinas "admiri" per "rigardi kun miro kunigita kun ap-

robo, estimo, alta ŝato", sed Millidge difinas simple per "to admire"; Plena Vortaro de S.A.T. donas: "esti ravata per ia beleco aŭ supereco".

La vorto devenas el Latina "ad mirari" (almiri, miri pri). Zamenhof, tradukante Gen. 24/21 kaj Georgo Dandin 34, 22/23, uzis la radikon pure laŭ ĝia klasika origino. Jen la citaĵoj:

"Kaj la viro admiris ŝin silente, por konvinkiĝi, ĉu la Eternulo prosperigis lian vojon aŭ ne."

"And the man wondering at her held his peace...."

"And the man looked steadfastly on her: holding.... (Revizita Biblio de 1882)

"Mi admiras mian malfeliĉon."

"J'admire mon malheur."

I am amazed at my misfortune.

Malsame ol la Franca kaj Germana lingvoj, kiuj havas ambaŭ signifojn eĉ hodiaŭ, la moderna Angla lingvo limigas "to admire" al sencnuancoj: altŝati, amrespekti, rigardi kun plaĉo, ravo, altedifa sento, aprobego, imitdeziro (eĉ se kun iometo aŭ neniom da espero pri atingo). Ĝia uzo en la simpla senco "to wonder (marvel) at" sonus nepre arĥaika, simile kiel sonas la konsilo de Emerson al junaj viroj, ke ili "insist" (stand in on: L. insistare) "upon themselves."

Studinda en tiu rilato estas ankaŭ "tiran'". Ĉe la Grekoj, kiuj kiel unuaj ekuzis la vorton, esti tirano ne signifas esence esti malbona reganto, kiu fiuzas sian povon. La nomo estis de ili donata al homoj, kiuj akiris regpovon pere de rompo de la leĝoj kaj rajtoj de la ŝtato. Tia homo, negrave kiom la paso de l'tempo evidentigis lin modera, malkruela aŭ bonfara, ankoraŭ kaj ĉiam estas tirano. La milda kaj sindona Pisistratus, malgraŭ sia bona karaktero, tamen estis por la Grekoj tirano, uzurpinto.

----- F.R.B.

### VENDO de BIBLIOTEKO.

Post malmulto da tagoj tiu biblioteko ne plu ekzistos. Tiuj libroj forpasos de la ĉambreto en kiu ili estis gardataj per tiel ama zorgo, kaj disen iros en milon da fremdaj manoj. Ili pliriĉigos aliajn bibliotekojn, kiuj siatempe diserigis. Trista sorto de aferoj homaj! Miaj libroj karegaj! Tago venos en kiu vi trovos vin dissternitaj sur vendotablo, de kiu aliaj homoj vin aĉetos kaj posedos, posedantoj eble pli indaj ol via unua mastro! Tamen, tiuj libroj estas por mi karaj! Mi elektis ilin, unu post alia, kolektis ilin per la ŝvito de mia vizaĝo, kaj mi tiele amas ilin! Ŝajnas al mi, ke per tiu tre longa kaj tre dolĉa komercado ili jam fariĝis por mi parto de l'animo. Sed kion fari? Nenio estas senŝanĝa en ĉi tiu mondo, kaj ni estas kulpaj se ni ne lernis ĝuste el niaj libroj mem: meti supren de ĉiuj bonaĵoj kiuj pasos kaj kiujn

forportos la tempo, tiun bonaĵon kiu neniam pasos for -- la senmort-  
an belecon, la eternan fonton de ĉia scienco kaj de ĉia saĝo. (1)

Trad. el S. de Sacy ("Variétés Littéraires")

- (1) Komparu liniojn de Keats: Beauty is Truth, Truth Beauty;  
that is all ye know On earth, and all ye need to know.  
(Belo estas Vero; jen la sum' de via scio  
Sur ĉi tiu tero; ne necesas pli ol tio. F.R.BANHAM.

-----

REDAKTORA BABILADO.

Mi ĵus revenis denove en la mondon de svarmantaj homformikoj,  
-papilioj, -vermoj kaj aliaj specoj, post du semajnoj en montetara  
regiono, kie uloj faritaj laŭ la bildo de Dio ne tre ofte vidiĝas  
-- terpomejo, kie la societo konsistas plejparte el grakantaj kor-  
voj kaj flosantaj nebuloj. Promenante sola laŭ la dolĉe murmurant-  
aj valoj de la ĉirkaŭo, mi pripensis la liniojn de poeto Cowper:-

Ho, se mi loĝus en senhomejo vasta,  
En senfinejo ombra, densarbara --  
Ke famoj pri kruelo, hipokrito,  
Militoj malsukcesaj, aŭ prosperaj,  
Neniam plu min trafu.

Nia eldona afero ankoraŭ kontentige iras sian vojon, malgraŭ  
ke multaj el niaj interesatoj kaj laborantoj forte sentas la premon  
de la kriza tempo tra kiu ni nun baraktas. Ankaŭ ĉe la Traduka  
Rondo montriĝas la postuladoj de devoj naciservaj, kiuj rabas de la  
membroj horojn en kiuj alicirkonstance ili sidus laborante en la  
spirita kunuleco de majstroj de la bela frazo, la delikate vestita  
penso. Ni tiuj provizore ne povantaj uzi la plumon eĉ je kelke da  
linioj, ni varme konsilus, ke ili tamen zorge legu kaj konservu la  
foliojn, farante per ruĝa krajono strekojn ĉe lokoj en kiuj staras  
frazturniĝoj por ili trafaj, utilaj. Povas esti, ke en postaj  
paciaj jaroj, tiuj folioj denove ricevos aman studadon kaj ludos  
sian rolon kiel fonton de helpa komparado kun propre faritaj tra-  
dukaĵoj.

Ne pensu, ke la "ŝerco" sur p.114 (Maja) aperis kun nia sen-  
komenta aprobo. Pro spacmanko ne povis aperi niaj iom akratonaj  
rimarkoj pri la afero. Varianto troviĝas en "La Suda Kruco" Junio  
1933, kun konforma kritiko. La mokaĵo estas preskaŭ samaĝa kiel  
Esperanto mem. "The Mail" (Adelaide) tre povas esti la dekmila  
gazeto el tiuj, kiuj siatempe trovis la "ŝercon" ridinda kaj aper-  
igis ĝin. "The Mail" kaj aliaj, kiuj eĉ hodiaŭ regalias siajn leg-  
antojn per tia kadavrosimila "bonhumoro", havas senton pri la rid-  
tikliĝemo multe pli subtilan ol estas ilia sento pri la valoro de  
efektivaj novaĵoj, ĉar neniam aperas sur iliaj paĝoj veraj raport-

oj pri Esperanto kaj progreso.

La Adresaro supozeble nun kuŝas ĉe la manoj de ĉiu interesato. Ĝi estas tre utila kaj bone farita verkaĵo, kaj meritas vastan uzadon.

F.R.B.

### KASO de LA RONDO.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s	d	<u>ELSPEZOJ</u>	s	d
Konta transpreno.....	8	14	1	poŝtmarkoj.....	7	--
S-ro I. Slavoff.....		8	6	inko.....	11	--
F-inoj Bostock, Rosengrave 3/6		7	0	papero.....	12	--
S-ino A.C. Hintze.....		3	6	bindpingloj.....	1	6
S-roj N. Grant, C. Thompson				ŝablonaĵoj.....	11	4
P. Hudson, Ballard, McKenzie				luo.....	5	0
R.G. Lees, C. Schmidt, F. Halls				okazaj elspezoj....	14	6
Banham, A. Boyle, 3/6.....	1	15	--		£3	2-4
S-ro Eljot (P.M.).....		1	--	En la Kaso	£9	7-6
S-ro G. Chatterton.....		5	--			
F-ino L. Kay.....		1	9			<u>£12-9-10</u>
F-ino Williams.....		1	9	W. ADDIS,		
S-ino Motteram.....		3	--	25 Greville Ave.,		
S-ro Hanks.....		3	--	Flinders Park,		
S-ino P. Hanks.....		3	--	Adelaide,		
vendoj.....		3	3	S.AUS.		
		<u>£12-9-10</u>				

### ALUDOJ.

Verko kia "Dictionary of Phrase & Fable" (Brewer) ĵetas lumon sur la obskurajn fontojn de centoj da popolaj diroj, unu kategorio de aludaĵoj. Petu al amiko, kial oni uzas nepre tiujn substantivojn en la frazoj: Plain as a pikestaff, dead as a door nail, not worth the candle, he retired to his ivory tower, kaj dubu pri lia povo kontentigi al vi. Ĉu ni rajtas transpreni tiujn formojn rekte en E-on, kiel faris ekzemple Bean en "La Naiveco de Pastro Brown" p. 152, "...videbla kiel lancostango? Aŭ Martyn Westcott en traduko de "Christmas Carol":...senviva kiel porda najlo, kie li cetere metas piednoton, "angla proverbo"? La frazon "Le jeu n'en vaut pas la chandelle" donis al ni Montaigne; Sainte-Beuve la lastan. La eŭropaj lingvoj estas tre riĉaj je tiuj popoldiroj kaj aludaĵoj. Ili trasaturas la hispanan majstraĵon Don Quijote, frapa modelo en tiu rilato. Ĝuste tial, traduki ĝin fidele prezentas grandan taskon, ĉar necesas redoni, laŭ ekstrema eblo, la proverb-ojn, hejmaĵojn, erojn de kampula filozofio, per respondaj formoj

el la traduka lingvo. Sed ĉe puraj afersimilaĵoj, -komparaĵoj, kia "li riproĉatakis min kiel anaso sur (junian) insekton" (like a duck on a June bug": Gone with the Wind) oni ne tre riskas. La verkoj de Ŝalom-Alejhem, inter ili ĉe Doktoro kaj La Gimnazio svarmas je popol-hebreaĵoj, metaforoj, kaj similaj. En sia traduko de la dua, Zamenhof opiniis bona, enlasi ilin kiom li nur povis sen tro mal-faciligi la komprenon aŭ perdi la aromon de la originalo -- vere dratbalancira akto! "povas krevi la galo", "propeka afero", "tamburi per la lango."

La mitologio estas trezorujo de trafaj esprimoj, se saĝe elektitaj. Zamenhof parolis pri "sizifa, herostrata laborado". Sed uzante ilin kaj tujn el la Biblio ni devas ĉiam teni en penso la japanojn kaj aliajn, kiuj scias preskaŭ neniom pri nia religia kaj klasika historio. Ĉu azianoj facile komprenas aludojn al hidro, stalo de Aŭgiaso, kalifo-cikonio, kesto de Pandoro, kalkano de Aĥilo, sezamo, la honesta makleristo, tiri kaŝtanojn el fajro? Prof-o Collinson donis prelegon ĉe la Kolonja Kongreso 1933, presita en Lingva Kritiko Julio-Aŭg.1933, kaj J.Hartog verkis pri Bibliaj Esprimoj en E-o, same Dec.1933. Simile ni gardu ĉe la laborintoj de angla historio, el kiuj oni povas ĉerpi milojn da ilustraĵoj, incidentoj, kiujn, aŭ tujvide aŭ post serĉo, komprenus kaj ĝuus mezinstruitaj angloj, se tute ne orientanoj.

La amo al aluda lingvaĵo estas forta en iuj homoj. La verkoj de Heine, simile al tiuj de Jean Paul Richter, estas tiom plenaj je ili, ke postulus volumojn por prinoti ilin.

-----F.R.BANHAM.

Sir Henry Irving iafoje estis atestanto ĉe proceso pri strata rabo. La advokato de la ŝtelisto kriegis al la fame konata aktoro:

"Je kiu horo okazis tiu ŝtelo?"

"Mi -- mi pensas --" komenciis Sir Henry.

La advokato interrompis: "Kion vi pensas, tion ni ne deziras scii!"

"Ĉu vere vi ne deziras scii kion mi pensas?" milde demandis la aktoro.

"Tute ne!" akre respondis la advokato.


"Nu, do," Sir Henry diris, en tono konkluda, "saĝe, ke mi forlasu la atestejon. Mi ne povas paroli sen pensi -- mi ne estas advokato!".

-----

Clasificación ORGANO de la A.E.A.

Ref 27-7-42

La RONDA.



Jul 1942

Nº 22

Edonita de F.R. Banham  
2 Banchory St Essendon W5 Vic AUSTRALIA.

REDAKTORA BABILADO.

Sendube plaĉas al legantoj tio, ke la paĝojnde "RONDŬ" nur malofte vizitas la petola presdiablo, tiu monstreto, kiu en ĉia gazetfarejo petole dispafas cerbumigajn, eĉ embarasajn erarojn sur la foliojn. Nur tri-kvar iom konsternetis nin en Junia n-ro, kaj espereble la nuna trafos en viajn manojn senmakula kiel novnaskiteto. Nefacila poŝtkomunikado inter Melburno kaj Adelaide foje rezultigis aperon de paĝoj sen definitiva kontrolo; indulgu nin, legantoj. Pri plumeraroj, falspaŝis eĉ la klasikuloj.

La leteroj pri enhavo de "LA RONDO" min pensigas. Multaj homoj tiriĝis al E-o parte pro logo lingvistika, tial ni ne malkuraĝis de temp' al tempo aperigi notojn pri gramatiko ĝia. Al aliaj ni provas provizi tradukojn de verketoj ne-efemeraj, tradukoj en kiuj manifestiĝas iagrade la kapabloj de nia lingvo redoni la sentkaresajn bildojn, la lertajn priskribojn, kiujn en la originalon verŝis homoj streĉe esplorintaj la senlimajn esprimrimedojn de sia amata patralingvo. Por komencantoj ni saĝe donus pli da simplaj, fabelecaj, facile sorbeblaj skriboj; kaj por ĉiuj ni raportas novaĵojn pri kamaradoj en Aŭstralio kaj en aliaj landoj.

LA RONDO ne estas kara en senco mona. Kontraŭ nur 3 $\frac{1}{2}$  ŝ. vi jare ricevas ne maldikan volumon da distraĵoj. En tempo de ĉiam grandiganta kosto, bele estas iom pensi pri tiu plaĉa fakto. Krome ĝi monate aperas; duoblaj numeroj -- ne. La geadministrantoj amas la taskon, cetere estas homoj de unu loko, fiksadresaj, kaj en vivaranĝoj, kiuj permesas ilin doni moderan atenton al ĝiaj konstantaj postuloj. Tion ne povus fari homoj trotantaj de urb' al urbo, vendante, mendante; aŭ rondirantaj salonojn, trikante, trinkante. Tiom longe kiel cirkonstancoj tion permesos, LA RONDO regule regalos vin, sed pri difinita nombro da paĝoj, ni prefere silentu. Restu certaj, ke ni ne facile rezignos evidentigi al ĉiuj, ke Esperanto vivas, eĉ floras en Aŭstrialiaj koroj, spite la flamojn de milito.

-----

BRITŬJ KAJ ALILINGVANOJ.

Estas interesa kaj stranga karakterizaĵo de homoj Britsengaj, ke ili rigardas kiel denaskajn idiotojn tiujn ne scipovantajn la Anglan lingvon. En Italujo kaj Francujo mi renkontis Aŭstrialianojn, kiuj klarevidente opiniis, ke nur ia stulteco flanke de Italoj kaj Francoj malebligas, ke ĉi tiuj komprenu la Anglan. La Aŭstrialianoj denove kaj denove ripetis siajn dirojn, tordante la buŝon kvazaŭ por komprenigi al surduloj; poste laŭtigante la voĉon por peni enmarteli signifon en la cerbon de la aliaj per la simpla forto de la bruo. Foje ili aldonis al sia klopodo, uzante manojn kaj brovojn laŭ manieroj, kiujn ili supozis esti Latinidaj gestoj. Kiam iliaj aŭdantoj ankoraŭ mildmiene staris mistifikitaj, ili aŭ ridis post la mano aŭ koleretiĝis pri tiu "napkapeco" de neanglalingvanoj. Ili eĉ ne suspektetis, ke ĝuste en ili mem io mankas. Male, ili

la aliaj ne havas ilin, ĉar ili ne sentas la bezonon. Ili bezonas multkostajn aŭtomobilojn kaj vestaĵojn, la plej bonajn viandpartojn, luksajn radio-aparatojn kaj elektrajn malvarmigilojn. Por ili komforta vivo ne inkluzivas sufiĉe da spaco, por certigi privatecon, intelektan progreson aŭ estetikan kontentigon. Al ili ĝi signifas: materia komforto kaj la ebleco, aĉeti aron da multekostaj objektoj. Homo, kiu povas permesi al si aŭtomobilojn kaj peltajn surtutojn kaj diamant-ringojn, estas riĉulo; alie li estas malriĉa. Tiu logiko estas vere simpla kaj ne kongruas kun io ajn inter la du ekstremoj.

Estas antaŭvidebla fakto, ke la mizerstato de l'gentilhomo finiĝos per estingiĝo. Ĝentilhomo signifas tiun klason de bonedukitaj homoj, kies enspezoj -- kvankam malgrandaj -- harmonias kun vivmaniero, kiu al ili estas kaj socie kaj individue necesa. Tio signifas kutime: domo, kiu eble estas maleleganta sed kie troviĝas libroj, lumo, spaco kaj trankvilo, kie oni povas akcepti gastojn sen pompo; hejmo, kiu estas nek tiel malgranda nek tiel malĉarma, ke ĉiu familiano devas serĉi siajn plezurojn ekstere. Kaj per praktikado de ĉiutaga ekonomio ĝi signifas, havi ĉiam sufiĉe da mono por lernejoj kaj universitat-elspezoj kaj eble kelkfoje por vojaĝoj. Tia komforto estis ebla nur en mondo, kiu konsentis, ke tiaj aferoj ne estas lukso, sed neceso al vasta popolklaso.

Ŝajnas al mi, ke tiu stato pasis; abstraktaj havaĵoj ne plu gravas. Sed ĉu la meza klaso povas estingiĝi sen sekvoj? La ofte fanfaronaj biografioj de homoj, kiuj saltis el nekonateco al nacia famo, ne povas kaŝi gravan fakton: ke la granda plimulto de niaj plej taŭgaj kaj eminentaj ŝtatanoj naskiĝis en klaso, pri kiu ni ĵus parolis. Ili heredis certajn gustojn kaj idealojn, kiuj direktis iliajn limigitajn elspezojn. Sed ne estante malriĉaj, ili ne devis elspezi ĉion por la nura ekzistado. Ili intime konis ŝparemon kaj honestan laboregon; ili sciis vivi senlukse, sed ne sendece.

Ĉi tiuj hejmoj enhavas nur malmultajn infanojn. Oni asertas, ke nur tro egoistaj homoj propagandas naskiĝ-kontrolon; sed oni forgesas, ke Amerikanoj vivas por la idealo de romaneca edzeco; nur la bonstato de la kunulo ĉefas. Kelkaj virinoj ne timas malsanecon sekve de nasko por si mem, sed ili ne volas riski, ke la edzo malsukcesu sub la ŝarĝo de spirita aŭ financa trostreĉo. Iam la ĝentilhomoj sentis la devon, havi infanojn, ĉar laŭtradicie ili faris la plej bonajn ŝtatanojn; sed nun la klaso fariĝis vere malriĉa, kaj ĝi estas tro impresebla, tro konscienca, por nun esti multnaska; kaj sekve ĝi estingiĝos.

La malriĉiĝo de la mezklaso estas fakto; ĉar malriĉa oni estas, se oni ne povas permesi al si sian propran vivmanieron. Ni kapablas ankoraŭ havigi al ni la ekzistad-necesaĵojn, sed nur malmulte de la viv-agrablaĵoj. Mi ne imagas esti malriĉa, ĉar mi ne posedas aŭtomobilon; ĝi ne estas necesaĵo al mi. Sed Eŭropo estis necesaĵo dum longaj jaroj kaj al mia edzo kaj al mi mem. Ĝi estas nun ne-imagebla utopio, ĉar ni ne havas la necesan monon. Pli kaj pli malofte ni ĝuas avantaĝojn, kiuj por la riĉuloj estas nuraj



ludiloj: liberan tempon, privatecon, librojn kaj feriojn refreŝigajn. Sen infanoj ni povus permesi al ni pli multe; sed ĉiu impulso de mia personeco malakceptas tion. Per oftaj oferoj ni sukcesas, doni al niaj infanoj bonan saneblecon kaj prudentan edukadon. Sed estiĝas pli kaj pli malfacile, instrui ilin, ke ili ŝatu civilizacian pli ol sukceson, personecon pli ol palacon. La malfacilaĵo ĉiam pli grandiĝas, montri al ili, ke estas pli grave, posedi hejmon -- en kiu vi ŝatas vivi -- ol aŭtomobilon, per kiu vi povas veni for de via hejmo.

La solvo ne estas facile trovebla. Mi timas, ke la ĝentilhomoj devas decidiĝi al malriĉeco. Ni, kiuj zorgas pri spiritaj aferoj, devas rifuzi, akcepti la nivelon de la plejmulto por ni mem; ni devas kun certa braveco elspezi nian etan pluson por objektoj, kiujn nek laboristoj nek kapitalistoj ŝatas. Ni devas batali kontraŭ la korpa laceco de nia generacio, ni igu niajn piedojn iri kaj niajn manojn laboregi, kaj ni trompu nin mem en la kredon, ke tio estas plezuro. Se ni iras renkonte al simpleco duonvoje kaj kisas ĝin sur ambaŭ vangoj, ĉu ni eble povas certigi la postvivon de nia klaso? Nur, se ni kapablas, konvinkigi mizerstato de la ĝentlemano originas en du faktoj: en la plialtiĝo de la vivkostoj kaj en la malintereso de l' Amerikana popolo por tiuj objektoj, kiujn la ĝentlemano vere deziras.

Kiel klaso ni ne povas toleradi la ĉiaman streĉon, daŭre vivi super niaj enspezoj, neniam havante marginon; tia streĉo estas tro detrua. Aliflanke ni ne povas ŝpari en edukad-kostoj, kaj saneco estas pli multekosta afero ol en pasinta tempo. Kaj la publiko ne volas helpi nin, ĉar ili ne pensas necesa la ekzistadon de la meza klaso.

Ne, la socio entute ne emas helpi nin; ĝi nuntempe respektas nur homojn, kiuj kapablas aĉeti ĉion, kion ili bezonas. En Ameriko nenio tiom vekas suspekton, kiel la malebleco gajni monon. Do, kia ajn estas la okupo de la ĝentilhomo, laŭ la sento de l'popolo lia kvalito dependas nur de la sukceso financa.

-----S-ino K. SCHWERIN (trad)

### LA TIGRO KAJ LA VULPOJ.

Vulpo kaj lia edzino estis venantaj al sia kaverno. Proksime de ĝi ili renkontis tigron. Tiu ĉi estis tre malsata, ĉar, kvankam li ĉasis dum la tuta nokto, li nenion kaptis. Ekvidante la vulpojn, li lekis la makzelojn kaj murmurante komencis vipsvingi la voston.

Kompatinda sinjoro Vulpo tiel konsterniĝis, ke li preskaŭ perdis la prudenton kaj nenion povis fari. Ankaŭ sinjorino Vulpo estis terura timigita, sed ŝi ekpensis pri la kvin vulpidoj en la kaverno, kaj, pro ili, ŝi tre volis eviti formanĝon.

"Sinjoro," ŝi diris al la tigro, "mi ĝojas vidi vin. Mia edzo kaj mi havis disputon, kaj vi, kiu estas tre saĝa kaj sperta, nepre povos decidi tion por ni."

Tre plaĉis al la tigro aŭdi tian laŭdon. Kun dolĉa rideto li

respondis: "Eble mi povos. Pri kio sinjoro Vulpo kaj vi mal-konsentas?"

"Sinjoro kaj mi decidis, ke ni ne pli povas vivi kune," sinjorino Vulpo respondis. "Tio estas facile aranĝata." "Sed ni ne povas interkonsenti, kiamaniere dividi la infanojn." "Kiom da infanoj vi havas?" la tigro demandis. "Kvin, via moŝto," fiere respondis la vulpino: "Kvin tre belkreskajn infanojn."

La tigro ĝojis. Li havos ne nur gesinjorojn Vulpo, sed ankaŭ, se li estus lerta, la kvin idojn por sia matenmanĝo. "Kaj kiel vi proponas dividi ilin?" li demandis. "Jen la demando mem, pri kiu la edzo kaj mi ne povas interkonsenti; li insiste volas preni tri el ili, lasante al mi nur du, sed ili estas tiaj karulcoj, ke mi ne povas senigi min je kiom. Mi estas la patrino -- mi opinias, ke mi rajtas havi tri. Kiel vi juĝas?" "Tio ja estas malfacila demando," la tigro konsentis; "estas bedaŭre, ke ne troviĝas aŭ kvar aŭ ses. Tiukaze ili povus esti facile dividitaj. Tamen se mi povus vidi ilin, eble mi pli facile povus juĝi la aferon."

Ekiris do gesinjoroj Vulpo kaj la nobela tigro, kiu apenaŭ povis kaŝi sian riddeziron. Sinjoro Vulpo jam nun rekolektis siajn pensojn, kaj li diris argumente: "Ili ne povas vivi sen la patro. Mi provizas ilin per nutrado. Mi estas certa, ke ĉi difinos tri al mi." Ili baldaŭ alvenis al la vulpa nestego. Ĝi estis kaverno en rokoj. La enirejo estis malgranda, sed la interno estis seka, varma, mola kaj komforta, ĝuste tia hejmo, kien vulpoj amas.

"Sinjoro Vulpo," ordonis la edzino, "eniru kaj elkonduku la infanojn." Obce li tuj malaperis tra la enirejo. "Vi devas vesti ilin tre zorge," postkriis sinjorino Vulpo al sia edzo. "Nepre devas ne esti, ke ni prezentu ilin al Lia Moŝto krom en ilia plej-bona vestaĵo."

La vulpino kaj la tigro dum longa tempo atendis. La tigro fariĝis senpacienca. Fine li ekkoleriĝis. "Kio detenas lin?" ek-kriis sinjorino Vulpo; "mi eniros por helpi lin. Mi tre deziras, ke vi vidu la infanojn, ĉar mi estas certa, ke via decido estos favora al mi." Tion dirinte, ŝi komencis malrapide sin enŝovi dorsdirekte tra la mallarĝa enirejo. "Kial vi eniras dorsdirekte?" mire demandis la tigro. "Ĉu mi estus tiel malklera, malhonori min per peko kontraŭ la deĉeco? Estas malkonvene, fortunaj la vizitaĵoj antaŭ sinjoro tiel granda, kiel vi."

Fine ŝi estis ekster danĝero en la kaverno. Tiam ŝi dolĉe diris: "Mi tre dankas al vi pro via vizito -- sed mia edzo kaj mi jam decidiĝis, ke ni ne disiĝos; tial ni ne devas dividi la infanojn. Tamen estis tre afable viaparte, fari tian komplezon." La kolera tigro ne povis enrampi en la kaverton post ili, kaj tiun tagon, krom se pli bone prosperis al li aliloke, li devis dormi malsata.

----- S. TREWIN. (trad)

Molkapulo deziris elkovigi kokinojn. Aĉetinte dekduon da ovoĵoj, li pridemandis la vendiston, kiom longe li devas atendi la elkoviĝon. "Tri semajnojn por kokinoj kaj kvar semajnojn por anasidoj."

Do li paciencie atendis tri semajnon; sed ĉar neniam kokino aperis, li decidis manĝi la ovojn pro tio, ke li "tute ne ŝatas anasojn."

----- C. THOMPSON. (trad.)

### ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATO. S-ino Rawson nomiĝis kiel dua Komitatano por M.E.K. A. Turner (Prezidanto) 2.6.42.

LIBROSERVO. Pro la manko de aĉeteblaj libroj en Aŭst. estas dezirinde, ke la Asocio akiru provizon da libroj revendotaj. De tempo al tempo anoncoj aperis en LA RONDO pri kelkaj libroj haveblaj, sed tiuj ne sufiĉas por la bezonoj de la diversaj grupoj kaj samideanoj.

Ĝuste nun la monŝto de la Asocio, kvankam sufiĉa por la ordinara laboro, ne permesus la elspezon de funtoj necesaj por aĉeti provizon da libroj. Tial la Asocio invitas siajn membrojn fari donacojn por establi libroservon. (Sed ne donacu tiucele se tio malhelpos iun regulan donacon al la gázeto, kies subteno estas eĉ pli grava). Se tiumaniere ni ricevos kelkajn funtojn, ni povos aranĝi regulan fluon de libroj necesaj al la Esp. laboro kaj alie ne aĉeteblaj. La gravecon de tia servo facile komprenos ĉiu, kiu ageme dissemas nian lingvon. Bonvolu sendi donacojn rekte al la Sekretario, kiu regos la libroservan kason. Ni bonvenigos ĉiun sumon, kiel ajn malgrandan.

ADRESARO. Responde al multaj petoj por ekzemplero de la Adresaro, ni avizas, ke ĝi ne estas aĉetebla. La nunan eldonon ricevis nur la unua cent Individuaj Membroj, kaj la Aliĝintaj Grupoj, kies kotizoj kaj laboro efektivigis la nombron.

Ne forgesu avizi nin pri malĝustaj informoj. Tiujn ni korektos sur ĉi tiu paĝo, kiel spaco permesas.

GRATULON al M.E.K. kaj S-ino A.C. Fintze, kiuj bone propogandas inter soldataj kluboj. Eble la Asocio povos helpi aliaj, kiuj ankaŭ deziras entrepreni tian valoran laboron.

LA INDIVIDUA MEMBRO-CIFERO jam atingis 107, kaj la Komitato nun formale voĉdonas pri aliĝo al I.E.L. Estantece ni rigardu 100 Individuajn Membrojn kiel minimuman, kaj 150 kiel la celon.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro-abonanto; Diakonino Magarey; S-inoj B. Jones, B. Westbrook, O. Glenie, A.C. Hintze; F-inoj L. Rosengrave, H. Bostock; S-roj R. Lees, F.R. Banham, K. Linton, A. Boyle, L. Pfahl, J. McDonald, H. Love, C. Thompson, C.W. Ballard, P. Hudson, E. Hearne, N. Grant, Walker, I. Slavoff, F. Halls, E. McKenzie, McLeery, E. Bantick, A. Chamberlain.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ. Membro-Abonanto 5/-. LA RONDO al nemembroj

3/6 (afrankita). Ĉiam atentigu la adresiton pri via ĝusta volo pri mono.

G.H.HILLERMAN (Sekretario)  
P.O.Box 75, Devonport, TAS.

-----  
KASO DE LA RONDO. Junio 1942.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s	d	<u>ENSPEZOJ</u>	£.	s.	d.
Konta transpreno.....	9.	7.	6	poŝtmarkoj.....	15.-		
S-ro Edgar Walker.....		4.	9	inko.....	11.-		
S-roj Onn, A.McKenzie, Knox Walker, J.Meehan, R.Rawson, H.Love, Pfahl,	1.	11.	6	papero.....	16.-		
J.McDonald, M.F.Walker 3/6.				ŝablonaĵoj.....	11.4		
R.L.McLeery.....		3.	6	bind-pingloj.....	1.6		
S-ino J.Hales.....		3.-		luo.....	5.-		
S-inoj Dunn, E.M.Hill.....		7.-		okazaj elspezoj.....	5.6		
Deaconess Magarey.....		3.6			<u>£3.5.4</u>		
S-ro Belcher.....		3.6		En la kaso	£9.13.2		
S-ro Owen Davies.....		3.-					<u>£12.18.6</u>
S-ino C.Hintze.....		1.6		F-ino W.ADDIS			
Gesroj Hanks.....		9.-		25 Greville Ave.			
Vendoj.....			9	Flinders Park,			
				Adelaide, S.AUS.			
			<u>£12.18.6</u>				

-----  
T.E.A.AFEROJ.

Je invito de W.E.A. (Laborista eduka asocio) T.E.A. konsentis elekti grupon por publike debati temon: "Ĉu Internacia Lingvo estas Necesa?"

La 10 Julio grupo el ses gesam-oj surestradiĝis antaŭ aŭskultantaro. Kap-o Couche agis kiel mastro kaj salutis ĉiujn diskutantojn. Sekvis horo plena je amika debato. Respondo rapide sekvis demandon, kaj iufoje aserto de ne-Espisto elvokis viglan kontraŭdiron de ŝajne malklera samideano.

Kompreneble ni kaptis la okazon propagandi. Post fino de la oficiala debato, la ĉeestantoj rajtis ĝenerale demandadi k.t.p. Ĉi tiu iniciato estis sukceso, en tio ke per ĝi ni povis evidenti al la ne-Espa mondo konsiderindan intereson pri Espo kaj samtempe fari bonan impreson sur la interesatojn.

Eĉ se ni ne tuj gajnos pli da membroj, ni esperas, ke kie nun subbruletas simpatio, tie baldaŭ ekflamos fera konvinko, tutforta partopreno.

-----  
Gordon Chatterton, Hon Sek.  
T.E.A.

PRESEKAROJ. Junio Numero. Paĝo 126, linio 17 de la malsupro: AL tiuj provizore... Paĝo 127, linio 1: kaj GIA progreso. Paĝo 128 linio 19: labirintoj Paĝo 128 linio 22: sed tute ne...

The following pages have not been seen by the Editor for correction. A list of printing errors will be given in our next issue.

L.E.B

SVEDA SAMIDEANO EN MELBURNO.

Malgraŭ la funebreco kaŭzita de la lumkaŝigo ekstere, la ĉeestantoj de la M.E.K. Merkredon (10 Junio) pasigis reviviĝajn kaj interesajn horojn okaze de la vizito de alilandano, nome S-ro Spant. Tiu, ĉefservisto sur ŝipo, devenis el Svedujo. Lia Esperanta parolo estis lerta, personna kaj flua, tiel instiganta, ke ni plibonigunian; kaj li alportis en la klubĉambron la freŝecon de marventoj dum li babilis ĵon pri spertoj kun E-istoj alilande kaj pri sia ĉiutaga vivo surŝipe. Multajn eminentajn E-istojn li vizitis, inter ili S-ro Lanti en Parizo kaj Profesoro Stamatiadis en Grekujo. Ni eniis lin dum li parolis pri siaj vojaĝoj al diversaj landoj --- Grekujo, Bulgarujo, palestino, Sirio k.t.p. estas bone konataj de li. Sprite, vigle li parolis, kaj streĉe aŭskultante al ĉiu vorto ni aŭdis pri renkonto kun Bulgara politika viktimo, kiu tre suferis pro fideleco al sia kredo, pri intervuo kun Usona konsulo ĉe Bejrut pri naĝado en la Norda Maro.

Kvarfoje en la daŭro de la Granda Milito kaj unu fojon dum la nuntempa milito S-ro Spant estis sur ŝipo kiu estis torpedata. La lastan fojon la ŝipo estis apud la Usona marbordo ĉe Baltimore; feliĉe nia samideano trovis la akvon varma pro la influo de la (Meksika) Gofa Fluo. En tiu okazo li perdis siajn E. librojn sed uzis la okazon de sia vizito al Melburno por aĉeti novajn.

S-ro Spant forvojaĝis al Ameriko sed, se la sorto permesos, li revenos al Aŭstralio post kelke da monatoj, kaj ni avide atendas lian duan viziton. Se eble, la sekretario anoncos la daton por ke aliaj sam-oj povu ĉeesti kaj partopreni interparolon kun nia estimata amiko el Svedujo.

----- F.RAWSON.

SERĈAS KORESPONDANTON proksimume 21-jaraĝan ŝtatoficisto Londona. Nepova soldatiĝi, de daŭra adreso, li promesas interesan leterintersaĝon. Muziko, lingvoj, homoj. C.N.Flippance, 372 Merton Rd., Southfields, London S.W.18.

-----  
LETERO.

ALDO (Hobart) LA RONDO pli kaj pli kontentigas. Oni diris, ke kelkaj el la artikoloj estas tro beletristikaj, sed miaopine ni ja bezonas tiajn, pro tio, ke nuntempe ekzistas malmulte da bonokazo legi belstilajn librojn E-ajn, kaj tial ni, kiuj celas plibonigunian scion, alte taksas bone verkitajn kaj tradukitajn artikolojn, historietojn k.t.p.

-----

RESPONDOJ.

JOE en Wo. Via atentigo pro la plumeraro "hipotama" (p.116 RONDO) dankigas min. La analogo kun via "algatoro", "krokodlo" tamen ne estas tute ĝusta. La plumeraro bone ilustras fundan leĝon de la lingvistiko, nome la sinkopo (A. syncope), laŭ kiu iu meza parto de vorto kvazaŭ glutiga, ellasiĝas. sub la influo de "la plej facila maniero" prononci multsilaban vorton. Ekzemploj el la Angla estas Symbology, Idololatri, Pacificist, kiuj nun preskaŭ ĝenerale estas Symbology, Idolatri, Pacifist. A. aphaeresis (perdo de komenca parto de vorto: ekz. (a)cute, (e)special, kaj A. apocope (perdo de fina parto: ekz. curio(sity), cinema(tograph), my(mine) estas rilataj lingv(istik)aj fenomenoj.

BoWo en Ho. Via rimarko, ke Esp-o ne estas tiel esprimriĉa kiel la Angla, ĉar en Esp-o oni ne diras "la traduko estas kovrita per pikiloj" kiel traduko de "(it) bristles with difficulties", ŝajnas al ni esti iom drasta. La unua devo de Esp-isto, uzante la lingvon, estas klare esprimi la penson; li lasas sin enmeti "koloron" se tio estas flukomprenebla kaj supozinde aldonos plezuron al la legado. Ni devas ne postuli de Esp-o, ke ĝi revestu en kristalklara lingvaĵo ĉian idiotismon aŭ popoldiraĵon de la tuta homaro. Ke ĝi tamen estas treege riĉa je metaforaj vortbildoj oni vidas, legante la verkojn de niaj bone konataj plummajstroj. "La traduko svarmas je eraroj" (ĉu ne sambone kiel "bristles"?), trafi en malfacilon, streĉi la cerbon, paliĝi super la Latino (swotting pale over it), li estas vera hidrargo, havi vinagron en la mieno, kaj mil aliaj, estas esprimoj pikaj kaj klarkompreneblaj. Kiu ankoraŭ ne zorge tralegis "Proverbaro Esperanta", tiu ne morale rajtas akuzi Esp-on pri sensuko, senkoloro, aŭ manko de esprimpovo kernece trafa.

----- F.R.B.

ESPERANTO EN DANLANDO. "Ni atentigas niajn legantojn je tio ke oni povas skribi al ni en la lingvo Esperanto el ĉiu lando, ĉar la Germana milita cenzuro tralastas Esperanto-lingvajn korespondaĵojn. Efektive ni ricevas ĉiutage Esp-lingvajn leterojn kaj poŝtkartojn el Usono, Svedujo, Italujo, Hungarujo kaj aliaj landoj." (El "Parolilo", Danlando. Citita en "Amerika Esperantisto" Dec.1941).

EL STOCKHOLM'A BULTENO DE I.E.L. ni sciigas, ke D-ro Leo Belmont mortis en la aŭtuno de 1941 kaj ke S-ron C. Pruski pafmortigis Germanoj kiel "garantiulon". Ĉiu konscia Esp-isto bone scias pri Belmont, kiu jam en 1887 sendis leteron al Zamenhof finantan per vortoj "Vi venkos, sinjoro!" sed pri kompatinda Pruski ni diru, ke li estis magistro de juro, nask.1897 Polo, E-igis 1913. Multe laboris por E-o. Charles Fredk. Hayes, nask, 1857, mortis Jan.1941. Li estis kunlaborinto kun O'Connor je la unua Angla-Espa Vortaro (1907).

-----

P. A C O.


Freneze ĝojega la kanto  
el koro ĉi mia:

Ho mi, feliĉa amanto  
bonsance pasia !

Jen trafis min, ĵus, letereto  
de Roza, amstelo.;

Ne vidis sed ĝin l'edzineto.

.....  
NE ESTOS KVERELO !

RIM-NOVELETO

Malpli gracia li,  
ol volapuka frazo ;  
kaj ŝi, frivola pli  
(nu, tio laŭ emfazo)  
ol eĉ kongresanino.  
Ili, ĉe apoteko,  
sin trafis en Berlino  
antaŭ Mondbatal-eko.

o  
Al ĉio la finiĝo ;  
al beletraĵo nia,  
kiel al gramatiko  
Kalokse-Varingia.  
Jen esperantistigis  
ĉi Zam.-dotota paro,  
kaj baldaŭ geedziĝis.

.....  
VERDADU LA IDARU!

NU, TRADUKEMULOJ!

Kiel vi tradukus la sekvantajn, kiuj povus fariĝi necesaj en ordinara konversacio je ajna tiktakero de la horloĝo? Tial, bonvolu Esperante vesti ilin sen helpo de vortaro.

(a) Government of, by and for the people. (b) He walked gingerly along the plank. (c) She swept into the room. (d) A bland smile. (e) He was in an invidious position. (f) Make no invidious distinctions. (g) Disestablishment and disendowment. (h) He's past praying for. (i) With all due respect to you. (j) She's not much to look at. (k) The morning after the night before. (l) Not even a ghost of an idea. (m) I take it with a grain of salt. (n) It's on the tip of my tongue.

SAMENHOF AU ZAMENHOF?

Kiel enskribiĝis la nomo de la Majstro en la naskregistro? Pri tio Privat en sia Vivo de Zamenhof ĵetas nenion da lumo. P. 19 de Historio de Esperanto 1887-1912, Z. Adam citas leteron (ĉ.1887) de Henry Phillips, sekretario de American Philosophical Society, en kiu tiu uzas formon Samenhof. Adam piednote klarigas, ke "en tiu ĉi tempo Zamenhof skribis iafaĵe sian nomon laŭ Germana ortografio: Samenhof. Ni ne bezonas klarigi, ke kvankam multaj Francoj prenis tiun ĉi nomon por Rusa -- danke al finiĝo -of -- etimologie ĝi estas Germana." Ĉirkaŭ 1903-04 Berlinaj E-istoj demandis al D-ro Zam-

enhof, kia estas la ĝusta ortografio de lia nomo. Li respondis per letero, en kiu sigas la jenaj lom por ni strangaj vortoj: "...ĉiuj personoj, kiuj ne timas tro kripligi aŭ nerekonablighi sian nomon per skribo fonetika, povas jam nun skribi en Esperanto sian nomon laŭ maniero esperanta. Jen estas la kaŭzo, kial mi skribas mian nomon per Z, kvankam ĝi havas devenon germanan."

Rimarko: "Jen estas la kaŭzo..." Tio rajtigas nin supozi, ke la nomo de Zamenhof estis registre enskribita.

"Zamenhof" (prononcu Zamenhof) signifas Germane "korto de semoj". Kiel S-ro J. Beleminsky skribis en "Esp. Internacia", ĝi estas taŭga nomo por tia viro, kiu semis kaj semis; eĉ se mil semoj perdiĝis, tamen jam kreskas verda tritikkampoj promesante riĉan rikoltoon kaj panon por la malsatanta homaro, malsatanta pro manko de paco kaj manko de interkompreno lingva kaj mensa.

-----F.R.B.

### PENSOJ PRI ESPERANTO.

"Laŭ la propraj talento kaj stilo." La pluralo "j" estas korekta, ankaŭ logika, sed ĝi estas tute ne-Zamenhova. Zamenhof ĉiam rifuzis kateni la lingvon per senbezonaĵaj reguloj, kaj li mem malobeis la regulojn, kiujn faris Esp-aj eminentuloj.

"Ĝis kiam" estas senerara, sed ĝi akcentas la tempon, dirante: Ĝis la tempo, kiam; aŭ ĝis la okazo, ke mi venos.

Zamenhof nomis E-on arta, kaj ni stulte kaj senkomprene nomas ĝin "artificial", "helplingvo", "kromlingvo", surogato por la veraĵaj lingvoj. Zamenhof estis artisto, kies metio estis lingvofarado; en tio li estis geniulo kaj elmontris genion, kiun la talentoj kaj instruiteco de la samideanoj ankoraŭ ne penetris komprene. Lia lingvo ne estas science, sed arte verkita.

La celo, spirito, esenco de E-o estas simpleco, logikeco, klaro kaj racieco; sed ankaŭ beleco. ĉar ĝi devas disdoni al ĉiuj plezuron. Mi alpensas al tio ankaŭ la belan kaj konvenan uzadon de la voĉo. Ni devas disciplini la voĉon, kiu en mia lando estas tre malbela.

Malnova Esperantisto. John A. Gill (Londono).

RIMARKO: Nur du prepozicioj, "dum" kaj "ĝis", estas ĝenerale akceptitaj ankaŭ kiel konjunkcioj; sed ekzistas tendenco ilin kombini kun "ke" aŭ "kiam" (dum ke, dum kiam, ĝis kiam). Jen ekzemploj de Karl Minor, proĉatalanto por tia uzo.

"Mi atendis dum kiam li skribis leteron."

"La riĉuloj diboĉas, dum ke la malriĉuloj malsatas."

Li asertas ilin puraj prepozicioj; se uzate konjunkcie ili sekviĝu de "kiam" aŭ "ke".

William Bailey, L.A., ne konsentas. Li nomas la "kiam" superflua. Kabe uzis ĝin ĉe La Paraono, vol. II, p. 107, 126, 212. Unu



ekzemplo de la pleonasma "kiam" staras ĉe Nombroj xiv, 33, sed ni ne povas esti/ absolute certaj, ke Zamenhof ĝin skribis; la biblia Komitato ne povis ricevi la Varsovian manuskripton de tiuj partoj de la Biblio, kiujn eldonis Hachette. Kie "ĝis kiam" estas defendebla, eĉ imitebla, tio estas en demanda frazo, kia "how long...?" -- Ijob xix, 2; "Ĝis kiam (how long) vi afliktados mian animon?"; Psa. xiii, 1: "Ĝis kiam...vi tute forgesos pri mi?" (Vidu ankaŭ Psa. lxxxii, 2, Jos. xviii, 3, Eliro x, 3, Nombroj xiv, 11, 27.)

Sed por montri simplan futuron Zamenhof uzis "ĝis" konjunkcie, kiel ekzemple: "ĝis ili ĉesos paroli", "ĝis mi venos".

----- F.R.BANHAM.

EL LA ENKONDUKO DE "ROGET'S THESAURUS OF ENGLISH  
WORDS AND PHRASES". (1852).

"La verŝajna rezulto, kiun havus invento de filozofia lingvo, estus ĝia pli-malpli frua adopto fare de ĉiu civilizita nacio. Per tio realiĝus la bela aspiro de homamantoj -- la establo de universala lingvo. Malgraŭ tio, kiom tia projekto povas aspekti utopieca al nuntempuloj, kaj malgraŭ tio, kiom fiaskis la provoj de Episkopo Eilkins kaj aliaj ĝin efektiviĝi, la plenumo de la tasko certe ne estas pli malfacila ol ĉe multe da aliaj bonfaraj aferoj, kiuj siatempe aspektis pli-malpli viziecaj, tamen kiuj, kun la paso de 1' tempo, sukcesis dank'al la daŭra kaj persista laborado de la homa intelekto. Tial, ĉu estas kaŭzo por malesperi pri tempo, kiam, je estonta etapo de tiu plialta civilizacio al kiu ni fide kredas, ke la homaro iompostiom proksimiĝas, ia nova, pli aŭdaca streĉo de la genieco finfine solvos tiun problemon kaj alportos utilon de super-ega graveco? Pli ol iu ajn alia, forigo de lingva diverseco --- tiu baro kontraŭ pens-interŝanĝo kaj reciproka komprenado -- rekte kondukus al tio: venigi orepokon de unueco kaj harmonio inter la nacioj." (Trad. F.R.BANHAM.)

RIMARKOJ de la TRADUKINTO: Sampaĝe Roget mencias la fakton, ke en Parizo en 1797 aperis anonima verko, "Pasigrafie, ou Premiers Eléments du Nouvel Art-Science d'écrire et d'imprimer une langue de manière à être lu et entendu dans toute autre langue sans traduction; inventés et rédigés par J. de M...." (Pasigrafie, aŭ unuaj elementoj de nova art-scienco laŭ kiu oni skribas kaj presas lingvon tiamaniere, ke ĝi povas esti legata kaj komprenata en ĉia alia lingvo sen traduko; inventitaj kaj kompilitaj de J.de M....). En tiu ĉi afero turnu vin al Fundamenta Krestomatio, p. 260, linio 5, kie vi legus, ke iu M. de Maimieux eldonis en Parizo pazigrafion en 1797. En Historio de la Mondolingvo E. Drezen, 1931. detale pritraktas la projekton de M. Ĉu li estas la sama? Rimarku, ke Roget mortis en 1869, do antaŭ ol la verko de Zamenhof aperis en 1887.

-----

IDIOTISMOJ, BILDESPRIMOJ, ALUDOJ, PROVERBOJ.

Mi volus foni prituŝi evitindaĵojn en E-o, nome (1) la senkonscia uzado de patralingvaj frazturniĝoj apartaj al nur limigita lingvokampo, kaj (2) de aludoj, mitologiaj, antikvecaj, fabelaĵoj, bibliaj, historiaj, kiuj estas tute bonaj, se internacie klaraj kaj tujvide kompreneblaj.

Jen ekzemploj pri la venena influo de la patralingvo sur la bone internacian E. stilon, kiu, antaŭ ĉio, devas esti ĉiulande facilegebla, ne nur por eŭropanoj sed ankaŭ por azianoj, hindoj, ĉinoj, japanoj, afrikanoj, polinezianoj. Ni supozu ke anglo tradukas la du frazojn:-

He fastened the cord so that he could undo it easily again.  
He had taken plenty of food with him, so that he felt no fear of hunger.

Multaj E-istoj (ni ne diru la plimulto) tradukus ambaŭ "so that" per "tiel ke"; sed la dua devas tradukiĝi per "tial", ĉar ĝi egalas "therefore". Ankoraŭe: If I want any dinner I must hurry home. Mia opinio tuj ankaŭ estas iagrade idiotisma, kaj ne necesas traduki laŭvorte. La baza ideo estas pri nepra rapideco ne pri deziro manĝi. "Mi devas rapidi, por ke mi alvenu hejmon ĝustatempe por manĝo." Aŭ simila. The bomb didn't explode, and were we happy! Aŭstralia idiotismo. Ne traduku per "ĉu ni estis feliĉaj?" sed per "Prezentu al vi, ke (aŭ, kiel) ni estis feliĉaj!" As for bushfires I've had my fill of them: se la senco permesas, per "Koncerne kamparajn brulogojn, mi multe suferis pro ili."

----- F.R.B.

LA DRONINTO.

No dust I have to cover me;  
My grave no man may see.  
My tomb is the unending sea,  
And I lie far below.  
My fate, O stranger, was to drown;  
And where it was the ship went down  
Is what the seabirds know.

.....


Kadavron mian kovras polv' nenia;  
Al tombo vane serĉus hom-okul'.  
Provizis ĝin por mi la mar' senlima;  
Sur ombra fundo kuŝas mi mortul'.  
Perei per dronad', jen mia sorto.  
Sed lokon, kie trafis ŝipon morto,  
La mevoj scias -- kono nur alia.

-----Esp-en trad. F.R.BANHAM el Greka Antologio)---

Oficinala Organo de la A.E.A.

24-8-42

La RONDA.



Aug 1942

Nº-ro 23

Eldonita de F.R. Banham  
2 Banchory St. Essendon W5 Vic AUSTRALIA.

NENIAM HEZITU.

La verŝajne plejsukcesonta studento en nia Viena kolegio estis junulo de bela aspekto. Li havis dek ses jarojn, estis eksterordinare naturdotita, laborema, ambicia, kaj bonmaniera. Ni lin moknomis Metternich, honore al nia fama diplomato, ĉar ni havis konvinkon ke, pro lia supera inteligento, brila kariero atendas lin. Nur lian elegantecon ni ne amis; ĉiam en nove gladita vestkompleto kaj kundande ordigita kravato li vizitadis la lernejon. Se malbona la vetero la patra ŝofero devis lin venigi kaj reirigi en luksa aŭto. Tamen li estis aminda knabo kaj havis neniom da aroganteco. Ĉiu el ni tre favorkliniĝis al li.

Unu matenon vakis la loko de Metternich. Je la lunĉpaŭzo ni sciigis pri la kaŭzo. En la hieraŭa nokto lia patro, ĉefo de granda fincentrepreno, estis arestita; lia konzerno estis giganta trompo kaj miloj da neriĉaj homoj supite perdis la tutan pene ŝparitan havon. Per kriantaj literoj kaj fotoj de la kulpulo kaj ties familio, la ĵurnaloj laŭte disdonis pri la skandala afero.

Per tio ni kompreniĝis pri la nealveno de nia malfeliĉa amiko -- li hontis. Du semajnojn, dum la ĵurnaloj anoncis ankoraŭ pli kaj pli detale pri la krimo, la sidloko de Metternich restis vaka. Poste, unu matenon en la tria semajno, la pordo malfermiĝis; Metternich maltrude, nerve kuretis al sia benko, ekfoliumis libron kaj dum du horoj eĉ ne levetis de ĝi la okulojn.

Kiam la sonorilo batis por dekminuta paŭzo, ni kiel kutime eniris la koridoron. Metternich, irinte rekte ĝis fino de la koridoro, tie staris sola kun dorso al ni, kaj rigardadis tra fenestro kvazaŭ io enstrata absorbis lian atenton. Tamen ni bone sciis, ke la kompatinda knabo tiel agas, ĉar li deziras eviti renkonton de alvidoj, kaj ke li estas terure soleca.

Formortis nia ludo, ridbabilo, ĉar fine ni konsciigis, ke tia libere elektita izoleco devas esti al li vere korŝira. Estis evidente, ke li atendas ian signon de amikeco de nia flanko; sed dubante pri ĝusta maniero laŭ kiu ni povus paroli al li sen vundi lian fiercenton, ni hezitis kaj neniu el ni sufiĉe havis kuraĝon por preni la paŝon.

Post kelke da senfinaj minutoj la sonorilo vokis nin reen en la ĉambron. Abrupte Metternich sin turnis kaj enpaŝis ignore, senrigarde al ni. Liaj firme kunpremitaj lipoj ŝajnis nun eĉ pli palaj; li sidiĝis kaj nervagace malfermis libron. Fine de la matena lecionaro li iris el la ĉambro tiel rapide, ke neniu havis plu ŝancon pl li paroli.

Ni ĉiuj sentis nin kulpaj kaj komencis konsideri: kiel rekompencon fari. Sed jam tro malfrue; li neniam plu donis al ni bonokazon. La sekvantan tagon lia sidloko denove staris vaka. Ni telefonis al lia hejmo, sed per tio sciigis, ke li antaŭ ne longe anoncis al la patrino decidon ne plu daŭrigi la studadon. Verdire li jam foriris el Vieno por fariĝi lernanto ĉe apotekisto en malgranda urbo.

Se li povus esti fininta la studadon, li tre verŝajne sukcesus pli brile ol ni ceteraj. Sendube nia hezitado kaj nehelo multe

kontribuis al lia decido rezigni karieron. Unu vorto, unu ago amika en tiu mateno tre eble estus doninta al li forten por venki la doloron de la animo. Kial ni ne helpis lin? Ne pro manko de simpatio, ne pro indiferento aŭ neamika sento, sed simple pro manko de kuraĝo, manko kiu ofte malkapabligas homojn paroli ĝustajn vortojn en ĝusta momento. Malfacile estas konsolparoli al homo, kies animo brulas en la honto de malvenko aŭ funde vundita fiero; ni tamen lernis per tiu frua travivaĵo, ke malbone estas heziti pri oboe al la unua impulso doni helpon -- jes, malbone, ĉar vorto aŭ ago de kompato efektive valoras nur en la momento de ekstrema bezono.

En postaj jaroj, en ĉeesto de iu homo suferanta pro malespero aŭ anima ofendiĝo, aperis antaŭ miaj internaj okuloj bildo de kompatinda Metternich staranta ĉe fenestro, kaj vane sopiranta signon de nia bonvolo. Tiu bildo pli ol unufoje helpis nin formeti la hezitemon kaj doni konsolon antaŭ ol estis tro malfrue.

-----Stephan Zweig----F.R.B. (trad)

(20.-28.10.38) ESPERANTISTOJ FLUGAS de Eŭropo al Aŭstralio.

III. Tria tago: Alexandria-Lyddá-Baghdad-Basra.


(1140 mejloj; neta flugdaŭro - 9 horoj)

Dum nia frumatena alveturo al la flughaveno de Alexandria malvarmeta vento blovas de la sunbrila maro. Rapide ni preterpasas la indiĝenan kvartalon, kie ankoraŭ regas trankvilo, kaj precize je la 7-a nia aviadilo leviĝas. Ni flugas laŭ la Egipta marbordo kaj baldaŭ estas super la Nil-delta, unu el la plej fruktodonaj regionoj de la mondo. Miriadoj da grandaj kaj etaj brakoj de la Nilo portas la laktec-verdan akvon malrapide al la Mediterraneo. La malaltaj partoj de tiu vastega distrikto estas inunditaj; la riĉaj grenkompoj kaj kotonkulturoj subakviĝis, eĉ la etaj urboj kaj vilaĝoj nur iom elstaras el la fluo.

Kelkloke la riverbrakoj larĝiĝas kaj formas vastajn lagojn, sur kiuj la indiĝenaj ŝipoj kun siaj karakterizaj pintaj veloj trankvile trafikas. Bone ekkoneblaj estas la foso-sistemoj de la kampoj, kiuj ebligas la alfluon kaj defluon de la fekundigaj akvomasoj. Nun ni superflugas la ĉefbrakojn de la riverego. La ŝlimasoj, kiujn tiuj gigantaj akvovoj transportas en la maron, distingiĝas de la blua marakvo ĝis kelkmejla distanco de la vera enfluejo.

Nun ni flugas transmaren; nur malproksime ni ekvidas Damietta, la orientan finpunkton de la Nil-delta, kiu etendiĝas ĉirkaŭ 150 mejlojn laŭlarĝe. Iom nebule vidiĝas Port Said, kaj post nelonge ni alproksimiĝas al la Azia kontinento, al la marbordo de Palestino. Tre tre malproksime je la maldekstra flanko situas Jaffa kaj Tel-aviv. Sub ni kuŝas orangejoj kaj daktilpalmaroj, sed pli ofte nur griza ŝtoneca tero sen vegetaĵoj, stratoj parte kovritaj de flugsablo, kio efike demonstracias, kiel peniga estas la kultivado de ĉi tiu lando. Kelkaj nove konstruitaj kolonioj ĝojigas per siaj blankkalkitaj domoj, kaj jen estas Lydda, la aerodromo de Gazah.

Kiam ni elegante surteriĝas, minaca kontraŭ-aviadila kanono



pruvas, ke la lando ankoraŭ estas en revolucia stato. Nur antaŭ du tagoj ribelaj araboj terenpafis aeroplanon, pro kio la estro de la flughaveno avertas nian piloton. Tamen ni ĝuas en komforta selono la abundan duan matenmanĝon kaj delikatan oranĝ-sukon ĉi tie faritan.

Baldaŭ ni devas adiaŭi, kaj nun la piloto pro favoro al ni deflugas de la lasta linio, por montri al ni Jerusalem. En nur malklare alteco ni superflugas la sanktan urbon, kies ĉiuj detaloj klare sin prezentas; la famaj preĝejoj, moskeoj kaj sinagogoj, la Olivomonto kaj Golgatha kuŝas tie en la sunbrilo de l' tagmezo kiel ludiloj por gigantoj. Ravite ni rigardas tiun historian ejon, dum malklare preskaŭ ĉe la horizonto vidiĝas Bethlehem, la naskiĝloko de Jesuo. La lasta al ni videbla urbo en Palestino estas Jericho; la fertila zono estas jam forlasita; profunde inter nudaj montoj serpentumas la rivero Jordan, kies enfluo en la Mortan Maron (1200 futoj sub ordinara marnivelo) ni ĵus transflugas.

Ni estas en Trans-Jordan, kies ĉefurbo Amman baldaŭ etendiĝas sub ni. Kaj post tio dum horoj kaj horoj ni vidas nur dezerton, dezerton, dezerton. Sed ne imagu, ke la Siria Dezerto ĉie same aspektas. Tute ne; dum komence ĝi estas bruna kaj onda kun veraj montetoj, ĝi iom post iom estiĝas pli blanka kaj ebena; ialoke ĝi prezentas sin ruĝeta kaj kvazaŭ kovrita de pustuloj, aliloke vastegaj areoj estas grizeni-

graj kaj aspektas forbrulitaj.

Dum longa tempo akompanas nin la senfina rektlinia tub-kondukaĵo de la Irak Petrolo Kompanio. Malofte ni vidas aŭtomobilojn aŭ kamelkaravanojn, kiuj malrapide moviĝas, sed ĉiam sekvas nin tie, 5500 futojn sub ni, la ombro de nia aviadilo. Rigardante al la vasta sunsekigita dezerto ni feliĉaj flugastoj ĝuas mirindan lunĉon, kiu kvazaŭ moke finiĝas per glaciigita fruktsalato.

Iam eĉ la senfina dezerto finiĝas. Ni aŭflugas la gigantajn monstrajn kurbliĉojn de la rivero Euphrat; kune kun la Tigris ĝi enfermas la faman landon, kiu iam estis ĝardeno de floroj kaj palmarboj, kaj laŭ la legendo estis la lulilo de la homaro. Tiu lando, kie en antikvaj tempoj fluis mielo kaj akvo,

nun estas soifa, suntorturita sovaĝejo; ĉar la Mongoloj en la 13a jarcento sisteme detruis la irigac-reton de la tuta lando. Baldaŭ ni alvenas ĉe Baghdad. Dum ni malalte ĉirkaŭflugas

tiun fabelan urbon, multkolora mozaiko ĝojigas nin, verdaj palmaroj, stranganĝemel-ŝipoj sur la blua rivero, verdaj kupoloj kaj gracilaj turetoj, blankaj domgrupoj kaj bruna araneajo de stratetoj, sed ĉio tio kvazaŭ superverŝita de subtila blanka polvo. Kiam ni faras grandan cirklon en la aero antaŭ la surteriĝo, ni ne povas ne memori la historion pri la kalifo-cikonio, kiu antaŭ longe tie ĝuis la saman ekvidon. Brula varmego akceptas nin en la aerodromo kaj lacigas nin tiel, ke ni eĉ rifuzas trinki teon.

La piloto urĝas nin kaj post dudek minutoj ni denove eniras la flugmaŝinon. Sufoka varmego ĉirkaŭas nin, ĉar dum la mallonga paŭzo la sunbrilo faris el nia flugsalono kvazaŭ bakfornon. Sed tuj post kiam ni leviĝas, la temperatur-kontrolo denove ekfunkcias kaj post kelkaj minutoj ni spiras ree en agrabla atmosfero. Flugante en alteco de 6000 futoj laŭlonge de la rivero Tigris ni post nelonge preterpasas la ruinion de Ctesiphon, la solan restaĵon de iam grandioza palaco kaj riĉega urbo. Dum 800 jaroj ĝi formis la centron de l' Parter-Stato, kies potenco en Azio endanferigis eĉ la Roman imperion, ĝis en 637 la Islamo

surprize konkeris ĝin. El la fabela rabaĵo, en kiu troviĝis ora ĉevalo kun smeraldaj dentoj, arĝenta kamelo kun ora ido ktp, la plej valora ero estis la tapiŝo de la reĝa banked-halo. Laŭdire ĝi reprezentis ĝardenon kun ora fundo kaj arĝentaj vojetoj, herbejoj el smeraldoj kaj rivaretoj el perloj, dum la arboj, fruktoj kaj floroj estis diamantoj.



lakt



De la iama pompo kaj gloro restis nenio. Tute ebena, seninteresa, senvegetaĵa tero estas sub ni, ĉis ni alvenas la urbon Kurra, ĉe la Gardeno de Eden. Post flugo super vasta areo de marĉoj, la pejzaĝo pli kaj pli verdiĝas, palmarboj kaj kampoj vidiĝas, kaj...jen kuŝas nia hodiaŭa celo Basra.

Plurfoje ni malalte superflugas la urbon, la bluan riveron, kun grandaj vaporŝipoj kaj blankajveloj, la palmgardenojn, la flavajn vojojn...kaj nun ni surteriĝas en la aerodromo Margil. Ni bezonas iri nur kelkajn paŝojn kaj jam ni staras en moderna kaj plej luksa hotelo, la Hotelo Shatt-el-Arab. Ĝi situas unuflanke ĉe la land-aerodromo kaj aliflanke rigardas al la rivero Shatt-el-Arab (la rezulto de Eŭfrat plus Tigris), kie la gigantaj duetaĝaj flugboatoj de la Imperiaj Aerlinioj surakviĝas.

La plej granda flugboato de la mondo alvenas tie antaŭ niaj okuloj, pasaĝeroj kaj pakajoj estas boate transportataj al la eta kajo. Dum ni ĝuas la pacigan aspekton de la granda silenta rivero, sur kies malproksima alia bordo densaj palmarbaroj siluete kontrastas kun la fono de la vesper-ruĝeta ĉielo, la suno rapide subiras kaj ni retiriĝas en la komforton de l' hotelo. Mirinda lukso regas tie; en la teretaĝo akcepta salono, grandega kiel fervoja stacio-halo, festene kunigas nun por tetrinkado la internaciajn pasaĝerojn de la flugkompanioj anglaj, francaj kaj nederlandaj. Riĉe meblitaj ripozejoj, skribsalonoj kaj belvederaltanoj invitas en ĉiu etaĝo, dum la dormoĉambroj enhavas kompreneble elektrajn ventumilojn, kamenojn kaj horloĝojn. Ĉiuj fenestroj kaj pordoj estas speciale ŝirmitaj kontraŭ enflugo de insektoj.

Post kelkminuta elrigardo en la mallumon ekstere, al kiu ĉeno de diverskoloraj elektraj lampoj en la hotelparko aldonas certan orientlandan nuancon, ni rampas sub la moskito-retojn de niaj litoj, por

ĝui mallongan dormon en ĉi tiu urbo, kiu ludis gravan rolon por la Brita Imperio en la lasta milito kaj eble fariĝos grava nun denove.

----- P. SCHWERIN.

### BRULIGNETOJ.

Jen ŝi estas denove, en sia kutima kaŭra pozo, ĉiam klopodante. Silente, monotone ŝi levprenas ilin. Ŝia malnova blua robo montriĝas sub la paltaĉo, ŝiaj ŝuoj eluzite klinas sin al unu flanko, kaj la supro de unu strumpeto pendas kaj nur duone kovras la kruron. Ŝia hararo estas malbukla, senviva kaj malzorgita; la mallarĝa vizaĝo havas malbrilajn senesprimajn okulojn, kaj kavaj skeletaspektaj vangoj montras tutan mankon de dentoj.

Ŝi neniam parolas, kaj mi neniam sentas, ke mi povas al ŝi paroli. Kial? Mi provas analizi mian senton de repeliĝo. Ŝi certe aspektas bezoni varman banon kun multe da sapo, sed ne tio plej ĝenas min. Kio plej repelas min, tio estas la senesprimaj, ŝafsimplaj okuloj, kiuj igas min demandi al mi: ĉu mi rigardas efektivan homon, aŭ pliĝuste ian vagan beston, kiu hazarde envenas por kaŝ-



preni laŭŝance tion, kio ĉirkaŭas.

Ŝi pacience levprenas la lignopecetojn kaj metas ilin en kadukan infanĉareton.

Rigardahte, mi sentas malfacilon kredi, ke ankaŭ ŝi estas egale homa kiel mi (kaj mi tute ne opinias min altvalora). Tamen, kiam ŝi naskiĝis ŝi eble havis latentajn kvalitojn taŭgaj por ke ŝi estu alia Melba, alia Sinjorino Curie. Almenaŭ ŝi havis la kvalitojn kreski ĝis sana kaj bone edukita virineco; ŝi eĉ povis esti belega, almenaŭ certe bonaspekta kaj kulturita ĝis grado inteligente interesiĝi pri la aferoj de ĉi tiu komplika mondo, kaj eduki siajn infanojn por esti eĉ pli bonaj.

Ĉi tiu mondo starigas abundon da rimedoj por prizorgi la sciencon bredadon de bovoj, ŝafoj, kortbirdoj, kurhundoj kaj -ĉevaloj, kiujn oni bredas sole por la vetado kaj amuzo de homoj, kiuj plejparte tute ne volas eĉ sciiti pri la problemoj de la socio. Kial oni ne povas trovi sufiĉe da tempo kaj mono por kulturati kaj prizorgi homojn, kia ŝi, kiu jam tiel kortuŝe degeneriĝis en tiun ĉi aĉulinon?

Ho rapide venu socio en kiu justa takskapablo pri valoroj nepre certigos al ĉiu burĝonanta etulo plenan kaj utilan vivon, je kies fino ŝi povos feliĉe senti, ke la mondo estas pli riĉa pro ĝia ĉesto.

----- E. HEARNE.

### LA STRANGAJ ANGLOJ.

La tradukaĵo de F.R.Banham en la Julia numero de LA RONDO estis tre interesa laŭ temo, sed miaopinie ne tute kontentiga, ĉar Nina Murdoch, la verkistino, tute ne klarigis, ke nur ĉe nebone edukitaj angloj kaj Aŭstralianoj troviĝas tia neĝentila traktado al fremduloj. Mi mem estas nur unu el miliono da geangloj kiuj neniam ridetis dum fremduloj luktas paroli angle, kiuj neniam uzis tiajn frazojn kiel Dagos, Froggies, k.t.p. Aliflanke, mi rimarkis fremdulojn interŝanĝi inter si ridetojn pro miaj nebonaj provo paroli ilian lingvon kiam kredantaj sin ne observataj. Ankaŭ tiuj, kiuj parolas pri Froggies, havas siajn samklasanojn en Francujo, kiuj nomas nin Plumpuddings, kaj sendube aliaj landoj havas por ni similajn moknomojn. Kaj eĉ se laŭ Nina Murdoch ni estas pli malĝentilaj parole ol alilandanoj, ili certe kuraĝas aĉe prezenti nin post niaj dorsoj.

Estas je mirindaj la kredoj kiujn havas fremduloj pri angloj. Jen notoj el artikoleto en "Life" (Melbourne) Marto 1941:-

Amerikano skribas:- La angloj estas tre stranga raso. Ili manĝas oleecajn malgrandajn fiŝojn matenmanĝe, renspicajon (kidney stew) varmetan kaĉon kaj similajn aĉaĵon. Ili certe tro parolas. (Tio de Amerikano! L.E.B.) Plej multaj angloj, kreskantaj kiel agarikoj en la malseketo, amas akvon, kaj honeste rigardas la marojn de la mondo kiel sian propran havaĵon. Ili traktas fremdulojn per troege komplezo. Ili malamas ŝanĝon, kaj anglaj nobeloj portas saman ĉemizon du semajnojn.

El Germanujo:- La angloj juĝas pizojn kaj fabojn laŭ grandeco kaj ne laŭ dolĉmeleco. Alivorte, ili estas mangavidaĵoj. Ilia matenmanĝo konsistas el bov-tranĉetoj kaj biero. Ili havas la plej stranganĝajn kutimojn en la mondo. En Anglujo ne decas preni salon vi mem, vi devas atendi ĝis oni proponas ĝin al vi. Sed se vi tamen prenas ĝin vi mem, vi devas unue proponi ĝin al via najbaro. Ŝoke estas en angla societo paroli pri religio kaj filozofio. La naskdonaco intence ŝoki apartenas sole al la vera anglo. Li intence marŝas sur la piedfingrojn de aliaj homoj por demonstracii, ke li estas la reganto de la mondo. Germanujo ankaŭ kredas, ke la "Lambeth Walk" estas speco de orgia danco kiu originis en la plej ekstremaj nokto-kluboĝj anglaj. Tiu danco postulas homajn oferojn. Ankaŭ asertas Germanoj:- la brita labor-klaso estas la plej malhigiena en la mondo. Epidemioj ofte okazas inter malriĉaj socitavoloj kaj nepre paralizus la tutan landon krom se ne la ekzisto de vasta ĉeno de izolaj hospitaloj.

Longe antaŭ la nuna milito, Germanoj asertis, ke Britaj virinoj faris el si armeon por defendi la landon. Ofte ili marŝas al paradplaco maldece vestitaj, kaj faras el la tuta afero specon de burlesko.

El Turka ĵurnalo:- Neniu angla edzo kuraĝus alkonduki iun hejmen nur por paroli komercon, ĉar Britujo estas socie regata de virinoj. Turkoj kredas, ke la angloj nuntempe vivas kiel herooj de elegantmodo; ilia plej dezirata celo estas konkuri la film-stelojn.

Nederlando:- El la Eŭropaj fraŭlinoj la anglaj estas la plej danc-frenezaj. Ĉiam ili estas vivtenataj de siaj gepatroj kaj elspezas sian tutan monon por lip-koloraĵo, okulnigraĵo, pudro, unglako kaj cigaredoj. Post preskaŭ ĉiu societa kunveno oni trovas ke unu aŭ pli el la aristokrataj gastoj ŝtelis valorajn aĵojn de sia gastiganto aŭ gastigantino.

El Hungarujo:- La plej alte pagataj laboristoj estas doklaboristoj. Ili kutime ricevas po £8 semajne kaj troege amas rostitan mel-esgron kaj brandon.

Italujo kredas, ke estas laŭleĝa kutimo ĉe Britaj fabrikestroj disdoni opion al siaj laboristinoj, por ke tiuj ĉi laboru pli longajn horojn kaj kun malpli<sup>da</sup> laceco. Mussolini skribas:- "La Angloj estas tre malrapidaj laŭ intelekto. Kion komprenas la Italiano post dek minutoj, la anglo bezonas semajnon por kompreni." Mussolini estis iafojn en Anglujo -- eble la angloj, malgraŭ Nina Murdoch, estis tiel ĝentilaj al li, ke li ne suspektis ke lia anglalingvaĵo povus esti tro fuŝa por facile kompreni.

En nova teatraĵo donita en Moskvo, nomita "Kremlin Chimes", angla romanisto, facile rekonebla kiel S-ro H.G.Wells, aperas fumante cigaron, ĉar kiel en Francujo ĉiu anglo estas supozata porti "plus-fours" (speco el sporta pantalono), kiel simile en Moskvo oni kredas lin senhalta fumanto.

Diras Eŭropa skribisto:- Britaj patrinoj komercas per siaj infanoj, vendante ilin por altaj prezoj. Ekzistas establitaĵoj kompanioj kiuj altigas la aĉetprezon de infano ĝis £500 aŭ £600. El Eŭropo ankaŭ, ni informiĝas, ke ĉiu viro en Britujo estas membro de

kriket-klubo.

Fine, Britaj oficistoj en la kolonioj, kiam ili iras pafi kroko-dilojn, ŝnurligas indiĝenajn knabojn por uzi kiel allogaĵon.

----- L.E. BAILEY.

HOMO KIU NE ŜATIS ESPERANTON.

Sendube multe el la personoj kiuj vizitadis la stratojn de Melburno dum la lastaj kvardek jaroj iam renkontis ĉifone vestitan vireton kiu portis longan grizan barbon, respektindan sed nekombitan -- viron kiu ĉiam portis en la manoj malfermitan Biblion kaj "billycan" (stana ujo por porti likvaĵojn) dum li vagis laŭ urbaj vojoj. Pro tio oni nomis lin "Bible Joe" (biblia Joĉjo). Lia vera nomo estas Robinson Gainsford Surgey, kaj antaŭ longe oni rekonis lin kiel aparte kompetentan koncerne al la Greka lingvo kaj entute pri la "mortintaj" lingvoj. Julio 21 li kolapsis sur urba strato kaj mortis en la ĉefa publika hospitalo aĝe 86 jarojn.

Ankaŭ por iuj Esperantistoj lia forpaso vekas memorojn. En jaro 1912 la Melburnaj E-istoj havis (dum la 2a kongreso) la unuan diservon en sia urbo. Ĝi okazis en St. James' Pro-Cathedral, kiu tiutempe staris sur strato malgranda Collins, apud str. William. Poste ĝi estis rekonstruita sammateriale kaj sandesegne sur strato King, en Okcid. Melburno.

La predikisto ĉe la Esp-a diservo estis Pastro W.D. Kennedy (NSK); ankaŭ partoprenis S-ro A.F. Johnson kaj F-ino Tilly Aston (bele-kantanto). La preĝejo estis homplena kaj ĉio marŝis bone, jen subite tumulto epizodo. Surgey paŝis antaŭ la parolanton kaj laŭte protestis kontraŭ uzado de ia lingvo "ne komprenebla por la ordinaraĵoj personoj" (vidu artikolon xxiv en la Komuna Preĝlibro) en Anglikana preĝejo. Oni kondukis lin eksteren dum li ankoraŭ kriegis.

De tiam ĝis la semajno antaŭ liamorto mi ofte renkontis lin. Lia vesto estis ĉiam multe uzita, liaj botoj pezaj kiel tiuj de plugisto, kaj sen laĉoj, kaj ĉapelaĉo tute sama kiel tiu portata de sovaĝeja bovĉaristo. Li estis "ĝismedola" vagemulo. En la lastaj jaroj li povis nur paŝeti. Post la afero ĉe St. James' mi neniam aŭdis lian voĉon.

----- C.W. BALLARD

EXTRACT FROM THE SECOND EDITION TO "BUCH DER LIEDER"

Among the most unhappy blunders of mankind belongs this: that it foolishly mistakes the worth of the gifts that Nature places most accessibly in its path, and esteems most precious those that are reached by it only by dint of great difficulty. The gem bedded in the earth's bosom, the pearl hid on the sand-bank, man holds to be the best treasures; he would give next to no attention to them had Nature cast them at his feet like pebbles or shell-fish. We are indifferent to our admirable qualities; concerning our deficiencies we so long to delude ourselves that we end by regarding them as excell-

encies. Once, after a concert by Paganini, when I walked towards this master in glowing laudation of his violin playing, he broke on me with the words: "But how did my bows and compliments impress them to-day?"

Al la plej malbenaj erarparŝoj de la homaro apartenas tio ĉi: ke ĝi infanece malsupertaksas la valoron de donacoj, kiujn la Naturo la plej oportune metas en ĝian vojon, kaj rigardas kiel la plej akirindajn tiujn, kiujn ĝi povas atingi nur per penado tre malfacila. La gemo firme kreskinta en la sino de l'tero, la perlo kaŝita sur submara sablo, estas ĝiakrede la plej bonaj trezoroj; sed se la Naturo estus ĵetinta tiujn al ĝiaj piedoj kvazaŭ ili estus ŝtonetoj aŭ miteloj ĝi preskaŭ neniom atentus ilin. Ni indiferentas pri niaj admirindaj kvalitoj; sed pri niaj mankoj ni trompas nin tiel trelonge, ke ni finfine venas al tio: rigardi ilin kiel bonegecojn. Foje, post koncerto de Paganini, mi alpaŝis tiun majstron, ardante lin laŭdi pro la violonludo. Li interrompis min per la vortoj:- "Sed kiel impresis la publikon hodiaŭ miaj komplimentoj kaj bustkliniĝoj?"

El Heine----- F.R.BANHAM (trad.)

### ASOCIAJ AFEROJ.

ESTRARO. Ĉar plia voĉdonado estas nenecesa, mi deklaras la jenajn elektitojn:- Prezidantino, S-ino F.Rawson; Sekretario, S-ro G.H. Hillerman; pliaj Estraranoj, S-ro P.Schwerin, S-ino A.Douglas.  
2:7.42. E.A.Turner (Eksiĝanta Prezidanto)

S-ro Turner, kiu rifuzis nomiĝi por Prezidanto, petis min regi la elekton pri Vic-Prezidanto. Per ĉi tio mi deklaras lin senkontraŭstare elektita Vic-Prezidanto. 4.7.42 G.Hillerman (sekretario)

ALIĜO AL I.E.L. Via Komitato decidis, ke la Asocio tuj aliĝu al Internacia Esperanto-Ligo. Ni jam kablogramis aliĝpeton al la Ligo.

EKZAMENOJ. La Sek. ne plu tenas materialon pri ekzamenoj, Bonvole turnu vin rekte al unu el la specialaj ekzamenistoj -- Pastro C.C. Cowling (Tas.) S-ro F.R.Banham (Vic.) kaj D-ro F.J.Williams (QLD). Espereble ĉiu progresinto uzos la nunan ŝancon konfirmi sian studon per ekzameno.

ADRESARO. Por ĝisdatigi vian ekzempleron bonvolu noti la jenon. La cifero rilatas la koncernan paĝon. Pliajn ni avizos pli poste.  
Aldonu: 13 Fn B.Fearmine, 27 Chapel St., East St.Kilda. R.A. -- 15 Sr J.McDonald, c/- Poultry Farmers Co-op Socy, Red Comb House, Roma St., Brisbane, B.F3. VF-5, R.A. -- 17 Sn F.Bunney, Mt.Helena. -- Sn I.E.Caldera, 229 St. Georges Trce, Perth. R.A. -- 17 Sn J.D. Chinn, Udoc Rd., Harvey. -- 17 Sr L.Cox, 41 Benwick St., South Perth. -- 18 Sn A.O.Miller, 73 Berwick St., Victoria Park. -- 18 Sn A. See-ligson, Flat 1, 14 Outram St, West Perth.

NOVAJ ADRESOJ. 9 O.Davies, Upper Ferntree Gully, A,R,M. -- 11 S.Ling  
 Heatherton Rd., Noble Park. -- 11 K.G.Linton, 485 St.Kilda St., El-  
 wood, S3. -- 13 G.Peers, 37A Caroline St., Sth Yarra. D,R,A. 15 A.S.  
 Frost, 19 Beatrice St., Jubilee Terrace (ktp) -- 15 H.N.Love, 23  
 Railway Pde., Clayfield N2. R,A. -- 16 N.G.Mills, Cnr. Durack St.,  
 and Ipswich Rd., Moorooka, S4, Brisbane. D. -- 17 Sr Burt, Commer-  
 cial College, 194 St. George's Trce., Perth. W D. -- 21 F.A.W.  
 Thomas, "Burramaronga", Avoca Beach Via Gosford R A. -- 9 Fn V.Cox,  
 "Las Rosas", 31 Albany Crescent, Surrey Hills. A,R,D,VD.

LIBROSERVO. Dankon pro la jenaj donacoj jam ricevitaĵ:- S-ro A.Saar  
 3/-, D-ro F.J.Williams 10/6, S-ro G.Hillerman 10/6. Ni denove atentig-  
 as vin pri la donacpeto en Julia numero. Ankaŭ ni ricevis de D-ro  
 C.J.Caldero £1, S-ino I.M.Caldero £1.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de membro-abonanto S-ino S.Dunn,  
 F-ino I.James, F-ino B.Ferrmine, S-roj A.Saar, W.Drummond, G.Peers,  
 D-ro F.J.Williams, S-ro R.R.Rawson, S-roj J.Meehan, E.C.Belcher,  
 A.W.McKenzie, Edgar Walker, S-ino E.M.Hill. S-ino Mayall.

Kotizoj kaj ABONOJ. Membro-Abonanto 5/-. La Rondo al nemembroj 3/6  
 afrankita. Ĉiam atentigu la adresiton pri via ĝusta volo pri mono.  
 Sur poŝtmonbileto NE enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos  
 ĝin.

Sinjoro R.Benham  
 Redaktoro "LA RONDO".

G.H.HILLERMAN (Sekretario)  
 Box 75, DEVONPORT. Tasmania.

Kara Sinjoro Banham,

Bonvolu permesi ke mi per nia gazeto, danki ĉiujn, kiuj helpis  
 min kiel Prezidanton de A.E.A. Precipe mi dankas S-ron G.Hillerman,  
 kiu laboregis ĉiam por antaŭenpuŝi nian aferon, ankaŭ mi tre dankas  
 F-inon L.E.Bailey pri presado de nia gazeto kaj la Adresaro, ankaŭ  
 al Fraŭlino W.Addis, kiu ĉiam kunlaboris. En Tasmanio, Sinjorino A.  
 Douglas laboris por la movado daŭre. Al tiuj ĉi kaj finfine al vi,  
 nia Redaktoro kaj ĉiuj helpantoj mi esprimas mian sinceran dankemon  
 je la nomo de A.E.A.

Al nia nove-elektita Prezidanto, Sinjorino R.R.Rawson, mi grat-  
 ulas kaj sendube ni spertos jaron de progreso, se nur ni ĉiuj helpos  
 ĝin kiel vi helpis pasintjare.

Kun Samideanaj Salutoj,  
 Via fratece,

ALLEN TURNER.

KLUBRAPORTOJ: "La Rendevuo". Dekunu progresintoj kun-  
 venis en gaja atmosfero. La sekretario, S-ro E.Hearne, faris la pro-  
 tokolon malenuige. La Prezidanto, S-ro C.Ballard, distris la anojn  
 per prelego pri S-ino Hubbard, tre amuza, kiun li ĉerpis el tridek-

jara "British Esp-ist." S-ino Hanks deklamis poemon de Raymond Schwartz. Sekvis interesa letero de korespondanto en Sydney, kiun S-ino Hintze voĉlegis, kaj kies adreson ŝi trovis okaze de disaŭdigo el stacio 3DB dum la "amatora horo". F-ino A. Godfrey prizorgis tason da teo por ĉiu Rendeŭano; malgraŭ fruaj timoj pri gasmanko, ĉio iris glate.

Melburna Esp-o Klubo: La anoj decidis starigi klason de partoprenantoj en la ekzameno de la Brita Esp-o Asocio. La grupon gvidos F-ino Elsie Godfrey, D.B.E.A. En la distra horeto S-ino Rawson legis amuzan rakonton "Ni estas sep", kiun ŝi mem verkis. Ĉeestis 15 anoj.

-----

REDAKTORA BABILADO.

Latina poeto asertis, ke "nenio rilata al la homaro estas por mi fremda", kaj precipe en la nuna tempo ni povas parafrazi, dirante, ke al nenio rilata al niaj eksterlandaj samcelanoj povas manki intereso por ni. El Londono ĵus trafis min letero de la patro de juna Anglo, kiu portis lumeton por Esp-o en Italujo antaŭ ol tiu lando envenis la militon. Li estas Wilfred Ingle, evangelia misiisto, kiu longe loĝis en Varese kaj La Spezia. Nun li sidas en Franca internigejo. Kernece mi rakontu. Junio 1940 patro, filino kaj filo ricevis akran ordonon el Romo: tuj ellandiĝi. Strange, la permesateston de Wilfred eliri el Italujo la lokaj aŭtoritatoj rifuzis rekonii; tio estis mallega, ĉar ankoraŭ tiam Italujo ne estis en milito. Wilfred povis akompani siajn du familianojn ĝis Genovo, kie la Brita konsulo prenis sur sin la aferon. Patro kaj filino pensis bona, rapide iri el Italujo, do devis adiaŭi Wilfredon la 7 Junio.

Large elvojiĝinte en Francujo por eviti avancantajn Germanojn, ili streĉpene sukcesis atingi Anglujon. Post tri monatoj la Usona ambasadoro en Londono informis la patron, ke Wilfred povis fine trafi en Parizon. Li ankoraŭ tie loĝas. Per la 25-vortaj mesaĝoj Ruĝ-krucaj sariba kontakto estiĝis. Dum 18 monatoj li havis limitan liberon iradi en Parizo, laborante ĉe Sav-Armeo. Sed Kristnaske 1941 oni ordonis lin en internigejon kune kun 2-3000 aliaj civilaj mal-liberigitoj, inter kiuj li faras "multajn kaj helpajn kontaktojn." Pli ol unu Aŭstraliano plume konas tiun gajmienan evangeliiston, kiu cetero laboris por Kristana Esperantista Ligo Internacia, kaj desegnis la devizon sur ties gazeto, "Dia Regno". (Li sendube ŝatus leterojn de E-istoj, kiuj povas sendi per la loka Ruĝ-kruca centro. Adresu: Mr. Wilfred Gothard Ingle, British Civilian Internee No. 1776, La Grande Caserne, St. Denis (Seine), France.)

De Svisujo venis al ni gazeto, kiu diras iom pri la rolo de la Germana kiel lingvo supranacia, kiu estus la administra lingvo de la tuta Eŭropo. "Berner Tagwacht" (Berna Tagviglanto) en artikolo La Lingva Situacio en Eŭropo informas, ke (laŭ "Das Reich") kleruloj en Germanujo nun sin okupas preparante reformojn en tiu nefacila lingvo, ĝis nun precipe ĉe la ortografio. La Latina literaro kaj tipo, antaŭe rigardata kiel "negermaneca", estas hodiaŭ uzata en ĉiuj oficial-

aj komunikaĵoj kaj ĉefaj gazetoj, kaj ĝia ĝenerala uzado fariĝos leĝe deviga. Unu "reformo" probable estos la forigo de la majuskloj ĉe la substantivoj kiam interne de frazo. Tio estus plimalfaciligo de la Germana lingvo, ĉar per la majuskloj lernanto povas tuj rekoni almenaŭ la substantivojn inter la aliaj gramatikaj formoj en frazo (eg)o. Pure ortografiaj ŝanĝetoj (kia f anstataŭ ph, f anst. v) lasas netuŝitaj la esencajn malfacilojn de tiu graka idiomo, kun gramatiko plena je senutilaj arkaismoj kaj deklinacio obeanta al neniu precizaj reguloj. Kiel medio de interpopola interkomprenado ĝi estas diable tro komplikita.

Halo, Anna-oj! Vi havas malfacile E-igeblan nomon, sed sciu, ke Sveda erudiciulo Karlsen nomas "Anna" la virina nomo plej uzata -- 96 milion. Nur 91 milion virinoj nomon "Maria" havas.

-----

RESPONDOJ.

POO. (Tradukaĵo 5): Ĝi ne estas preseraro por "povo", sed signifas "rate of". "Fo" estas prepozicio sig. "at the rate of" (ne "for every", kiel multaj erare pensas); tial "poo" estas boĝeformita substantivo, sed tre stranga aspekto pro sia nekutimeco. Nur G. Gordon uzis ĝin ĉis nun laŭ mia scio.

INSTINKTO AU INTUICIO? (Notaro 30/11). Estas diferenco inter tiuj ĉi iom tre filozofiecaj vortoj. Instinkto estas enaska inklino en la vivantaĵoj, precipe ĉe la bestoj, kiu pli-malpli manifestiĝas en agoj ŝajne raciaj sed efektive farataj sen konscio pri kaŭzo kaj efiko. Intuicio estas la tuja senpera kompreno de la menso pri afero, sen ajna helpo de la rezona povo; tuja kompreno de aferoj pere de la sehto.

ATENDI, ĈEESTI. Thirty attended the meeting (Tridek ĉeestis la kunvenon. NE atendis (waited for)...).

----- F.R.B.

NU, TRADUKEMULOJ. (p.139)

Tradukante kelkajn el la frazoj senkontekstaj sur p.139, ni devis fari laŭ la koncepto, spirita bildo, de la koncernaj frazoj. Ekzemple, "she swept into the room" povus mense bildigi (inter aliaj) fieran, aŭ koleran, aŭ riĉe vestitan sinjorinon plimalpli rapide (aŭ gracie) enirantan ĉambron; simile ĉe "bland", kiu povas elvoki ideojn pri mildo plus memkontento aŭ satiro aŭ ĝentilo aŭ komplezo...; ĉe (e) "invidious" ŝajne estas erare anstataŭ "unenviable". "Gingerly" ankaŭ estas multnuanca vorto; elegantulo portas malpuran katon nauzate-zorge. Ĉe (a) pedanto povus penadi esti pli preciza, je la kosto rezigni pri la neteco de la originala frazo. "De" estas tre tro multsenca, do li eble eksperimentus per "fare de", de per" en

la dua klaŭzo.

- (a) Regado super la popolo, de la popolo, por la popolo.  
 (b) Li paŝetis timzorge laŭ la morttabulo (de pirata ŝipo).  
 (c) Ŝi susureflugpaŝis gracie en la ĉambron.  
 (d) Milda rideto.  
 (e) Li estis en situacio neenviinda.  
 (f) Ne faru enviigajn distingojn (ofende distingajn rimarkojn);  
 Dio ne privilegias personojn (Acoj 10/34); Ne distingu vizaĝojn ĉe la  
 jugo (Readmono 1/17); Ne atentu personojn (Readmono 16/19).  
 (g) Deŝtatigo kaj sendotigo (de la Eklezio).  
 (h) Ne plu savebla.  
 (i) Malgraŭ mia plena respekto por vi.  
 (j) Ŝi ne imponas per eksteraĵo.  
 (k) Kapo postebrie peza.  
 (l) Eĉ ne la plej malgranda supozeto.  
 (m) Kun deca dubo.  
 (n) Jam ne multe mankas ke mi rememoru (la nomon). Ĝi estas  
 preskaŭ dirpreta (sur mia lango).

----- F.R.B.

KASO de LA RONDO.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£ s d	<u>ELSPEZOJ</u>	£ s d
konta Transpreno.....	0-13-2	Poŝto.....	15-0
S-ino Glenie.....	2-6	inko.....	12-6
S-ro Earne.....	2-3	papero.....	16-0
S-roj Bantick, A.Saar, G.Peers,		ŝablonaĵoj.....	11-4
Dr. F.Williams, 3/6.....	14-0	bindpingloj.....	1-6
F-inoj James, Pearmine 3/6.....	7-0	luo.....	5-0
S-ro Drummond.....	6	okazaj elspezoj.	2-4
S-ino M.Myall.....	3-6		<u>£3-3-8</u>
	<u>£11- 2-11</u>	En la Kaso	
F-ino W.ADDIS		£7-19-3..	
25 Greville Ave.			<u>£11-2-11</u>
Flinders Park, S.AUS.			

Respondante al leteroj:- El ĉiu 5/- duobla kotizo ricevata, La  
 Kaso de LA RONDO prenas 3/6 kaj Aus. Esp. Asoc. kaso 1/6. W.A.


-----

A list of printing errors not corrected in this number will be  
 given in September. ERAROJ en la JULIA No. -- P.137, 1.18 (intervjuo)  
 1.32(jaraĵa); p.138, 18(Symbolology); p 140, 7 de malsupro (uzaĵo);  
 p. 141, 1. 19 (ilkins).



Oficina Organo de la A.E.A.

La RONDO.



sept 1942

No 24

Eldonita de F.R. Banham  
2. Banchory St Essendon W5 Vic AUSTRALIA.

LAU LA TRADICIO.

S-ro Henry Seager milde-ĝue promenis en la parkon kaj paŝis senurĝe en direkto al ŝia preferata sidbenko sub ombro de multaga ulmo. La benko proteste ĝemis dum li mallevis la korpon, ĉar Henry Seager estis homo korpulenta kaj pezis minimume funtojn 250. Sidiginte, li spirblovis kontente kaj streĉis la karnriĉajn krurojn.

Antaŭ horeto li finis superbelan manĝon kaj lavis la gorĝon per unu-du glasoj da bonega vino vere oportu; tial li estis en humoro indulgema, en kiu viro ordinare inklinas rigardi kun de-alta simpatio siajn ne tre saĝajn kunhomojn. Kun la dolĉa sento de korpa komforto, kiu normale akompanas digestadon de bonkvalita manĝo-vino, li plezurapatie lasis la vidon fiksiĝi sur la miksmova fluo da zumantaj aŭtoj kaj dise vagantaj piedirantoj.

"Tre plezura vespero," ekrimarkis viro en trouzita vesto, sidanta sur la benka fino. Ĝis tiu momento S-ro Seager ne donis al li pli ol tre indiferentan rigardon.

"Ja vere," li konsentis. "Mia opinio," daŭrigis la alia, "Junia vespero en Anglujo estas nekompareble bela."

"H'm, pravdire," gruntis S-ro Seager dum li eltiris grandan cigaron el bel-leda ujo. Per ora ileto li zorge fortranĉis ĝian ekstremiton antaŭ ol meti ĝin inter la grasajn, bonerazitajn lipojn. Almeto ekflagris, lasante klarvidi la trajtojn de la brulruĝeta, dikvanga, riĉe nutrita vizaĝo de S-ro Seager dum li tuŝigis flameton al la cigaro.

Sopiris la ĉifonulo, ekklarante la aromon, kiu naĝis en la milda atmosfero. "Menio pli bona ol altkvalita cigaro," li diris.

En la ombroj la cigaro trembrilis kiel rubeno. "Ea, h'm," gruntis S-ro Seager, kiu (mi aldonu juste) neniel estis snobo (1). "Kaj tiu, kiun vi nun fumas, estas bonega el Havana; se mi eraras, mi ne plu kompetentas taksi," aldonis la alia.

S-ro Seager pafis al li esplorrigardon. "Vi do kapablas taksi cigarojn?" li scivolis.

La malelegantulo amare ekridis. "Mi ja kapablas, sinjoro. Iam nur tiajn mi fumis. Sed en la nunaj tagoj mi trovas malfacila eĉ fabrikaĉi cigaredon."

S-ro Seager, malgraŭ certaj ŝajnoj, estis efektive bonkorulo kaj kompatis malfeliĉulojn, kondiĉe se esprimado de tiaj sentoj neniom forprenus de lia komforto. ~~Ĉelita~~ de impulso li proponis la cigarujon. "Prenu, ĉu?" li invitis.

La alia hezitis. "Vi estas tro bona, sinjoro. Mi esperas...."

"Ne, ne," instigis S-ro Seager. "Prenu ja. Mi ne domaĝas ĝin, precipe donante al fidinda taksanto de cigaroj." La vestaĉulo akceptis ĝin. Du rubenoj tremadis en la mallumo. Post iom da silento la ricevinto rimarkis: "Mi gratulas vin, sinjoro, pro via ekstreme evoluinta gustsento rilate al tabakon. Neniam mi fumis pli plezurdonan cigaron. Mi kore dankas vin pro vere riĉa regalo."

S-ro Seager murmuris plaĉon. "Kubo ne povas produkti pli bonan," li asertis. "La tabako estas kultivata en speciala bieneto kaj fabrikata laŭ mia preciza instrukcio."

"Mi vin envias," diris la homo en trouzita vesto.....

S-ro Seager pene nevigle levis sin surpieden kun sopireto.

"Nu, jam tempo hejmen marŝi." Apenaŭ li paŝis kelke da futoj, jen lia kunulo vokis: "Flankdire ĉu maljuna Cliveden ankoraŭ tenas ĉe si la bonegan vinon de Oporto, pri kiu li fieradis?"

S-ro Seager ekturnis sin abrupte kaj time fiksrigardis la vestaĉulon. "Kiu vi estas?" li balbutis, demandante al si, ĉu tiu estas iom frenezeta amiko de maljuna Lord Cliveden. "Ne embarasiĝu. Gibson estas mia nomo -- Daniel Gibson," la alia informis ridete.

"Gibson?"

La malriĉaspekta viro starigis. "Jes. Iama ĉefservisto. Mi ricevis maldunĝon pro troinklino prenadi la cigarojn de mia mastro. Nu do, ĉu fareble konduki min endomen por diskrete ricevi vespermanĝeton kaj glason da tiu vino el Oporto, pri kiu la maljuna lordo tiom fieris?"

"Venu do," malafablis la nuna ĉefservisto, kapitulacante al la milda ĉantaĝo.

(1) Snobo. En Fulcher & Long kaj Plena Vortaro. La unua difinas simple per "snob"; la dua per "homo, kiu konstante, stulte kaj sendistinge admiras kaj imitas ĉion ajn, kion li kredas laŭmoda" Tamen la senco de la vorto uzita en la rakonto estas: "homo, de pli-malpli alta socirango, kiu malestimas tiujn sub sia klasnivele kaj laŭeble evitas kunulecon kun ili."

----- F.R.BANHAM (Trad.)  
(Lynn Dacre en "London Opinion".)

### KARIERULINO. (de Heather Gilligan)

Knut iom delirete rigardis en la violbluajn okulojn de la gracia floristino.

"La tute plej belajn florojn..., nur tiujn..., " li balbutis, kaj aldonis, "Ĵu, kiajn vi elektus por vi mem."

"Ĉu la dekduon?" ŝi sugestis glatvoĉe kaj kun la kraĵono pretskriba.

"Duoble tiom," respondis Knut. "Jen la adreso. Vi nepre alvenigos ilin dum la mateno, ĉu ne?"

Li jam trovis sin en la strato. Jesja, estas alio, kion li volas aĉeti. Kio do estas? Ha! kandaĵo, bombonoj. Li eniris la plej apudan frandejon, kaj zorge elektis la plej imponan el la bombonujoj en la butikoj.

Treble, ke Primola ankoraŭ ne povos manĝi ilin. Nu, ili ne difektigos. Eble, ke la bebo manĝos ilin, kiam ĝi -- li -- alvenos. Beboj, supozis Knut, manĝas tiajn samajn aferojn, kiajn infanoj. Li mem ŝat-adoris kandaĵon, estante knabeto.

La frandistino rid-singultis kontraŭ lia mendo, "Ĵon por beŝeto." Negrave. Li pagis per sia lasta funtbileto kaj viŝis la ŝvitan frunton. Li nesciis, kiel opinias Prinjo, sed por li: fariĝi patro estas multe pli eluza afero ol tuta tago da penado ĉe la laorejo.

Sed, jen li ne estas telefoninta la hospitalon dum plena horo -- nu, almenaŭ duonhoro.

Novajon li ne ricevis. Sinjorino Knuterfilo tiel same ankoraŭ statas. Ne, nebezone ke li venu. Knut enpoŝigis la manojn kaj sencele rigardis montrofenestron. Neniel utile, iri al la laborejo. Do li tamen iru al la hospitalo, eĉ se li estus nebezonata.

... ..  
 Venis eke en la Knut-an kapon, ke jen estas hodiaŭ la dua datreveno de ilia geedziĝo. Strange, se ĝi -- li -- alvenus en tiu ĉi tago. Estus kvazaŭ familia afero. Estis antaŭ du jaroj, kiam Primola rezignis sian postenon inter la ĵurnalanaro, kaj ili akiris specialan geedziĝ-permeson. Ŝajnis al li, kvazaŭ nur hieraŭ li kuregis al ŝia oficĵo, kaptis ŝian maneton, kaj ekkriis:

"Prinjo karulino! Jen mi ricevis la salajro-altigon! Kiel vi opinias; ĉu ni tuje tuj geedziĝu, jam nun?"

Kaj Primola, momente senspirigite, surkapigis la purpuran ĉapleton, dirante: "Do kial ne?"

Ili ne havis la tempon por ion plani. Knut eĉ forgesis, ĝis post la ceremonio, aĉeti por ŝi florojn. Sed jen, preterpasante florkioskon, li subite ekvidis ornarisojn, konformantajn al la oro de ŝia hararo kaj al la strietoj en ŝiaj avelbrunaj okuloj. Da ili, li estis aĉetinta tri grandajn bukedojn, kiujn li premis en ŝiajn brakojn. Tie ŝi staris en la ora sunlumo, ridante, kun la oro de la "dafodeloj" kontraŭ la bluo de sia mode tajlorita kostumo. Neniam Knut povis forgesi tiun tiam prezentitan bildon.

Li estis vokinta taksion, kaj ili veturis al ŝiaj ĉambroj por detemi la florojn. Tri ŝi retenis kaj alpinglis ĉe la brustfaldo de sia kostumo. Plie, ŝi insistis, ke ankaŭ Knut portu je unu. Poste ili veturis al kafejo, kaj celebris per festeto el kafo kaj biskvitoj efektive ne tre pompa geedziĝglunĉo, sed plena de gajo.

Kiam ili revenis ŝian oficĵon, la estro de Primola, post serĉa rigardo al Knut, estis dirinta: "Ha! jen estas la adiaŭ." kaj tiel estis.

Tiun posttagmezon ili trovis apartementon -- ne tre grandan -- sed sufiĉe grandan por du; por du kaj ono. De tiu apartemento vidiĝis la haveno tiel, ke ili povis subenrigardi el la manĝoĉambro al la briletanta akvobluo kaj la vagaj ŝipetoj diversspecaj.

... ..  
 En la komenco Knut dubis, kiel ŝi alkiutimiĝos. Ŝi estis jam tiom kutimiĝinta al plene okupita vivo; kaj nun, ŝi devas resti hejme dum la tago, kaj mastrumi per lia salajro de suba kunestro.

Kiel bone li rememoris tiun tagon kiam, hejmen reveninte, li trovis ŝin aparte gaja kaj vivobrila, jes, eĉ iom tro vivobrila kaj iom tro gaja. Post la vespermanĝo, kiam ili sidadis kune sur la kanapo antaŭ la "radio", Prinjo estis dirinta per tiu ŝia dolĉe cediga voĉo.

"Knuĉjo, ĉu vi tre ĉagreniĝus, se mi reirus la oficĵon? Ne por konstante, sed nur tra kelkaj semajnoj. Ĝuste nun ili estas tre helpbezonaj."

Sed Knuĉjo estus treese ĉagreniĝonta. Li ja tute ne plenumis la edzinigon de Primola, supozante, ke ŝi ree volos "labori". Kaj Prinjo ankaŭ ofendiĝis. Estis ilia unua disputo. Eĉ en la nuna

momento, rememori tiun aferon dolorigis Knut-on.

Tutan la tiaman nokton li forpasigis kun Toĉjo Tombako. Li ne enhejmiĝis ĝis la frumateno. Kiam li eniris, tie ŝi sidis, maldorma, atendanta lin, kun senrozaj vangoj kaj sekaj okuloj, iel vundita.

"Knuĉjo, kio estas al ni?" ŝi demandis kiam, enveninte, li laco-plene sterniĝis en apuda seĝo.

Kaj tiel finiĝis tiu afero. Ambaŭ estis sentantaj sin mizeregaj. Sed ĉio tamen estis ree en ordo. Prinjo ne reiros la oficejon. Knut ne plu estos tiel suferigata.

Tamen, de tempo al tempo piketis lin obstina penso. Oni ja estis asertinta, ke Prinjo trafos la unan rangon ĵurnalistan, kaj tio post ne tre longe. Eĉ al Knut, kiu ne pretendis ian kritikan sperton, ŝiaj artikoloj aspektis neordinaraj. Tion ankaŭ opiniis ŝia estro, Azel Perlakonk. Kiam ili malkaŝis al li pri la geedziĝo, li estis dirinta: "Do, vi forrabas mian plej talentan de specialaĵoj verkiston. Kaj tion neniam forgesu. Atentu, Prinjo knuterfilo, se iam la edzo malbontraktos vin, vi jam scias kien iri por rehavi postenon."

Ĉe tio ĉiuj kune ridis, kaj estro Perlakonk amike frapetis Knut-on sur la dorso kaj deziris al ili ĉian bonŝancon kaj daŭran feliĉon.

Post tiu unua disputo ili neniam aludiis la oficejon. Tamen, ne-kontraŭdireble, ke antaŭ la geedziĝo ŝi jam vidis la celon trafata de ŝi, karierulino. Kian grandan signifon tio ĉio devas havi por virino tiel senlace kaj fervore luktanta. Kiom da plezuroj ŝi estas volonte cedinta; kiom da longaj kromhoroj dediĉinta al tiu sia kariero.

Unu fojon Knut diris al ŝi: "Prinjo, vi ne bedaŭras esti forlasinta la ĵurnalon, ĉu?"

Kaj Primola restis silente sidanta tra momentoj. Poste ŝia maneto premis lian.

"Ho, stultuleto," ŝi diris.

Tamen Knut ankoraŭ ne entute maldubis. Li rememoris la surprizon okazigitan, kiam ŝi komencis mastrumi ilian hejmon. Tiu ilia geo; kaj tamen ili estis tiom diferencaj unu de la alia. Knut ja havis la reputacion de bonulo, laborema sed ordinara, male, Prinjo estis tiel lerta kaj sporta. Ŝi estis jam rekonata. Ŝia kariero jam estis flore burĝonanta.

Enveninte hejmen ĉe la noktigo, kaj trovante, ke jen ŝi atendas lin kun la vespermango tablopreta, li ne povis sidi vidalvide, krom adorante per siaj okuloj el la fundo de am-inundita koro. Neniam li povos repagi al Prinjo. Al Prinjo, rezigninta sian postenon pro li.

Estis fojo, kiam tion li diris al ŝi. Flugis al ŝiaj lipoj tiu nerezisteble dolĉa rideto, kiam ŝi respondis:

"Knuĉjo, la kariero estus vana afero, se ĝi kondukus al izoligo."

La respondo feliĉigis lin. Ĉu ĝi ne signifis, ke ŝi trovis kontenton? Eĉ se ŝi bedaŭretus la oficejon, ŝia respondo tamen montris, ke ŝia vivo kune kun li estas la preferata.

"Vi estas tiel kara, Prinjeto," li estis dirinta, kaj mense vipis sin pro sia neeblo elpensi pli trafan frazon.

"Karega ankaŭ vi," ŝi respondis, kun tiu karesa rideto ankoraŭ fluganta ĉirkaŭ ŝiaj lipoj.

Ree Knut staris kaj rigardis en montrofenestron. La varojn li ne vidis, nur konceptis terurajn pensojn pri katastrofo trafanta Prinjon, solan en la hospitalo. Tiaj tragedioj ja okazas. Se malprosperus pri Prinjo, li ne povus travivi.

Ĉe la hospitalo oni aspektis neparolemaj kaj okupitaj. Knut ek-sidis en la venta atendejo, kaj nerve ludetis per la ĉapelo en siaj manoj. Ŝajne, ŝi jam estas en akuŝsufero.

Li fikse rigardis malbelegan vazon, en kiu kelkaj velkintaj floroj. Ho! Ĉio, estu kompatema. Ne permesu tragedion. Ne al Prinjo. Ne al Prinjo tiel gaja, tiel vivoĝua.

Tamen, li ne devis esti sin turmentinta. Ĉio prosperis. Li povus scii, ke Prinjo estos traluktinta. Ŝi ne estas la tipo, kiu rezignas en la lastaj momentoj.

Poste, kiam li eniris la ĉambreton kaj vidis ŝin kuŝantan tiel senmova kaj senpova en la malgranda lito, io okazis al Knut. Li sentis sin humiligita; kaj lia nuna malfiero ne estis tia, kiam li sentis dum la geedziga sakramento, ĉar kompreneble li ĉiam sentos humilon pro tio ĉio, kion Prinjo estas foroferinta por li.

Estis alia speco de malfiero. Preskaŭ adorkliniĝo. Tiel malgranda ŝi aspektis tie, kun la ora hararo dissternita ĉe la kapkuseno, kaj tamen, kiomege pli granda ŝi estas ol nura li. Jen ŝi estas kreinta kion neniu en la mondo kapablas kopii.

Knut eligis eĉ ne vorteton. Li simple surgenuiĝis apud la lito kaj palpetis por ŝia mano. Ĉe tio ekmalfermiĝis ŝiaj avelbrunaj okuloj, kaj ŝi ridetis. Moviĝis ŝia libera mano, kaj Knut ektrovis sin rigardanta en la okulojn de la novenaskito. La okuloj de lia fileto estis grandaj kaj brunaj, kaj orstriitaj kiel tiuj de Prinjo; la vizaĝo ruĝa, kaj sulka kiel la propra kiam io perpleksas lin kaj li ne scias ĝuste kion fari.

"Prinjeto!" ekkrietis Knut. Plion li ne povis elbuŝigi; ŝveliĝo en la gorgo malpermesis vortojn.

Ree ŝi ridetis kaj ekpemis lian manon.

"Li ja estas komikuleto, ĉu ne, Knuĉjo?" ŝi flustris.

"Uhu!"

Silento ree regis, kaj liaj okuloj transiĝis al ŝia blanka vizaĝo. "Prinjo," li kuraĝis, "jen mi repensis. Vi rememoras, kion diris Azel Perlakonk, via estro; ke vi jam trafas pri la kariero. Nu, mi opinias, ke se vi ankoraŭ deziras...."

Ŝi estis rigardanta en ĝian -- lian -- vizaĝon, kaj denove, flirtis tiu karesanta rideto ĉirkaŭ ŝiaj lipoj.

"Stultulo karulo," ŝi murmuris. "Ĉu vi ne povas percepti, Knuĉjeto? Jen estas la gloro kaj la famo. Jen la plena kariero."

Kaj knuterfilo, alrigardante la ruĝan vizaĝon de la komikulo, komprenis, ke ĉio efektive estas kaj restas en la plej bona ordo.

"QANTAS" MALFELIĜEGO.

La flugboato forlasis Darwin je 21.30 G.M.T. la 29 Jan. 1942. Je preskaŭ 01.15 G.M.T. nin atakis Japanaj flugmaŝinoj.

Bruligo-kugloj kaj kanon-kugloj ŝutiĝis tra la fuzelon. Unu viro antaŭ mi estis mortpafita, kiel ankaŭ aliaj en la promenejo. Kelkaj el ni tuj faligis nin sur la plankon, kio sendube savis nian vivon. Trafiĝis la maldekstra kaj, tuj poste, alia motoro, kaj la du fariĝis maso da flamo. La kajuto plenigis per fumo. La flugboato rapide perdis alton kaj falis en maron, po 120 mejloj en horo. Kunfrapo rompis la dorson de la flugboato, kiu estis traborita de kanontruoj. Rapide antaŭenpuŝata sub seĝoj kaj ruinaĵo, mi pensis min preter savo, kaj ke miaj lastaj momentoj jam venis. Mi tenis al mi la spiron sub la akvo, da kiu mi tamen devis engluti kelkon. En tiu momento la maro fariĝis pli hela. Baraktante supren, mi trovis min ĝuste ekster la flugboato. Kelkaj aliaj viktimoj naĝis ĉirkaŭe, kaj diversaj objektoj disjetiĝis sur la maro. Opiniante ke eksplodos la furioze flameganta flugmaŝino, mi naĝis for de ĝi al videbla poŝtsako. Mi mem vidis zumi supren nur unu aeroplanon, sed la Kapitano diris ke estis sep. El dekok, suraeroplano, sep personoj sin liberigis, kaj kvin el tiuj sukcesis naĝi tri-kvar mejlojn al la marbordo de Timor. La ĉefoficiro helpetiris en pajlo-korbon la senfaden-telegrafiston, sed, pro tio ke li estis tro multe vundita, tiu ne povis naĝi. Alia, kiu ne sukcesis, estis la sola kun savzono, sed, grave vundita, li eble baldaŭ senkonsciigis -- oni ne plu vidis lin.

Kapitano Koch, kvankam grave vundita, kune kun S-ro Moore, ekiris naĝi al la marbordo por havigi al ni helpon: la aliaj dise naĝadis. Mi ne vidis ŝarkojn, sed konfesas ke mi tre timiĝis pri ili -- eble la perdo de miaj okulvitroj estis beno! Tamen, ŝarko ĉirkaŭ-naĝis unu viron, sed ne atakis. La akvo estis varmeta. La naĝado de tri-kvar mejloj ĝis la marbordo okupis tri horojn. La poŝtsako, kvankam tre peza pro la akvosorbiĝo, restis flosipova kaj poste pruviĝis altvalora. Ĝi enhavis drogon uzatan por malebligi gangrenon, malarion, k.t.p. Tiu drogo eble helpis savi al ni la vivon.

Atinginte la sablejon, mi ekvidis Moore, kaj neniam en mia vivo mi tiel ĝojis iun renkonti! Kune ni iris al la kapitano kaj trenis lin pli for de la ondoj. Kvankam unu kubuto estis vundita, kaj la kruroj senutilaj, tamen li elfaris la longan naĝon. Ni tiam serĉis postvivantojn. Poste atingis la marbordon S-roj Lyne kaj Fisher, kun fortoj tre elĉerpitaj. Fisher havis tri rompitaĵajn ripojn, kaj grave tranĉitan fingron.

Pro tio ke ni ne povis trovi trinkakvon, Moore kaj mi iom serĉis, lasante Lyne prizorgi la du vunditajn virojn. Irante ĉirkaŭ 1/2 mejlojn, ni transnaĝis riveron, larĝan je triona mejlo. Ankoraŭ ni ne trovis akvon, kaj fine, pro la mallumo, ni kunamasiĝis en kaverno kun herbaĵo kiel lito, ĉemizoj kiel kovraĵo. Pluvegis dum la nokto, tial, trinkante la akvon fluantan de sur la arbofolioj, ni iomete sensofiiĝis. Je sunleviĝo, post senkomforta, malvarma kaj malseka nokto, ni aŭdis kokon krii. Irante en la direkto al tiu hejmejo sono, ni

ekvidis indiĝenan vojstrekojn, kaj, poste, alvenis al saleta akvo, el kiu bestoj trinkis. Ni tuj malsupreniris sur manojn kaj genuojn kaj sat-trinkis. Biero aŭ kiu ajn trinkaĵo neniam estis por ni tiel bongusta! Irante laŭ la vojstreko, ni alvenis al indiĝena kamploĝejo. Tial, ke li povis paroli la Malajan lingvon, Moore klarigis pri nia embaraso, rezulte ke la agrablaj indiĝenoj provizis nin per trinkomango. Akompanante nin al la rivero, ili portis kukurbon da akvo, kaj korbbon da dolĉa greno. Konstruante krudan floseton, ili ligis al ĝi la nutraĵon. Tiun ni trenis, kiam, ĉe malaltmaro, ni renaĝis la riveron. Je krepusko ni alvenis al nia restejo. Lasante min prizorgi la du malsanulojn, Moore kaj Lyne naĝis trans la riveron, kaj restis tiun nokton kun la indiĝenoj. Tio estis sabato, vespere.

Dimanĉon, 1 Februaro, mi eliĝis el mia malmola dormloko -- kavo en la sablo, kovrita per palmofolioj, kiel iometa ŝirmo kontraŭ pluvo. Mi tiam transnaĝis la riveron, kaj iris al la kampejo. Lyne, al kiu doloriĝis la piedoj, devis resti tie, sed Moore, rajdante ĉevaleton, ekiris, kun indiĝena gvidanto, por havigi al ni helpon. La indiĝenoj denove kolektis grenon kaj akvon, kaj prunte-donis al ni kelkajn lumbo-ŝalojn (sarongs), ĉar mi havis nur kalsonon, kaj la aliaj nur unu ĉemizon por ĉiu.

Sekve de tio, Koch kaj Fisher, kiuj ne povis movi sin, fariĝis tre malvarmaj kaj malsekaj, kaj pasigis tre malkomfortan tempon. Ili uzis, nokte, la poŝsakon kiel kovrilon. Je la dekunua horo mi ekiris al la rivero kune kun pli ol dudek indiĝenoj. Alvenante ĝis la sabloj, ili konstruis pli fortan floson por la pli granda kvanto da nutraĵo, kaj fabrikis ŝnuron el palmofolioj, disfenditaj kaj plektitaj. La ideo estis fari kvazaŭan kolbridon, por ke mi povu posttreni la floson dum la naĝo. Mi devis atendi kelke da horoj ĝis la tajdo malaltiĝis. Tamen, pro tio, ke la indiĝenoj malpacientiĝis, mi decidis transnaĝi la riveron, pli frue ol mi deziris. La tajdo ne tute malfluis, kaj la fluo estis forta. Kun indiĝenoj kiel interesitaj rigardantoj laŭ la suproj de la krutejoj, mi ekiris kaj, post multe da malfacilaĵo, tre ĝojis palpi, sub la piedoj, firman sablon. Tirante la floson preter la altmarkpunkto, mi malligis la kukurbojn da akvo kaj greno, kaj revenis al nia kampejo. Strange estas ke la indiĝenoj tre timas pri la akvo. Ili diris ke tie troviĝas krokodiloj. Ĉi tiuj eble estas trovoblaĵoj en la marĉoj sed, mi opinias ke estas tro sale ĉe la loko kie ni naĝis. Mi vidis nek krokodilojn nek ŝarkojn.

Ankoraŭ unu fojon ni pasigis malkomfortan nokton sub niaj palmofolioj, precipe la Kapitano, kiu tute ne povis movi sin. Frue en la sekvanta mateno indiĝenoj rajdis laŭ la sabloj. Rimarkante kiel malfacile por mi estis naĝi kaj, samtempe, treni floson, kaj kiel laca mi fariĝis post la peno, ili decidis seligi la ĉevaletojn, kaj rajdi ĉirkaŭ la supra parto de la rivero. Ili alportis al ni viandon, sukeron, akvon kaj dolĉan grenon. Por ĉio ni tre dankis. Dum la mateno ili konstruis ŝirmojn. Tiu estis bona kontraŭ la suno sed, tuj kiam pluvigis ni malsekiĝis. Tial, ni devis iom alikonstrui por forklini la pluvon.

Estis preskaŭ sunsubiro. Malesperante ke oni savos nin tiun



nokton, ni subite aŭdis la bonvenan zumon de motoroj. Baldaŭ, ser-  
 çante nin aperis flugboato. Flugveturante tiam kaj reen, ĝi ekvidis  
 nin, kaj almariaĝis proksime de nis kampejo. Jam nun mallumiĝis, sed  
 mi povis vidi, alproksimiĝintan tra la ondegoj, kaŭçukan boaton, el kiu  
 saltis kuracisto Pekking, kaj du liaj helpantoj. Prizorginte la du  
 malsanulojn, ni remis trans la riveron kaj iris al la indiĝena kampejo  
 por kunpreni Lyne kun ni. Dum ni restis tie, ni fumis ilian tabakon,  
 kiun ili envolvas en seka folio de dolça greno. Ekstere estis mal-  
 lumege, interne la flamo de la kampa fajro lumigis amason da indiĝ-  
 enoj ĉirkaŭantaj nin. Kiam ni, returne, atingis la riveron, ni trov-  
 is ĝin ĉe altmaro, kaj ĝia larĝo estis granda. Tamen, ni sendangere  
 padelis transe. Portante la boaton, ni rapidis al nia kampejo, kie  
 la altmaro atingis dek futojn for de la palmo-kabano.

Ĉe sunleviĝo komenciĝis tasko transporti la Kapitano al la Neder-  
 landa flugboato. Tio ja estis dolorego por li. Oni metis lin en  
 kuŝantan pozicion, tiam du homoj penis padeli tra la ondegoj. Poje  
 kaj ree ili penis sed, tuj kiam ili padelis preter unu ondego, la  
 sekvanta subakvigis ilin, tial estis necese reveni al la sablejo por  
 ke ili malplenigu la boaton. Fine mi iris tute ekstere en la ond-  
 ŝaŭmon, puŝante kaj senskuige tenante la boaton. Tio peno sukcesis.  
 Prosperis al la aliaj sen malfacilo suriĝi sur la flugmaŝinon. Post  
 kelkaj minutoj ni jam ~~meteris~~ al la libera maro, tiam, kun muĝego de  
 tri motoroj, leviĝis en la aero. *— aŭto kuris*

Baldaŭ ni superveturis la montojn de Suda Timor kaj surakviĝis  
 en la haveno Koepang, mardo, 3 Feb. Ni havis strangan aspekton,  
 vestitaj per ĉifonaj ĉemizoj, portantaj lumboŝalon indiĝenan kaj kvin-  
 tagan barbon. En hospitalo, Koepang, oni bandaĝis niajn vundojn.  
 Koch kaj Fisher tie devis resti, sed Lyne, Moore kaj mi iris al la  
 Resaniĝejo. Tie ni, en la Nederlanda maniero, lukse banis nin en  
 varma akvo. Po! Kiel bongusta ni trovis la Eŭropan manĝadon!

Jen la rakonto pri la fia pafatako de sep Japanaj batalaeroplanoj  
 al unu flugmaŝino. Eĉ la Germanoj neniam faris tian, la flugmaŝino  
 estis nearmita.

Fine, decas ke mi tributu al ĉiuj pro iliaj bonkoreco kaj kompato  
 la indiĝenoj kiuj provizis nin per nutraĵo kaj propramaniere, kuracis  
 niajn vundojn tiel zorge kiel flegistino -- al la Nederlando kaj  
 militistoj kiuj donis al ni vestojn kaj cigaredojn. Precipe mi dank-  
 as kuraciston Pekking, al kiu nenio ĝenis, kaj kiu faris sian eblon  
 por nia komforto kaj bonfarto.

de Lieut. B. L. WESTBROOK Tradukita  
 de lia patrino B. L. WESTBROOK.

#### HEPTAMETRE.

Slumber sweet, all things forgotten, Heaven's chief gift to man;  
 By it earthly life-awareness loses half its span.

Dormo, dolça plenforĝes', ĉefdonac' de l'Dio;  
 Per ĝi duoniĝas ja tera vivkonscio.

----- Originaloj de F.R.B.

WIRY ----- TENDENPLENA.

Kursano sendis al ni kopion de Traduko 30, sur kiu troviĝas konsilo de S-ro Gordon. En tiu konsilo la kursano substrekis la vortojn "Ne tro penu traduki laŭvorte .... Tradukante idiomaĵon oni zorgu pri la vera signifo kaj traduku nur laŭ tiu signifo." Tiujn liniojn li strekligis kun frazo el la Traduko mem: "Sur sia tendenplena ĉevalo," kaj komentis:- "Mr. Gordon seems weak. I don't think his translation of 'wiry horse' is permissible any more than 'ostplena ĉevalo' could pass for 'bony horse'. The first could not have more tendons than other horses unless it was a freak (He might have stronger ones). The second could not have more bones than other horses (freaks excepted). He might have more protruding ones.

No. 1 seems to mean a strong and thin horse.

No.2 " " a horse with less flesh than usual.

This has caused some amusement in Esperanto circles."

RIMARKOJ:- Se S-ro Gordon estis nesukcesa en sia elekto de Esp-a vorto por traduki "wiry" ni devas nomi tia ankaŭ S-ron Millidge, la plej kompetentan Esp-Anglan vortariston en la Anglalingvaj landoj, ĉar en lia vortaro troviĝas "tendenplena", tiu "ridinda" formo, kiu forte amuzis Rondanojn.

Mi ne tro logikeme rigardas "tendenplena" kiel fizike signifantan "plena de tendonoj en sama senco kiel sitelo estas plena de akvo." Komparu "ŝuo truoplena, ŝuo plena de truoj," "pudingo beroplena, pudingo plena de beroj," "Plena Vortaro, vortaro plena de ??". Por S-ro Gordon -plena signifas: "Enhavanta grandan kvanton," kiel ĉe "haveno plena de ŝipoj." La ĉevalo estis tiel plena de tendonoj, kiel permesis tion la leĝoj de la korpa naturo, en tio, ke pro bona nutro, longa ekzerco, pena laboro kaj sandone aktiva vivo la besto havis en si la tendonojn kreske evoluintajn ĝis la plej ekstrema grado de forteco, do ŝvele-grandeco. Tendono estas fibra fasko liganta muskolojn al ostoj, kaj la lokoj en la korpo difinitaj por ili estis plenpakitaj ĝis la limoj de l'atingoblo. Kiam mia amiko diras post bela manĝo: "I'm full!" (mi estas plena) mi simpatie komprenas, ke li volas diri precize-logike: "Mia stomako, mia manĝriceva korpoparto, estas plena."

La lingvo ne sklave sekvas la logikon, sed redonas la sentojn, impresojn, tujajn reagojn de la vidantoj. Rigardante al mizere nutrita ĉevalaĉo, ni facile impresiĝas per la multaj lokoj je kiuj la ostoj videble prepuŝas kontraŭ la haŭto, kaj ni facile formas la frazon: "sako da ostoj."

"A horse with less flesh than usual" ne estas en ĉiu okazo "bony horse", ĉar la velure glata, belkontura vetkurulo ("trained to a hair!") ankaŭ havas malpli da karno ol ordinare ĉe la ĉevaloj, kaj "svelta knabino" estas "ĉarme maldika." La esprimon "a strong and thin horse" ne traduku per "forte maldika", ĉar "forte" ĉe multaj verkistoj estas uzata kiel varianto por "tre". La tro longaj "forta-

maldika," "maldika sed forta," ne kontentigas, pro la kerneco de "wiry.

La "ekzemplo" ne estis trafe elektita de nia amiko, ĉar Gordon fidela al sia principo, ne lasis sin uzi "drat'" (wire). Fulcher & Long, male, donas "drateca = wiry" kun ia rajto, ĉar kun nomoj de materialoj -eca ĉiam havas la signifon: "karakterizita de unu aŭ kelkaj el la kvalitoj entenataj de la kvalitkomplekso esprimita per ECO" (Plena Gram. p. 90)

G. sehn/ig, F. tendin/eux egalas A. tendin/ous, sinew/y. El "tendona, tendoneca, tendonoza, tendonaĵa, tendonriĉa, tendonplena, la lasta ŝajnas al mi la malplej kontraŭinda aŭ nefavore kritikebla. (Red.)

### ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATA DISKUTO. Per plena diskuto la Komitato nun penas aranĝi praktikan longtempan programon por nia laboro dum milita kaj postmilita. La plibonigo de la lingvonivelo, la pretigo de pliaj unugradaj instruistoj por estontaj kursoj estas inter la aferoj diskutataj por la nuna laboro, kaj metodoj de postmilita propagando formas parton de la diskuto. Ĉar la temo estas grava, kaj la konsilo de ĉiu samideano bona, ni invitas membrojn fari diskuteblajn proponojn. Se en via mensuro estas ideo, kiun vi pensas praktika kaj helpa, sendu ĝin tuj al la Sekretario. Komitatanoj ne forgesu respondi la Prezidantan cirkuleron ĝis la 30a de Septembro.

EKZAMENAJ KURSOJ. Gratulon al Melbourne Esp.Klubo, kiu aranĝis kurson por kandidatoj por B.E.A. Ekzamenoj. Espereble ĉiu Grupo simile agos, tiunmaniere plibonigante la lingvonivelon en Aŭstralio.

GRUPAJ KOTIZOJ. Ni rememorigas la Grupajn Sekretariojn, ke la Grupaj Kotizoj nun estas ŝuldataj. Bonvolu sendi ilin tuj kiam eble.

ADRESARO. Por ĝisdatigi vian ekzempleron faru la jenajn ŝanĝojn. La cifero rilatas la koncernan paĝon:-- BA.-- Batchelor devus esti Bachelor. -- 9. Sr D. Glenie devus esti Sn. -- 10. Gesroj Hearne adreso estas "14 The Korso" ktp. -- 11. Sr F.Hudson devus esti P.Hudson. -- 11. Fn. F. Kemp adreso estas "5 Adeney Av." ktp. -- 11. R.Lees, al adreso aldonu "W 13." -- 12. Gesroj Myall devus esti Mayall. -- 13. Fn Rich adreso estas "Pope St." ktp. -- 15. O.H.Behnken devus esti Behncken. -- 16. T.Snoss devus esti T.Suess. -- 19. Sr Alan, "Lugamo" devus esti "Lugano."

Al la jenaj nomoj aldonu la montritajn mallongigojn:-- 5. A.Douglas, D. -- 7. C.B.Ballard, IT-PM. -- 11. P.Hudson, IT-PM. -- 11.F.Kemp, D. -- 12. Sn Mayall, A.R.

Forstroku la Jenajn:-- 11. Fn M.Kemp -- 11. Gesroj Kurrell. -- 11. Lily Irwin. -- 14. E.E.Stevens. -- 15. Fn Ronnie Eliot.

Aldonu la jenajn nom-adresojn:-- 16 (Qld) Sr F.T.Simon, Pembroke St, Cooraroo. -- 16 (Qld) Sr Joe Popham, C/- Tropical Engraving Co., 321 Flinders St., Townsville.

Notu la novan Adreson:- 16 (SA) Sr H.G.Onn, 22 Vera St., Port Pirie. A.R.

LIBROSERVO. Dankon pro la jenaj donacoj:- S-ino F.Rawson 11/-, S-ino A.Douglas, 3/6, S-ro E.A.Turner 10/-, S-ro P.Schwerin, 5/- Sumo ĝis nun 4F. 13s. 6p.

Ni esperas, ke kiel eble plej multaj samideanoj faros donacojn. Se ĉio iros bone ni ricevos libroprovizon en Decembro.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon (1) de Membro-Abonanto:- Pastro T.C.Carne, S-roj H.M.Lanyon (multajn dankojn por via helpo), A.L.Martin, V.J.Murphy, W.McPherson, A.Bassett, H.M.Leighton, I.Serišev, F.V.Taylor. (2) de Membro F-ino M.Douglas.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ. Membro-Abonanto 5/-. LA RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita) Ĉiam atentigu la Adresiton pri via ĝusta volo pri mono, Sur poŝtbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

LETERO al S-ro Hillerman.

GEORGE HILLERMAN, (Sekretario)  
Box 75, DEVONPORT, Tas.

.....En LA RONDO mi legis kun granda intereso la hŝtorian skizeton pri la pioniroj de Esp-o en Aŭstralio, kaj speciale pri Cedric White. Mi bone memoras lin, ĉar li estis la bonhumora sinjoro kiu instruis Esp-on al ni en kurso en Glasgow kiun organizis la Glasgova Edukada Komitato en la "evening continuation schools." Ankaŭ en nia "parolrondo", ĉiusemajna klubo kiu kunvenis en la agenteja ĉambro de S-ro White, li estis tre agema parolanto. Ĉiu altestimis lin. Li pasis for de ni sed restas en la koroj de multaj Esp-istoj.

-----

Tradukrondano F-ino TELFER (Adelaide) heredis tutajn la librojn postlasitajn de arda samideano Pastro R.T.M.Radcliff, B.A., kiu mortis antaŭ proksimume du jaroj. Muziko kaj Esperanto estis la preferataj flankokupoj de tiu estiminda homo, pri kiu bedaŭrinde ne troviĝas noto en nia "Pioniroj" (Maja 1942). Laŭ la eldondato de iuj supraĵ libroj (1908, 1909) ni rajtas supozeti, ke ankaŭ li estis frutempa laborinto por nia afero en (Suda) Aŭstralio.

-----

MORTOJ. 1 Majo 1942 William Harvey, en Edinburgh, aĝo 81. Unu el la kompilintoj de Edinburgh Pocket Dictionary; tralegis prespruvaĵojn de la Esperanta Biblio.

Mankas detaloj pri la morto de Nov-Zelanda pioniro W.L.Edmanson. En Viktorio en 1909 li fondis Melburnan Komercan Klubon Esp-an, kiu daŭris kelke da jaroj.

El "ESPERANTO INTERNACIA", MAJO-JUNIO 1942.

**BRITUJO:** En la Angla lingvo H.G.Wells speciale verkis por "Esp. Internacia" enkondukon al la "Sankey" Deklaracio pri la Rajtoj de l' Homo. Esp-a traduko de la enkonduko, kune kun la 11-alea deklaro, aperas en tiu numero. Plaĉe estas scii, ke S-ro Wells, kiu ĝis nun ne tre varme rilatis Esp-on, "tre ĝojas ke Internacia Esperanto-Ligo estas preta diskonigi...."

Pli ol 900 personoj aliĝis la 5-ŝilingan kurson per korespondo.

**BRAZILLO.** Presadi gazetojn en alilandaj lingvoj estas malpermesate, sed "O Globo Esperantista" daŭre aperas en Esp-o, ĉar tiu ĉi ne estas alilanda lingvo. Oni eldonas kelkajn novajn librojn en Esp-o.

**DANUJO.** Granda aktivo. 150 E-istoj kunvenis en Odense. Decembron oni eldonis novan libron kun 150 kantoj. S-ro Neergaard eldonis disertacion kun E-a resumo.

**PALESTINO.** 52 sam-oj kunvenis en Haifa Aprile 1941. Kaj ĉi-jare ni legas en Brita gazeto: "En Tel-aviv konsiderinda nombro da Britaj armeanoj ĉeestis la 4an jarkunvenon de Palestina Esp-a Ligo sub prezido de D-ro Olšvanger. Esp-an literaturon pruntedonis la Hebrea Universitato.

**SVISUJO.** Ĉe Neuveville 60 sam-oj festenis. D-ro Ed. Privat el Locarno lekciis pri Federalismo en Usono, Svisujo kaj Ligo de Nacioj; kaŭzoj de sukceso kaj malsukceso.

-----  
"RU, TRADUKEMULOJ. (Paĝoj 139/155.

- (a) Reĝimo de la popolo, per la popolo, por la popolo.
- (b) Li paŝis malkuraĝete laŭ la tabulo.
- (c) Ŝi majestrapide enpaŝis la ĉambron.
- (d) Milda rideto.
- (e) Li estis en malŝatiga pozicio.
- (f) Ne faru malamajn diferencigojn.
- (g) Ŝtateklezia disigo kaj nuligo de dotado.
- (h) En lia stato preĝoj ne plu valoras.
- (i) Kun ĉiu deca respekto al vi.
- (j) Ŝi ne estas tre alrigardinda.
- (k) Jen la sekvoj de la pasinta nokto.
- (l) Eĉ ne ero da ideo.
- (m) Mi akceptas ĝin kun iom da rezervo.
- (n) Ĝi estas kvazaŭ sur la pinto de mia lingo. P.SCHWERIN.

-----  
ERAROJ en Aŭg. p.148 BRULLIGNETOJ. p.145, linio 26, Mediteraneo.  
 Uncorrected typing errors in this number will be listed in our next.  
L.E.B.

KASO de LA RONDO.ENSPEZOJ.

	£	s	d.
Konta transpreno	7-19-	3	
S-roj Lanyon, Murphy			
Basset, Stevenson			
Leighton, MacPherson			
Guilbert, S.Taylor.....	1-	8-	-
Rev.T.C.Carne.....	3-	6	
I. Serišev.....	3-	6	
F-ino J.Williams.....	4-	-	
F-ino J.Mitchelson.....	3-	6	
S-ro A.Shain.....	13-	6	
	<u>£10-15-</u>	<u>3</u>	

ELSPEZOJ.

	£	s	d
papero.....	16-	-	
ŝablonaĵoj.....	11-	4	
bindpingloj.....	1-	6	
luo.....	5-	-	
poŝto.....	15-	-	
okazoj elspezoj.....	3-	6	
	<u>£2-12-4</u>		

en la kaso

£8-2-11

£10-15-3W.ADDIS

25 Greville Ave.

Flinders Park, S.AUS.

Al A.E.A KVITANCOJ aldonu F-ino J.Mitchelson, S-roj A.Shain, Onn, J.Stevenson.

-----

El "DIPLOMATIALLY SPEAKING" de Lloyd C.Griscom.

Frue en unu mateno, ne longe antaŭ la fino de la marvojaĝo, mia servisto vekis min per parolsendo, ke Mme.Melba deziras tuj vidi min. Dormeme, mi surĵetis negliĝan veston kaj rapidis al la super ferdeko. La prima donna kuris min renkonti. Per flirto de la brako taŭga por sia plej drameca momento en Lucia di Lammermoor, ŝi elmontris amason da viŝiloj kaj banmatoj el kiuj maldika fadeno de vaporo leviĝas. "La ŝipo brulas. La tutan nokton mia servistino kaj mi batalis kontraŭ ĝi. Pro timo ke ĝi kaŭzus panikon, mi atendis ĝis taglumo antaŭ ol informi pri ĝi. Ĝis nun ni sukcesis subpremi ĝin."

Mi havis la spiritĉeeston min deteni sciigi al Mme. Melba ke ŝi batalas kontraŭ fendeto en la vapora tubo, kaj rapidis averti la ŝipestron.

"Ni devas igi Mme. Melba kredi ke ni grave rigardas la aferon," mi avertis lin.

La ŝipestro revenis tuj kun mi.

"Ni neniam povos sufiĉe danki al vi pro via granda servo, Mme. Melba," li diris. "La fajro jam estas regata."

En tiu momento ni aŭdis ekresonegon kaj frapadon de sube. La fadeno de vaporo malaperis.


Ĝis la tago de sia morto Mme. Melba sendube konvinkiĝis, ke ŝi savis la ŝipon.

----- L.E.BAILEY (Trad.)

EN LA DOMO de mia amiko, kiel alloga estas libro, kiu, se ĝi nestus en mia domo, ne dezirigus al mi legi ĝin. Emerson.

Oficina Organo de la AEA.

La Ronda.



Orte 9+2

Pro 25

Edonita de F.R. Banham  
2 Banchory St Essendon W3 Vic AUSTRALIA.

LA NIGRAJ PANOJ,  
el "Le Puits de Sainte-Claire", de Anatole France.

En tiu tempo Nicolas Nerli estis bankiero en la nobla urbo Florenco. Kiam sonadis la naŭa (1) horo matene, li kutime sidis ĉe sia skribtablo, kaj kiam sonadis la tria (1) posttagmeza li ankoraŭ tie sidadis, kaj li ĉiutage faris ciferojn sur notlibroj. Li pruntadis monon al la Imperiestro (2) kaj al la Papo. Se li ne pruntis ankaŭ al la Diablo, tio estis ĉar li timis fari malbonan negocon kun tiu, kiun oni nomas la Malbona, kaj kiu estas majstro de la ruzartifiko. Nicolas Nerli estis aŭdaca kja nefidema. Li akiris jam abunde da riĉo kaj senposedigis multe da homoj. Pro tio oni honoris lin en urbo Florenco. Li loĝis en bela domo, en kiun la lumo de Dio eniris nur per mallargaj fenestroj. Tio estis prudentaĵo, ĉar la loĝejo de riĉulo devus esti ia citadelo, kaj kiuj posedas grandajn havaĵojn, tiuj faras saĝe defendante per forto, kion ili akiris per ruztrompo.

Do la palaco de Nicolas Nerli estis provizita per kradoj kaj ĉenoj. Interne, la muroj estis pripentritaj de lertaj istoj, kiuj tie prezentis la Virtojn sub formo de virinoj, patriarkoj, profetoj kaj reĝoj de Izrael. La tapetoj, etenditaj en la ĉambroj, vidigis la historiojn de Aleksandro kaj de Tristan, kiajn ili estas rakontitaj en la romanoj. Nicolas Nerli brile diskonigis sian riĉon en la urbo pere de siaj pliaj fondo-donacoj. Li konstruigis ekster la urbomuroj hospitalon de kiu la friso, skulptita kaj pentrita, prezentis la agojn plej honorajn de lia vivo; pro la mono, kiun li donis por la kompletigo de la Sainte-Marie-Nouvelle, oni dankeme pendigis lian portreton en la ĥorejo de tiu preĝejo, en kiu ĉi oni vidadis lin genufleksantan, kun la fingroj pie interplektitaj, je la piedoj de la tre sankta Virgulino. Li estis facile rekonebla per sia ĉapo el ruĝa lano, pelta jako, flave-dika vizago kaj viglaj okuletoj. Lia bona edzino, Mona Bismantova, kun aspekto honesta kaj negaja, sin tenis je la alia flanko de la Virgulino, en humila pozo de preĝado. Tiu viro estis unu el la ĉefaj urbanoj de la Respubliko (3). Ĉar neniam li parolis kontraŭ la leĝoj, nek ĝenis sin pri la malriĉuloj, nek pri tiuj, kiujn la aŭtoritato monpunis aŭ ekzilis, tial neniom malpliigis la alta estimo de la magistratanoj, kiun li jam akiris per sia riĉo.

Unu vesperon en vintro, reveninte hejmon iom pli malfrue ol kutime, li trovis sin apud sia domsojlo, ĉirkaŭata de almozuloj duonnudaj, kiuj etendadis al li la manojn. Li repelis ilin per akraj vortoj. Sed malsato igis ilin krude senrespektaj kaj riskomaj kiel lupoj. Ili formis sin ronde de li kaj postulis panon per voĉo raŭkeplenda. Li jam sin klinis por preni ŝtonojn por ĵeti, kiam li ekvidis unu el siaj servistoj porti surkape korbon kun nigraj panoj destinitaj por laborantoj en la ĉevalejoj, kuirejoj kaj ĝardenoj.

Li mansignis al la bakisto alveni, kaj, preninte plenmanojn da panoj el la korbo, ĵetis ilin al la mizeruloj. Poste, enirinte sian domon, li kuŝigis por dormo. En sonĝo li estis frapita de apopleksio kaj mortis tiel subite, ke li kredis sin ankoraŭ en la lito, kiam



li vidis en "loko tute sen ajna lumo" (4) Sanktan Miĥaelon iluminitan de ia klareco devenanta de ties korpo.

La ĉefanĝelo kun pesilo en mano ŝargis la telerojn. Rekonante en la pli peza la de vidvinoj juvelojn, kiujn li tenis garantie, la multon da moneraj rando-tranĉaĵoj, kiujn li malleĝe kolektis, kaj pecojn da oro, kiujn li nejuste akiris, Nicolas Nerli sciis, ke lian ĝisnunan vivon Sankta Miĥaelo pesas antaŭ li en tiu momento.

"Messer (5) Sankta Miĥaelo," li diris, "se vi metas en unu teleron la tutan gajnon de mia vivo, metu, mi petas, en la alian la belajn fondo-donacojn per kiuj mi tiel malavare manifestis mian piecon. Ne preterlasu la preĝojn de Sainte-Marie-Nouvelle, al kiu mi donis almenaŭ kvarenon de la prezo; ankaŭ ne mian hospitalon ekster la muroj, kiun mi konstruigis je tuta mia propra kosto."

"Ne timu, Nicolas Nerli," respondis la ĉefanĝelo. "Mi forgesas nenion." Per siaj gloraj manoj li sidigis sur la pli malpeza telero la preĝojn de Sainte-Marie kaj la hospitalon kun la friso skulptita kaj pentrita. Sed la telero neniom malleviĝis.

La bankiero eksentis trean maltrankvilon. "Messer Sankta Miĥaelo," li daŭrigis, "iom pli serĉu. Vi ankoraŭ ne metis mian belan sanktakvuĵon de Sainte-Jean, nek la pupitron de Saint-Andre sur kiu la bapto de nia Sinjoro Jesuo Kristo estas laŭ-nature bildita. Ĝi estas verko, kiu kostis al mi multe."

La ĉefanĝelo lokmetis la pupitron kaj la sanktakvuĵon de Sainte-Jean apud la hospitalon sur la telero, kiu tamen neniom malleviĝis. Nicolas Nerli eksentis la frunton kovriĝi per malvarma ŝvito. "Messer ĉefanĝelo," li demandis, "ĉu vi estas certa, ke la pesilo estas justa?"

Sankta Miĥaelo respondis, ridetante, ke ĝi ne estas laŭ la modelo uzata de la uzuristoj de Parizo kaj la monŝanĝistoj de Venecio, tamen al ĝi nenio mankas al ĝia perfekta precizeco.

"Kio!" ĝemsopiris Nicolas Nerli, tutpala, "Tiu preĝejo, tiu pupitro, tiu kuvo, tiu hospitalo kun ĉiuj ĝiaj litoj, ĉu tio ne pozas pli ol pajlero, plumeto birda?!"

"Vi vidas bone, Nicolas," diris la ĉefanĝelo; "ĝis nun la pezo de viaj malbonaj multe superas la kvanteton da viaj bonaj faroj."

"Mi do iras en inferon," diris la Florencano. Liaj dentoj klakis pro timo.

"Paciencon, Nicolas Nerli," daŭrigis la ĉiela pesanto, "paciencon! Ni ne finis. Ankoraŭ restas io." Kaj la benita Miĥaelo prenis la nigrajn panojn, kiujn la riĉulo antaŭe ĵetis al la mizeruloj. Li metis ilin en la teleron de bonaj faroj; ĝi abrupte mallevis sin dum la alia telero leviĝis, kaj la du stabiligis egalnivele. La vekto inklinis nek al unu flanko nek al alia, kaj la nadlo indikis perfektan egalpezecon.

La bankiero ne povis fidi la ateston de la propraj okuloj. La glora ĉefanĝelo diris al li:- "Ci vidas bone, Nicolas Nerli; Ci taŭgas nek por la ĉielo nek por la infero. Iru returne en Florencon! Multobligu en tiu urbo la panojn, kiujn ci donis hieraŭvespere, sed faru tion en maniero sekrete kaŝa, kaj ci estos savita. Ne estas sufiĉe, ke la ĉielo malformiĝu por ricevi pentintan rabiston (6).

La pardona kompato de Dio estas neelĉerpebla; eĉ riĉulon ĝi savos. Ci estu tiu riĉulo! Obligu la panojn, kies pezon ĉi rimarkas en mia pesilo. For!"

Nicolas Nerli vekigis en sia lito. Li firme intencis agadi laŭ la konsilo de la ĉefanĝelo kaj obligi la panojn de la malriĉuloj, por ke li povu eniri la regnon de la ĉielo. La tri jarojn, dum kiuj li ankoraŭ vivis sur la tero post sia unua morto, li estis kompartema al la senhavuloj kaj estis granda almozdono.

(1) naŭa (tierce), tria (nones): laŭkanon(ik)aj horoj en kiuj celebriĝas iuj ritoj de la Eklezio.

(2) Temas pri monarko, kiu regis "la Sanktan Roman Imperion."

(3) Florenco ĝis 1860 estis sendependa urbo.

(4) Linio el "La Infero" (Dante), kiu priskribas tiun regionon de la infero en kiu pekuloj estas juĝataj.

(5) "Ne estas sufiĉe....." aludas al Luko 23. La senco estas: Pardonu al riĉulo (malfacile savebla), multe pli ol pardonu al rabisto, atestas la kompaton de Dio. Komparu Luko 18/24: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio!

(5) v. p. 184

----- F.R. BANHAM (trad.)

#### DONU AL LA POPOLO MONON!

de Prof-o Walter Murdoch, O.B.E., Univ. de Perth.

Ofte mi aŭdis diri ke la plano Douglas estas nepraktikebla ĉar ĝi estas tiel kompleksa ke neniu povas ĝin kompreni. Efektive ĝi estas tiom tre kompleksa, pro bona kialo, nome ke tre kompleksa estas la nuna monsisistemo, kiun Douglas celas modifi.

Sed la komplikecon de la sistemo mona oni povas facile troigi, kaj komuna prudento povas eltrovi simplajn faktojn, kiuj klarigas pri la kolapsigo de la sistemo kaj certigas ke ĝi neniam refunkciigos per simpla filikriparo, kaj ke la mondo ne eliĝos el la marĉo antaŭ ol ni kuraĝos apliki reformon almenaŭ tiom drastan kiom la Douglasa.

Antaŭ deko da jaroj la mondo suferis plej teruran ekonomian krizon dum ekzistis riĉabundo senfina. Ni mondanoj similis al homoj sur flosligno pereantaj de soifo meze de sensala lago. La epoko de l'malsufiĉo jam longe pasis; en tiu de l'abundo ni vivas. Por ĉiam solvita estas la problemo produkti sufiĉan manĝon kaj ceteron por ĉiuj popoloj.

Aŭto estas supozinde ia luksaĵo. Nu, la mondo nun posedas sufiĉe da fabrikoj, maŝinoj, potenco, materialo por provizi aŭton al ĉiu domo. Kial do ĉiu domo ne ektive posedas aŭton? Ĉar "mankas mono"....

En nia maŝinepoko la mekanismoj faras plejmulte la laboron; el tio sekvas ke ne estas sufiĉe da laborlokoj, oficoj, por la homoj, kiuj multmilo devas perdi la vivrimedojn. Ĉu ne saĝe labori dum malpli da horoj? Al tio la mastroj respondas: Ni volonte donus laboron por duono de la tempo, sed povus pagi por tio nur duonan,

ne tutan salajron. Ni "ne havas monon."

30 ĝis 40 milion homoj estis sen laboro. La moderna socio povis doni al ili da mono sufiĉan por forpuŝi la morton, sed ne pli. Ĝi "ne havis monon."

El tio sekvas ke homoj mortis pro panmanko; aliloke oni diskutis superfluan da tritiko kaj planis malpliigi semteron. Same ĉe kaŭĉuko kaj oleo; en Brazilo oni bruligis pomilione sakojn da kafo; en Usono oni ĵetis en riverojn lakton tiomkvantege ke la fiŝoj mortis pro ĝi. En Fiĝio oni detruis sukeron; en Japanujo rizon. La homoj forte bezonis tiujn, sed ili "ne havis monon."

La t.n. (tielnomitaj) financaj ekspertoj povas konsili nur per: "Ŝparu, kontentigu per malplio." Al homoj pro soifo mortantaj sur dolĉakva lago oni papagas: Trinku malpli! Al homoj en mondo neniam pli riĉa ol nun, ili admonas "Mallevigu la vivnivelon!" En Aŭstralio oni sabris la salajrojn kaj malfortigis la aĉetpovon de la popolo, en tempo kiam eĉ iometo da simpla prudento informus ke malpliigi la aĉetpovon signifas pliakrigi la krizon.

Kio estas mono? Ĝi estas nenio alia ol biletoj por ebligi interŝanĝon de varoj. La mondo suferas ne pro troabundo da varoj sed pro malabundo da biletoj per kiuj la varoj estas interŝanĝataj.

Prezentu al vi vilaĝon kiun minacas superakvego. Ĉiuj vilaĝanoj febre kuras al stacidomo kie staras trajno sufiĉe granda por ilin porti. Ili envagoniĝas sed la konduktoro petas biletojn. Iom nepaciencaj ĉar akvego forte leviĝas, ili kuregas al la biletbudo sed malfeliĉe ne plu haveblaj estas biletoj. Ili rekuras al la trajno, ĉe kiu ili rimarkas ke jam konduktoro estingas la fornafajron. "Damage estas," diris la stacidomestro, "ke vi devas droni. Se konsole estas, mi informas, ke ankaŭ mi dronos kun vi. Nenio farebla. Kompreneble ke trajno ne povas porti pasaĝerojn senbiletajn." Ili do ĉiuj dronis pro manko de biletoj.

Tio absurdega okazas en la moderna mondo. Anstataŭ krei ĝustan kvanton da mono per kiu la tutmonda negoco povus glate iradi, oni limigas la negocadon por ke ĝi konformu kun la monkvanto. Ni fermas butikojn, malsatigas homojn, simple pro mona manko; kaj ironie estas ke mono estas aĵo krebbla laŭ ajna kvanto dezirata.

Kiu fakte kreas monon? Antikvatempe la reĝoj, registaroj -- ili sole. Sed post fondo de la ĉeksistemo la povo krei kaj malkrei monon pasis al la bankieroj.

El la tuta mono en la mondo nur eta kvanteto konsistas el metalaj moneroj kaj banknotoj. La multe pli granda parto konsistas el skribnotoj faritaj en banklibroj. Ĉirkaŭ  $1\frac{1}{2}$  el cento de la mono en Aŭstralio estas forme de metalo kaj banknotoj -- la cetero estas bankkredito.

Tri elcentojn da nia mono kreis la registaro kaj 97 elcentojn kreis kaj administras la banksistemo. Registaroj faras monon el oro aŭ argento -- el kio faras ĝin la bankieroj? El nenio. Pri tio interkonsentas ĉiuj ĉefaj aŭtoritataj pri la financa sistemo. La bankoj kreas monon per plumstreko kiam kaj kiom ili deziras; ili detruas ĝin en sama maniero. Ĉiufoje kiam ili donas prunton ili kreas monon; ĉiufoje kiam ili reprenas prunton ili malkreas monon.

Rege administrante la volumenon kaj fluon da mono, la bankieroj regas la vivojn kaj destinojn de la homoj, kaj el ilia mano sklave manĝas ĉiu registaro.

La tuta kredito de la popolo juste apartenas al la popolo, ne al grupoj da privataj individuoj. Kiel parto de la nacia registemo la kreo-administro de la mono devus esti donita en manojn de homoj respondecaj al la popolo. Repreninta la plenadministron de la monsisistemo, la registaro devus ĉeftaske ekkonstrui ponton por ligi produktadon kaj konsumadon.

Douglas eltrovis ke laŭ la nuna fincansistemo nenia industrio povas elspezi salajre, dividende, sufiĉan monon por pagi la koston de la varoj produktitaj -- jen la A plus B teoremo. Douglas en du manieroj proponas financprovizi konsumantojn, cele harmonie interrilatigi produktadon kaj aĉetpovon. (a) Igi ĉiun homon kompaniano en la nacia ekonomio, donante al ĉiuj nacian dividendon kalkulitan laŭ la reala valoro de la nacia havo, kaj (b) ebligi ke ĉiuj varoj estu vendeblaj sub kosto, kaj nuligi tiun perdon per eldonoj de nacia mono. La problemo estas: kiel krei pli da mono sen kaŭzi malplivalorigon de mono. La solvo estas: (a) mono devas esti kreata laŭ ekzakta proporcio kun la reala riĉo de la nacio, kaj (b) devas esti faritaj aranĝoj ne nur por ĝia eldono sed ankaŭ por ĝia nuligo. La proponoj de Douglas ne portas en si danĝeron de inflacio aŭ deflacio, kaj mi kredas ke ili farus el mono altvaloran servanton anstataŭ, kiel nune, nian despotan mastron.

----- H.M.LEIGHTON (resum. & trad.)

EL THESE ARE REAL PEOPLE. de Rosita Forbes.

(Rosita Forbes kaj Sarah-Graham vojaĝadis en la sovaĝa kamparo de Meksikio kun sia gvidisto Diego, kiu rakontas al ili timigajn superstiĉojn de la indiĝenoj, kiuj, li diras, en korpoj de sovaĝaj bestoj serĉas revenĝon kontraŭ malamikoj. Nokte ili atingis tro homplenan gastejon kaj la du fraŭlinoj devas okupi ĉambron en kiu troviĝas nur unu malgranda lito. Rosita Forbes rakontas.)

Sarah-Graham trenis la matracon for de la lito sur la plankon kaj firme posedis ĝin kun volvita vesto kiel kapkuseno, kaj lasis min serĉi ripozon sur la nudaj risortoj.

Sendube ni estis lacaj. Mi scias, ke mi dormis tiel bone kiel iam ajn, kun miaj rajdbotoj envolvitaj en banviŝilo kiel kapkuseno kaj brile divers-kolore strekita sel-tuko sternita super tiaj lit-tukoj kiujn oni asignis al mi.

Noktomeze vekis nin terure timiga sono. Ne bezone la tremeca demando de Sarah-Graham "Kio estas tio?" Mi tuj sciis, ke io terurega okazis aŭ okazos. La sono ripetigis. Ĝi venis de la banĉambro kaj estas tute neeble kontentige priskribi ĝin. Kun akra kriego, Sarah-Graham saltis de sia matraco sur la plankon kaj de tie rekte al la mezo de mia lito, kie mi kaŭris paralizata pro teruro. La risortoj estis el la plej forta kaj plej resalteca materialo. Kontraŭ-

reagantaj al la subita frapo de 126 funtoj de solida karno, ili resaltis kaj saltigis nin al la planko. Por momento, dum ni luktis regajni la komparan sendangerecon de la lito, la sama ideo plenigis ambau niajn mensojn, kaj Sarah-Graham donis voĉon al ĝi.

"Tio estis besto kiu aspektas kiel virino!"

Ebriiga de dormo kaj plue konfuzita pro la mallumeco kaj la memoro de la rakontoj de Diego, mi konsentis.

Alia frapo de bruego venis de la banĉambro kaj mi sentis deziron vomii. Nenia homa gorgo povis fari tiajn sonojn.

"Almetu la lumon," ordonis Sarah-Graham.

"Kial vi ne faras tion?" mi protestis.

"Mi ne kuraĝas."

Fine unu el ni premis la komutilon kaj, kun la koroj ĉe la fundo de niaj stomakoj, kie ili estis ja tro sentemaj kaj viglaj, ni malrapide rampis trans la ĉambrom. La lumo atingis la banĉambrom. Per la kuraĝo de malespero mi malfirme postŝovis la interpordon ebene ĝis la muro.

Menio viva troviĝis en la banĉambro.

Tiam el la malpleneco antaŭ kaj ĉirkaŭ ni, venis la plej terura bruo el ĉiuj.

Efektive, mi sentis kompletan simpatian por Sarah-Graham kiam ŝi faligis sur la plankon kaj havis histerion. Ŝi tre plene havis ĝin. Mi aŭdis piedpaŝojn en la vestibulo, tiam oni malfirme ekjetis nian pordon kaj Diego enkuris.

"Kio okazas?" li rapide demandis, kaj liaj okuloj fulme rigardis tute ĉirkaŭ la ĉambrom malplenan.

"Atentu!" mi iris, tremkuŝanta kiel malbone farita gelateno, kaj en tiu momento sono kvazaŭ la tomboj eljetas siajn nevolantajn mortulojn venis de kelkete da futoj for de ni.

Sen vorto Diego paŝis super la plankfaliĝintan Sarah-Graham, marŝis tra la banĉambrom kaj dise tiris la kurtenojn. Ekstere, ĝuste sub la fenestra sojlo, sidigis treege granda histriko, blekanta plengorge al sia amikino, kiu respondis per egala veneno el la plej proksimaj ombroj.

Diego admirinde kondutis. Li faligis malseketan spongon sur unu histrikon kaj jetis mian ungbroson al la alia.

"Estas la pariĝa sezono," li diris, "la kompatinduloj nur kantas sian amon."

----- L.E.BAILEY (adaptita)

JUNA VIRO, promenante tra urbo, ekvidis buĝutigan persikon en fenestro de luksa fruktobutiko. Li decidis aĉeti ĝin por sia amatino.

"Kiom kostas tiu persiko?" demande la vendiston.

"Kvar frankojn," respondis tiu ĉi.

La junulo paliĝante hezitis, sed la tento estis tro forta kaj li pagis per monero kvinfranka. Li jam denove estis en strato, kiam la vendisto kurpaŝe atingis lin: "Mi ŝuldas al vi unu frankon restajan!"

"Ĝin retenu," diris la juna viro. "Ĉio en ordo. Enirante vian butikon, mi pro neatentemo paŝe disprenis unu vinberon."

-----

ALMOZPETANTO.

Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis amikon kiu loĝis en la kamparo. Inter ŝiaj dombestoj troviĝis hundo nomita "Tip" kiun ŝi edukis sidi petege-rektdorse, kun antaŭaj kruroj etendataj kaj piedetoj malsupren pendantaj. La serioza mieno de la eta hundo en tia sintenado aspektis tiel komika ke eĉ neridemulo ne povis ne ridi.

Ĉiuj urbetanoj konis kaj amis Tip-on kaj por petsidigi ĝin ili ofte aĉetis sukeraĵojn, kuketojn, ktp. Pro tio, Tip, vidante iun ajn kun ion ajn enmane tuj eksidis petege.

Venis dimanĉo, kaj mi vizitis preĝejon por partopreni Diservon. Kvankam la konstruaĵo estis malgranda kaj neimpona, la Diservo laŭ la angla eklezio estis iom neordinare pompa kaj grava afero. Do, prezentu al vi kiel mi embarasiĝis sciante ke Tip estis sekvinta min kaj sin trudas en la preĝejon, flare serĉante min inter la ĉeestantoj, iuj el kiuj rigardas ĝin malaprobe, aliaj kaŝe ridetas.

Mankis al mi tempo por hejmon irigi la hundon ĉar jam la ĥoranoj estis envenintaj kaj la pastro envenonta; tial, per suĉsono mi atentigis Tip-on, kiu, rekonante min, ĝoje flirtadis la ridindan vostrestadon. Mi kviete kuŝigis la hundeton ĉe miaj piedoj, kie, dank' al Dio, ĝi bone sin kondukis, kvankam iom konfuzata pro la ofta ekstareksido de la adorantoj. Pli ol unu fojon estis necese ke mi kaptu ĝin per la kolumo kaj trankviligu ĝin per amfrapeto.

Fine venis la oferkolektisto, portante enmane lignan pladon por ricevi la monoferaĵon. Dum mi serĉis moneron Tip eskapis, kaj gravmaniere sekvis la kolektiston laŭ la flanknavo ĝis la ŝtupetoj ĉe la ĥorejo kie la ĥorestro venis renkonte al la kolektisto, prenis la lignopladon kaj sin turnis prezentante ĝin al la pastro, kiu siavice sin turnis al la sankta tablo por prezenti la monoferaĵon al la Plejaltulo. En tiu solena momento mi aŭdis subridon malantaŭ mi, kaj samtempe rimarkis la strangan agmanieron de junulo antaŭ mi, kies ŝultroj skuigis konvulsie kaj kies vangoj ruĝigis kvazaŭ io ŝtopis al li la gorgon. Direktante la rigardon al la ĥorejo mi tuj konstatis: Jen staris la pastro supren tenante la monoferaĵon. Jen la ĥorestro en blanka surpriso, kun kapo pie klinata. Jen la kolektisto, humilvizaga kaj jen, lastavice sidis Tip rektdorse kun antaŭaj kruroj etendataj kaj piedetoj malsupren pendantaj, humile, petege, atendantante donacon!

----- PERTULINO.

**LOGIKO:** Sinjorino bonhumore demandis kvinjaran filineton de amiko, ĉu ŝi poste kiel virino konsentus edziniĝi kun ŝia propra fileto sepjara. Anjeto hezitis. "Mi tre dezirus, sinjorino, sed tio ne estas ebla." "Ĉu? Pro kio do?" "Ĉar ne decas, ke homo edziniĝu kun alia kiu ne estas en la sama familio." La sinjorino gape miris, "Kial ne?" Respondis Anjeto: "Paĉjo edziĝis kun panjo, avo kun avino, kaj onklo kun onklineto kara. Ĉu ne klare?"

-----

REDAKTORA BABILADO.

En ĉi tiu, la 25a numero de la RONDO, ni pensas bona, kelkvarte rimarki la duan datrevenon de ĝia naskotago -- en Oktobro 1940, tempo en kiu la fumo de gigantaj aerbataloj ankoraŭ ŝvebis super heroa Londono. Antaŭ ni ne kuŝis bela perspektivo, sed ni fidis kaj hodiaŭ scias la fidon bone bazita. Malgraŭ ĉia minaco de senĉese malboniĝanta situacio, nenia-rompe aperis en ĉiu monato legaĵbukedo, portanta instigon, diskuton, informon, amuzon al samcelanoj tra la lando.

Tamen ne ĉio kontentigas. En la lastaj monatoj ni rimarkis kun kreskanta miro la por ni nekompreneblan indiferenton de certaj homoj, kelkaj el kiuj iam bone laboris por Esperanto. Ni ne volus kredi, ke ili nin ignoras. Ĉu efektive ili ne scias pri ekzisto de LA RONDO kaj pri ĝia valoro por ili? Aŭ ĉu ili jam iom cedas antaŭ "la batoj de l' sorto" aŭ timiĝas pro "la noktaj fantomoj"? Ilia animo ricevu la inspiron de "La Vojo", tiu kuraĝa poemeto per kiu Zamenhof vokas al ni trans la jaroj. Tiam iliaj spiritaj fibroj denove elasteciĝos, la volo ricevos viglon, la koro revarmon, kaj -- la kruroj forton paŝi al poŝtofiĉejo.

PRI SONIMITA KRIPLIGO DE ESPERANTO.

Laŭ mia opinio, nur tre malofte trudas sin la neceso detale indiki, per ŝanĝo de la Esperantaĵo, ke tiu aŭ tiu ĉi homo parolas en maniero misgramatika aŭ fuŝprononca. En "Tatterley" (1912), ĉap. 17, A. Wilson provas redoni la obtuzan paroladon de ebrigiĝinto. Jen: "Mi deĵiriŝ vidi vi'. Ne permeŝu, ke tio okaĵu. Hektor ŝciaŝ kiel ĝin elŝpeĵi. Juŝ 'ĉetiŝ bi'neton -- vivoŝ kiel grafo. Ŝarma dolŝ'lino." Ankaŭ vidu la lingvaĵon de Tomi Butler (filo de M.C.B.; vidu "Literaturo" No. 12) -- "Onu omi anto" (Donu al Tomi ganton), 2-jara infaneto. Indiki la precizajn formojn de la malkorektaĵoj de homo misuzanta la Anglan lingvon havus malmultan sencon aŭ intereson por ne-Anglalingvano. En la traduko de "Footprints" neniom helpus la scio, ke Harry aŭ Brown nekorekte parolas la patran lingvon. Se necesas indiki la fakton, oni uzu adverbos: "... li diris misgramatike" (fuŝprononce, kriplalingve aŭ sim.)

Mi inklinas kredi, ke certaj verkoj en ĉiuj lingvoj restas ekster la kampo de tradukebleco, se nepre oni devas konservi la koloron kaj humoron de la originalo. Ekzemple, la verkoj de Wodehouse, kun iliaj sociklasa slango kaj voĉtono-prononco; la naive komikaj konversacioj de kamparanoj-vilaĝanoj de Hardy, Phillipotts kaj aliaj, kiuj uzas dialekton aŭ apartan dirmanieron. Mi ne opinias, ke kripligo de la Esp-aj vortoj helpus kompreni la dirojn de malkleraj aŭ province parolantaj homoj. Ŝajne ankaŭ tiel opiniis Zamenhof, ĉar en "Lingvaj Respondoj" No. 1 (Pri la Esperanta Stilo): "En mia traduko de la Revizoro troviĝas iafaĵe frazoj ne tuj kompreneblaj; precipe ofté vi trovos tiajn frazojn en la paroloj de Osip. Tamen ne ĝusta estas (via) supozo, ke tiuj frazoj estas laŭvorta traduko de la rusa stilo. Osip parolas ne per stilo tute logika kaj literatura, sed per stilo

de malklera rusa servisto, kaj mi devis almenaŭ iom konservi tiun stilon, por ne forpreni de liaj paroloj ilian tutan karakterecon. Li ofte simple kripligas la vortojn. Mimpennis tion ĉi eviti, ĝar, se por la laganto oni povus doni klarigon en la malsupro de la paĝo, al la aŭdanto en la teatro oni tion ĉi ne povas fari...." Mi ne povas eke trovi en liaj verkoj provon indiki per kripligo malkorektan prononcadon aŭ solecismojn -- rimarku, la lingvo de Osip, kvankam vive-suke idiotismeca, tamen restas forme pura Esperantaĵo.

"Kijo estas tijo ĉi?" .. "Nje verŝajnje, sed tutje .. Sed kija, djiru Mihok. .... Vi scijas tutje bonje legi!" Per tio Baghy en "Dancu Marionetoj" p. 107, eksperimentas indiki la malbonan Esp-an prononcadon de Petroff. Nesame estas peni indiki per Esp-o la langajn "pekojn" de homo malperfekte parolanta sian gepatran. Tio ŝajnas al mi tasko neplenumbla. Paroldifektoj aŭ nenormalaĵoj estas mult-levariaj. Se homo kaŝtavas aŭlispas: "The thick man theth, Come koon!" Kiel tion redoni? Ja mankas en Esperanto litero th-sona (Greka Theta). Se Esp-o havus th-sonan literon, ni povus traduki per "La malthana homo dirath, Venu baldaŭ!" Cetere, Zamenhof (Originala Verkaro, p.92) aludis el eblo uzi t(h) por la th en "think", kaj d(h) por la th en "father". Sed -- se homo prononcas V kiel W: "Wiolet, bring the weal and other wittles," aŭ A kiel I: "You'll hev ter pi fer thet piper, lidy;" aŭ R kiel L: "Velly fine," said the Chinese, tiam estus malfacile en tiuj okazoj indiki la naturon de la misprononco. Simile je la solecismoj. La gramatikoj de la naciaj lingvoj strukture tre diferencas inter si, kaj la "eroj ne estas interŝanĝeblaj."

En "Lingvo Stilo Formo" troviĝas du-tri paĝoj da lingvaĵo simila al Kataluna lingvo antikva. Ĝi estas amuza kaj lerta provo de Kalocsay reprodukti ekzemplon de "Mezepoka Esperanto." Ĉu li sukcesis en sia celo? Kio estas lia celo? Tion vi diskutu.

----- F.R.BANHAM.

LETERO. AL LA REDAKTORO.

De S-ro GEO. GORDON.

Referring to your reply about "the rate" in No. 23 of LA RONDO, p. 155. In Alfred Wackerill's translation of "The Merchant of Venice," Act 1, Scene 3, 16th speech of Shylock, he translates the word by "jara poeco", but the suffix seems unnecessary, if not unmeaning there.

In the last line of the same reply I doubt whether your use of "laŭ" conveys the meaning ("as far as") that you intend. Notice how in similar cases Zamenhof uses "kiom" at George Dandin 13/24, 27/2; Marta 153/30. The same word with "e" added is in one place used by Grabowski, but the "e" is not necessary.

-----



LA TOSTO !

Numero Dudekkvina! Nia koro,  
amplena, nun fariĝu la amforo.

Kaj tiel, per trinkaĵo plej nektara,  
ni tostu: ĉar utila, bona, kara  
LA RONDO jen fariĝis jam dujara.

Dum tiuj jaroj brilis ĝi verdstele;  
plenumis gravan rolon tre fidele;  
kaj senfavore agis nur altcele.

LA RONDO jam fariĝis jen dujara ...  
Ho, daŭru ĝi kun voĉo kreske klara  
tra ĉi sensenca tempo mult-erara,  
tra ĉi noktiĝo de la pac'homara.

Numero Dudekkvina! ... La <sup>am</sup>senforo  
por tosti vin, samideana koro.

----- JOEDIKO.

WILLIAM LEAK EDMANSON, iama prezidanto de la Nov-Zelanda Esp. Asocio, dormante ~~momente~~ mortis 5 Aprilo 1942 ĉe sia hejmo en Wellington aĝe 81 jarojn. Tiu ĉi pioniro naskiĝis en Tarrawingee, Victoria, 19 Majo 1860, frato de dek unu infanoj.

En 1900 li starigis la Metropolitan Business College en Melburno. Tiun li gvidis ĝis 1912, kiam li ekloĝis en Nov-Zelando. En 1909 li Esp-istigiskaj lom poste fondis la Komercean Klubon Esperantan, kiu daŭris kelke da jaroj. Li fariĝis fratulo de la B.E.A. en 1912 kaj vizitis Eŭropon negoce. Tie li eterne konvinkiĝis pri la praktika valoro de la Zamenhofa lingvo. Lia propaganda laborado en N.-Z. estis vaste kaj daŭre efika. Senlaca instruisto de Esp-o; lia unua lernanto estis Bernard Potts, nuna prezidanto de la N.Z.E.A.

Postrestas vidvino, filo Harry kaj fino Nancy; du fratopj loĝas en Melburno. La 8 Aprilo okazis kremacio. Laŭ lia deziro lia filo solene disĵetis la cindron sur lian ĝardenon. Flirtis Esperanta standardo dum kelkaj samideanoj parolis kaj deklamis honore al granda homo kaj nobla amiko. (El plena raporto en "Interna Ideo," Apr. 1942)

Mi unue renkontis S-ron Edmanson en 1909. En tiu jaro mi pene laboris por perfektigi kiel stenografo, kaj tiucele vizitadis la Metropolitan Business College. En ĉiu tago mi stenografis laŭ dikto de S-ro Edmanson aŭ lia helpanto F-ino Foster. Li parolis al mi pri Esperanto sed mi ne komencis lernadon ĝis starigo de lia Komerca Klubo Esp-a. Je ajna momento en tago Esp-isto trovis bonvenon ĉe la Metropolitan; S-ro Edmanson neniam estis tro aferplena por diri unu-du vortojn al vizitanto verdstela. Kun dolora bedaŭro mi ekaŭdis pri lia morto.

----- C.W.BALLARD.

ASOCIAJ AFEROJ.

LIBROSERVO. Donaco danke ricevita -- S-ro G.Chatterton 3/6. Transpreno de la ĝenerala kaso laŭ estrara decido 3F. Ĝisdata sumo 7/17/- Ni ankoraŭ bonvenigus vian helpon. La librojn tenos perantoj en W.A. Vic., kaj Qld. La Perantoj vendos la librojn al Grupoj kaj individuoj laŭmende. Plenajn detalojn ni avizos antaŭ ol libroj alvenos. Pro la malgranda monsumo, kiun la servo disponas, ni ne povas provizi multe da legolibroj, sed pliajn donacojn ricevitaĵojn ni utilos tiucele. Se iu volas aĉeti libron havebla ĉe B.E.A., sed ne provizota de nia servo, tiu povas mendi ĝin pere de A.E.A., kiu importos la libron post ricevo de antaŭpagita mendo. Pro la rabato ricevita de la Asocio, oni helpas la libroservon tiel mendante. Ĉiu profito helpas plibonigi la servon.

LEGAJA PETO. V377016 Pte K.J.Hirschell, V.A.L.U. 4 Coy. 2 Plat. Aŭstralia, Eŭropa rifuĝinto, kaj malnova samideano, volas ricevi malnovajn librojn, gazetojn k.t.p. por distri sin dum liberhoroj en militista tendejo. Neflua parolanto de la Angla lingvo, li tre bonvenigus iun Esp. legajon, kiun vi povas sendi.

GRATULON al S-ro R.R.Rawson en Melbourne, kiu faris bonan propogandon pere de intervjuo raportita en la "Argus."

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon de (1) Membro-abonanto, S-ro W. Langham, S-ro G.Chatterton. (2) Aliĝinto Grupo, Westralian Esp.Soc.

STATISTIKO. Grupoj 5. Individuaj Membroj 134. Ni ankoraŭ kredas ĉi-lastan ciferon multe tro malgranda por nia lando.

ADRESARO. Ni tre deziras ricevi la nom-adreson de ĉiu Esp-isto. Ni aparte petas helpon pri tiuj de Suda Aŭstralio, kies listo estas mal-kontentige malgranda. Kiam spaco permesos, ni publikigos ĉiun korekton kaj aldonon.

Por ĝisdatigi vian ekzempleron aldonu la jenajn mallongigojn -- la cifero rilatas la koncernan paĝon. 15. B.Cuvet.B. -- 16 L.R. Roberts. A,B,R. -- S.Wanmer, P-B. -- 19 A.C.Boyle. A.S. -- 20 L. Fekonja. S. -- A.J.Prior.S. -- 21. V.Rutland, S -- F.Schwerin.S. -- E. Stevens, S. Notu la novajn Adresojn. 11, Ge-sroj Holmes, Villiers St., Seymour, 16, V.B.Moore, Kabra, Via Rockhampton. -- 20 E.Klussen-dorf, "Pasadena", 9B Wardell Rd., Petersham.S. -- W.Langham, "Peoples Palace," Pitt St., Sydney. R,A,S, Korektu la Jenajn:- 16 S.L.Parry, al adreso aldonu "Brisbane." -- 17 Gedroj Caldera, Stratcifero, estas 220. -- 21, Schwerin (3 nomoj) la domnomo estas "Carabella". -- I. Serišev, Aldonu ankaŭ 2988 NN, G.P.O., Sydney. R,A; 11, aldonu Sr Clive A.Hughes, M.A., 1 Vera St., Williamstown. Radio VK3CA.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ. Membro-Abonanto 5/- . LA RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita). Ĉiam atentigu la adresiton pri via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontentos ĝin.

GEO.HILLERMAN (Sekretario) BOX 75. DEVONPORT. Tas.

Organiza Organo de la A.E.A.

Le Rondo.



Nº 1942

Nº-ro 26

Eldonita de F.R. Banham  
Banchory St. Essendon W5 Vic. AUSTRALIA.

MINISTO RAKONTAS....

"Kompreneble, vi ĉiuj ridos," diris la ministro maldolĉe. "Homoj aŭskultantaj la rakonton pri Joe Capper (ĝo kep<sup>r</sup>) ĉiam ridas, dirante, ke ĝi estas nur propagando por la Minlaborista Sindikato, k.t.p. Tamen, tio estas por mi indiferenta. Mi donas ĝin kiel evangelian veron, kaj ridu laŭvole. Jen kiel la afero okazis.

Joe Capper jam laboradis preskaŭ monaton, havante kiel helpanton bubon nomitan Tomĉjo Owens, kiam fariĝis akcidento, kiu devigis ilin esti kunuloj en kavo dum dekdu tagoj sen aŭ lumo aŭ manĝo. Granda falo de roko malantaŭ ili elbaris la vojon returne, entombigante la viron kaj la knabon kun nigraj pensoj kiel iliaj solaj kunuloj.

La patrino de la juna Tomĉjo, aŭdinte pri la malfeliĉo, preskaŭ frenezigis, ĉar Tomĉjo estis ŝia sola ido; plue, ŝi estis speco de vidvino per tio, ke la edzo, tuj antaŭ ol la unvenaskito aperis en la mondo, decidis forkuri pro edzina trobabilado. Ŝi tre laŭte priploris la baton kaj ricevis kondolencojn de ĉiuj. Ne malmultaj el-tordis por la kompatindulino iometon el sia nesufiĉa monhavo, kaj pli ol unu penis kuraĝigi ŝin, dirante, ke Tomĉjo nepre estos savita, kaj, kvankam li enfermiĝis subtere, li ne povis elekti pli bonan viron ol Joe Capper kiel kunulon. Joe estis tia bonega laboristo, kian oni malofte trovas, kaj pli saĝa ol ordinarulo en siaj aferoj, ĉu farataj, ĉu dirataj. Estas strange, ke neniu sciis multon pri li. Tre maljuna homo li certe ne estis, tial iom ridetinda li aspektis pro sia portado de barbo. Jen la tuto direbla pri Joe ekster tio, ke li estis lertega ministro, kulturis vizaĝharojn por sin amuzi, kaj loĝis kun la familio Jones (ĝonz), laktvendistoj en apuda vilaĝo. H'm, preskaŭ mi forgesis vin informi, ke li tre amike sintenis kontraŭ juna Tomĉjo, eĉ tiagrade, ke iliaj nomoj aŭdiĝis en la drinkejo Ruĝa Leono pli ofte en unu semajno ol tiu de Steve Donoghue (stiv donohu; fama ĵokeo) en la daŭro de tuta semajno. Mi tute ne scias, kion amikigan Joe trovis en bubo ĵus dekokjara, simila al vivanta skeleto kaj havanta okulparon trograndan por sia vizaĝa mallarĝo.

Tamen -- negrave, ĉu ili estis amikoj, ĉu malaj -- sube ili mal-liberiĝis, devigaj kunuloj. Duono de la minejanoj laboregis envice, kriante kiel frenezuloj, dum ili dispecigis furioze la solidan karbonuron inter si kaj la enfermitoj. Trafranĉi ĝin per pioĉoj estis la ununura ŝanco por savi ilin, kaj mi volus demandi, ĉu iu el vi uloj okaze renkontis diablön vagantan el la Infero? Nu, ministro hakeganta por savi kamaradon ĝuste similas tiun. Jen ili, la fortaj elektitoj de la minejo, ŝvite frakasantaj kaj tiregantaj same furioze kiel tigroj -- sed ve: dekdu tagoj estas tre longa tempo ĉe homoj restantaj senmanĝe, senakve, kaj la favorato je veto estis Joe Capper. "Joe estas forta kaj nekonfuziĝema homo," pensis la mineja administranto; "li tenos la vivon, sed timinde la alia estas tro malfortika."

Tio estis la ĝenerala opinio, kaj ĝi fine trafis la orelojn de la vidvino Owens. "Dio estas pli kruela kontraŭ iuj ol aliaj," ŝi vee plendis. "Li forprenis de mi la edzon, aŭ, pliguste diri, Li igis lin forlasi min, kaj nun volas senigi min je la sola filo.

Ĉiam la malriĉaj kaj senhelpaj devas suferadi. Joe Capper sukcesos travivi, ĉar li havas nenium esperantan revidi lin; mia filo mortos, ĉar li estas mia sola helpanto. Ho, la kruela Dio." Tiel ŝi daŭre babilis, demandante al ĉiu, kion ŝi faris por meriti tian traktadon, sed neniu povis klarigi al ŝi, ĝis poste per diro, ke ŝia lango estas ŝia kulpiganto.

Je la dek-dua tago ili finhakis trairejon. Nu, mi ne volas aperigi la aferon pli nigreca ol ĝi efektive estis, ĉar por diri la nudan veron estas mia ĉiama celo, kaj ĝin mi foje jam trovis sufiĉe stranga. Tamen, devige estas dirota, ke la pioĉistoj trafis ilin -- unu vivantan kaj unu mortintan. La morta estis Joe Capper, kaj la kialo por tio estis videblega. Li estis entrancinta vundon en sian manradikon per akra rando de la propra manĝvazo, kaj la bubo ŝajne, estante en komao, ne sciis, kion li trinkis.

La stranga parto de la rakonto eble restus daŭre kaŝita, se ne estus, ke la vidvina lango denove ekklakadis. Ŝi komencis iradi de dom' al domo, dirante al najbaroj, kiamaniere la bona Dio respondis ŝiajn preĝojn. Eĉ ŝi rakontis ĝin ĉe la temaĝo de la Societo de Patrinoj. Oni ne povis reteni ŝin, kaj multaj enuis je troaŭdado. La mineja administranto estis unu tediginto. Tial li vizitis ŝin en unu nokto, portante ion sub papero. Post invito eniri, li demandis:

"Ĉu vi scias, kiu estis tiu Joe Capper?"

Ŝi tute ne havis ian informon pri la mortinto.

"Nu, vidu ĉi tion," li diris. La montraĵo estis uzade difektita manĝvazo, de kiu li forprenis la kovrilon.

Ĝi estas lia manĝvazo," ŝi diris sciiginte, "kaj tre uzita, tre malpura."

"Nu, tiu malpuraĵo savis la vivon al via filo," respondis la administranto. "Vi nepre devas legi komunikon engratitan sur la fermo-plato. Ĝi estas skribo de mortanto -- al vi."

Post ioma peno ŝi konfesis nekapablon ĝin deĉifri.

"Aŭskultu do. Ne estas multo legota," respondis helpe la viro, kiu tiam voĉlegis por ŝi la jenon:- "Diru al Tomĉjo, ke ĉi tio estas ĉio, kion povas fari por li lia patro. Joe Owens."

Jes, ĝi certe estis stranga afero, tamen per ĝi klarigis la korinklino de Joe al la bubo. Kompreneble, iom anime fortiĝinte, la vidvino denove plendis pri la krueleco de Dio pro tio, ke Li permorte forprenis de ŝi la edzon tuj kiam ŝi lin trovis. Estus dece se ŝi tenus fermita la buŝon kaj per tio mutigus sian ĉiaman "Dio faris tion kaj ne faris ĉi tion," k.t.p.

Joe estus farinta la samon por kiu ajn -- tiamaniere Patrino-Naturo konsistigas la ministojn.

----- F.R.BANHAM. (El la Angla trad)

PURA SILKO estas unika substanco; forbruligite, ĝi lasas absolute nenion da cindro. Se enestas en silko la plej malgranda falsaĵo, restanta cindro aperus post brulo. Ĉina silko estas pura, kaj la Ĉinoj fidus al ĝia pureco. Pro tio, ili vendas ĝin laŭ pezoz anstataŭ laŭ longo.

-----

FRUA ARĤITEKTURO.

Longe antaŭ ol la homoj ekkomprenis la skribarton, niaj prapatroj postlasis siajn vivhistoriojn per la tiamaj konstruaĵoj kiuj spegulis morojn kaj vivmanierojn. Klimato kaj religio gvidis la mensojn kaj la manojn de la majstraj konstruistoj, kaj ĉar antikvuloj kredis, ke la animo revenos teren por reenkorpiĝi, ili klopodis konservi la kadavrojn kontraŭ ĉiaj atakoj. Tial ili konstruis fortikajn konstruaĵojn, kiel maŭzoleojn, ekzemple la piramidoj apud Kairo, el kiuj la plej granda estas de Ĉeops, tirano kiu vivis ĉirkaŭ 3700 jaroj A.K. La bazo de tiu piramido staras sur kvadrato de solida roko kiu okupas ĉirkaŭ 13 akreojn, kaj la triangulaj muroj havas altecon, ĝis la pinto de 481 futoj. En tiu tempo, la ĉefcelo de la konstruistoj ne estis fari belajn, sed ĉiamdaŭran masegon.

Poste, proksimume 2200 A.K., iuj faris tombojn ĉe la orienta bordo de la rivero Nilo, ĉizitajn el vertikala roksurfaco, el kiuj kelkaj similas la Grekan. En la 7a jarcento A.K. la Grekoj kopiis la Egiptajn formojn, kaj farante tion, multe plibonigis la iom krudajn detalojn.

Ĉirkaŭ 1600 A.K., la Teban periodo, la reĝoj Totmes III, Amenhotep III, Seti I, kaj Ramzes II, klopodis superi la konstrupenadojn de la ceteraj kaj konstruis, plej notinde, la templon de Karnak, kaj antaŭ tiu templo la du obeliskojn, unu nuntempe en Romo antaŭ la preĝejo, S. John Lateran, kaj la alia, Cleopatra's Needle, en Londono.

Ĉiu templo sekvis la saman stilon -- vicoj de altaj kolonoj, kiuj subtenis la plej altan parton de la tegmento; la flankaj partoj, malaltaj, subtenataj per aliaj vicoj de kolonoj. Tiu desegno enlasis lumon tra traboritaj ŝtonaj paneloj, kaj jen, oni sciigis pri la deveno de la plimalpli moderna preĝejo kaj katedralo.

La Asiria regno, kiu starigis laŭlonge de la bordoj de rivero Eŭfrates, kies ĉefcivito estis Nineva, postsekvis la Egiptan, sed kvankam la loĝantaro estis kulturaj homoj, kiuj konstruis grandegajn palacojn ktp, mankis al la desegnoj arteca merito. Plejparte la konstruistoj uzis sunbakitajn brikojn en la muroj, kaj pro tio tiujĉi ne povis kontraŭstari la detrupovon de alternaj atakoj de pluvo kaj de la suno, kaj post ne longa tempo ili kadukiĝis. Nur malgrandaj pecoj de la bazo ankoraŭ restas kiel post signo de iama grandega regno.

La Egiptoj kaj la Asirioj ambaŭ komprenis la principojn de arkaĵaj formoj, laŭ restaĵoj de brikaĵaj volboj, kiuj troviĝis en diversaj regionoj, sed la Asirianoj malofte uzis la kolonon. Multajn ekzemplojn de ilia arĥitekturo oni povas vidi en la Brita Muzeo.

Ĉirkaŭ 530 A.K. la Persoj disvolvigis alian stilon sub la regado de la reĝoj Darius kaj Zerxes, kiu superis eĉ la Asirian kaj Egiptan, laŭ la grandiozaj kaj luksaj palacoj ĉe Persepolis, kie la ĉefkonstruaĵoj starigis sur vastaj terasoj, ĉizitaj el solida roko. Hodiaŭ, krom kelke da ruinoj, nur la terasoj restas. La 'Granda Halo de Zerxes' ĉe Persepolis havis areon da 105,000 futoj; ĝia tegmento estis subtenata per kolonoj altaj 64 futojn, kun diametro kvar futojn kaj ses colojn. La Persoj ne postlasis multajn monumentojn.

La plejfrua aŭtenta Greka historio estas datumita 776 A.K., kaj

la plej malnova konstruaĵo kiu ankoraŭ restas, estas la "Trezorejo de Atreus" ĉe Mycenae. Post kiam la Grekoj venkis la Persojn, la arto atingis sian zeniton ĉe Ateno, 400 A.K., ĝis la morto de Aleksandro la Granda, post kiam ĝi grade dekadencis. Iliaj temploj estis kompare malgrandaj, sed ĉiam belaj laŭ desegno. Notinda ekzemplo estas la Partenon. Ĝenerale Greka templo havis fenestrojn en la muroj. La Grekoj uzis tri formstilojn -- Dorika, Ionika, kaj Korinta; la unua montris simplecon, fortecon kaj severecon, la dua estis gracia kaj ornamriĉa, kaj la tria treege ornamriĉa.

Kiam la Roma armeo eniris Grekujon ĉirkaŭe 200 A.K., la soldatoj forprenis multajn valorajn detalojn, ekzemple kapitelojn de la grandioza templo 'Olimpian Zeus' de Ateno, ĝis Romo, por ke la tieaj arkitekturistoj uzu tiujn kiel modelojn de tiu bela stilo, Korintan. Krom temploj, la Grekoj konstruis teatrojn. Ankoraŭ la restaĵoj de grandega teatro, Dionisus, kiu sufiĉis enteni 30,000 rigardantojn, troviĝas ĉe Ateno.

Ĉirkaŭ 753 A.K., la Etruskanoj floris en bonega stato de civilizacio; tiuj alvenis el Azio, alportante al Romo konon de la artoj kaj konstrulertecon. La Romanoj kaj Etruskanoj estis kulture kunligitaj. Inter la grandegaj Romanaj konstruaĵoj estis 'Kloaca Maksima', longa ŝtona subtera tubo, por elfluigi akvon el la malseka grundo. Tiun drenilo oni kovris per arkajforma tegmento. Tiutempe, la duoncirkla arkaĵo estis tute nova. Ĉe multaj lokoj tiu arkaĵo restas, nuntempe, tute sendifekta, post 2500 jaroj. Romaj arkitekturistoj multon lernis de la Etruskanoj kaj la Grekoj, sed ĉiam fieris pri tiu Roma arkaĵo kiun ili mem elpensis, ĉar ĝi revolucigis tute ĉi tioman arkitekturon. La Romanoj ankaŭ inventis tute novan konstrumaterialon, nome, betonon. De tiu tempo oni uzis betonon kiel ĉefmaterialon en ĉiu impona konstruaĵo. Brikoj kaj ŝtonoj servis nur por kovri la betonon. La Grekoj abomenis ian trompaĵon en la arkitekturo; kontraŭe, la Romanoj malkaŝe aprobis tion. Aŭgustus, imperiestro, dungis skulptistojn el Grekujo por verki skulptaĵon ĉe la plej grandaj temploj. Tiel troviĝis en Romo gloraj verkoj de la Greka arkitekturo, sed bedaŭrinde, la Romanoj mem detruis tiajn por akiri spacon, kiam ajn ili deziris lokon por la impona konstruaĵo. La fama amfiteatro, la Koloseum, kun sidejo por 80,000 rigardantoj, estas konstruita preskaŭ entute el betono, tegita per ŝtono. La Koloseum estas la plej impona ruino en la mondo, sed arkitekture ĝi havas nur malmulte da merito.

Granda komerca centro -- Romo -- postulis alian formon de arkitekturo -- Basilika -- kiu povis servi kiel juĝejo, komercejo kaj borso. Tiu ekzemplo ĉe Trajan, 'Basilika Ulpia' konstruita 115 P.K. havis halon longe 360 futojn, larĝe 180 futojn. Kutime, tia konstruaĵo havis tegmenton el ligno. Pri privataj domoj, nur malmultaj ankoraŭ restas en urboj Pompeii kaj Herculaneum, en stato de ruino. Ĉe Romo mem, la privataj domoj estas tute detruitaj.

La Roma kaj Greka stiloj estas akceptataj kiel klasikaj formoj -- la Greka esprimas belarton, kaj la Roma potencon.

El "I SWEAR BY APOLLO," de William E. AUGHINHAUGH,  
M.D., LL.B., LL.H.

Unu el miaj lastaj vizitoj al Hindujo estis al tre fama raĝao. Li regis grandan teritorion sude de Bombaĵo, estis ekstreme riĉa, multe vojaĝadis, kaj profunde interesiĝis pri ekonomiaj kaj sociaj aferoj. Mi iĝis lia kuracisto kortega.

En lia haremo troviĝis pli ol ok cent edzinoj kaj kromvirinoj el diversaj aĝoj, grandecoj kaj koloroj. Tiuj virinoj luksege vivadis kaj oni provizis por ili ĉiom fizikajn komfortojn, kiujn ili deziris, ĉar ilia grandsinjoro estis treege indulga. Kvar fojojn en ĉiu jaro estis lia plezuro dungi unu-du privatajn vagonarojn, kun manĝvagonoj kaj enlandaj kuiristoj ortodoksaj, por preni siajn edzinojn por ekskurso de kvardek ok horoj de sia ĉefurbo al Bombaĵo, en tiu tempo la plej grava butikcentro de Hindujo. Lunukoj kaj aliaj geservistoj akompanis ilin. La vagonaroj haltis ĉe flankrelaro apud la granda ĉionprovizejo de Whiteway kaj Laidlaw, kaj sub baldakenoj kun ŝirmkurtenaj flankoj, tiuj kaŝitaj virinoj de la haremo piediris al la butikego, neviditaj de la publiko, kiujn retenis fore la policanoj kaj la privataj gardistoj de la raĝao.

La inventaro estis ĉiam kalkulata en la tago antaŭ ilia anoncita vizito al la granda komerca vendejo. En la tago sekvanta ilian foriron, ree oni kalkulis la inventaron, kaj la diferenco inter la du inventaroj estis la konto, kiun pagis la dorlotema kaj multedziga raĝao. Nur inaj vendistoj estis permesataj en la butiko dum la du tri tagoj de ~~buĝado~~ farita de tiuj raĝa-edzinoj, ĉar nenia fremda viro povas rigardi la vizagojn de virinoj de la mahometana religio. La sinjorinoj de la haremo malfermis vitromeblon post vitromeblo, elektis kion ajn ili ŝatis, kaj prenis ĉion kion ili deziris. Ili vagadis de etago al etago, asistataj de servistoj portantaj ilian rabajon. Plejmulto el tiuj troindulgitaj estaĵoj preferis juvelaron kaj sensignifajn bagatelojn al pli praktikaj aĵoj. Mense ili estis ankoraŭ infanoj kaj facile feliĉigataj.

Hejme, ankaŭ, la raĝao iris al ekstremoĵoj por indulgi la kapricojn de siaj edzinoj kaj provi teni ilin kontentaj. Pro unu el liaj provoj amuzi ilin, mi neintence kaŭzis tre eksterordinaran aĉetaĵon.

S-ro Plunkett, Usona vojaĝanta vendisto, venis al Bombaĵo kun vasta diversaj specimonoj tipe Amerikanaj. Lia havaĵo estis la plej eble malkongrueca kunigo de objektoj kiun oni povus imagi, kaj estis elektata tute sen iu ajn ideo pri la postuloj de la landoj kiujn li vizitos. Li havis...gigantan pumpilon-brulestingilon -- el la orumita kaj nikelita kvarĉevala speco kiu faras pli da bruo kiam kurlanta al brulo ol unu el niaj grandaj vagonar-maŝinoj plenvaporigita kaj tiranta centon da frajt-vagonoj. Ekvidante liajn komercaĵojn, mi sciis, ke neniam li interesos iun ajn urban konsilantaron pri tiu fajrmaŝino. Mi sciigis tion al li, kaj poste, pro malagrablaj sportoj, li konsentis kun mi. Unu tagon kiam S-ro Plunkett estis ĉeŭrbe, la raĝao ankaŭ hazarde estis tie kaj ludi kun mi. Dum la manĝado mi sugestis al li, ke li eble interesiĝos inspekti elmontraĵon de Amerikanaj komercaĵoj de S-ro Plunkett. Kune ni vizitis la demonst-



racion. La okuloj de la raĝao tuj fiksiĝis je tiu estingilo. Li ŝajnis ensorĉita de ĝi. Mi diris al li, ke mia opinio, laboranta plenrapide, ĝi povas senakvigi la golfeton de Bombajo en ĉirkaŭ dek horoj de pumpado sed kiel brulestingilo ĝi estas tute senutila en ia parto de Hindujo, aŭ ja eĉ en ia ajn lando de Azio, simple pro tio, ke neniu el la urboj havas modernan akvo-provizon aŭ la necesajn ilojn por kunigi la maŝinon al la akvo-ĉeftuboj. Tamen li aĉetis la maŝinon je la nomita prezo kaj aranĝis pri ĝia liverado al sia palaco. Mi demandis al li kion li intencas fari kun ĝi.

"Veturigi ĝin ĉirkaŭ la palacajn ĝardenojn ĉiutage por la sinjorinoj de la haremo," li respondis kun rideto. "Ĝi amuzos ilin. Krome ĝi donos ekzercadon por kvar virĉevaloj en la palacaj staloj, kiuj multe bezonas laboron."

Poste mi estis invitata pasi<sup>Ĝ1</sup> semajnon kun la raĝao ĉe lia mond-fama palaco.

"Venu kun mi," li diris post lunĉo, "kaj vidu kian uzon mi faris el tiu estingilo."

Ni sidiĝis sur ombroplena verando, kaj baldaŭ aperis tiu giganta pump-estingilo tirata de kvar komplete terurataj virĉevaloj. Ili ĝin kirlis ĉirkaŭ kaj ĉirkaŭ la palacajn grundojn. Ĝia sonorilo klakegis, ĝia fajfilo fajfadis, nuboj da densfumo vomis el ĝia fum-kameno, la ĉevaloj estis frenezaj pro teruro. Pluvoj da fajreroj kaj polvo fluis ĉiudirekten el la cindrokesto. Kun terura bruo, la elfluego de fumo kaj fajreroj aspektis kvazaŭ parto de la infero dise liberigis.

La sinjorinoj de la haremo, elrigardantaj el siaj latisfenestroj, blekegis pro ĝuego, kaj la viroj kriis plengorge ĝis ili raŭkiĝis, kiam la afero pasis kaj repasis. Fine ĉevaloj kaj vidantoj ambaŭ senfortiĝis. Mi estas certa, ke ne unu el la indiĝenoj kaj vidantoj kiuj vidis tiun prezentaĵon, krom la raĝao, havis la plej malgrandan komprenon pri la vera celo por kiu oni konstruis tiun modernan maŝinon. Ili rigardis ĝin kiel grandan meĥanikan mirindaĵon -- kolosan ludilon, farita solcele por ilia amuzado. Ĝi fine eksplodis en unu tago dum ĝi kuregis ĉirkaŭ la terojn, mortigante la meĥanikiston, la hejtiston, la veturigiston, unu el la ĉevaloj, kaj vundante kelkajn rigardantojn.

----- L.E.BAILEY. (trad.)

### TRE FRUA ESPERANTISTO.

Tre frua Esperantisto estis Doktoro William Lamb de Elliston, Sud Aŭstralio. Li estis vera Angla sinjoro, altkreska, altrangeca laŭ aspekto, kaj lia eminenteca figuro estis bone konata en la stratoj de la malgranda urbo, de kiu la loĝantoj sin multe amuzadis observi lin daŭre forpelanta la muŝojn per sia mano kaj promenad-bastoneto. Eĉ vere, li havis grandan malamon kontraŭ muŝoj, kiuj naske plimultiĝis ĉe la proksimaj sablomontetoj, kaj efektive oni povus diri, ke la grado da tiu malamo estis dua nur al lia amo al Esperanto, rilate al kiu lia edzino ofte diris, ke li estas frenez-entuziasma.

Konsentite, li estis treege fervora por la lingvo kaj faris tutan sian eblon por ĝin diskonigi. En la jaro 1910, kiam li jam antaŭ kelkaj jaroj mem estis lerta Esperantisto, li komencis klason Esperantan kiun li kondukis en sia propra domo. La lernantoj ĉe tiu klaso estis la pastro (Rev. R. T. M. Radcliff), la tiea lerneja instruisto, la urba sekretario, la policano, la belega filino de la doktoro kaj mi mem. Li estis bonega instruisto kaj ni rapide progresis per lia ĉiam pacienca instruado. Poste li transloĝigis al alia urbo, sed ne antaŭ kiam liaj studentoj povis korespondi kun li per la lingvo, kaj mi ankoraŭ tenas poŝtkarton kiun li skribis al mi de Hummock Hill, lia nova hejmo, post kiam li rimarkigis al mi la erarojn en mia letero al li, li skribis "Mi paroladis pri la kara lingvo en la ŝtata lernejo tie ĉi kaj kiel rezultato mi havas kurson enhavantan dekdu gelernantojn!"

Esperanto estis certe lia preferita flankokupo. Li povis interesi ĉiun en ĝi, kaj neniam ĉesis paroladi pri ĝi, laŭdante ĝian utilecon. Ofte li citis D-ro Zamenhof, al kiu li havis grandan admiron.

----- R.G.TELFER.

LETERO DE MALNOVA ESPERANTISTINO.

Ni prenas la liberon publikigi la jenan leteron de amiko jam de longaj jaroj:-

Estimata Sinjoro,

Estis vera ĝojo al mi ricevi la gazeton LA RONDO, kiun mi tralegis kelkfojojn por ĝui la lingvon, pri kiu bedaŭrinde mi aŭdis nur malmulton dum kelkajaroj. Ĉi tiu estas mia kulpo, ĉar mi grave malsaniĝis post la morto de mia edzo, S-ro J. H. Cadell, kiu estis vera entuziasmulo. Mi memoras kelke da nomoj sur la listo de Fioniroj (Maja numero) Antaŭ mia alveno al Aŭstralio mi ĉeestis la Sepan Internacian kongreson en Antverpeno, kie mi vidis Doktoron Zamenhof. Ho ve, se la popoloj nur povus fariĝi veraj Esperantistoj, por plifaciligi la nunajn problemojn internaciajn! Eble en la estonteco ĉi tiu estos plenumita se nur ni fidas.

Nuntempe mi estas pro artritismo kripligita kaj devas resti hejme, tial ne havas okazon ĉeesti kunvenojn; sed mi povas legi, tial mi ŝatus ricevi la gazeton se vi bonvole sendus ĝin. Mi enmetas 4ŝ.

Kun bondeziroj al la kunlaborantoj kaj samideanoj,  
Sincere la via, ETHEL CADELL.

-----  
JEN LA LITEROJ de la Angla alfabeto laŭ ordo de ilia uzofteco. Ĉu iu leganto povus informi pri tia ordo de la Esperanta alfabeto?

E T A O N I S H R D L C U F M P B W G Y V K X Q J Z.

-----

LA FILINO DE LA DRINKESTRINO.

(Es zogen drei Bursche...)

UHLAND.

Tri junaj bravuloj la Rejnon transpaŝis;  
Al iu drinkeja estrino almarŝis:

"Estrino, ĉu bonaj biero kaj vino?  
Kaj kie troviĝas la bela filino?"

"La vino, biero ---- ja klara kaj hela,  
Sed kuŝas senviva la bela."

En ĉamb<sup>filino</sup>ron enpaŝis la trio, por vidi  
Kadavron de ino en kesto kuŝsidí.

Unua bravulo morttukon fortiris  
Kaj longe, amare la inon admiris:

"Se nune vi vivus, ho bela knabino,  
Mi amus vin jam de nun, pluen sen fino."

La dua resternis la tukon forkaŝe  
Kaj turnis sin plore, singulte, trempaŝe:

"Ho vin, kiu kuŝas jam ĉe la mortintaj,  
Amadis mi multon da jaroj pasintaj."

La tria denove la tukon dis-prenis  
Kaj arde la buŝon mortpalan kispremis:

"Mi amis vin vivan; nun amas en morto;  
Kaj amos senfine tra ĉia homsorto!"

----- F.R.BANFAM (trad.)RIM-NOVELETO.

Malpli gracia li,  
ol volapuka frazo;  
kaj ŝi, frivola pli  
(nu tio laŭ emfazo)  
ol eĉ kongresanino.  
Ili, ĉe apoteko,  
sin trafis en Berlino  
antaŭ Mondbatal-eko.

Al ĉio la finiĝo;  
al beletraĵo nia,  
kiel al gramatiko  
Kalokse-Varingia.  
Jen esperantistiĝis  
ĉi Zam.-dotota paro,  
kaj baldaŭ geedziĝis.

•••  
VERDADŬ LA IDARO!

----- JoE.

LINGVAJ NOTOJ.

SPIRITĈEESTO. Sur p. 188 Heroldeko troviĝas jena stranga komento de Joab Eljot:- "tiu monstro 'spiritĉeesto' estas terura anglismo. Plejne estus sufiĉinta la eleganta esperantaĵo 'sprito'". Tio estas dubbla eraro. Kiam F-ino Bailey (p.170 RONDO) skribis: "Mi havis la spiritĉeeston min deteni sciigi..." ŝi uzis Zamenhofan esprimon cetere sankciitan de la Plena Vortaro S.A.T. kaj aliaj bonaj vortaroj. En la Angla-Germana Vortaro de Flugel sub "presence of mind" sidas difinoj "Besonnenheit", "Geistesgegenwart", kiuj tradukiĝas en Worterbuch Deutsch-Esp. de Pfeffer per "spiritĉeesto". "Sprito" havas tute alian sencon, nome "wit(tiness), humor, sprightliness" (Millidge). El cent similaj citaĵoj ni direktas lian atenton nur al du: "La oficisto ricevis sufiĉe da spiritĉeesto por flustri..." (Fabeloj de Andersen, Vol.1,p.85), kaj "Ŝi retrovis sian maltimon kaj ĉeeston de l'sprito" (Interrompita Kanto, p.28; Kabe). Cetere nomi ĝin anglismo estas aparte maltrafa; la formo estas "spirit-" ne "mensĉeesto." F.R.BANHAM.

PRI LA ARTIKOLO "IDIOTISMOJ, ALUDOJ EN ESPERANTO" (Junia, p 127) De tempo al tempo mi aŭskultas per mallongaj ondoj al la brodkastado de informoj el aliaj landoj. Tio estas vera leciono. La lingvaĵo (Angla) estas kristale klara, logika, korekta kaj -- bonstila. Tute mankas aludoj, idiotismoj, bildesprimoj; tamen la lingvo estas kolorplena, riĉa varia. Troviĝas sarkasmo, ironio, maldolĉeco, ridemo. Oni povus rekte, vorto post vorto, traduki en Esperanton. Se oni ne parolas tro rapide mi povas traduki (eĉ aŭkulti) en Esperanton, ŝajne en internacie bonan Esperanton.

Aliaj Lingvoj:- Ŝajnas al mi, ke la utilo de kono, aŭ pli bone scio, pri aliaj lingvoj troviĝas en tio, ke per tio oni pli kaj pli liberigas de naciaj idiotismoj, kaj lernas uzi lingvaĵojn sen aludoj, metaforoj, proverboj k.t.p.. Esperanto mem tiurilate estas bona, sed troviĝas la kulpo, ke ĝi estas kvazaŭ spegulo en kiu reflektiĝas la nacia pensmaniero de la uzanto. Lanti ("Vortoj," p.23) pravas, dirante, ke ĝi estas la plej malfacila lingvo, ĉar en ĝi nur logika (ne poeta) menso povas paroli -- verki sen idiotismoj, ĉar per si ĝi ne forigas tiajn. Ankaŭ, por bonstila uzi Esperanton necesas ne nur plena scio pri la lingvo, kiel ĉe la naciaj, sed io alia, nome pri kio estas akceptebla universale. C.C.COWLING.

PRI "CI". Malgraŭ ke kontraŭ tiu pronomo Zamenhof sintenis nevarme ("Lingvaj Respondoj") kaj nur malofte lasis sin ĝin skribi, kaj malgraŭ la atako de Kalocsay en "Lingvo Stilo Formo", iuj tradukantoj bedaŭras se legantoj ĝenerale perdus familiarecon kun tiu formo pro ĝia preskaŭa neuzateco. En kelkaj lingvoj ekzistas du formoj (ekz. you, thou; tu, vous; du, Sie) kaj foje estas aparte dezirinde, ke la tradukanto indiku pri tio: kiu el la du staras en originalo. Ekz., en "La Nigraj Panoj" ("RONDO", Okt.) zorgaj legantoj rimarkis anstataŭigon de "vi" per "ci" tiuparagrafe, kie la anĝelo pasas el la rolo de pesanto-juĝisto en tiun de severpostula sed animsavema konsilanto al Nerli. Ĉar la rolo ŝanĝiĝis, ankaŭ la alparola formo tiel faris,

prenante al si patrecan tonon, milde sed solene avertan: kio estas iagrade indikita per "ci".

Ni devas tamen rimarki, ke estas icm tre komplikita la konvena maniero uzadi tiujn pronomoduojn en la diversaj lingvoj, kaj ili povas provizi veran inferon da embarasaĵoj al trokuragemoj, kiuj uzas lingvon ne sian. En Esperanto "ci" signifas senceremoniecon, (parenca) familiarecon, intimecon, k.s. Verdire, en tiuj maloftaj okazoj, kiam al tradukantoj ŝajnas bone ĝin uzi, ili saĝe farus aldonante ied piednoton. Tion ne faris Ric. Berger en "La Vojo Returne" p. 192, kaj donis laŭ Carl Minor, ekzemplon de netrafa uzo de la vorteto.

F.R. BANHAM.

**VE!** Jenajn vortojn mi ricevis de la estimata Robo: "Kara Joab, mi rimarkas, ke vi uzas 'Ah'. Sed, por mi la 'h' en tiu interjekcio aldonas neniom al la prononco. Mi uzis 'aĥ', por tiu ve-sopiraĵo, sed pli ol unu E-isto esprimis al mi malplaĉon<sup>Pro</sup> ĝia graka kaj malbela sono. Laŭ S-ro Gordon, Z. uzis 'Ah' sur p.130 de "Rabistoj", sed mi tiupage serĉis vane. Kial ne uzi 'Ve!' anstataŭ 'Ah!' kaj "Aĥ!?"

Mi respondas: La esenco de floroj estas aromo, de vortoj sono. Ĉu aromoj, sonoj povas porti propran signifon en si? Al mia orelo ŝajnas, kvazaŭ vorto ofte penas por esprimi sin ĝuste per tiu sia sono. Jen do, por mi, "A" estas tiu pura, vigla vokalsono, per kiu mi lernis distingi la adjektivon. Aldonante "h" al tiu pura, vigla "A", jen ni havas "Ah", kiu prononciĝas tre simile kiel "Aĥ", sed milde-dolĉe anstataŭ brugrake. Rigardante animpikan pentraĵon, legante kortuŝan poemeton, mi eble ekkrius "Ah!", sed ne "Aĥ!" nek "Ve!". Se mi lasus fali malpuraĵon sur tiun pentraĵon, pri kiu mi ĵus flustris "Ah!", mi treeble aldonus "Aĥ!". Alivorte, per "Ah!" mi esprimus mildan sopireton, per "Aĥ!" efektivan malplaĉon. Per "Aj!" mi komprenus, ke io malordas. Ekzemple, se iu surtretus miajn piedfingrojn, mi povus ekkrii "Aĥ!" por esprimi mian malplaĉon, aŭ "Aj!" por esprimi mian vundiĝon. "Ha!", "He!", "Ho!", "Hola!", jam estas sufiĉe difinitaj interjekcioj por eniri la P.V. Kaj, same pri "Ve!". Sed, "Ah!", "Aĥ!", "Aj!", ankoraŭ estas nuraj sonoj. Ne estus maloportune, se ĉi lastaj difiniĝu, tiel ke oni povu distingi la kiaecon de vekrio.

JOABO.

(Cetere kabe kelkfoje uzas "Oh" en sia traduko de Interrompita Kanto. Mi ankoraŭ dubas, ĉu la esprimado de la sentoj de homoj sur la tero estas tiom egala, ke ĉie kaj senbare ili komprenus la signifojn, kiujn Joabo tiel precize asertas kuŝi en tiuj sonoj. La fakto, ke li devis fari klarigon al Britoj, por kiuj ili estas relative familiaraj, subtenas mian supozon. F.R.B.)

(En la lando en kiu mi naskiĝis, "Ah!" signifas "Come here!" L.E.B.)

**SIMPATIO:** Liking, affinity, sympathy; reciproka favora instinkta inklino de du personoj. Favora inklino de iu por alia, kiu plaĉas al li. "Kun okuloj plena de simpatio kaj kunsento (sympathy and liking) por mi tiu afero estas tre simpatia" (appeals to me).

**KOMPATO:** Kortuŝo pri ies sufero aŭ malfeliĉo, kaj deziro ĝin malakrigi.

**INDULGO:** Malsevera traktado, milda konsidero al iu.

LUMI estas netransitiva: "la suno lumas" (gives off light). La trans-  
itivaj formoj estas (1) LUMIGI: havigi lumon al io; provizi per lumo.  
(2) PRILUMI: lumi al io; verŝi lumon. "Lian vizagon la luno prilumi-  
as". Esperanto do povas distinge esprimi la efikadon de luma materio  
kiu per si mem verŝas lumon sur objekton, kaj la agadon de homo kiu  
lumigas objekton per helpo de luma materio aŭ aparato. Kiomege del-  
ikata kaj subtilnuance estas Esp-o, kiun certaj nomas ĵargono!

----- F.R.BANHAM.

### ASOCIAJ AFEROJ.

KOMITATA DISKUTO. Dankon al ĉiuj, kiuj sendis ideojn por la komit-  
ata diskuto pri longtempa programo por la asocia laboro. Ĉiun pro-  
ponon ni metas antaŭ la Komitatanojn.

I.E.L. La Sekretario de I.E.L. avizas, ke nia kablograma aliĝpeto  
bone atingis lin, kaj ke tuj post ricevo de nia statuto, ties komit-  
ato faros decidon. Espereble nia Asocio fariĝos Landa Asocio ne pli  
malfrue ol la 14 de Jan. 1943. Unu devo de Landa Asocio estas kolekti  
kti por la Ligo la kotizojn de ĝiaj individuaj membroj en Aŭstralio.  
La Estraro decidis, ke la Cefdelegato tiel agos por A.E.A., kaj tiu-  
jn kotizojn ni regule sendos al la cefsidejo de la Ligo. Plenajn  
detalojn ni avizos en sufiĉa tempo.

LIBROSERVO. Donacoj danke ricevitaj -- Brisbane Esp. Societo 1/2/6;  
S-ro J.H.King 3/-, S-ro A.Turner, 4 libroj por revendo; F-ino Bailey  
1 libro (jam revendita). Kredeble aliaj legantoj povas donaci uzit-  
ajn sed revendeblajn librojn, kiuj helpus la servon. Tiuokaze, bon-  
volu avizi la Sek-n (sed ne sendu la alibrojĝis la Sek. avizos al  
kiu sendi ilin). Ĝies helpo bonvena.

ADRESARO. Espereble dua eldono aperos en 1943. Se eble ĝi ankaŭ  
enhavos, la Statuton, detalojn pri la diversaj servoj, klarigon pri  
nia labormetodo k.t.p. Por ĝisdatigi vian ekzempleron aldonu la jen-  
ajn sur la montrita paĝo:- 8. Sr A.Bassett, "Hilldene", Seymour RA.  
Pr T.C.Carne, Gardiner Rd., Burwood. R.A. -- 12 Sr A.L.Martin, 4  
Merton St., Box Hill, R.A. -- Sr W.J.Murphy, 20 or 56 Cumberland Rd.,  
Pascoe Vale.R.A. -- 15. Sr B.B.Hartley, Rainworth Rd., Rainworth, W4  
Brisbane. B.R.A. -- Sr H.Dickinson, Belgrave Rd., Indooroopilly, SW2,  
Brisbane, BL,B.-- Fn J.Byron, "Sorrell", 21 Jubilee Trace., Ashgrove  
W3, Brisbane. IT-FL-PM-NK,B. -- Fn R.Macpherson, "Opoho", Fortescue  
St., Spring Hill, B 18, Brisbane. K.B -- 16 Sr A.J.Sycamore, "Bon-  
venu", Chester St., Highgate Hill, sl, Brisbane. Ks-Pm-SA,B. -- Fn E.  
Weller, 38 Mullen St., Hawthorne, NEL, Brisbane. B -- 18 Sr H.M.  
Leighton, Box K787, G.P.O. Perth, R.A.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la kotizon (1) de Membro-Abonanto, S-roj B.  
Hartley, J.King, F-ino M.C.Trundle, S-ino A.Douglas (2) de Aliĝinta  
Grupo, Tas.Esp.Asocio.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ. Membro-Abonanto 5/-, LA RONDO al nemembroj 3/6, (afrankita) Ciam atentigu la Adresiton pri via ĝusta volo pri mono. Sur poŝtbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.  
 GEORGE HILLERMAN (Sekretario)  
 Box 75 Devonport, TAS.

-----  
 LA RONDO kore gratulas la nelacigeblan laboranton por A.E.A., S-ron Hillerman, kaj lian estimatan edzinon pro la enveno en ilian familirondon de kara filo, David Murray. Ni sincere esperas, ke la nova vivo estos por la gepatroj konstanta fonto de ĝojo kaj helpo.

-----  
 MELBURNA ESPERANTO-KLUBO. Ĉiumerkrede la fideluloj de MEK kunveniĝas ĉe "Budiness & Professional Women's Club." En la lasta monato ni bonvenigis tri novajn anojn -- du junaj lernantoj kaj samideanon el Eŭropo, kiujn ni kore akceptis en nian rondon. Ni tre bedaŭras la foreston de nia estimata kolego S-ino Hintze. Ŝi estas for pro malsano. Sendube nur tia ĉagrenaĵo povus deteni ŝin de la klubveno.

La Diploma Klaso sub la spirita gvido de F-ino Godfrey diligente laboras, kaj se ni ĝuste juĝas laŭ la gajaj ridoj, ili lernas "Esperanton sen larmoj."

Kelkaj intencas prezenti sin ĉe la Pyke Memoriga Ekzameno, kiu okazos, kiel kutime, en Novembro.

----- FLORENCE RAWSON.

KASO de la RONDO. OKTOBRO 1942.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£	s	d	<u>ELSPEZOJ.</u>	£	s	d
Konta transpreno.....	6.	11.	7	Papero.....	16.-		
F-inoj M.Helm, L Morphy				Poŝto.....	1.	2.	6
Trundle.....	10.	6		Ŝablonaĵoj.....	11.	4	
S-roj H.Calwell, B.Hartley				Bindpingloj.....	1.	6	
J.King.....	10.	6		Luo. Sept. Okt.....	10.-		
F-inon J.Willans.....		6		Inko.....	12.	6	
S-ino Cadell, A.Douglas.....		7.	6	Okazaj Elspezoj....	2.	8	
	<u>£8. 2.7</u>				<u>£3.16.6</u>		
				En la kaso £4.6.1	<u>£8. 2.7</u>		

(Notu eraron en la kontoj por Sept. Legu:- S-ro Lamb 3/6)

F-ino W.ADDIS, 25 Greville Avenue, Flinders Park, South Aŭstralia.

-----  
 Typing errors not corrected in this number will be listed in Dec.  
 -----

NOTU. p 190, line 23, anstataŭ "buĉado" prefereble legu "freneza akirado". (Angle "slaughter")

-----

NU TRADUKEMULOJ!

PROVAJ TRADUKOJ de la Verbo "TO PUT".

- |                                                                          |                                                                                                                            |
|--------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| (1) Ni metas libron sur la tablon.                                       | (13) preĝi, sed paroli pri artifiko.                                                                                       |
| (2) ĝuste montrigi horloĝon                                              | (14) enloĝigi en gastdomo, kaj post ĝi toleri ĝiajn mankojn.                                                               |
| (3) (seks)parigi bovinon ĉe bovo(n).                                     | (15) kolerigi, kiam ni sentas, ke iu prenas troan liberon rilate nin; aŭ, kiam iu nejuste ŝargas nin per siaj respondecoj. |
| (4) metie lernuligi krabon.                                              | (16) (kasete, aŭ ĝustige) klarigi aferon al iu, aŭ rigardi lin kiel stultulon.                                             |
| (5) doni verkan formon al ideoj.                                         |                                                                                                                            |
| (6) enhavenigi ŝipon.                                                    |                                                                                                                            |
| (7) pruve ekzerci ĉevalon.                                               |                                                                                                                            |
| (8) furkurigi la malamikon.                                              |                                                                                                                            |
| (9) meti proponon por konsiderado.                                       |                                                                                                                            |
| (10) subpremi ribelon.                                                   |                                                                                                                            |
| (11) ordigi ĉambron.                                                     |                                                                                                                            |
| (12) rilatigi la konatajn faktojn.                                       |                                                                                                                            |
| (17) resti firmestara (neforpremebla), simile al Casabianca sur ferdeko. |                                                                                                                            |

TRADUKU: The chain-smokers called for a round of drinks.  
The sophisticated women indulged in wishful thinking.  
He has just about as many apples as he has pears.  
What do you know that we don't know?

-----

NOMO DE FAMA INSULO.

Antaŭ mi kuŝas seso da tiuj vortaroj, kiuj enhavas kelke da landnomoj. Tri donas "Malto"; tri "Maltujo", kiel la nomon de tiu herooa fortikaĵo en la Meza Maro. Kiom mi scias, Zamenhof menciis ĝin nur unu fojon -- Fabeloj de Andersen, vol. 1, p.150 -- "Malto". Tiu prefero unuavide ŝajnas kontraŭagi lian principon pri uzo de -ujo ĉe landnomoj (Lingvaj Respondoj, No. 47), ĉar la loĝantoj de tiu insulo estas aparta gento, posedanta propran lingvon. Male ĉe Kreto, kiu estas provinco de Grekujo; ĝiaj loĝantoj parolas Greke, estas Grekoj.


Ĉe la adjektivoj "Malta", "Kreta" mi konsilus skribi majusklojn, kaj ĉe ĉiaj derivaĵoj de ne vaste konataj propraj nomoj, kiaj "Bernana", "Samosa", "Pafia", "Ĥetida".

F.R.B.



Oficina Organo de la A.E.A.

La Ronda.



Dec 1942

No 27

Eldonita de F.R. Banham  
2 Banchory St. Essendon W.Vic AUSTRALIA.

MORDANTO MORDITA.

La malrapida esprimriĉa voĉo de maljuna Luko estis plena de simpatio. "Mi tute konsentas kun vi, Tom Carter. Natan Bleaker estas la plej malagrabra homo en ĉi tiu regiono, malgraŭ ke li loĝas en granda domo."

"Ofendas min la maljusta flanko de la afero," murmuris Carter, enpense rigardante la lastan guton da biero en sia poto. "Se mia filino ja estus ŝtelulino, mi kiel unua batus ŝin. Sed ŝi ne estas tia. Male, pli honesta knabino neniam troviĝis."

"Ĉiu tion scias," akordis Luko, palpante al snufskatolo en veŝpoŝo. Li ĉirkaŭe rigardis al la malmulto da kutimaj klientoj en la drinkĉambro de la gastejo Packhorse (pron. pakhors; ŝargĉevalo) kvazaŭ li ĵetus provokon al iu kontraŭdiri la aserton. Sed la klientoj per silento unuanime konfirmis.

Kiel diris Joe Bourne: se maljuna Luko faras aserton vi povas ĝin kredi. Homo, kiu dum kvardek jaroj estris drinkejon, vaste scias pri la vivo, precipe ĉar dum tiu tempo li havis multe da aferoj kun friponoj el Old Market alvenintaj por ĉeesti lokajn konkursojn de ĉevaloj. La klientoj de la Packhorse same opiniis kiel Joe Bourne. Ili kutime vizitis Lukon por helpo en tempoj de maltrankvilo, sciante per longa sperto, ke ne mankos ĉe li bona konsilo.

Malgraŭ sia dika ventro Luko ne aspektis la tipe bonhumora drinkejestro, ĉar lia vizaghaŭto estis de flavpala speco, kaj li havis pendantajn nigrajn lipharojn kaj malhelajn okuletojn. Li prenis la poton de Tom kaj plenigis ĝin per tiele forta tiro, ke la biero superŝaumis la randon. "Tom, trinku tiun je mia kosto kaj rakontu la aferon."

Tom korvarmiĝis pro la simpatio. Li dankis Lukon kaj allipe levigis la poton: "Bonan sanon!" La malgranda ĉarpentisto surbenkigis la poton post forta gluto, kaj en tiu ago montriĝis pli da energio ol en liaj ĝistiamaj senvigilaj movoj. Estis kvazaŭ la biero kune kun la bonvolo de Luko jam donis al li esperon.

"Ne tre gravas tio, ke la knabino perdis oficon de ĉambristino ĉe la maljuna fiulo. Ekzistas multe da oficoj el kiuj elektu inteligenta ino kia Molly. Efektive, mi mem sentas ĉeksigi el lia servado, sed eble mi ne facile trovas alian laborlokon. La maljusto de la afero -- jen kio kruele pikas la edzinon kaj min. Por pruvi ŝian honestecon li intence kaŝis duŝilingon moneron en tirkesto pri kiu la knabino havis ordonon purigi ĝin. Tiam li nomis ŝin ŝtelinto!"

"Kie nun estas la duŝilingo, Tom?" demandis Luko, kun pinĉo da snufo survoje al nazo.

"Jen la malagrabraĵo," ĝemis Tom. "Molly diras, ke ŝi ne vidis ĝin -- opinias ke ĝi miksiĝis en rubo, kiun ŝi forĵetis. Se li estus malbeninta ŝin pro nezorgemo, li havus pravon. Sed la maljuna artifikulo asertas, ke ŝi ŝtelis ĝin, do li tuj maldungis ŝin, malgraŭ ŝia propono, ke duŝilingo deduktiĝu el ŝia salajro por fini la aferon. Ni povas fari nenion, ĉar li lege persekutus al Molly se ni tro ofendus lin. Ho se mi povus venĝi!" Li kraĉis lerte kaj impete antaŭ ol puŝi fingrojn en la snufujon prezentitan de Luko.

"Mi ne scias kion fari," dubtone komentis Luko; "li certe pravas laŭ la leĝo."

"Jes, sed la rakonto ankoraŭ ne finiĝis. En la lavotajaro, kiun la edzino ricevis de li ĉi-semajnon, troviĝis pijama jako, en kies poŝo sidis dekŝilinga monbileto. La cimaĉo ne kontentiĝis per pruvo al la honesto de Molly, sed krome deziris pruvi ankaŭ al mia edzino." La malgrasa bruna vizaĝo de Tom sulkiĝis en koleran grimacon, kaj liaj akvece bluaj okuloj pafis fajron dum li kraĉis ankoraŭfoje, eĉ pli fervore.

Luko klinis sin super la servbenko: "Dekŝilinga bileto en poŝo, ĉu vere? Tre interese, Tom." Liaj nigretaj okuloj momente lumis, kaj ekespero kaŭzis, ke la pipo de Tom haltis ire al buŝo: "Kion vi volas diri?"

"Vi asertas, ke dekŝilinga bileto sidis en la poŝo?"

"Ja, jes."

"Ĉu vi certas, ke ĝi estis tien metita intence?"

"Jes, tion ankaŭ li faris al S-ino Bamford, kiu antaŭtempe lavadis liajn tolaĵojn. Post kiam ŝi redonis la monon ŝi hazarde aŭdis la aĉulon diri al ŝia fratino, ke li pruvis la honeston de la lavistino kaj trovis ĝin bona."

"Kion vi intencas fari kun la bileto?"

"Redoni ĝin, kompreneble. Kaj diri al li, ke li estas ----"

"Ne! Ne faru tion," kviete konsilis Luko. "Donu ĝin al mi."

Tom ekmiris, tamen puŝis kalhavan fingron en veŝpoŝon kaj el-tiris monpapereton. "Jen ĝi."

"Atentu," diris Luko trenvoĉe. "Anstataŭ tiun ĉi dekŝilingan bileton vi prenu redone al S-ro Bleaker funtan."

"Funtan...!"

"Ne laŭtu. Se mi kompetentas juĝi pri la homa naturo, S-ro Bleaker ne estas tiom honesta, kiom li postulas de aliaj homoj. La pruvemuloj pri honesteco ordinare estas mem nefidindaj rilate tiun virton. Iru kaj informu lin, ke via edzino trovis funtan bileton en lia pijamo. Anstataŭ pruvi vin, li mem estos pruvita. Se li estas honesta, li diros, ke temas nur pri dekŝilinga. Li krome konfesos, ke li faris artifikon por pruvi vin. Tiam vi povos riproĉi lin laŭ via volo. Sed tion li verŝajne ne faros. Li konfuziĝos, ne kuraĝos konfesi la aferon, kaj finfine akcepte prenos la funtan."

"Mi dubas pri ..."

"For la dubojn. Prenu la bileton," diris Luko en definitiva tono, donante ĝin al Tom. "Lasu ĉe mi la dekŝilingan kaj atentu ni rezulton. Se li ja akuzos pri artifiko viaflanka klarigu al li, ke devas esti, ke via edzino distrite misprenis propran bileton anstataŭ la trovitan; do erare resendis la malĝustan"

Kontraŭaj ideoj ŝajnis batali inter si en la kapo de Tom, sed post nelonga hezito lia fido al Luko venkis. "Facile estas vidi, ke vi elpensis bonan ruzon, Luko," li ridetis, "tamen, se li efektive akceptos vian funtan bileton ....?"

Luko palpebrumis moksolene: "Ne ĝenu vin. Prenu ĝin al S-ro Bleaker."

Tom foriris. Luko tuke ekpoluris glason, kun saĝa rideto sur

la pala vizaĝo.

Post dudek minutoj Tom tre ekscitate revenis. "Luko, li akceptis ĝin!"

Plilarĝigis la rido de la gastejestro. Li ĵetis la viŝilon sur seĝon kaj klinis sin super la benko: "Rakontu detale, Tom."

Tom glutis, preparante la gorgon, ke ĝi estu inda perilo en tia grava afero: "Mi prezentis al li la bileton, dirante al li precize laŭ via konsilo. Li rigardis ĝin iom nervece, komence ne sciis kion fari, sed fine ektiris ĝin el mia mano, grumblis 'Dankon' kaj foriris." Luko balancis la kapon malrapide. "Mi sciis, ke mi ĝuste taksis lin. La etanimaĉa hundo bone tion meritis."

Tom malpacienĉigis. "Sed vi leĝe persekutos lin, ĉu ne?"

Luko milde karesis la lipharojn: "Tute ne. Estas diro: La Virto sin mem rekompencas -- kio signifas: la meritaĵo de bona homo konsistas en la plaĉa sento, kiun donas al li honestaj agoj." Li redonis al Tom la dekŝilingan bileton. "Jen, donu tiun al Molly kune kun mia bondeziro; krome diru, ke estas por ŝi laborloko en la Packhorse se ŝi volas ĝin. Sed -- atentu iom!" Li prenis la bileton el la fingroj de la konfuzita ĉarpentisto kaj anstataŭigis ĝin en la tirkesto per alia, kiun li donis al Tom. "Prefere, ke vi tenu tiun ĉi, ĉar eble la maljuna bufo scias la numeron de la origina bileto. Li ne vidos ĝin ĉe mi."

"Sed, Luko, vi perdas per tio dek ŝilingojn!" Luko prenis pinĉon da snufo kaj ankoraŭfoje palpebrumis: "Ja vere, sed Bleaker ne gajnos ilin. Tiu funta bileto estas falsa. Iu fripono per ĝi trompis tiun stultulinon, kiun mi lastan monaton maldungis. Ĝi estas tiel facilvideble falsa, ke Bleaker neniam sukcesos uzi ĝin alie ol ĉe vi kiel salajraĵon; en tiu okazo vi venigos Vilĉjon, la policanon, kiu, farante laŭ sia devo, kompreneble detruos ĝin sen rekompenco al Bleaker. Mi volus veti, ke ĝuste tiel okazos." Tiel efektive okazis.


-----El la Angla trad. F.R.BANHAM.

### ESPERANTISTOJ FLUGAS de EUROPO al AUSTRALIO. (Daŭrigo.)

LV.Kvara tago: Basra - Jask - Karachi - Jodhpur.  
(Distanco 1680 mejloj; neta flugdaŭro 10 horoj.)

La luksa Shatt-el-Arab Hotelo en Basrah servis al ni nur por tre mallonga ripozo; jam antaŭ la 4-a matene ni devas ellitiĝi. Estas ankoraŭ tute mallume, kiam je la 5-a nia aeroplano leviĝas sub la nigra kupolo de la brilstele ornamita ĉielo. Dum ni flugas laŭlonge de la Shatt-el-Arab, la unuig-rivero el Eŭfrat kaj Tigris, la ĉielo ĉe la horizonto iom post iom heliĝas kaj koloriĝas en ĉiuj koloroj de ĉiel-arko, unue en tre mallargaj strioj, kiuj poste pli kaj pli largiĝas kaj etendiĝas, ĝis fine la unuaj radioj de la arderuĝa sun-disko briligas ĉion.

Post duona horo ni atingas la Iranan Golfon, kiu estas fame konata kiel unu el la plej varmegaj regionoj de la tero. Malgraŭ tio ni ĝuas en nia flugkabino ĉiam agrablan, freŝan kaj malvarmetan




aeron. Unu horon ni flugas super la verdaj marondoj, kaj jen ni preterpasas la havenurbon Bushire, de kie unu el la plej malnovaj karavan-vojoj kondukas al la ĉefurbo Teheran. Dum ni nun sekvas proksimume la marbordon de Iran, ni neniam perdas la vidon al la montaroj, kiuj estas ĝis 9000 futojn altaj kaj borderas al altebenon de Iran formante tre sovaĝan bordlinion. Jen kaj jen ni vidas etajn havenojn kun blankigitaj domoj kaj verdaj makuloj, kiuj estas internaj kortoj kun ombredonaj arboj kaj refreŝigaj fontanoj.

Dum kelkcentmejla flugo en sudorienta direkto laŭ la bordo grizaj, blankaj aŭ ruĝaj montoj ĉiam akompanas nin, ĝis ni ree transflugas la golfon, sur kies ondeca akvo kviete balanciĝas blankvelaj ŝipoj de perlfisistoj. Kaj nun ni transflugas Ras-el-Djebel, sovaĝan duoninsulon el nigraj minacaj rokoj, kiu enŝovas sin profunde en la Iranan Golfon de la araba flanko. Oriente de ĝi estas la Golfo de Oman, kaj transfluginte ĝin ni ekvidas Jask (Djask), tre malgrandan lokon, kiu dankas sian ekzistadon precipe al la Brita Kablo Stacio, sed kiu perdas sian valoron ĉiam pli pro la rapida evoluo de la sendrata telegrafio.

Preskaŭ kvin horojn post nia frumatena forflugo ni surteriĝas tie en la eta aerodromo de Jask. Vasta ebenaĵo proksime al la maro, kovrita de arde-blanka sablo, kuŝas antaŭ ni en la blindige brila sunlumo. En granda distanco vidiĝas kelkaj grizverdaj palmarboj, kaj malantaŭe strange-aspektaj montoj kun krutaj deklivoj formas monstran silueton kontraŭ la bluega ĉielo. Sed ĉirkaŭ ni estas nur sablo, sablo en terura varmego. Nur 300 jardojn de ni situas malalta refreŝigdometo; sed en ĉi tiu detrua brulego oni ne povas atingi ĝin piedire. En la ombro de la aeroplan-flugiloj ni devas atendi, ĝis aŭto veturigas nin al tiu proksima-malproksima ripozejo. Ĝi levigas kelkajn

futojn super la marnivelo, malfermita al ties freŝaj ventblovetoj unuflanke, sed ŝirmita aliflanke kontraŭ la sunvarmeĝo per dikaj argil-muroj. Interne regas surprize agrabla atmosfero; ni ripozas ĉirkaŭ plene kovrita manĝotablo, kies bongustaj specialaĵoj allogas nian apetiton, dum irana servisto en ŝafidfela kapkovraĵo zorgas por ni kaj vendas al interesatoj la multkolorajn iranajn poŝtmarkojn. Dume la piloto rakontas al ni, kiel malriĉa la loĝantaro de tiu vilaĝeto estas; ĉiam li kunportas por ili kelkajn eluzitajn vestaĵojn el Nederlando, ĉar ili ne povas aĉeti ion ajn.

Mallonge antaŭ nia forflugo ni travivas etan sensation: la kontraŭ-aeroplano, venante de Karachi, surteriĝas antaŭ ni, kaj pilot-



oj kaj pasageroj interŝanĝas viglajn salutojn. Baldaŭ ni adiaŭas de tiu unika loko, kiu malgraŭ la varmeĝo postlasis en nia memoro simpatian impreson de refreŝiga oazo.

En alteco de dek mil futoj ni plue flugas laŭ la irana marbordo. Multaj riveroj tratranĉas la ebenon, sed ili enhavas nur malmulte da malklara verda akvo, kaj ankau tion nur ĉe la enbuŝigo, aliloke nur la sablaj fluejoj estas ekkoneblaj. Dum sube la pejzaĝo estiĝas malinteresa, por ni en la flugkabino estas surtabligita bonega lunĉo: varmega supo, malvarma viandaĵo kun salato, fruktoj, fromaĝo kaj Nederlanda kafo, kiu estas laŭ la opinio de ekspertoj la plej bona kafo en la mondo.

Post du horoj ni atingas la limon de Baluchistan kaj ekvidas dekstre la havenon Gwadar, sur kies blanka plaĝo multaj ŝark-kadavroj rostiĝas en la suno, ĝis iliaj naĝiloj fariĝas bongustaj por Ĉinoj. Unu horon kaj duonon ni flugas super Baluchistan ĝis ni alvenas la limon de Hindujo kaj tuj poste ni malleviĝas kaj alŝvebas la flughavenon de Karachi.

Bedaŭrinde, ni povas vidi la urbon mem nur de malproksime; laŭdire ĝi estas treete pura kaj moderna. Karachi estas la okcidenta pordo de Hindujo rilate la aer-trafikon. Estas la 4-a posttagmeze, ni ĝuas mallongan temaĝon inter urban-kovrita servistaro kaj poste ĉiu pasaĝero devas trapasi mallongan kuracistan ekzamenon, kiu fakte estas nura farso. La kuracisto demandas la nomon, premas la pulson dum kvin sekundoj kaj ĉio finiĝis. En Karachi tri el niaj kunpasaĝeroj forlasas nin; ni estas nur kvin kiam ni post duonhora paŭzo ree forflugas.

Baldaŭ negastama lando kuŝas sub ni, ni superflugas parton de la Indus-delta, kies fluejoj estas duone sekaj, kaj preterpasas Hyderabad, mondfaman lokon, ĉar ĝi estas la plej varmega urbo surtere. Dum somero tie la termometro montras 135°F aŭ pli en la ombro. Sur la dom-tegmentoj troviĝas altaj ventilatoroj, laŭforme kamentuboj, por ekkapti ĉiun etan aerbloveton, kiu povus eble havigi iom da malvarmeto al la enloĝantoj.

Post Karachi, do oriente de la Indus-rivero, komenciĝas la sennlima vastejo de rokoj kaj sablo, la Hinda-Dezerto. Longajn horojn ni flugas sur ĝi, dum pli kaj pli noktiĝas, kaj nur kvaronon post la 7-a ni atingas la aerodromon de Jodhpur, kompreneble en plena mallumo. Aŭtomobilo rapide kondukas nin al la pompa State Hotel, kies konturoj estas feste iluminitaj per miloj da elektraj lampetoj. La ŝtata Hotelo estis konstruita de la Maharaja de Jodhpur, por logigi aerpasaĝerojn kaj ŝtat-gastojn. Sufiĉe lacaj ni enbuŝigas parton de la sennombraj pladoj kiuj formas sibiritan ĉefmanĝon, prizorgita de precize dudek servistoj, brunaj kaj nigraj, ĉiuj en kaptanoj kaj turbanoj, sed kun nudaj piedoj. De la altano-koridoro, kiu kondukas al niaj ĉambroj, ni havas elrigardon al la najbara palaco de la Maharaja....., sed malgraŭ ĉiuj grandiozaj impresoj de la tago, miaj rigardoj fiksiĝis sur futlonga lacerto, kiu trankvile kaj senĝene grimpas sur la muro ĉe la enirpordo al nia ĉambro. Tion kaj la indiĝenan servistaron, kiu kaŭras surplanke ĉie en la koridoroj, ni opinias enlandan specialaĵon. Ni eniras niajn apartementojn, kaj post refreŝiga bano falas mortlacigite en la litojn, ŝirmitaj per moskito-retoj, .....estas duono post la 9-a, .....kaj tre baldaŭ la monotona zumado de la elektraj ventilatoroj kante forportas nin en la landon de la sonĝoj -----.

(La mapon bonvole ŝablonegis F-ino Hall)

----- P.SCHWERIN.

Ĉe Gajiga Kabano, Adelaide, lastatempe, pano-kaj-butera pudingo estis unu el la manĝaĵoj metitaj sur la tablon por la soldatoj, kaj dum la manĝo oni informis la manĝantojn per son-pligrandigilo, ke unu el la memvolaj helpantistoj perdis diamanton de sia fianĉa ringo, kredeble dum ŝi pretigis la pudington. Ĉiu manĝanto zorge observis ĉiun ereton, kaj la diamanto troviĝis -- en la mansako de la posedanto.

El THREE DESERTS de C.S.JARVIS, late Governor of  
Sinai.

La kuracisto ĉe Dakhla estis "difficile" -- ĝentila vorto por kverelma -- kio estis kredinde pro la klimato; ĝi faris min kverelema ankaŭ; kaj unu tagon mi ricevis plendon de dek unu omdahs (urbestroj) ke ili estas treege maldekolate insultitaj de la kuracisto. Se unu, aŭ eĉ tri pléndis mi estus provinta decidi la aferon per korespondado; sed pro tio, ke la tutaj dek unu koleriĝas kaj estas pretaj mem kontraŭagi, la afero ŝajnis esti grava kaj postuli mian ĉeeston.

Post mia alveno, la dek unu omdehs eniris mian oficejon, kaj ekster ĉia dubo, ili estis ja tre plej kolefaj. Ili estis aĉege insultitaj kiel jene -- la kuracisto aĉetis dek unu meleagrojn kiujn li enhavis en sia ĝardeno, kaj li estas nominta ilin laŭ la nomoj de la dek unu urbestroj de la oazo. Ili, la elektitaj estroj de siaj vilaĝoj, kies oficiala rango kiel homoj de moŝteco estas aprobita de la regado, havis siajn nomojn donitajn al meleagroj -- nure birdoj -- kio estas netolerebla kaj degrada. Mi havis grandan malfacilon reteni mian ridadon, ĉar la dek unu grasaj homoj, ruĝaj, pro kolerego kaj gestantaj en mia oficejo, certe ja tre similis meleagrojn.

Mi demandis al la kuracisto, ĉu tiu aserto estas vera, kaj li estis tute nekaŝema pri ĝi -- li aĉetis la meleagrojn kaj nomis ilin laŭ la "omdehs". Ili estas tre belaj meleagroj, tre grasaj kaj en la plej bona stato, kaj li vidas nenian kaŭzon de ĉagreno. Por gajni tempon, mi sugestis ke ni ĉiuj iru por rigardi la meleagrojn, kaj ni marŝis al la ĝardeno de la kuracisto, kie la dek unu birdoj fierpaŝis kaj gongblekis laŭ sia kutime ridinda maniero; sed estis tre malfacile trovi insulton, ĉar la meleagroj estis videble belegaj specimenoj el ŝia speco, kaj kontraŭe la "omdehs" ne estis tre inspirantaj. Ili havis tutan la fanfaronadon de la birdoj, sed neniom de iliaj bonkvalitoj aliaj.

Estis malfacila kaj absurda situacio, sed mi sukcesis solvi ĝin pli-malpli kontentige, dirante, ke la evidenta konkludo el la donaco de la nomoj estas, ke la kuracisto kompreneble intencis prezenti al ĉiu omdeh, la birdon nomitan laŭ lia nomo -- tre delikata maniero festi la venontan Bairam-libertempon. La kunveno atingis feliĉan finon; ĉiu omdeh dignoplene formarŝis kun meleagron sub la brako. La sola persono kiu ne estis tute kontentigita estis la kuracisto, kiu sentis ion da ĉagreno, vidante 150 funtojn da bona blanka viandaĵo forlasanta sian ĝardenon por ĉiam, sed li ĝuste konstatis sian pozicion esti tro malfacila por protesto. Mi eltrovis poste, ke nomi beston aŭ birdon laŭ persono estas mortiga insulto en la oriento.

----- L.E.BAILEY. (trad)

Ateisto estas homo, kiu ne havas nevideblajn rimedojn de subteno. John Buchan (Lord Tweedsmuir.).

-----



Oni povas rimarki ~~em~~ flanko de "Esp-jistoj uzi malgrandajn komencliterojn eĉ je lokoj, kie povas starigi miskomprenoj, ekz-e ĉe paria, bearna, kreta, malta, samosa. Vane oni serĉus al paria (A. Parian; parolante pri la insulo Paros) en vortaroj. Per la uzo de grandliteroj oni povas unuavide rekonii derivaĵojn el personaj nomoj, kio evitigus al miloj tra la mondo la ĉagrenon serĉadi al nelistitaj nomvortoj.

Sed mi krome sugestus, ke estas psikologia faktoro pri kiu ni devas konsideri. Ekzistas multaj legantoj, kiuj juĝas ian tekston interesa laŭ tiom da konkretaĵoj, lokaj, historiaj, nomaj vortoj troviĝas en ĝi. Angle oni ne uzas minusklojn (malgrandliterojn) ĉe propraj nomoj aŭ ties derivaĵoj, krom se ili estas plene asimilitaj en la lingvon, kiaj colossal, herculean, titanic, quixotic (kolosa, herculesa, titana, kiĥota). La ofta uzo de majuskloj (grandliteroj) ĉe vortkomencoj en tiu lingvo ebligas al mi, per facila glito de la okuloj, konstati, ke la teksto verŝajne estos por mi dolĉe suka. En "The Intellectual Life" de P. Hamerton, la aŭtoro ĉarme pritraktas la multflankan vivon de la studema homo. Nu, se li limigis sin al seka, abstrakta verkado, "senmajuskla", mi ne estus leginta ĝin eĉ unu fojon, sed ĉar li prempakis la libron per anekdotoj, mencioj pri Schiller, Shelley, Hugo, Hazlitt kaj aliaj, kaj pri cent lokoj literaturaj, mi legas ĝin kun streĉa intereso la duan fojon. La uzo de majuskloj donas "karakteron", "personecon" al teksto; krome forte faciligas citserĉon, ĉar la serĉata vorto, se ĝi havas majusklon, "elstaras" el la teksto.

Lippmann en "Oficiala Dokumentaro Esp-a" (1928) traktas la diferencon inter "Sokrata demando" kaj "sokrata demando"; "Herkulesa tasko" kaj "herculesa t."; la unua indikas, ke Sokrato mem demandas, la dua, ke iu demandas laŭ la maniero de Sokrato, sed ĉu oni ne rajtus supozi, ke la kunteksto nepre malebligus miskomprenon? Zam, uzis "Sizifa" ĉe Fund. Kr. 307 (La uzo de majusklo faciligas al mi trovi la vorton en tiu verko). Zam, en siaj laste aperintaj verkoj pli libere enŝutas grandajn komencliterojn, kaj mi de nun uzos ilin ĉe ĉiaj derivaĵoj de propraj nomoj, ekster tiam, kiam io grava devigos al mi fari rompeton al tiu mia principo.

----- F.R.BANHAM.

"POST LA FEBRA AGADO DE LA VIV!".....Estas erara la vasta kredo, ke, malgraŭ tio kiom malzorgas homo kiam sana, li forte timas morton kiam ĝi proksimiĝas. Mi havas 500 fidele komplitajn observojn pri mortoj. El ili 90 mortantoj suferis neniom da korpa doloro aŭ malkomforto; li montris ian mensan timeton ("mental apprehension" ne estas klara por la trad.); du efektivan teruron, unu spiritan ekzaltcon, unu amaran konscienciproĉon. La tre granda plimulto donis neniam signon; simile al ilia nasko, ilia morto estis endormiĝo kaj plenforgeso.

-----Sir William Osler(The Student Life)

REDAKTORA BABILADO.

Ni sentas plaĉon pri nia agado por 1942. La A.E.A. estis for-  
mita kaj nun estas Landa Asocio de I.E.L., la universala organizo;  
dek du numeroj de LA RONDO eldoniĝas; adresaro kompakta estas kroma  
frukto. Bedaŭre ĝi ne aperis en sufiĉa nombro kaj multaj amikoj de  
nia afero priploras mankon de ĝi. Espereble nova eldono, dank' al  
nova fortostreĉo, estos havebla en 1943. Kiel vi helpis al Esperanto  
pasintjare? Kion vi intencas fari por ĝi en 1943? Ne necesas, ke vi  
postulu de vi grandajn aferojn -- faru simplaĵojn. Parolu pri Esper-  
anto en konvenaj okazoj, uzu stampilon sur viaj poŝtaĵoj, portu ste-  
lon, skribu Esp-ajn frazojn en gastejaj vizitlibroj, per diskreta  
lingvaĵo verke batu tiujn, kiuj atakas Esperanton en gazetoj. Vi  
povas, devas fari almenaŭ ion favore nian aferon se vi efektive vol-  
as helpi konstrui internacian organizon taŭgan kaj pretan por la  
postmilita fermentado, kiam la helplingva demando denove levigās en  
rondoj komercaj, kulturaj, eĉ ŝtataj. Miloj da Germanaj, Polaj,  
Rusaj Esperantistoj, soldatiĝintaj, nun silentas por ĉiam; aliaj  
miloj alsaltu iliajn lokojn, por daŭrigi ilian laboron eĉ pli obstine.

Ĉu vi konas facile kompreneblan, frape interesan, lerte sed klare  
verkitan rakonton? Se jes, ĉu vi tradukus ĝin por LA RONDO? Aŭ pet-  
us nin fari tion? Ĝi ne okupu pli ol 1½ paĝojn.

Ni bonkore salutas legantojn okaze de la sankta sezono de la jaro,  
tamen sentante la animpemon de la vasta lukto nin ŝiranta la homar-  
on. Kelkajn el nia rondo sendube ĝia fera mano atingis; al tiuj kur-  
aĝon. La gajaj, facilkoraj Kristnaskoj de antaŭ 1914 ŝajnas tre tre  
for. Ilia spirito revenos, se ne por ni, certe por alia generacio.  
Dume, parafrazante la laŭreaton de antaŭ cent jaroj, ni kantas:

Per la tremantaj fingroj ni kunplektas  
L'ilekson ĉirkaŭ la Kristnask-fajrejo;  
Milita nub' posedas nian landon,  
Malgaja Sankta nokto mallumiĝas

Ĉe la kutimaj ludoj en ĉambrego  
Saltetas ni kun ia vana ŝajno  
De ĝojo, tamen kun terura sento  
Pri Morto-Ombro, ĉion observanta.

Sed jam trembrilas tra la vualo fendeto da lumo. La kirlo de  
mondeventoj flustras pri pli bona perspektivo. Ĉu vere la nigraj  
muboj komencas fordisiĝi, lasante aperi la aŭronon de l'paco? Kaj  
nia lasta Kristnasko sub milito? Dio volu.

-----  
S-ro Rawson havas por vendi: Lernolibro (Robbie) 1/-. Step by Step,  
2/6. English-Esperanto Dictionary (Fulcher & Long) 12/6.  
-----

LETERO de SINJORO G. GORDON.

Dear Mr. Banham,

I have just read the amusing discussion about "wiry" on page 166 of La Rondo, and there came to my mind Zamenhof's equivalent of "stiffnecked", "stiff of forehead" (Exodus 32/9, Ezekial 3/7 -- malmolnuka; malmola frunto).

Elsewhere in the literature there is "heartless", "stony-hearted", "cold-blooded", but I cannot indicate precisely.

When a learner becomes critical it is a sign that he is making progress. Criticism should be encouraged. I have always been critical and have asked others to criticise me, sometimes with the result that I have been criticised for using words used by Zamenhof and Kabe. An American gazette ridiculed my use of "fumaji" herrings, which was used by Zamenhof, Kabe and Grabowski.

Yours very truly,

Geo. Gordon.

13.10.42.

-----

NU TRADUKEMULOJ.

La Germanoj uzas "Kettenrauchen" (ĉenfumi), same la Angloj, "chain-smoke", kiu vorto donas ideon pri fumado de sinsekvaj cigaredoj laŭvice ekbruligitaj unu per alia. Konsiderinde estas "seriofumanto"; kaj "ĉeno" estas uzata figure, kiel en "ĉeno da montoj, ideoj, veturiloj, generacioj". Tial "li fumis ĉenon da cigaredoj", "ĉenfumisto" ŝajnas eksperimentindaj. "Sophisticated" estas vorto pri kies signifo ni aparte atentigus tiujn (jun)ulinojn al kiuj plaĉas kredo, ke ili estas tiaj. Ĝi tute ne estas honora termino sed havas sinonimojn "adulterated, debased, corrupt, vitiated". Kial la vorto sidas en tiom malbela kompanio? Jen interesa studeto. "Wishful thinking" estas rezonado en kiu argumentanto, ignorante la logikon, lasas sin tro influi de sia optimismo, partiemo, esperoj aŭ deziroj. Sekve, li parolas duonverojn, evitas malplaĉajn faktojn -- restas en eraro.

- (1) La senĉese-fumantoj de cigaredoj voke mendis trinkaĵon por ĉiu el si (aŭ tuttablan trinkon).
- (2) La mondumulinoj (mondume saĝaĉaj virinoj) permesis al si rezonadon tro influatan de propraj deziroj.
- (3) Li havas ĉirkaŭ tiom (same) da pomoj, kiom (li havas) da piroj.
- (4) Kion vi scias tian, kion ni ne scias? (Ijob 15/9). (Aŭ, kion vi scias nesciatan de ni?)

TRADUKU: (1) The happening in the zoo intrigues me.

(2) The wind ripples the lake.

- (3) To be witty at some one else's expense.  
 (4) His sore point. (5) He's under her thumb.  
 (6) An embarrassment of riches. (7) The data is insufficient.  
 (8) You're cut out for the work.  
 (9) That's an example of reasoning in a vicious circle.

AL SOLDATO FORA.

"Kiam fine trafas vin skribpaĝoj,  
 Post sopirado koropreme longa,  
 Vi serĉas nek al epigram-spritaĵoj  
 Nek prozo riĉa, arte lerte ĵongla.

"Ho tute ne! Vi legas kun avido  
 Rimarkojn hejmajn, kare familiajn ---  
 Amikvizito, mangotabla rido ---  
 Kaj en imago partoprenas tiajn." F.R.B.

KASO de la RONDO.

<u>ENSPEZOJ.</u>	£.s.d.	<u>ELSPEZOJ.</u>	£ s.d.
Konta transpreno.....	4.6.1	Poŝto.....	19.6
S-ro Brown.....	3.6	Papero.....	16.-
S-ro Shelton.....	3.6	Ŝablonaĵoj.....	11.4
S-ro Rutland.....	3.6	Luo.....	5.-
F-ino Cox.....	3.6	Bindpingloj.....	1.6
S-ro Dornbusch.....	3.6	Okazaĵ Elspezoj.....	2.6
S-ro Masel.....	3.6		<u>£2.15.10</u>
S-ro Roberts.....	8.6	En la kaso £2.19.9	
	<u>£5.15.7</u>		<u>£5.15.7</u>

(Notu:- eraro en Oct. kontoj. Legu S-ro King 5/6)

W.ADDIS 25 Greville Ave. Flinders Park, Adelaide, S.Aus.

RICEVITA: To NARCISSA, by JACK in the MIST. Facile fluantaj versoj kelkaj el kiuj evidentigas, ke la spirito de Eros forte efikis sur la animon de la aŭtoro. La misuzo de "lay" en la antaŭlasta poemo (Against my Breast tonight You'll lay--) metas nian amikon en la kompanion de Lord Byron, Lord Houghton, Wilkie Collins, Henry Kingsley, kiuj simile eraris.

ASOCIAJ APEROJ.

**SALUTO!** Nome de la Prezidantino kaj la Komitato de A.E.A. mi volas al ĉiu membro kaj leganto ĝojan Kristnaskon. La nova jaro alportu al la mondo tiun pacon jam sopiritan ĉie. Nia Asocio kaj ĝia Organo daŭre progresu, kiel dum la nuna jaro kaj prosperan tempon al ĉiuj.

**SOLDATOJ SERVANTAJ EKSTERLANDE.** Lieut H.W. Buswell, kiu servas eksterlande kun la Aust. Imperia Armeo (A.I.F.) deziras eltrovi la Nom-adresojn de Esp-istoj kiuj ankaŭ tiele servas. Se vi scias la nom-adreson de tia samideano bonvolu avizi la sekretarion.

**MONO.** Ĉar kelkaj membroj ne scias ĝuste al kiu sendi monon, ni donas la jenan klarigon. La Asocian Generalan Kason, kaj la libro-servan monon regas la Sekretario. F-ino Addis, Kasistino de LA RONDO, regas la kason de la gazeto. Oni povas sendi monon al iu el ili por iuj aŭ ĉiuj el la kaso, sed ĉiam klare montru vian volon pri mono sendita, por ke ili povu ĝuste difini la monon. Individuaj membroj de I.E.L. povas sendi kotizojn de la Ligo al la ĉefdelegito, S-ro L.E. Pfahl, 64 Brighton St., Croydon N.S.W. Sed bonvolu ne sendi al li monon kiu rilatas sole nian Asocion. La A.E.A. kotizoj kaj abonoj estas :- Membro-Abonanto 5/-; LA RONDO al nemembroj 3/6 (afrankita). Sur poŝtbileto ne enskribu nomon de la urbo en kiu oni kontantos ĝin.

**LIBROSERVO.** Donacoj danke ricevitaj:- S-ro Hart 2/6, F-ino M. Oldham 3/-, D-ro F.J. Williams 5/-, S-ino H. Johansen 3/-, -- Sumo ĝis nun 10/9/6. El la 4 libroj donacitaj de S-ro A. Turner 3 jam vendiĝis - la kvara, "Mr. Tot aĉetas mil okulojn," tenas nian peranton en W.A., S-ro A. Chamberlain, 55 Kenny St., Bassendean -- La prezo 2/6.

**KVITANCOJ** ĝis 18/11/42. Bonvole pagis la kotizon de (1) membro, F-ino M. Oldham. (2) Aliĝinta Grupo, Sydney Esp. Societo, Melbourne Esp. Klubo, (3) Membro-Abonanto, F-inoj M. Helm, L. Morphy, J. Williams; F. Kemp; S-ino H. Johansen; D-ro F.J. Williams; S-roj H. Calwell, W. Lamb, C.C. Dornbusch, L.R. Roberts, I. Masel, E. Hart, P. Holmes; S-roj Brown, Rutland, Shelton; F-ino Cox.

GEORGE HILLERMAN (Sekretario)

Box 75, Devonport, Tas.

**KOREKTOJ** al la Novembra numero:-

P. 193, linio 1	Drinkejestrino
196 " 7	subtilnuanca
197 " 15	klubkunveno
197 " 16	sprita (anst. spirita)
198 " 1	prefere (anst. <u>prefereble</u> )
198 " 12	forkurigi

Typing errors not corrected in this no. will be listed in our next.

NOTOJ.

S-ro Malmgren (Stokholmo) raportas, ke la gvidantino de la Estona Esp. movado, S-ino Helmi Dresen, estis pafita de Germanoj kiel danĝera persono. Ŝi naskiĝis 1892, E-iĝis 1912, poetino kaj "animo de la movado en Estonujo." Lektoro Henrik Seppik estas arestita.

Ferman Boucon, nask. 1856, mortis en Annecy, Francujo. Profesoro, li verkis tradukon de Moliere, La Mizantropo. L.K. de 1909. Esp-isto de 1898.

Teo Jung "en la lasta tempo fariĝis pli esperplena ol iam antaŭe!" En Danujo E-o floras. En Portugalujo kaj Svedujo aperis libroj en aŭ pri Esperanto.

La Hidrografia Oficejo de la Usona Militŝiparo uzas ankaŭ E-on en siaj flotboteloj. Trovintoj de tiaj sendu al la Oficejo en Usono.

NEKROLOGO. La 12an de Oktobro mortis Fraŭlino Maude Hopton, en Malvern, Viktorio. Ŝi estis ano fidela de la Melbourne Esperanto Society kaj Grupo Espero (Surrey Hills) kaj konscienca plenumanto de la skribaj taskoj dum la jaroj en kiuj Sinjoro Geo. Gordon kondukis la Tradukan Rondon. Ni sincere kondolencas.

"To Narcissa": Twenty Lyrics. Kontraŭ p.m. afranko ĉe J.Eljot, 2 Cambridge Str., Willoughby, N.S.W.

-----

HOMO TRAPASANTE ponton ekvidis aliulon, kiu ekgrimpis sur la barilon, ŝajne celante sinmortigon. "Hej," ekkriis li, "kion vi faras? Ne estas permesata dronigi vin. Rakontu al mi vian malfacilaĵon!" "Ve!" plendis la dronvolulo, "mia sorto estas terura. Ĝam mi estis feliĉa homo, sed mia edzino iĝis kverelema ebrulino. Ŝi perfidis min kaj mi devis ŝin eksedzinigi. Mi finfine malsaniĝis kaj perdis mian oficon. Mi ne scias kio okazis pri mia eksedzino." "Ĉu vi diris, ke ŝi estas kverelema ebrulino? Kia estas ŝia nomo?" "Katrino." "Ĉirkaŭ kvardekjaraĝa?" "Jes." "Diablo! Guste kun ŝi mi lastatempe edziĝis. Restu tie ĉi; mi dronos!"

C. THOMPSON (trad)

AUTORO vizitis aktoron, kiu estis patro de tri tre viglaj infanoj. Tiuj ĉi tiel laŭte bruaĉis, ke estis neeble interparoladi. Inter aliaj petolaĵoj la infanoj frapis najlojn en la meblojn per martel-etoj. La vizitanto, fingre montrante al unu el tiuj perturbantoj, diris al la patro: "Ĉu ne malutila al vi, ke tiu diableto enbatas najlojn en viajn belajn meblojn? Ĉu tio ne ŝajnas al vi iom altkosta?" "Altkosta?" ridetis la aktoro, "tute ne. Mi aĉetas najlojn je pomalgranda prezo."